La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №3

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №3 (321)

La Ondo de Esperanto **aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.**
Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.
Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.
Eldonas kaj administras: Halina Gorecka
Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)
Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro)
Peter Baláž
Stanislav Belov
István Ertl
Irina Gonĉarova
Povilas Jegorovas
Wolfgang Kirschstein
Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando
Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com
Retejoj: https://esperanto-ondo.ru, https://sezonoj.ru
Abontarifo por 2024 aŭ 2025

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj
Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj
Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)
Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)
Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)
Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)
Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.
Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.
Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2024, №3 (321).
Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.
Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.
Подписано в печать: 7 октября 2024 г.

© La Ondo de Esperanto, 2024

En ĉi tiu numero

Bazaj informoj pri *La Ondo de Esperanto* 2
En ĉi tiu numero. 3

Temo **5**
Jukka Pietiläinen. Unika okazaĵo en Aruŝo 6
Rezolucio de la 109a Universala Kongreso de Esperanto 9
Miora Raveloharison. Afrika Kongreso de Virinoj 10
Aleksander Korĵenkov. Adiaŭ, Aruŝo! Saluton, Brno! 12
Ranja Zafinifotsy. La Infana Kongreseto unuafoje okazis en Afriko. 13
Diplomoj de UEA pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj 14
Du laŭreatoj de la premio Deguĉi 2024 15
Miguel Gutiérrez Adúriz. Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2024. 16

Eventoj **18**
Roman Raljko. IJK-80: Malfacila vojo al kaj el Ŝventojo 19
Lars Sözüer. 1500 kilometroj sur du radoj 23
Aristóphio Andrade Alves Filho. ILEI-kongreso, unuafoje en Brazilo, duafoje en Sudameriko 25
Nova estraro de ILEI 27
Novembraj C2-ekzamenoj 27
Ulrich Matthias. Pola Kongreso en Kalisz – sukcesega kaj kortuŝa 28
Ilona Koutny. UAM: Bonaj rezultoj de la unika eksperimento 30
Ilona Koutny. Fino de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano 31
Ilona Koutny. Interlingvistika sekcio en Internacia Lingvista Kongreso 33
Russ Williams. La 38a Arkones: Laŭdire la lasta. 34
Bill Maxey. NASK-2024: 25 lernohoroj kaj multo alia 37
Steven Cybulski. Postkongresozaj notoj el Usono 39
Dennis Keefe. Ni venis, ni vidis, ni Valenciis 41
Ulrich Matthias. Itala Kongreso: Impona kiel ĉiam. 43
Vinko Markovo. Oportuna jubileo por SAT-Kongreso 44
Surinsula kongreso de kroataj esperantistoj 45
Nedeljka Ložajić. Interkulture kaj inkluzive en la ĉefurbo de Serbio 47
Gražina Opuskienė. La 58a BET en la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo 49
Povilas Jegorovas. Kunflugo kun eŭrop-parlamentano kaj aliaj famuloj 51
Povilas Jegorovas. Ekspozicio omaĝe al Petras Čeliauskas 53
Felix Zesch. La 45a REF: Gajaj en Geyer. 54
Heinz-Wilhelm Sprick. Rata Rendevuo kun muzeo, ĝardeno kaj piroteknikaĵoj 55
Bert Schumann. La verda somero en Greziljono. 57
Esperanto-kurso por hispanlingvanoj 58
Irina Gonĉarova. KLERo: Survoje al la junulara Movado en Ruslando 59
Irina Gonĉarova. La dua Kalejdoskopo de lingvoj en Odincovo 61
Lupo. La Verdaj Skoltoj tendumadis en Ĉeĥio. 62
IJK 2025 okazos en Indonezio 63
Bonvenon al BET-59 64
BET-59: Konatiĝu kun Arno Lagrange 66

Aleksander Korĵenkov. Aliĝu al UK-110 en Brno 67
Lu Wunsch-Rolshoven. Novjara Renkontiĝo denove en Wiesbaden 67
JES: Unuafoje en Belgio 68
3a NaturAmikara KulturSemajno en Esperanto. 68
La 5a Virtuala Kongreso de Esperanto 69
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas 70

Tribuno 71
Vytautas Šilas. Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno. 72
Etsuo Miyoshi. Politikistoj de EU kaj Esperanto 77
Etsuo Miyoshi. Konfirmo pri samrajteco de Esperanto ĉe Eŭropa Unio 78
Renato Corsetti. Eŭropaj komencOntoj. 79
Renato Corsetti, Ulrich Matthias, Keyhan Sayadpour. Solidara kampanjo: Helpi la edzon de Miora. 80
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Redakcie 81
Aleksander Korĵenkov. Telegramo: Pli ol 400 abonantoj de “Esperanto-novaĵoj” 81
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco, la 21a de septembro 2024 82

Arkivo 83
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2024. 84

Kulturo 86
Aleksander Korĵenkov. Vsevolod Ivanov: nesufiĉe konata verkisto. 87
Vsevolod Ivanov. La kornaĵo. La bebo. La kampo. La vivo de Smokotinin. Andreo Kuzjmiĉ (Trad. Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova, V. S. Neminem) . . 89
Paulo Sérgio Viana. Abstino 122
Laure Patas d’Illiers. Veroniko. 126
Sergio Pokrovskij. Pri *Faŭsto* en Esperanto (Recenzo: Johann Wolfgang von Goethe. *Faŭsto*) 129
Carlo Minnaja. Plia paŝo al ĝisdatigo, kvante kaj kvalite (Recenzo: Sten Johansson. *Plia dozo da prozo*) 149
Paŭlo Moĵajevo. Albumeto agrabla sone, sed malriĉa je enhavo (Recenzo: Tim. *Bela vivo*). 151
Spomenka Štimec. La Zagreba lernolibro de Esperanto en la svahila 152
Floréal Martorell. Rapidu, vagonaro! 153
Bobelarto. La 3a Interkultura Novelo-Konkurso. 153
Aleksander Korĵenkov. *Unesko-Kuriero*: Konstrui por estonteco. 154
Literatura Foiro, 2024, №330 155
Literatura Foiro, 2024, №331 156

Mozaiko 158
Stanislav Belov. Bonan vojaĝon! 159
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj 160
Perantoj de *La Ondo de Esperanto*. 161

Kovropaĝe: La unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko iĝis la ĉefa evento de la jaro en Esperantujo. Ĝia unua programero estis la movada foiro en kiu pluraj internaciaj, naciaj kaj fakaj organizoj kaj entreprenoj prezentis sian agadon. *(Foto: John Huang)*

Temo

La unua Afrika UK iĝis la ĉefa Esperanto-evento de la jaro. Legu pri ĝi en la 12-paĝa sekcio “Temo”. La prikongresajn fotojn afable disponigis John Huang.

Unika okazaĵo en Aruŝo

109a Universala Kongreso de Esperanto Aruŝo, la 3–10an de aŭgusto 2024

La unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko estis vere unika okazaĵo. Ne nur pro tio, ke inter laŭdire 600 kongresanoj (el 854 aliĝintoj) proksimume duono estis afrikanoj, sed ankaŭ pro tio, ke la afrikaj partoprenantoj ĝenerale estis tre junaj. Eventuale ĉi-foje mi ne apartenis al la pli juna duono el la kongresanoj, kio ankoraŭ estas realo por mi en multaj eŭropaj Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj.

Juneca afrika vervo videblis ekzemple en tio, ke la kongresa kuriero estis komence kvarpaĝa en papero A4 kaj sekve kun malgrandaj literoj, sed eventuale pro plendoj, poste la grandeco duobliĝis. Mirinde estis ankaŭ ke el pli ol 30 infanoj de la infana kongreseto preskaŭ ĉiuj estis afrikanoj.

La kongresejo estis aparte taŭga por Esperanto-kongreso, des pli ke eblis paroli kun aliaj kongresanoj ekstere, kie regule videblis diskutoj inter kongresanoj el diversaj partoj de la mondo. Multaj afrikanoj estis komencantoj, sed ankaŭ multaj parolis bone malgraŭ malmultaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj pli frue. Ankaŭ la teknikaĵoj bone funkciis, retkonekto en la kongresejo foje estis iom kaprica, sed kiam aperis teknikaj problemoj, ekzemple, okaze de montrado de filmoj, la kongreseja personaro solvis ilin rapide kaj kontentige.

La inaŭguro komenciĝis kun duonhora malfruo, kio videble kaŭzis nervoziĝon

Foto: John Huang

inter la respondeculoj. Ne estis rezervita kroma tempo post la inaŭguro, sed la sekvaj programeroj jam estis planitaj tuj poste en la sama salono. Tamen indis atendi, ĉar partoprenis vicministro pri turismo kaj naturaj resursoj, kiu eventuale venis el la ĉefurbo Dodoma kaj portis saluton de la ministro. Partoprenis ankaŭ multaj lokaj gravuloj, pli ol mi antaŭe vidis en solena inaŭguro, kaj ĉiuj el ili parolis en la svahila kun Esperanta traduko. Nur en la fermo la reprezentanto de ekskursa agentejo uzis la anglan. Krome al la inaŭguro venis eĉ la ukrainia ambasadoro, kies oficejo troviĝas en la najbara Kenjo.

La programo estis iom malpli abunda ol kutime, tamen la kutimaj kongresejaj programeroj, IKU kaj du IKU-kursoj, prelegoj pri la kongreslando kaj multaj kulturaj programeroj ne mankis. Eventuale nur unu prelego, pri masaja kulturo, tre malfruis. Mi ne ĉeestis kaj ne informiĝis, kio okazis poste, ĉar la programeroj tamen devis finiĝi ĝustatempe eĉ se la komenco malfruis.

Mankis kelkaj kutimaj eŭropaj kantistoj, sed feliĉe venis Jomo rekte el la flughaveno al la kongresa balo, kaj li koncertis ankaŭ poste en aparta koncerto. Krome la muzikan programon vigligis afrikanoj, tamen la senegala artisto Samba Faye ne ricevis vizon kaj ne povis alveni. Al belartaj konkursoj venis iom malpli da konkursaĵoj ol kutime kaj bedaŭrinde partoprenis neniu afrikano.

La vetero estis aparte agrabla, se kompari kun kelkaj pasintaj UKoj. Matene kaj antaŭtagmeze la temperaturo ne superis 18 gradojn kaj la plej varmaj horoj en posttagmezo estis nur iom pli varmaj. Vespere foje senteblis eĉ ioma malvarmo. Pluraj tagoj estis ankaŭ nubaj aŭ parte nubaj, sed ne pluvaj. En ekvatoro la suno estas tre supre kaj la mallumo aperas rapide. Aperis avertoj ne piediri sola en mallumo (kaj grandparte mankis trafiklumoj) sed la proksimaj hoteloj estis en nur kelkminuta piedira distanco kaj la ĉirkaŭaĵo aspektis tute sendanĝera.

Same kiel en Torino, en Aruŝo ekzistis telegrama diskutgrupo por kongresanoj. En ĝi aperis utilaj informoj pri programŝanĝoj, sed ankaŭ interkongresanaj diskutoj kaj pli privataj informoj. Per tio la kongresanoj informiĝis, interalie, pri tio, ke estis prirabita almenaŭ unu kongresano kaj alian trafis trafikakcidento (tamen ne serioza). Se tiuj estis la solaj tiutipaj okazaĵoj, la problemoj ne estis pli grandaj ol en kutima UK alikontinente. Krome dum la kongreso forpasis unu kongresano.

Programŝanĝoj eble aperis pli ofte ol kutime: la lokon por la nacia vespero oni ŝanĝis dufoje, finfine ĝi okazis en la kongresejo mem, du diversaj lokoj estis informitaj pli frue. Ankaŭ aliaj programŝanĝoj estis anoncitaj nur malmulte da tempo antaŭ la programero. Tamen la kongresa teamo faris sian laboron bone, kvankam la ŝanĝoj sendube kaŭzis multe da kroma laboro por la organizantoj.

La manĝado almenaŭ foje ĉesis pli frue ol planite, pri kio iu plendis en la telegrama diskuto. Kaj foje la manĝilaro estis malpureta, sed tiajn mankojn oni ja povas akcepti en Afriko. La bankeda manĝo inkluzivis viandon el sovaĝaj bestoj, sed almenaŭ en mia tablo la komentoj pri la manĝaĵoj estis grandparte kritikaj. Novaĵo por la bankedo estis, ke mankis distingo inter pagipovaj kaj nepagipovaj kiel kutime, kaj

la bankedo akceptis ĉiujn kongresanojn. Ankaŭ la lokon por la bankedo oni laŭdire decidis nur dum la tago, kiam la bankedo okazis.

Ankaŭ la kongresaj manĝoj, haveblaj per antaŭe aĉetitaj manĝokuponoj, estis ordinaraj, multflankaj sed ĉiam la samaj, diversaj viandoj, rizo, terpomoj ktp. Aparta budo vendis trinkaĵojn kaj post kelkaj tagoj jam haveblis malvarma biero, kiun kelkaj eŭropanoj postulis, dum por aliaj varmeta biero akcepteblis.

La kongresa libro prezentis IKU-prelegojn, sen indiko pri la temo en la programo, kaj manko de prelegnumeroj en la priskriboj, kaj ĉu vere IKU-prelego kvin povas okazi pli frue ol IKU-prelego du?

Ankaŭ en kongresaj programeroj estis multflanka miksaĵo de partoprenantoj, apenaŭ ekzistis programero sen afrikaj kongresanoj. Afrikanoj produktis multe da programo: en internacia arta vespero estis multaj afrikaj eroj, kaj unupersona konga teatraĵo pri sekurecproblemoj en orienta parto de Konga Demokrata Respubliko donis emocie ankaŭ informojn pri la forgesita civila milito en tiu parto de la lando.

Kiel kutime en Esperanto-kongresoj, la gravaj programeroj allogis malmulte da kongresanoj. La relative brilan paroladon de Duncan Charters pri la strategio kaj estonteco de UEA aŭskultis nur malmultaj kaj malmultaj ĝuis la legadon de rimleteroj de William Auld kaj Marjorie Boulton fare de Tim Owen kaj Stela Besenyei-Merger.

La kongreso estis granda paŝo por UEA kaj al la Esperanto-movado. Laŭdire UEA subtenis la organizadon de la kongreso en Afriko per 80 mil eŭroj. Tamen mi ĝojas, ke tiel okazis, kaj ke la kongreso ne estis nur kongreso de eŭropanoj en Afriko, sed vere internacia Esperanto-evento kie renkontiĝis ne eŭropanoj kun afrikanoj, sed homoj kun homoj.

Jukka Pietiläinen

Foto: John Huang

Rezolucio de la 109a Universala Kongreso de Esperanto

La 854 kongresanoj de la 109a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Arusho, Tanzanio, inter la 3a kaj 10a de aŭgusto 2024, traktis la temon “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”. La partoprenantoj de la kongreso ne nur diskutis la temon, sed samtempe prezentis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas pace kunvivi kaj interkomuniki sen tradukistoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.

Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivas en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

La kongresanoj alvokas al ĉiuj homoj protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli bonan mondon. Ili alvokas al ĉiuj homoj de la tero konsideri utiligi dum vojaĝoj transportilojn, kiuj konsumas malpli da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento, kaj kunlabori por kompensi la emision de forcejaj gasoj, kiam ankoraŭ ne eblas tion eviti.

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, koresponde kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke ankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo.

La jarabono por 2024 aŭ 2025 kostas nur 15 eŭrojn

https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Afrika Kongreso de Virinoj

Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) organizis la kongreson, kiun ni nomas AKVoj aŭ Afrika Kongreso de Virinoj. Akvo estas neevitebla elemento en la homa vivo. De ĝi fontas vivo kaj ĝi estas la vivobazo de ĉiuj kreitaĵoj. Virinoj estas kiel akvo, la fonto, el kiu fluas generacioj. La dua kongreso, kiu okazis en Arusho de la 31a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2024, kunvenigis ĉirkaŭ 60 partoprenantojn el Belgio, Burundo, Ĉinio, Francio, Gambio, Kenjo, DR Kongo, Koreio, Madagaskaro, Rumanio, Svislando, Tanzanio, kaj Usono.

Nia kongresa temo “Virinoj: leviloj de daŭrigebla disvolviĝo” montras, ke virinoj estas leviloj de daŭripova disvolviĝo. Nia celo estas investi en la subtenado kaj trejnado de virinoj, kaj tio montras disvolvigan levilon por la lando kaj kontinento. Tiu ĉi kongreso, kiu reliefigis la decidan rolon de virinoj en Esperanto-movado, estis vera festo de virina engaĝiĝo kaj solidareco ene de Esperanto-komunumo.

La partopreno de virinoj havas valoron en nia socio, negrave kie ili loĝas aŭ en kia kampo ili estas. Ju pli da virinoj estas entreprenistoj en siaj landoj, des pli kreskas ilia ekonomio, des pli reduktiĝas ilia malriĉeco, kaj tio estigas ilian daŭrigeblan evoluon kaj disvolviĝon. Ni certas, ke la edukado kaj trejnado estas la sola longedaŭra solvo, kiu ebligos al ni kuraĝigi knabinojn kaj virinojn eniri la edukan kampon.

Sekve, gravas doni eblecon, kiel ĉi tiun kongreson, al virinoj, por povi provizi al ili diversajn trejnadojn, ekspluatante iliajn talentojn kaj kundividante kun ili novajn spertojn. Ĉi tio estas farita por atingi nian celon pri daŭripova disvolviĝo.

Nia programo

1. Prelegoj kaj kundividoj

Sub nia temo, la partoprenantoj havis la okazon interŝanĝi ideojn kaj perspektivojn pri la graveco de Esperanto kiel ilo por egaleco kaj interkultura interkompreniĝo. La intervenoj de prelegantoj, el diversaj profesiaj kaj kulturaj fonoj, traktis diversajn temojn kiel instruadon de la lingvo al infanoj, la rolon de virinoj en la disvastigo de Esperanto, la problemojn alfrontitajn de virinoj en la movado kaj la efikon de Esperanto al ina emancipiĝo.

Unue, ni sekvis la prelegon pri la kongresa temo. Pritraktita en ĝi estis temo pri la identeco de virinoj, iliaj rajtoj, iliaj malfortoj kaj fortoj, iliaj respondecoj, iliaj agadoj por igi ilin efika ilo por disvolviĝo. En la fino de tiu prelego, ni rigardis tion, kion ni faras por ke virinoj estu leviloj de daŭrigebla disvolviĝo: detruu sociajn kaj kulturajn barojn, permesu la aliron al edukado kaj dungado kaj zorgu pri la sano kaj bonfarto. Nia kuraĝiga frazo: “Ne timu ŝanĝi por ŝanĝigi”.

Due, ni havis prelegon, kiu klarigis al virinoj, ke lerni estas unu el iloj por disvolviĝo. Virinoj havas motivon lerni kaj studi por antaŭeniri. Trie, ni ricevis la prelegon kundividi spertojn de usona virino kaj virinajn spertojn el Kinshasa. Sekve, ni havis

tempon por aŭskulti prelegon pri virino por paco. La granda ideo en ĝi temas pri virino, kiu devas vivi pace por provizi pacon al siaj ĉirkaŭuloj. Ankaŭ grava temo de la kongreso estis genra egaleco: virinaj rajtoj, virina povo. Se ĉiuj respektas homajn rajtojn, neniu vivas sub perforto. Lerni pri starigo de simpla projekto fermis la prelegon. Ni instruis al ĉiuj partoprenantoj la paŝojn por starigi projekton kaj difini buĝeton.

2. Lernado de dancoj, artaj atelieroj, plivigligado kaj lingvoinstruado kaj ekskurso

La kongresa programo estis riĉa je praktikaj labor-renkontiĝoj, kiuj iris de artoj ĝis metilernado, ebligante al virinoj enspezi monon per siaj propraj iniciatoj. Malfermaj diskutoj ankaŭ esploris la malhelpojn alfrontatajn de virinoj kiel lernantoj kaj praktikantoj de Esperanto.

Ĉiuj partoprenantoj kunlernis rumbaon la tradician dancon de Kongo kaj zumba-on la novan dancon. Ĉi-vespere ni sekvis la internacian vesperan kulturon. Virinoj el ĉiuj landoj prezentis siajn kulturojn: scenetojn, kantojn, dancojn, rakontojn ktp.

Artaj atelieroj: voĉteknikoj, pentraĵoj, perlaj sakoj, ĉapeloj, orelringoj, pneŭaj/ledaj sandaloj, transformado de fruktokonfitaĵo plivigligis nian kongreson. Ankaŭ instruado de Esperanto okazis. Ni laboris grupe por ekzerci kaj paroligi lernantinojn.

Foto: John Magessa

Ni ricevis gvidadon pri instruado de Esperanto al infanoj. Ni havis ekskurson en la tria tago. Ni vizitis du lokojn: la masajan merkaton kaj la centron de afrika kultura heredaĵo.

Inter la eminentaj invititoj de la kongreso estis Duncan Charters, la prezidanto de UEA kaj lia edzino Cecily Lee. Estis lanĉita ideo pri kreado de internacia reto de esperantistaj virinoj por subteni kaj antaŭenigi lokajn iniciatojn samtempe plifortigante la ligojn inter virinoj engaĝiĝintaj en la movado. Tiu ĉi alvoko estis varme bonvenigata de la partoprenantoj, kiuj esprimis sian deziron nutri kontakton kaj kunlabori trans landlimoj.

La virina kongreso estis momento de inspiro kaj plifortigo de ligoj. La partoprenantoj disiĝis pli motivitaj kaj entuziasmaj per novaj ideoj por diskonigi Esperanton ne nur kiel lingvon, sed kiel veran ilon de egaleco kaj emancipiĝo. Dum la esperantista movado daŭre evoluas, la rolo de virinoj en ĝi montriĝas pli kaj pli decida.

Ĉiuj partoprenantoj sentis, ke la etoso estis tre amuza kaj ĝoja, tre varma, amika kaj paca. Ĉiuj estas fieraj pri nia lingvo Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj kunvivis amike kaj pace en tiu kongreso. Ĉiuj partoprenantoj pretas agadi revenonte en siaj urboj kaj landoj.

Tiu virina kongreso okazis danke al la subteno de UEA, ESF kaj ILEI. Ni tre dankas ĉiujn, kiuj subtenis ĉi tiun virinan kongreson, kaj ni tre dankas ĉiujn, kiuj partoprenis. Vi montris, ke ni ĉiuj estas kunlaborantoj kaj subtenas unu la alian por disvolviĝo. EVAA estas ĉiam preta por ajna kunlaborado. Multajn dankojn al ĉiuj!

Miora Raveloharison

Adiaŭ, Arusho! Saluton, Brno!

Laŭ la retejo de UEA, sume 854 homoj el 66 landoj aliĝis al la 109a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2024 en Arusho (Tanzanio). Tio iĝis ebla danke al la kampanjo de UEA, kiu per ĉ. 80 mil eŭroj sukcesis aligi al la kongreso multajn Afrikajn esperantistojn, kiuj mem ne povus pagi siajn kongresajn kostojn.

En la supro de la landotabelo restis la kongreslando Tanzanio kun 172 aliĝintoj. Vidu la liston de la landoj, el kiuj aliĝis almenaŭ 20 personoj.

172 Tanzanio	30 Japanio
95 Burundo	28 Koreio
75 DR Kongo	25 Usono
50 Francio, Germanio	22 Brazilo
32 Ĉinio, Italio	21 Pollando

Intertempe ekfunkciis reta aliĝilo al la 110a UK, kiu okazos la 19-26an de julio 2025 en Brno (Ĉeĥio).

Aliĝu ĉe https://uk.esperanto.net/2025/

AlKo

La Infana Kongreseto unuafoje okazis en Afriko

Ĉi-jare la 52a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) arigis naŭ infanojn kaj 20 adoleskantojn de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto en Catholic Archdiocese of Arusha. Tie ĉiuj kune travivis interesan sperton. Per kantoj, desegnaĵoj kaj dancoj la parto-prenantoj lernis, amuziĝis, kaj la knabinoj pli lertiĝis pri kudrado. La adoleskantoj havis rajton viziti la Universalan Kongreson, kiam ili tion volis aŭ trovis iun eron de ĝi pri kiu ili interesiĝis. Per multaj ludoj la etuloj estis prizorgitaj. Ili ankaŭ lernis Esperanton. Ni provis paroligi ilin en Esperanto kaj, se kelkfoje ili ne komprenis, ni uzis la anglan, svahilan aŭ la francan. Sed la ĉefa laborlingvo estis Esperanto.

Kiel la aliaj kongresanoj, la infanoj havis la eblon iri al ekskursoj. Ekzemple, ĵaŭde ili vizitis la nacian muzeon. La deĵorado en la infana kongreseto multe helpis pliriĉigi miajn spertojn de Esperanto-instruisto. Dum la kongreseto ni faris multajn aktivaĵojn kun la infanoj, instruante al ili Esperanton. Kaj la infanoj ankaŭ vere amuziĝis dum la IIK. Iu knabino, kiu en la komenco estis timema eĉ kiam ni parolis al ŝi en ŝia gepatra lingvo, tute ne volis paroli. Sed post kiam ni ludis, dancis, kantis kun ŝi, ŝi malfermiĝis al ĉiuj. Tio ĉi estis vere granda sperto por mi. Mi pasigis tre laboran, sed ankaŭ agrablan momenton kune kun la infanoj.

Ranja Zafinifotsy

Foto: Jonathan Raveloharison

Diplomoj de UEA pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj

En la Solena Fermo de la 109a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo estis anoncita la disdono de ok diplomoj pri Elstara Agado kaj kvar pri Elstara Arta Agado por la jaro 2024. La Diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Elstara Agado

Aime Patrick Manirakiza (Burundo) pro elstara agado kiel kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, interalie pro efika subteno al la preparado de la UK en 2024.

Alessandra Madella (Ĉinio/Italio) pro lastatempe abunda eldona agado kaj fervora instruado de Esperanto en Ĉinio.

Etsuo Miyoshi (Japanio) pro la malavara laboro pri disvastigo de Esperanto en Eŭropa Unio inter alie ĉe amaskomunikiloj, kaj pro aktiva kontribuo por financa subteno de UEA kaj ĝia grava tutmonda agado por informado.

Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio) pro elstara kluba agado en Hameln kiel organizanto de kunvenoj ĉeestaj kaj retaj, kant-konkursoj, retaj kursoj.

Jehoŝua Tilleman (Israelo) pro jardekoj da daŭra agado kiel UEA-ĉefdelegito kaj varbado de individuaj membroj en Israelo.

Laure Patas d'Illiers kaj **Pierre Dieumegard** (Francio) pro la elstara agado kadre de la movado Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiu kandidatiĝas por la balotado de la Eŭropa Parlamento ĉiun kvinan jaron kaj tiel videbligas Esperanton al la franca loĝantaro.

Orlando Raola (Usono/Kubo) pro laboro en la Estraro de UEA aparte kiel unu el la ĉeforganizantoj de la 1a kaj 2a Virtualaj Kongresoj de Esperanto dum la pandemia epoko, pro kerna kontribuo al kontraktaj aranĝoj por nova hejmo de Biblioteko Hector Hodler (BHH) kaj nia arĥivo kaj pro la aktivado en Esperantujo kiel akademiano, longtempa estrarano kaj prezidanto de Esperanto-USA.

Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (Brazilo) pro longtempa aktivado en la urbo kaj subŝtato Rio-de-Ĵanejro: ĉiujara okazigo de la Esperantaj Subŝtataj Renkontiĝoj kaj Trejnado de Esperanto-Instruistoj, monataj migrantaj kulturaj renkontiĝoj, bontenado de la biblioteko Carlo Bourlet, eldono de la revuo *Rio Esperantista* kaj informado pri Esperanto, inkluzive ĉe la Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵanejro, la plej granda literatura foiro en Latin-Ameriko, en kiu ĝi reklamas Esperanton al pli ol 600 mil homoj ĉiun duan jaron.

Elstara Arta Agado

Emmanuelle Richard (Francio) pro la elstara kontribuo al la literaturo tradukita en Esperanton, interalie, per eldonado de la gravaj verkoj *Reĝo Ubuo* kaj *Mil kaj unu noktoj*, kiuj aperis kadre de la serio "Oriento-Okcidento".

Julian Modest (Georgi Miĥalkov) (Bulgario) pro la elstara kaj ampleksa kontribuo al la originala literaturo en Esperanto, per verkado de multaj verkoj, ĉu romanoj, novelaroj, esearoj, krimromanoj ktp.

Tim Owen (Britio) pro la sukcesa eldona agado nome de Esperanto-Asocio de Britio.

Zhou-Mack Mafuila (D.R. Kongo/Francio) pro la elstara kontribuo al la Esperanto-muziko laŭ la stiloj afroĵazo, afrohinda funko kaj regeo.

GK UEA

Du laŭreatoj de la premio Deguĉi 2024

Mramba Simba Nyamkinda

La premio Onisaburo Deguchi aŭ simple premio Deguĉi estas monpremio administrata de UEA, kiu celas regule distingi la plej meritajn projektojn kaj agantojn (individuojn aŭ organizaĵojn), kiuj aktivas sur la kampo de utiligo de Esperanto kiel potenca rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de L. Zamenhof, la instruoj de Deguĉi Onisaburo kaj la Statuto de UEA, kiu listigas inter siaj celoj (art. 3ĉ) “kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj”.

La premio Onisaburo Deguchi estis fondita en 1987, okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto, kaj tiel titolita honore al la japano Deguĉi Onisaburo, kunfondinto de la Oomoto-movado, kiu en 1923 enkondukis en sian agadon Esperanton kiel internacian komunikilon por la disvastigo de la ideoj pri universala homamo kaj monda paco. Spegule al la ideoj de Zamenhof kaj Deguĉi la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo.

Ilia Sumilfia Dewi

Pri la aljuĝo de la premio respondecas la Estraro de UEA laŭ specifa regularo.

Ĉi-jare la elekto ne estis facila: estis multaj meritoplenaj kandidatoj kaj fine la Estraro de UEA decidis elekti du meritoplenajn aktivulojn.

La premio Deguĉi por 2024 estas aljuĝita al **Mramba Simba Nyamkinda** (63-jara tanzaniano) kaj **Ilia Sumilfia Dewi** (46-jara indonezianino).

GK UEA

Legu tripaĝan artikolon pri la premiitoj en nia novaĵretejo:
https://sezonoj.ru/2024/09/premio-9/

Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2024

Estis aljuĝitaj la premioj kaj honoraj mencioj de la 75aj Belartaj Konkursoj de UEA (BK). Gvidis la BK-ceremonion en la 109a UK vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., surbaze de materialo preparita de la sekretario de la BK, Miguel Gutiérrez Adúriz, kun subteno de Francisco Javier Moleón, plurfoje premiita en la BK, kiu voĉlegis la mikronovelon gajnintan la unuan premion – premion Paula Adúriz – "Enamiĝinto", de Jorge Rafael Nogueras. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj la prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández.

Okaze de la 75aj Belartaj Konkursoj de UEA estis ricevitaj entute 110 verkaĵoj. La agnoskoj estis:

BRANĈO POEZIO

Juĝkomisiono: Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu.

Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj [6 el Azio, 1 el Ameriko, 17 el Eŭropo]

La unua premio estas aljuĝita al "Litera turo" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La dua premio estas aljuĝita al "Reveno" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La tria premio estas aljuĝita al "Mia lasta vizito" de Benoît Philippe el Germanio.

BRANĈO PROZO

Juĝkomisiono: Trevor Steele, Julian Modest, Anina Stecay

Partoprenis 18 verkoj de 12 aŭtoroj el 8 landoj [2 el Azio, 2 el Ameriko, 14 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al "Brodita tuketo" de Ewa Grochowska el Francio.

La dua premio estas aljuĝita al "Plano B" de Debra Hamel el Usono.

La tria premio estas aljuĝita al "Lia sekreto" de Cho Sung Ho el Koreio.

BRANĈO MIKRONOVELO

Juĝkomisiono: Trevor Steele, Nicola Ruggiero, Antonio Valén.

Partoprenis 35 verkoj de 16 aŭtoroj el 12 landoj [9 el Azio, 6 el Ameriko, 20 el Eŭropo].

La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al "Enamiĝinto" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La dua premio estas aljuĝita al "Unuaj amrendevuoj" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La tria premio estas ne aljuĝita.

Honora mencio estas aljuĝita al "Ridetema soldato" de Yin Jiaxin el Ĉinio.

BRANĈO TEATRAĴO

Juĝkomisiono: Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler

Patroprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando [1 el Eŭropo].

La unua premio estas ne aljuĝita.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas aljuĝita al “La Krimulo kaj la Floro” de Raffaele Del Re el Italio.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO

Juĝkomisiono: Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler

Patroprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj [2 el Eŭropo].

La unua premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas aljuĝita al “Nova fianĉino” de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

La tria premio estas ne aljuĝita.

INFANLIBRO DE LA JARO

Juĝkomisiono: Ricardo Albert Reyna, Jeong-yeol Jang, Martin Markarian.

Partoprenis 14 infanlibroj de 6 eldonejoj el 6 landoj [1 el Ameriko, 13 el Eŭropo].

La premio “Infanlibro de la jaro” estas aljuĝita al la Eldonejo “Esperanto-Asocio de Britio”, pro la verko “Doktoro Esperanto kaj la lingvo de Espero” de Mara Rockliff, ilustrita de Zosia Dzierżawska.

BRANĈO ESEO

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj [1 el Ameriko, 1 el Azio, 2 el Eŭropo].

La unua premio – premio Luigi Minnaja – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas aljuĝita al “De drako al loongo: la malfacila tasko esperantigi ĉinajn vortojn” de Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo.

BRANĈO KANTOTEKSTO

Juĝkomisiono: Ankie van der Meer, Ĵak Le Puil, Flavio Fonseca

Partoprenis 12 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj [2 el Ameriko, 3 el Azio, 7 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al “En la trajno de mil duboj” de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La dua premio estas aljuĝita al “Liven Dek, diru jam!” de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La tria premio estas aljuĝita al “Lasta amo” de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Sen vi“ de Virágh Ferenc el Germanio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Inferaj inaj vivoj“ de Serĝo Sir’ el Francio.

Miguel Gutiérrez Adúriz

Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA

Eventoj

Nia primovada rubriko ĉi-foje estas enorme ampleksa pro raportoj pri la Kongresa Sezono, dum kiu okazis pluraj kongresoj, renkontiĝoj, tendaroj, staĝoj kaj aliaj esperantistaj kunvenoj, interalie, pri la 80a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, unuafoje okazinta en Litovio. Sur la foto estas la litova tablo dum la trinkomanĝa nokto en IJK. ***(Fotis Ivo Miesen)***

Foto: Ivo Miesen

IJK-80: Malfacila vojo al kaj el Ŝventojo

Ĉi-jare la 80a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (IJK-80) okazis en Litovio, lando kiun mi delonge volis viziti, sed pro la nuna politika situacio en la mondo la vojo al ĝi estis malfacila. Mi akceptis tion kiel defion kaj petis vizon de Italio, kaj mi ricevis ĝin. Samtempe mia familio volis ripozi en Montenegro, sed, ĉar rektaj flugoj el Moskvo al Italio kaj Montenegro nun ne ekzistas, ni unue flugis al Istanbulo, kaj tie ni pasigis iom da tempo. Ni renkontiĝis kun mia turka amikino Fatma, kaj mi havis ŝancon montri al miaj samfamilianoj la praktikan utilecon de Esperanto: ŝi faris malgrandan ekskurson en Istanbulo por ni.

El Turkio ni flugis al Montenegro, kie mi pasigis nur unu semajnon. Al Montenegro venis ankaŭ mia franca-itala amiko – esperantisto konata kiel Galeks. Li restis kun ni dum tiu semajno, kaj pro li miaj gefratoj iom eklernis Esperanton. Ni havis multajn aventurojn en tiu bela Balkania lando ĉe la Adria Maro. Poste mi daŭrigis mian vojaĝon al Italio, mi venis al Romo kie mi restis dum du tagoj, en Romo mi ne trovis esperantistojn, ĉar ĉiuj romaj esperantistoj, kiujn mi kontaktis, tiutempe ne estis en la urbo, mi vizitis Vatikanon kaj multajn vidindaĵojn de Romo, poste mi daŭrigis la vojaĝon kaj iris al Budapeŝto. En Budapeŝto min gastigis mia hungara amiko Petro, li montris al mi la urbon kaj la tradician hungaran manĝaĵon.

Poste mi venis al Pollando, kiun mi deziris viziti ekde multaj jaroj, multaj aferoj en mia vivo rilatis al ĝi, sed mi neniam antaŭe havis ŝancon viziti ĝin. La unua urbo, kien mi venis, estis Krakovo, mi pasigis tie du noktojn, sed esperantistojn mi ne trovis ankaŭ en Krakovo, sed mi renkontis homojn el la belarusa diasporo, ili montris al mi interesaĵojn de Krakovo kaj gastigis min. Krakovo estas la urbo, kiun mi plej ŝatis en Pollando, ĝi estis bela kaj komforta kun multaj historiaj vidindaĵoj. La sekva urbo sur mia vojo estis Poznano, tie mi renkontiĝis kun mia amiko Esperanta jutubisto Amadeo (Amadeo Sendiulo). Ni kune faris filmeton pri Poznano, ankaŭ mi renkontis la teamon de “Esperanto Senlime”.

Veninte al Pollando, mi ricevis mesaĝon en la belarusa lingvo de nekonata ĉeĥo, mi havis neniun ideon kiu povus sendi ĝin. Li skribis, ke li spektis mian belarus-

lingvan podkaston pri Esperanto kaj scias, ke mi nun vojaĝas en Eŭropo. Vasil, programisto el Belarusio, kiu migris al Ĉeĥio, estas bahaano, kaj ĉi tiu religio multe rilatas al Esperanto, ĉar unu el ĉefaj principoj de la bahaa kredo estas uzado de la internacia helplingvo. Li invitis min gasti en Prago, kaj mi konsentis. Pragon mi tre ŝatis, mi vidis la dancantan domon, Karolan ponton kaj aliajn vidindaĵojn.

Poste Mari, mia Esperanta amikino el Slovakio, invitis min al Bratislavo. Konsentinte, mi spertis multajn problemojn, ĉar nia trajno rompiĝis, kaj mi venis al Bratislavo nur nokte, kaj mi havis nur unu tagon por vidi Slovakion. Mi komencis timi, ke mi ne sukcesos ĝustatempe atingi la kongreson, kaj mi ekrapidis reen al Pollando.

En Varsovio, kie mi renkontiĝis kun esperantistoj, irontaj al la kongreso, ni vizitis la tombon de Zamenhof. Tamen Varsovio kompare kun Poznano kaj Krakovo ne tre impresis min, kaj poste ni iris al Vilno, alia urbo, kiun mi dum multaj jaroj deziris viziti, kaj tie mi ne estis seniluziigita. La historia centro de Vilno multe pli bone konserviĝis ol en Varsovio; mi vidis preĝejon de Sankta Anna kaj la Turon de Gediminas, mi trovis multajn similecojn inter la litova kaj la slavaj lingvoj. Mi volis gustumi litovajn manĝaĵojn, sed mi trovis ke litovaj manĝaĵoj estas preskaŭ la samaj kiel la belarusaj, simple ili havas aliajn nomojn. Poste tio helpis min prepari la tablon por la trinkomanĝa nokto en IJK.

El Vilno ni finfine iris al Ŝventojo (litove: Šventoji), kien venis 223 kongresanoj el 45 landoj, kaj mi estis la sola reprezentanto de Ruslando/Belarusio en IJK-80, okazinta de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto. La kongresloko aspektis pli junece ol en la pasintjara IJK-79 en Italio; ĉirkaŭe estis restoracioj, diskejoj, amuzveturiloj, vendejoj.

La kongresa dometaro (Foto: Ivo Miesen)

Glebo Malcev en IJK (Foto: I. Miesen)

Tamen estis aferoj kiuj pasintjare pli bonis (laŭ mi): en la kongresejo de Ŝventojo necesejoj kaj duŝejoj estis ne en la ĉambroj, sed en aparta konstruaĵo, kaj sufiĉe for, ofte mankis varma akvo. Mi ne sukcesis aliĝi al multaj ekskursoj, mi tre volis viziti, ekzemple, la muzeon de la malvarma milito, sed lokoj jam mankis, kaj mi nur partoprenis kajakadon, kie mia telefono falis al akvo kaj mortis…

La Balta Maro en Ŝventojo ne estis varma, tial mi naĝis nur kelkfoje. Estis multaj interesaj programeroj pri diversaj temoj, kiel Jugoslavia milito, Esperanta retkulturo, kurso de la litova, sed mi ne vizitis multajn, mi preferis interkomunikiĝi kun homoj, kune kun miaj amikoj ni promenis ĝis Latvio. Ankaŭ estis diskejo kaj karaokeejo dumnokte. Ni havis ludojn ekzemple eskapludon, kie ni devus plenumi la taskojn por trovi aliajn taskojn, ankaŭ estis koncertoj de kelkaj famaj Esperantaj grupoj kiel Martin & la Talpoj, “Perdita Generacio” kaj la plej freneza “Piĉismo” de Glebo Malcev, speciale veninta el Kaŭno.

Dum la internacia vespero mi kantis kanton de legenda belarusa grupo N.R.M. (S.R.R. Sendependa Respubliko Revo) kiun mi tradukis al Esperanto. Dum la trinkomanĝa nokto mi prezentis la belarusan tablon, mi sukcesis trovi en Ŝventojo multajn manĝaĵojn litovajn, kiuj estis similaj al la belarusaj, sed ne estis la samaj kiel ĉe la litova tablo, mia tablo estis tute vegetara.

Memoraĵo pri IJK en Ŝventojo (Foto: Ivo Miesen)

La kongreso en Ŝventojo pasis glate, neniu dormis surmare, neniu vokis policon, nur ambulancon unufoje, la ĝenerala etoso estis bona, mi estas tre danka al Litova Esperanta Junularo por ilia laboro kaj agado, mi tre ĝojas, ke tiel rapide kreskis nova forta Esperanta junulara movado en ĉi tiu lando, tiu kongreso ja restos por mi bela kaj varma memoraĵo.

Post la kongreso komenciĝis iom freneza vojaĝo. Konkurante kun “Esperanto Senlime” mi kun miaj amikoj Galeks kaj Mari komencis nian propran realecserion “Esperanto Senhejme”.

En Kaŭno ni dormis sub iu ponto, tie estis sufiĉe trankvile, sed poste litovoj diris, ke tiu loko estas konsiderata kiel danĝera. En Bjalistoko ni surstrate ne dormis, sed ni renkontis atestantojn de Jehovo: kiam ili provis prediki al ni sian religion, ni komencis “prediki” al ili Esperanton. Fine ili konsentis, ke “Zamenhof estis profeto” kaj ke “Biblio diras, ke Esperanto estas bona, ĉar homoj devas laŭdi dion en unu internacia lingvo”. Ni vizitis ankaŭ monumenton de Zamenhof, kiun vandaloj detruis kelkajn semajnojn antaŭe, sed ĝi jam estis renovigita.

En Varsovio ni denove dormis surstrate – pli ĝuste en parko – kaj poste ni venis al Gdansko, tie ni vizitis muzeon “Solidareco” kaj vidis multege da sukceno. La loka esperantistino Orcino, kun kiu ni konatiĝis en Ŝventojo, afable montris al ni la urbon.

Orcino, Galeks kaj Roman en la malnova kvartalo de Gdansko

En Gdansko mi adiaŭis miajn amikojn kaj sole veturis per buso al Kaliningrado, kie mi renkontiĝis kun mia amiko Timer – esperantisto kaj aktivulo de la tatara lingvo, poste ankaŭ kun Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, kiuj eldonas Esperanto-librojn kaj la magazinon “La Ondo de Esperanto”. Mi vizitis la domon, en kiu naskiĝis la fama filozofo Kantio, kaj tie mi trinkis tre bongustan kafon, kuiritan laŭ malnova recepto.

De Kaliningrado mi venis aviadile al la ĉefurbo de Ruslando, kaj tiel finiĝis mia unumonata vojaĝo, la tuta vojaĝo estis ebla nur dank’ al Esperanto, sen Esperanto kaj helpo de miaj esperantistaj amikoj mi ne havus kuraĝon fari tion.

Roman Raljko

1500 kilometroj sur du radoj

Kiam BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) alvokis por bicikla karavano al la 80a IJK en Litovujo, aperis kelkaj ideoj. Unu el ili venis de Viola el Vieno: ŝi havus 16 liberajn tagojn antaŭ la evento kaj dezirus en tiu tempo veni al Ŝventojo startante de sia hejmo. Jen defio: la distanco estas pli ol 1500 km, do necesus bicikli averaĝe 100 km tage, sen paŭzotago. Tio estas multe pli ol la 70 km en kutima BEMI-karavano.

Unue ŝi renkontiĝis kun Ivo, longtempa BEMI-aktivulo el Nederlando, por kelktaga bicikla provekskurso. Ili konkludis, ke la projekto estas realisma, do ni invitis al “sportema” karavano, en kiu partoprenu nur spertuloj. Fine aliĝis ankaŭ Christine kaj Lars el Germanujo, kiuj ĵus akiris specialan tandemon.

La 2an de aŭgusto la tri eksterlandanoj alvenis trajne en la aŭstria ĉefurbo, kie akceptis ilin delegacio de lokaj biciklemaj esperantistoj en la stacidomo. Post la riparado ni sukcesis forlasi Aŭstrion en la unua tago kaj atingis Slovakujon per eta pramo. Antaŭ la starto Ivo investis multe da laboro por plani agrablan itineron sur etaj stratoj kun bona surfaco. Kaj ankaŭ dum la vojaĝo li ofte laboris vespere en la tendo per sia komputilo por adapti la vojon al la deziroj kaj bezonoj de la grupo.

Foto: Ivo Miesen

Ni nun biciklas laŭlonge de la iama Fera Kurteno kaj ofte vidis ties restaĵojn. Ni sufiĉe bone progresis por permesi ĉiutage unu longan tagmezan paŭzon, sed la tempo ja premas, kaj ni preskaŭ neniam povis interrompi la veturadon por viziti vidindaĵojn aŭ babili kun lokanoj.

En la dua tago ni atingis Ĉeĥujon. Tie atendis nin la plej serioza monto de la vojaĝo, la ĉefa eŭropa akvodislimo inter la valoj de Bečva kaj Odro. Ĝi ne estas ege alta, sed la kruteco de 13º devigis nin ĉiujn puŝi la pezajn biciklojn. En Ostrava ni vizitas grandan sportvendejon por provizi nin per diversaj ekipaĵoj kies bezono aperis dum la unuaj tagoj.

Ĉiuvespere ni aĉetis legomojn kaj aliajn ingrediencojn por kuiri bongustan vespermanĝon sur gaskuirilo, kutime en loko bone kaŝita, kie ni tendumis sovaĝe. Jen kaj jen ni ĝuis ankaŭ la komforton de oficiala tendumejo – vera duŝo ja estas pli agrabla ol la duŝada sako kiun ni havas.

Poste ni biciklis tra dense loĝata parto de Pollando, kie ni ne ĉiam trovis etajn stratojn kaj devis foje bicikli inter kamionoj kun foje senpaciencaj ŝoforoj. Ni rimarkas diferencon inter la niveloj de respekto, kiun biciklantoj renkontas en diversaj landoj – Ĉeĥujo estis tute agrabla, Pollando kaj Litovujo malpli.

Post la ebena centra regiono de Pollando, defiis nin en la nordoriento pejzaĝo kun pli da reliefo. Neniuj altaj montoj, sed senĉesa biciklado supren kaj suben. Alia malhelpo venis de iuj oficialaj bicikloitineroj, kiuj komenciĝas bone, sed baldaŭ transformiĝas en sablajn piedpadojn kie eĉ puŝi la biciklojn apenaŭ eblas. Pri la vetero ni bonŝancis: nek tro varme, nek tro malvarme, malofte pluvetis, kaj nur unu fojon pluvegis, ĝuste kiam ni vespere en kampadejo kuiris. Rapidege necesis porti ĉion difekteblan sub tegmenton.

Pro la nuna politika situacio, ni ne povas preni rektan vojon al Ŝventojo, sed devis eviti la Kaliningradan regionon tra la t. n. koridoro de Suwałki. Post la eniro en Litovujon, ni biciklas laŭlonge de la landlimo, kie Ruslando foje estas nur kelkajn metrojn for de ni. Tre agrable estis fine atingi la malaltan, ebenan parton de Litovujo, kie bicikli 100 km en unu tago estis malpli granda peno. En iu pluveta mateno, la tandemo glitis ĉe fervojkruciĝo sur la malsekaj reloj; falego ŝajnis neevitebla, sed feliĉe ni jam bone regis la biciklon kaj saviĝas. La maron ni unue vidas ĉe la Kurŝa Laguno, kun bela vido al la impresa Kurŝa Terlango.

Tre bela estis la lasta parto de la vojo inter Klajpedo kaj Ŝventojo, kie oni biciklas proksime al la marbordo tra arbaro sur bela sinua biciklovojo inter multaj turistoj, sed sen aŭtoj. Ĝi kondukis nin post 16 tagoj kaj 1510 kilometroj al la ejo de la 80-a Internacia Junulara Kongreso, por revidi multajn bonajn amikojn kaj konatiĝi kun novaj.

Lars Sözüer

Iĝu patrono de “La Ondo de Esperanto”!

ILEI-kongreso, unuafoje en Brazilo, duafoje en Sudameriko

Dek jarojn post la 47a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Montevideo, jaro de la 60-jariĝo de la unua rezolucio de Unesko favore al Esperanto, la Kongreso de ILEI (renomita en 2017) revenis al Sudameriko, precize al Brazilo – lando kun forta movado en nia mondparto.

La kongresoj de instruistoj, eble pro nomo, kiu pensigas la homojn pri tre fakaj prelegoj kun temoj specifaj nur por instruistoj, ne allogas multajn esperantistojn, kaj la plej amasa estis la 51a kongreso en Madrido (2018), kun 253 aliĝintoj el 33 landoj.

La kongreso, kies ĉeftemo estis “Esperanto por justa edukado”, okazis en la nordorienta urbo Masejo (Maceió), ĉefurbo de la ŝtato Alagoaso (Alagoas), de la 20a ĝis la 27a de julio 2024 kaj estis organizita de ILEI kune kun la brazila sekcio de ILEI. Ĝi estis hibrida, la dua post Lignano Orsabla (Italio), kaj aliĝis al ĝi entute 84 homoj el 27 landoj, 46 brazilanoj kaj 38 alilandanoj, 35 ĉeeste kaj 49 virtuale.

La bona vetero, suna kun temperaturo ĉirkaŭ 25 gradoj celsiaj, kelkfoje forlogis nelokanojn por promenado kaj sunbruniĝo. La urbo estas konata kiel akva paradizo pro la Atlantika oceano, lagunoj kaj riveroj, kiuj donas al la urbo belan pejzaĝon. La merkreda ekskursa tago ne estis sufiĉa por ekkoni la urbon kaj iom turismi en ĝi. Tial multaj profitis la eblon forlasi la kongresejon.

La programo de la kongreso estis tre varia kun multaj prelegoj, atelieroj, komitatkunsidoj, koncertoj, seminario, simpozio, kvizo, paroliga sesio, interkona frandvespero, libroservo kaj festo por omaĝi la 137-jariĝon de Esperanto la 26an de julio.

La komitato de ILEI kunsidis la 22an kaj la 27an de julio. Ĝi pritraktis interalie raporton pri la agadoj de la Ligo (2023-24), prezenton de kandidatoj por la estraro (2024-27), kaj voĉdonadon pri diversaj temoj.

La Seminario “Interkultura Komunikado – Manĝetiketo”, gvidita de Alessandra Madella, kadre de ILEI-projekto “Virina Agado” kun kunagado de Ariadna G. Gutiérrez (Kubo) kaj Arko (Ĉinio) esploris la universalan homan bezonon manĝi, kaj kiel diversaj kulturoj faras tion malsame, uzante tion por difini kulturan identecon kaj genrajn rolojn.

Dum la kongreso ni povis lerni kiel prepari ludojn per la apo LearningApps, temo de la virtuala prelego de Ladislau Afonso. Aliaj interesaj momentoj estis lernado en la praktiko, kiam ĉeestaj kongresanoj, helpe de la instruisto Cícero Carlos partoprenis en du atelieroj pri Origamio kaj la Brajla skribsistemo. Willian Gomes montris al ni la agadojn de la “Programo Mia Amiko” (PMA) kaj ankaŭ paroligis la publikon

pere de la temo “La kosmo”, tekniko apartenanta al lia kurso “Ekflugo” kadre de PMA. En alia tago ni havis la interesan kvizon fare de Marton Paulo pri vortoj en Esperanto, kiuj devenas de pluraj lingvoj, kaj Ariadna Gutiérrez el Kubo montris al ni la influon de lingvoj kiel la hispana, araba, afrikaj, kaj la ĉina al la Kuba gastronomio.

Ankaŭ aliaj temoj kaptis la atenton, ekzemple: “Radio Havana en Esperanto” kaj la venontjara “Kuba kongreso”, ambaŭ fare de Ariadna, kiu dum la kongreso rolis kiel raportisto de Radio Havana intervjuante niajn kongresanojn”.

Ursula Grattapaglia prezentis la bienon-lernejon “Bona Espero”, en kiu ŝi agadis dum 50 jaroj. En alia okazo parolis pri rotaria klubo en Esperantujo. Pri “Bienalo de Rio”, la plej granda librofoiro de Latinameriko, parolis al ni Alvaro Motta, kiu invitis nin partopreni la venontan bienalon en 2025. La agadoj de “La Esperanta ambasadejo” estis temo de Fabio Roberto, kiu ankaŭ prezentis du libretojn, nome: *Amiketo*, alloga kaj bunta lernolibro por komencantoj, kaj *La sekreta pordego*, portugallingva historieto, en kiu knabino trovas geknabojn, kiuj parolas Esperanton.

La projektojn “Cifereca-biblioteko” kaj “Esperanto-mapo ĉe google-maps” prezentis al ni Lívio Lima; James Rezende Piton prelegis pri “Konkurintoj de Esperanto en la tempo-maŝino”; Cícero Soares raportis pri “Indukta metodo – skizo de eksperimentado”, nova “vesto” por la natura metodo. Tatjana Loskutova, kiu ofte instruis Esperanton en Ruslando kaj en aliaj landoj, prelegis pri “Defioj kaj perspektivoj de Esperanto-instruado eksterlande” kaj Laura Brazzabeni pritraktis “la defiojn de la angla kaj la ŝancojn de Esperanto por italaj studentoj.

La Simpozio “Lingvoj de instruado kaj justa edukado” okazis sub la kunordigo de Fernando Pita. La simpozianoj estis: Alessandra Madella, kiu prezentis la *Simpoziaj*n *Aktoj*n *de ILEI-2022/2023*; Ilona Koutny pri “Profesoro István Szerdahelyi, okaze de la 100-jara jubileo”; Vicente Manzano-Arrondo pri “Miksita metodo por la esploro pri la lingva justeco en la eduksistemo”; Nina Danylyuk pri “la ukraina lingvo por la instruado kaj edukado en Ukrainio”; Renato Corsetti pri “Egaleco kaj lingva egaleco ĉe lernejoj”; Mireille Grosjean pri “Lingvo, per kiu afrikaj infanoj lernas legi kaj skribi”; Adriano Fonsaca pri “Lingvo en dialogo, justa edukado en la lingvo-instruado”; Eduardo Nadalin pri “Lingvo kaj identeco: la vojirado de la pola en UFPR”; Fábio Roberto pri “la kreado de didaktikaj kaj malmultekostaj instruiloj”; kaj Ivan Colling pri “la lingva diverseco en Brazilo, kunoficialigo de lingvoj, plurlingveco, kaj defioj en edukado”.

Dum la kongreso okazis ankaŭ koncertoj, inkluzive de kantistoj kiel Alejandro Cossavella kaj Flávio Fonseca, kiu ankaŭ prelegis pri la temo “Muziko kaj edukado”. Dum la nacia vespero tri lokaj artistoj deklamis kaj kantis brazilajn muzikojn kun surekranaj tradukoj al Esperanto.

La fermo de la kongreso okazis kun prezento de la nova estraro, legado de la kongresa rezolucio, prelego pri la 76a ILEI-kongreso kaj virtuala transdono de la flago al la organizantoj de la venontjara kongreso en Beogrado, Serbio.

Eblas spekti videojn de pluraj programeroj en la kanalo de ILEI https://www.youtube.com/@EsperantoEdukadoILEI/playlists.

Aristóphio Andrade Alves Filho

Nova estraro de ILEI

La 22an de julio okazis komitatkunsido de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), dum kiu okazis elekto de la estraro por la oficperiodo 2024-2027.

La ILEI-estraranoj estas:

Prezidanto: Ahmad Reza Mamduhi

Sekretario: Elena Nadikova

Estraranoj (alfabetorde): Karine Arakelyan, Laura Brazzabeni, Marija Jerković, Alessandra Madella, Aime Patrick Manirakiza, Radojica Petrović, Luiz Fernando Dias Pita.

Gratulon al ili kaj bonan laboron!

Elekta Komisiono de ILEI

Novembraj C2-ekzamenoj

En 2024 ankoraŭ ne estis eblo trapasi la plej altan nivelon de la KER-ekzamenoj, pri kiu havas atestilon jam 43 personoj (el la 2804 KER-sukcesintoj de ĉiuj niveloj). Estus bone duobligi ilian nombron! Jen la sekva bona okazo je tio.

La C2-nivelaj retaj ekzamenoj okazos la 16an kaj 17an de novembro. La individuajn parolajn partojn ni organizos por la proksimaj datoj de tiu semajnfino laŭ individua interkonsento.

La ekzameno povos okazi nur se aliĝos minimume 20 personoj.

Provtestoj: Se vi ne certas pri via nivelo aŭ volas ekkoni ekzamenpartojn, eĉ sperti ilin inter la veraj (kaj streĉaj) ekzamenkondiĉoj, nepre trapasu unue la provtestojn, al kies senpagaj retaj versioj eblas registriĝi ĉe https://forms.gle/vzg7bM6Qcj9KQdFr6.

La testojn (ĉu skriban, ĉu aŭdkomprenan) la provantoj solvas en ajna tempo laŭ siaj kondiĉoj kaj la teamo de edukado.net ene de kelkaj tagoj informas pri la solvoj, rezultoj kaj donas ankaŭ konsilojn. En oktobro ni okazigos ankaŭ plurajn preparsesiojn en zoom.

La klarigo pri la ekzamenpartoj kaj poentumado legeblas en tiu ĉi PDF dokumento https://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/Ekzamenoj/UEA-KERC2_Tabela%20prezento_2022.pdf.

Al la novembraj ekzamenoj aliĝu ĉe: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj.

Edukado.net

Pola Kongreso en Kalisz – sukcesega kaj kortuŝa

Kun preskaŭ 160 partoprenantoj el naŭ landoj, la 41a Pola Esperanto-Kongreso, okazinta de la 17a ĝis la 21a de julio en la urbo Kalisz, estis verŝajne la plej granda post la ŝanĝoj de 1989. Kaj ĝi estis aparte sukcesa el ĉiuj vidpunktoj: bonega etoso, interesaj ekskursoj, alloga urbo, bonega vetero, inspiraj prelegoj kaj bonegaj manĝoj.

La bonegan etoson de la kongreso oni dankas nelaste al niaj muzikistoj: La simpatia duopo *Kajto*, Ankie kaj Nanne, entuziasmigis kaj dancigis nin ĉiuvespere per siaj jen amuzaj, jen pensigaj kantoj. Abundis inter ni ankaŭ polaj muzikistoj, el kiuj mi ŝatus aparte mencii Maciej Fortuna kaj lian ensemblon, Aleksandra kaj Julia Czajka (piano) kaj Wojtek Ławnikowicz kaj Jerzy Stefański (kantado kun gitaro aŭ ukulelo).

La kongreso komenciĝis per tuttaga ekskurso al Gołuchów kaj ties renesanca kastelo, en kiu ni povis admiri valorajn artaĵojn el diversaj epokoj. Vespere sekvis pikniko sur herbejo de la universitata *kampuso* (tereno) – belega pro la vetero, muziko kaj dancado.

Ekde la inaŭguro en la vendreda mateno ni traktis la kongresan temon “Kalisz

41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz, 18-21.07.2024

Foto: Andrzej Sochacki

– atestanto pri tempoj, fonto de scio kaj memoro”. Oni elektis tiun temon certe por akiri pli facile subtenon de la urbo. Sed rapide mi konstatis, ke tiu temo devas tuŝi ne nur polojn, sed aparte min, ĉar la ĉefaj kulpuloj pri la tragedia sorto de la urbo Kalisz ja estis germanoj. Estis germanaj trupoj, kiuj preskaŭ plene detruis la urbon komence de la Unua Mondmilito en aŭgusto 1914, kaj kiuj forpelis polojn kaj deportadis la grandan judan komunumon de Kalisz dum la Dua Mondmilito.

Pensante pri tio, mi miregis pri unu afero: Kvankam Kalisz atingeblas de Berlino en malpli ol kvin horoj per trajno aŭ aŭto, mi estis inter la multnombraj kongresanoj la sola germano sen pola deveno. Ĉu do landlimoj eĉ por esperantistoj plu gravas? Ŝajnas, ke jes. La organizantoj estis tiel afablaj, ke homoj el ĉiu lando devis pagi nur malaltajn kostojn – 16€ ĝis 21€ kiel aliĝkotizon, 11,60€ por tranokto en komforta dulita ĉambro kaj 5,80€ por bonega tagmanĝo. Domaĝe, ke aliaj germanoj ne eluzis ĉi tiun ŝancon renkonti siajn polajn samideanojn je favoraj kondiĉoj en belega aranĝo.

La kongreso estis plena je ĝojo kaj kortuŝo. Menciindas, ke iuj el la ŝatataj “steluloj”, kiuj pliriĉigis la kongreson per muziko aŭ danco, estis handikapuloj. Aparte kortuŝa estis la momento, kiam en la programero pri Ŝoaho la prelegantino tiel emociiĝis, ke ŝi devis peti amikon daŭrigi la laŭtlegadon de sia manuskripto. Ŝi trovis ĉies komprenon, ĉar temis pri la deportado de ŝia avino al koncentrejo.

Apenaŭ eblas diri ion negativan pri la kongreso. Krokodilado ne malabundis, sed apenaŭ ĝenis, ĉar en ĉeesto de iuj el la 20 eksterlandanoj la poloj kutime ŝanĝis sian lingvon al Esperanto. Kaj facilis havi ĉiam ĉirkaŭ si geamikojn, kun kiuj eblis tre bone interparoli en Esperanto. Eĉ la fakto, ke nia ĉefa tranoktejo troviĝis ekster la urbocentro, ne ĝenis min, ĉar busoj veturis tre fidinde – kaj nia kongresa nomŝildo validis kiel busbileto. Tiu ĉefa tranoktejo estis studenta domo inter brua strato kaj brua fabriko, tiel ke nokte necesis elekti inter du malbonoj: bruo (malferma fenestro) kaj varmego (fermita fenestro). Tiun problemon bonŝance malakrigis la fakto, ke ni kutime sidis kune kun geamikoj ĝis la unua horo nokte, kiam la ĉambro jam iom malvarmiĝis.

Eblas ankoraŭ mencii diversajn sukcesajn programerojn, ekzemple la prelegon de Jolanta Chrustowicz pri komunaĵoj inter Ludoviko Zamenhof kaj John Lennon (pri kies koncepta lando *Nutopio* mi aŭdis unuafoje en tiu prelego), kaj la ekskurson tra la urbo, kiun ni finis per plantado de Esperanta arbo. Per senvualigo de la koncerna memorŝtono, ni ekhavis novan ZEOn en Kalisz.

Restas en mia memoro multaj belegaj momentoj – kaj belegaj kantoj, ekzemple, “Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko…” Vere mi sentas en mi profundan dankemon al Zamenhof – sed ankaŭ al ĉiuj organizantoj kaj kontribuantoj de tiu ĉi mirinde bela kongreso.

Ulrich Matthias

UAM: Bonaj rezultoj de la unika eksperimento

La 25 jarojn de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) ni festis en 2022 per la lanĉo de magistraj studoj pri interlingvistiko kadre de la studdirekto “Lingvistiko kaj informmastrumado”. La Studoj en Poznano enhavis ne nur studobjektojn rilatajn al la lingvo, kulturo kaj movado de Esperanto, al planlingvoj, sed ankaŭ perfektigon en la angla lingvo kaj angle informmastrumadon (diĝitan humanistikon). En la centro troviĝis ankaŭ interkultura komunikado kaj lingvoplanado kaj -politiko, sume, donante bonan bazon por trovi laboron poste.

La unikaj magistraj studoj startis kun dek ĉinaj studentoj (el kiuj sep el la universitato en Zaozhuang). Ĉiuj dek atingis la finon de la dujaraj studoj. La 27an de junio 2024 sep studentoj sukcese trapasis la magistran ekzamenon, dum kiu ili defendis siajn diplomlaboraĵojn kaj respondis al demandoj.

Ĉiuj studentoj esprimis deziron plu kunlabori en la vortara projekto de Ilona Koutny aŭ plu esplori kaj verki artikolon pri sia temo. Iuj povos dungiĝi en la Universitato en Zaozhuang, en la Esperanto-Muzeo, kaj pensas eĉ pri doktoriĝo en UAM.

Antaŭ la ekzameno aperis la *Angla-Esperanta-Ĉina etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado*. Temas pri la aktualigita kaj ĉinigita versio de la *Angla-Esperanta-Hungara etvortaro* de Ilona Koutny. Du studentoj el la magistra grupo, Long Yunxia (Nuba) kaj Sun Yesheng (Suno), pretigis la ĉinajn versiojn, kontrolis ilin Gong Xiaofeng (Arko). En la libreto troviĝas ankaŭ ekzercoj por uzi la vortaron en progresanta nivelo de Esperanto – kion la studentoj povis mem sperti.

Okaze de la dua anonco de la studoj en 2023 – post la sukcesa unua jaro – neniu esperantisto aliĝis krom kvin ĉinaj studentoj, kio ne sufiĉis por startigi la sekvan grupon. UAM fermis la studojn. La nuna eksperimento restos unika.

Ilona Koutny
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Fino de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano

La Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) estis fonditaj en 1997, kaj la unua grupo startis en 1998. La 9-11an de septembro 2024, post 26 jaroj da funkciado, la oka trijara studgrupo trapasis sian lastan ekzamenon kun defendo de faklaboraĵoj. Tiu ĉi grupo estis la plej granda komence en 2021 kaj ankaŭ fine de la studoj. Krom tri studentoj, kiuj ekzameniĝos kun prokrasto, nun, en septembro 11 gestudentoj prezentis siajn temojn rilatajn al kvar specialiĝoj:

Tradukado (gvidanto de la unuaj tri laboraĵoj: Chris Gledhill):

Gong Xiaofeng (Ĉinio): Apliko de universalaj trajtoj de tradukado en la tradukoj de ĉina klasika romano *Rugĝdoma Sonĝo* (recenzanto: Nicolau Dols)

O Gisook (Kroatio): Korea-Esperanta traduko de korea moderna poezio (recenzanto: Klaus Schubert)

Vitor Tagor de Magalhaes Monteiro (BR): Aŭtomataj Tradukiloj (recenzanto: Klaus Schubert)

Yu Jianchao (Ĉinio): El la ĉina al Esperanto: diferencaj esprimoj en realaĵo, strukturoj kaj kulturaĵoj (+ etvortara ĉapitro pri lernado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto: Alessandra Madella)

Interlingvistiko (gvidanto Vera Barandovská-Frank):

Ana Alebić-Juretić (Kroatio): La fonto(j) de la Fiuma idiomo. Ĉu la Fiuma idiomo estis la unua internacia lingvo en Rijeka (eksa Fiume)? (recenzanto: Ida Stria)

Renato Guedes Filho (Brazilo): Ikoneco por artefaritaj lingvoj (recenzanto: Ida Stria)

Esperanto-movado (gvidanto Mark Fettes):

Fabio Fortes (Brazilo): Kiom lingvo efikas sur la mondo? La utopioj kaj la politika programo de Esperanto laŭ Brazilaj esperantistoj (recenzanto: Kimura Goro Christoph)

Tim Owen (Britio): Esperanto en Britujo: de la Unua Libro ĝis gastigado de la Universala Kongreso en 1907 (recenzanto: Ziko van Dijk)

Metodiko (gvidanto Katalin Kováts):

Maurizio Giacometto (Britio): Dedistanca edukado en Esperanto: la programo Ekparolu! kiel ilo por efika dua-lingva akirado (recenzanto: Peter Weide)

Rafał Darasz (Pollando): Andrzej Pettyn – la pedagogia penso kaj aliro al instruado spegulita en liaj elektitaj lernolibroj de Esperanto (recenzanto: Barbara Pietrzak)

Milan Kolka (Ĉeĥio): Pretigo de elektronika versio por plurlingva temvortaro (+ programado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto Markos Kramer)

La unujaran instruistan trejnadon finis kvin partoprenantoj (gvidanto Katalin Kováts):

Aranka László (Serbio): Reta instruado de Esperanto en miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj (recenzanto Rob Moerbeek);

Nedeljka Lozanić (Serbio): Reta instruado de Esperanto por nevidantoj (recenzanto Rob Moerbeek)

Yentl-Rose Hemelrijk (Francio): Pedadogia analizo de verkigaj taskoj (recenzanto Hans Becklin),

Lidia Komar (Pollando): Halina Komar kaj ŝia socia agado per Esperanto (recenzanto Barbara Pietrzak)

Zhang Changsheng (Ĉinio): Kultura konverĝo, tradukado kaj elpensoj por ĝia instruado (+ etvortara ĉapitro pri laboro, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto Alessandra Madella).

Ili havis kompleksan ekzamenon pri Esperantaj lingvo, kulturo kaj movado, krome provinstruadon. Ni havis la bonŝancon gastigi ankaŭ la prezidanton de UEA, Duncan Charters, kiu partoprenis en ilia prijuĝo.

Post la ekzamenoj okazis la Interlingvistika laborsekcio de la fama Internacia Lingvista Kongreso en Poznano kun 12 anglalingvaj prelegoj kaj diskutoj, kiun la studentoj povis partopreni. Ĵaŭde la studentoj kaj instruistoj de la Interlingvistika fako de UAM festis kune kun la prelegantoj de la Kongreso dum la agrabla bankedo. Dankon al ESF por la subteno de la studentoj kaj festado. La kultura festivalo Arkones (same la lasta) fermis la semajnon kun riĉa programo. Pluraj kontribuoj de finstudintoj kaj instruistoj de la Interlingvistikaj Studoj kolorigis la programon.

Ilona Koutny
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Interlingvistika sekcio en Internacia Lingvista Kongreso

La Internacia Lingvista Kongreso (angle: ICL) estas la plej granda kaj prestiĝa aranĝo de lingvistoj, kiu okazas ĉiun kvinan jaron en diversaj landoj. La 21an kongreson la 8-14an de septembro 2024 organizis la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano

Multaj sekcioj kaj laborsekcioj funkciis dum la semajno. La Interlingvistikan laborsekcion kun 12 prelegoj el 11 landoj gvidis Ilona Koutny (UAM) kaj Nicolau Dols (Universitato de Balearaj Insuloj, Hispanio) ĵaŭdon posttagmeze kaj vendredon. Dum la enkonduka parto, Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj François Lo Jacomo, sekretario de la Akademio de Esperanto salutis la partoprenantojn, poste Ilona Koutny skizis la terenon de interlingvistiko kaj esperantologio, fine Nicolau Dols prezentis la temojn kaj prelegantojn de la sekcio.

Interlingvistiko havas historian radikon en ICL, jam dum la 2a kongreso en 1931, en Ĝenevo Otto Jespersen (konata dana lingvisto, adepto de Esperanto, poste de Ido kaj kreinto de Novial) iniciatis diskuton pri la problemo de internacia lingvo, kiun partoprenis konataj lingvistoj (i.a. Sapir). Li enkondukis interlingvistikon kiel lingvistikan branĉon (li antaŭe aperigis sian verkon “A New Science Interlinguistics”, 1930).

La temoj de la prelegoj estis diversaj.

Sabine Fiedler (Germanio) traktis la temojn de esperantologia fakliteraturo dum la lastaj jardekoj. Nicolau Dols analizis konverĝajn kaj diverĝajn tendencojn en Esperanto surbaze de la Tekstaro. Christopher Gledhill (Britio/Francio) prezentis la problemojn de paronimoj kaze de terminoj. Philippe Planchon (Francio) diskutis la uzon de -ig kaj -iĝ lige kun la verbaj valentoj.

Marc van Ostendorp (Nederlando) esploris la prononcon de esperantaj akronimoj. Natalja Dankova (Kanado) analizis la uzon de artikolo en parolataj, spontanaj tekstoj de latinidlingvanoj kaj slavlingvanoj. François Lo Jacomo (Francio) traktis la manieron kiel Esperanto riĉiĝas per novaj vortoj. Ilona Koutny prezentis “István Szerdahelyi (interlingvisto, novema esperantologo, fondinto de la Esperanto fako en Budapeŝto)” okaze de lia 100a naskiĝjubileo.

Fabio Fortes (Brazilo) esploris kiomgrade la bazaj nocioj de esperantistoj – kiel lingva demokratio, lingvaj rajtoj, komuna lingvo en interkultura komunikado – estas akceptataj inter ne-esperantistaj studentoj en Brazilo. Başak Aray (Turkio) parolis pri logika empirismo kaj lingvoplanado kaze de *Carnap*. Věră Barandovská-Frank (Ĉeĥio/Germanio) elstarigis la rolon de la latina kaj latinidaj lingvoj en lingvoplanado. Jorge Antonio Leoni de León (Kostariko) elektis aktualan temon, la uzon de artefarita intelekto en la konstruado de lingvoj, ĝiajn teoriajn, metodikajn kaj etikajn aspektojn.

La prelegojn de la Interlingvistika sekcio ĉeestis pli ol tridek kongresanoj, inkluzive de la postdiplomaj interlingvistikaj studentoj (kiuj finekzameniĝis komence de la kongresa semajno) kaj de neesperantistoj. La prelegoj okazis angle, sed estis ankaŭ esperantlingvaj demandoj poste, kiel tiuj de Alicja Sakaguchi (konata interlingvistino kiu reprezentas mallarĝan aliron al interlingvistiko). Ni planas publikigi libron el la prilaboritaj prelegoj.

Ni esprimas nian dankon al ESF pro ĝia multflanka subteno, aliĝkotizoj kaj vojaĝigo de la prelegantoj kaj eventuala subteno de la eldonota libro.

Krom en la interlingvistika sekcio okazis prelegoj de aliaj esperantistoj: Bengt-Arne Wickström, Ida Stria kaj Sean O'Riain en la lingvopolitika sekcio, Rafał Darasz en la signolingva sekcio kaj Ana Alebić-Juretić en la sekcio pri historia lingvistiko (la du lastaj ĵus finis la interlingvistikajn studojn de UAM).

Dum la semajnfina kultura aranĝo ARKONES kelkaj prelegantoj kontribuis al la programo.

Ilona Koutny

La 38a Arkones: Laŭdire la lasta

La long-tradicia semajnfina renkontiĝo Arkones okazis la 38an fojon la 13-15an de septembro en Poznano. Estis malpli multaj partoprenantoj (125 aliĝoj) kaj pli malgranda programo ol en iuj pasintaj jaroj, tamen venis pli multaj homoj ol en 2023 (nur 82 aliĝoj). Verŝajne la kvanto rekreskis parte pro tio, ke ĉi-foje estis laŭdire la lasta Arkones, do la lasta ŝanco partopreni ĝin! Do estis iuj homoj por sia unua vizito al tiu ofte laŭdata renkontiĝo, kaj aliaj, kiuj revenis post paŭzo por resperti ĝin lastan fojon, aldone al tiuj kiel mi, kiuj simple regule ĉeestas.

Depost la pandemio, la programo iomete ŝrumpis kaj havas nur du trakojn (mi memoras kelkajn grandiozajn jarojn kun tri aŭ eĉ kvar trakoj), tamen denove estis pluraj interesaj programeroj, kaj certe ne eblis vidi ĉion.

Kiel kutime, la du vesperaj programoj havis multan diversan muzikon, kion mi ŝatas pri Arkones. Revenis la kortuŝa vendreda muzika kaj danca prezento de ukrainaj rifuĝintoj de la milito. Suzana kaj ŝia fianĉo Mirek koncertis denove. Pli nekutima muzika prezento estis mezepoka muziko de profesoro Marek Nahajowski, kiu ludis diversajn malnovajn bekflutojn kaj ankaŭ interese informis nin pri la instrumentoj kaj pri la komponaĵoj. El eksterlando venis popularaj muzikistoj: ĴeLe (kiun mi ĵus ĝuis ankaŭ en la Litovia IJK!) kaj JoMo!

En kelkaj programeroj la salono “Spegulejo” estis tro malgranda por la spektantoj kaj aŭskultantoj (Foto: Ulrich Matthias)

Kompreneble la tagaj programeroj estis diversaj. Ekzemple mi aŭdis prelegon de Duncan Charters pri literaturo: kio ĝi estas, kaj kial indas legi ĝin. Katalin Kováts rakontis pri sia sperto kun kancera kuracado komence de la pandemio, kaj pri la rezulta teksto “Pli ol plena”, kiun ŝi verkis pri la sperto (kiu aperis en *Beletra Almanako*, №44) – ŝi parolis en la malgranda ĉambro “Svarmejo” anstataŭ la granda “Spegulejo” pro la ideo, ke malmultaj homoj volus aŭdi pri kancero en intima etoso, sed fakte la “Svarmejo” ja svarmis kun multaj aŭskultantoj! Pli leĝere kaj amuze, Katalin ankaŭ gvidis kvizon en la stilo de “Risko” de edukado.net. Aida Čižikaitė rakontis pri multaj lokoj en Kaŭno, kie okazos la venonta BET, kaj pluraj ja rilatis al Esperanto. Estis ankaŭ prelego pri tio, kiel bestoj evolue iĝis homoj, prelego pri diferencoj en interhomaj rilatoj por esperantistoj kaj neesperantistoj, prelego pri lingvistaj aspektoj de familiaj nomoj, ktp.

Kiel kutime, pluraj studentoj de la interlingvistikaj studoj prezentis pri diversaj interesaj temoj, ĉu rilate al siaj studoj (ekzemple Arko (Gong Xiaofeng) pri la Esperanta traduko de la ĉina klasikaĵo *Ruĝdoma sonĝo*), ĉu kulture rilate al siaj hejmlandoj: ekzemple Ĝojo (Hoan Trần) pri vjetnamaj manĝoj.

La viva teatraĵo *Oni devas pardoni* de la juna trupo Studio P prezentiĝis. Filmeto montriĝis kun deklamado (de Urszula Zybura) de hajkoj kun akompano de ĵaza pianado (de Świętosław Fortuna), verŝajne filmita dum la pola kongreso de Esperanto.

La tradicia libroserveto funkciis kun multaj malnovaj libroj (mi aĉetis malnovan tradukon de Goethe ĉi-foje) kaj novaj belaj eldonoj el Bjalistoko.

Kutime tia raporto ankaŭ celas kuraĝigi interesatojn partopreni la venontan fojon… sed oni diras, ke tio estis la lasta Arkones! Kial? Finiĝas la interlingvistikaj studoj, kiujn gvidis Ilona Koutny dum multaj jaroj, kaj la ligo inter la studoj kaj Arkones ĉiam estis grava, ĉar la instruistoj kaj studentoj estis granda porcio de la partoprenantoj kaj prezentantoj dum Arkones. Pli frua bato al Arkones estis la forpaso en 2018 de la longtempa ĉeforganizanto Paweł Janowczyk. Do, bedaŭrinde, ŝajnas ke Arkones nun ĉesis.

Arkones havis siajn proprajn etoson kaj tradiciojn, kaj dum jardekoj ĝin ĝuis multaj homoj el multaj landoj. Certe multaj homoj sentas dankemon al la multaj diversaj organizantoj kaj prezentantoj tra la jaroj. Malfeliĉas la fino, sed feliĉas, ke Arkones ekzistis kaj riĉigis niajn vivojn.

PS: Tamen mi aŭdetis nebulajn onidirojn kaj esperetojn, ke eventuale iuj prenos la torĉon por daŭrigi tian semajnfinan kulturan eventon, ĉu en Poznano, ĉu aliloke en Polujo… Ni vidu.

Russ Williams

Spektaklo de Studio P (Foto: Ulrich Matthias)

NASK-2024: 25 lernohoroj kaj multo alia

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ĉi-jare okazis de la 30a de junio ĝis la 6a de julio en Raleigh, la ĉefurbo de la usona ŝtato Norda Karolino. Naskita en la San-Franciska Ŝtata Universitato en 1970, la 53a NASK disvolviĝis en sia nuntempa hejmo, la universitato William Peace. Hans Becklin respondecis pri edukaj aferoj, kaj Brian Harmon pri la administrado.

Jam printempe okazis ok-sesia virtuala preparkurso kiun estris Vince Allison. (El la 22 lernantoj, sep poste aliĝis al la somera kursaro.) La ĉi-jara ĉeesta aranĝo do proponis nur du klasojn anstataŭ la kutimaj tri. La pli altan nivelon (C1) gvidis Birke Dockhorn (Germanio), kaj la meznivelan (B2) instruis Rafael Nogueras (Usono/Porto-Riko). Ambaŭ estas veteranaj NASK-teamanoj.

Ĉeestis 24 lernantoj el 15 usonaj ŝtatoj, inkluzive de ukraina geparo kiu nun rifuĝas en Norda Karolino. Inter ili troviĝis lingvisto, psikologo, artistoj, inĝenieroj, instruistoj kaj komputilistoj, de studenta ĝis emerita aĝo, parolantoj de kvar malsamaj denaskaj lingvoj. Pro la manko de tria nivelo kaj pro tio, ke la ĉi-jara usona landa kongreso okazis en tre fora Los-Anĝeleso, la studantaro rezultis nekutime malgranda. Tio tamen ebligis aparte intimajn interrilatojn inter la partoprenantoj.

Ĉiutage la lernantoj pasigis kvin horojn en klasĉambro, do entute profitis 25 horojn da instruado. Kompreneble, en la tuta aranĝo oni uzis nur Esperanton, en la dormejo kaj la manĝejo (kie eĉ la menuoj aperis en Esperanto), same kiel dum la lecionoj.

En la klaso de Rafa (kun instruhelpanto Enrique Haro Márquez) la gramatiko kaj ĝusta vortouzo okupis la ĉefan lokon. Aldoniĝis eroj pri diversaj aspektoj de la lingvo, ĝia historio kaj la Esperanto-kulturo, al kiuj la lernantoj interparole esprimis siajn proprajn reagojn. Krom laborfolioj kaj skribaj ekzercoj, aktivaĵoj kiel komprenigaj desegnado kaj aktorado vigligis la lecionojn, kaj la uzo de la aplikaĵo Mentimeter por tuj registri respondojn al demandoj aktualigis la instruadon. Inter la klasanoj abundis ridado kaj reciproka helpado en komforta partopreniga etoso.

La supera klaso, post prepara ampleksigo de la vortostoko pri korpopartoj, aparte traktadis la menson, la memoron, la demencon kaj rilatajn temojn el pluraj vidpunktoj. Ĉiu sesio komenciĝis – ĝuste “por akrigi la menson” – per amuzega tripilka ĵetado laŭ ŝanĝiĝantaj reguloj, kiuj tagon post tago fariĝis pli defiaj. Tri diversstilaj kantoj de nuntempaj Esperanto-muzikgrupoj tuŝis aktualajn temojn pri militado, recikligado kaj iluziaj revoj. Pluraj prezentaĵoj de lernantoj aldonis mallongajn lecionojn pri literaturaj kaj sciencaj temoj. La instruado utiligis variajn teknikojn, kaj la diskutoj estis viglaj, trafaj kaj ĉiel agrablaj.

Tri vesperaj programoj prezentis okazojn por kanti Esperante, aŭskulti rakontojn pri Ukrainio kaj sperti improvizitan teatraĵon. La 4an de julio, je la usona nacia tago (kio tamen ne nuligis la lecionojn), kelkaj veturis vespere por spekti artfajraĵojn aŭ ĉeesti festan basbalan matĉon. Vendredon okazis la diploma ceremonio, antaŭ kiu

Alex Miller vidigis filmigitajn fotojn de NASK-2023, kaj Birke (fluto) kaj Mike Lowden (gitaro) kunmuzikis.

Post ĉiu vespera programero, usonstila gufujo proponis diverstipajn ludojn kaj okazojn muziki kaj babili en malstreĉa etoso kun manĝetoj kaj trinkaĵoj.

Dum la semajno la partoprenantoj disponis pri ampleksa biblioteko de prunteblaj libroj kaj ankaŭ interesaj senpagaj esperantaĵoj. Kiel kutime, memoraĵoj pri la aranĝo aperis poste en 32-paĝa almanako *La NASKa Fasko*, kiu prezentis verketojn kaj alispecajn kontribuaĵojn de la tuta komunumo.

Du semajnojn poste, kadre de la usona landkongreso, la NASKa “marko” okazigis ok-horajn refreŝigajn kursetojn je du niveloj, kiuj allogis po 15 partoprenantojn. Instruis Brian Harmon kaj Rafael Nogueras. Kredeble aliaj kursoj – virtualaj kaj ĉeestaj – aperos estonte sub la NASKa tegmento.

La NASKaj kursoj estis konceptitaj kaj realigitaj de usona aktivisto Cathy Schulze (1913–1999), cele al altkvalita klerigo de usonaj esperantistoj. La kursaro nun estas konstanta projekto de la Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu estras kaj subvencias ĝin per monsumoj kiujn Cathy kaj ŝia edzo heredigis al la organizaĵo.

Pliaj informoj pri NASK kaj ĝia historio troviĝas en la retejo https://nask.esperanto-usa.org/pri/.

Bill Maxey

Foto de Alekso Miller

Postkongresozaj notoj el Usono

Post surprize longa promeno, ni atingis la mezon de la plaĝo. Ni ankoraŭ povis aŭdi la Esperantan version de iama furorkanto, kiun ludigis la diskĵokeo ĉe la restoracio, kie ni ĵus vespermanĝis. La aero estis malvarmeta, kaj mi volis havi ion pli varman ol la T-ĉemizo, kiun mi portis. Krom tio mi estis tre kontenta. Ni pluiris al la bordo, kaj iom vadis en la Pacifika Oceano. Dum la suno subiris, kaj mi babilis kun miaj kunuloj, mi rimarkis, ke la ondetoj ĉe niaj piedoj plenis je nekalkuleble multaj flosantaj sableroj, kiuj kune aspektis kiel fumo sub la akvo. Mi tiel ĝojis esti tie, kaj tuj sciis, ke mi longe memoros tiun momenton kun granda dankemo.

Sed kial mi estis tie? Mi facile povus maltrafi tiun belegan sperton, sed feliĉe mi decidis partopreni la ĉi-jaran usonan landan kongreson ĉe California State University, Dominguez Hills en Carson, Kalifornio. Mi ekiris al la kongreso vendrede, la 12an de julio. Mi tre agrable pasigis longan parton de la flugo al Kalifornio legante en PMEG pri la uzo de *si* en kompleksaj frazoj. Foriginte kelkajn dubojn pri la ĝusta maniero uzi tiun problemdonan pronomon (kaj kun kelkaj novaj demandoj diskuteblaj kun aliaj harfendemuloj), mi elaviadiliĝis kaj buse, trajne kaj alibuse veturis al la kongresejo.

Per la Telegramo-grupo por kongresanoj, mi sciis, ke mi unue iru al la universitata biblioteko. Kiam mi vidis la verdajn balonojn kaj sagojn, mi sciis, ke mi iras al la ĝusta direkto. En la biblioteko mi facile trovis la akceptejon, ricevis mian nomŝildon kaj komencis babiladi kun aliaj partoprenantoj. Kelkajn el ili mi unue renkontis antaŭ multaj jaroj, sed jam longe ne vidis. Kun unu mi ŝercis pri la grizaj haroj, kiujn ni ambaŭ senintence akiris inter tiam kaj nun. Aliajn mi ekkonis lastatempe per retaj eventoj kaj videobabilado, kaj estis plezuro babili kun ili la unuan fojon en la malvirtuala mondo. Tamen la plimulton de la ĉeestantoj mi tute ne konis antaŭ la kongreso. Mi estas introvertita, sed mi volis plene kapti la okazon uzi la lingvon ekster Zoom-ĉambro, do mi penis dum kelkaj tagoj forgesi miajn ordinarajn tendencojn kaj konatiĝi kiel eble plej multe kun aliaj kongresanoj. Feliĉe, mi trovis ilin tre amikemaj, kaj mi ege ĝuis niajn konversaciojn. Iuj temis pri la du komunaj interesoj, kiujn havas pli-malpli ĉiu esperantisto: Esperanto mem kaj la kulturo, kiu floras pere de la lingvo. Ni parolis pri tio, kial kaj kiel ni lernis Esperanton, kion ni faras per ĝi, kiujn Esperanto-librojn ni plej ŝatas, ktp. Ŝercoj kaj aludoj tute ne kompreneblaj ekster Esperantujo abundis, kaj mi ĝuis la kontraston kun mia normala, malverda vivo. Sed viglajn diskutojn vekis ankaŭ multaj temoj, kiuj ne rekte rilatis al Esperanto: sukcesoj kaj malsukcesoj en la lernado de aliaj lingvoj, laboro, hobioj, revoj, religio, kaj aktualaĵoj estis nur kelkaj el ili.

Dum plejparto de la kongreso ni estis en unu grandega, longa ĉambro en la biblioteko. Murgrandaj fenestroj enlasis multe da sunlumo, kaj mi trovis la ejon tre taŭga kaj komforta. En unu malgranda apuda ĉambro troviĝis la libroservo, kaj en alia la universitataj arĥivistoj prezentis kolekton de esperantaĵoj. Promendistance

de la biblioteko estis universitata apartamento, kiu servis kiel nia gufujo, kie malfruvespere kongresanoj kolektiĝis por babilado kaj tabloludoj.

Vendredon posttagmeze komenciĝis “miniNASK”, Esperanto-kurso por kongresanoj. La nomo devenas de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kiu okazis ĉi-jare en Raleigh (vd. p. 37). Vespere okazis du interkonaj ludoj ekstere. Estis multe da kurado kaj ridado kaj, je la fino de la dua ludo, ĉiu montris al la grupo ian talenton. Estiĝis amuza kaj amika etoso, kiu karakterizis la kongreson.

Sabate kaj dimanĉe dum la tago okazis la kongresaj programeroj, inkluzive de pluraj kunvenoj kaj diskutoj pri diversaj flankoj de la agado de la asocio Esperanto-USA. Ofte estis almenaŭ du programeroj samtempe, do ne eblis partopreni ĉion. Mi tamen tre ĝuis ĉion, kion mi elektis: interalie, mi partoprenis lecionon pri origamio, lernis krei krucvortenigmojn kaj aŭskultis mirindan rakonton pri vojaĝado per Pasporta Servo. David Jordan, la ĉefparolanto, pensige prelegis pri la vortoj *revo* kaj *fantazio* kaj poste verve laŭtlegis unu el siaj spritaj rakontoj pri imagita historio de Esperantujo.

La sabatan vesperon ni iris per buso al Seal Beach por festo ĉe la plaĝo. Tie ni ĝuis bongustan vespermanĝon, dancigan muzikon, kaj belegan pejzaĝon. Plurfoje mi aŭdis, ke la etoso tie similis al la etoso ĉe junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Post la vespermanĝo, kiam mi promenis kun malgranda grupo kaj vadis en la oceano, mi sentis min profunde feliĉa, ke mi decidis veni al la kongreso.

Foto de Alekso Miller

La dimanĉan vesperon okazis la solena fermo de la kongreso, interesa prelego pri Esperanto en Holivudo, kaj la arta vespero, dum kiu la kongresanoj regalis unu la aliajn per muzikado, dancado, kaj aliaj spektakloj. La sekvan matenon, mi reiris al la flughaveno. Mi estis sola, sed dezirante iom prokrasti la finon de mia kongresa sperto, mi trovis aliajn kongresanojn helpe de la Telegramo-grupo. Mi atendis mian flugon kun ili. Finfine mi devis ilin adiaŭi, kaj alfronti la malpli solenan sed pli definitivan fermon de la kongreso.

Fine de la kongreso, mi plurfoje aŭdis la vorton *postkongresozo.* Ĝi estas nomo por la malgaja sento de soleco, kiun multaj spertas post kongresoj, kiam novaj kaj malnovaj amikoj estas malproksimaj, kaj oni estas foririnta de Esperantujo. Kvankam estis bone reveni hejmen kaj brakumi denove miajn karajn infanojn kaj edzinon, postkongresozo ja iugrade trafis min; mankis al mi la aliaj kongresanoj kaj la belaj tagoj, kiujn ni kune ĝuis. Nu, se tiu kromefiko estas la postsekvo de partopreninda kongreso, mi povas akcepti ĝin. Mi elkore gratulas kaj dankas la organizintojn de la ĉi-jara Landa Kongreso, kaj esperas, ke la partoprenontoj de la sekva kongreso spertos simile sukcesan aranĝon.

Steven Cybulski

Ni venis, ni vidis, ni Valenciis

La 82a Hispana Esperanto-Kongreso sukcese okazis de la 5a ĝis la 9a de septembro en Valencio kun 108 partoprenantoj el 20 landoj, plejparte el Eŭropo, sed ankaŭ el Azio kaj Nordameriko. La kongreso okazis en nekutima, neferia tempo, ĉar la lokaj esperantistoj volis okazigi ĝin en Universidad Laboral (fakte, Centro-Edukativo), kaj tio estis ebla nur en la unua semajno de septembro.

Unu el la ĉefaj trajtoj de la kongreso en Valencia/Cheste estis la abundaj prelegoj, atelieroj kaj horoj de aŭtoroj. Entute 23 prelegantoj prezentis diversajn temojn tra 32 paroladoj. Preskaŭ ĉiam la ĉeestantoj povis elekti inter tri samtempaj prelegoj, kaj ĉiam estis multaj esperantistoj en la prelegoj. Kerne de la tuto estis AMO-Seminario, spirite gvidata de Stefan MacGill, kaj surloke efektivigita de Duncan Charters, Laura Brazzabeni, Rubén Fernández kaj Dennis Keefe. Speciala aplaŭdo iras al Charters pro liaj kvin tre interesaj kaj celtrafaj intervenoj.

La festparolado de José Antonio del Barrio traktis la historion de Universidad Laboral, nia kongresejo. Del Barrio, emerita fizikisto, kaj eminenta esperantisto, kortuŝis nin speciale, ĉar li mem kiel junulo faris parton de sia studado ĝuste tie en Universidad Laboral, ĉeestante kursojn, manĝante, dormante, diplomiĝante tie surloke. Kaj por vespere fini la Kongreson, Arno Langrange aktoris en profunda, arte prezentita teatraĵo *La ŝaknovelo* de Stefan Zweig.

Alia speciala programero estis la vizito al la urbodomo de Cheste kun ceremonio kaj akceptado de ĝia urbestro. Tiaj vizitoj ofte okazas en Esperantujo, sed ĉi-foje ĝi estis iom speciala, ĉar, kvankam Cheste havas nur 8 mil 500 loĝantojn, ĝi pose-

das tiom da ZEOj, kiom la metropolo Barcelono! Tri stratoj en Cheste havas loke kaj internacie famajn esperantistojn kiel nomojn. Aliloke en la urbeto troviĝas arta grafitio pri la esperantisto Francisco Mañez.

La tria interesa parto estis la longa postkongreso, speciale por tiuj eksterlandaj esperantistoj kiuj havis liberan tempon en septembro. La postkongresaj ekskursoj havis plurajn ĉiĉeronojn, inter ili profesoro pri astrofiziko Amri Wandel, kiu gvidis postkongresanojn tra la bela scienca muzeo kaj tra la specialaj ekspozicioj pri spac-esplorado. En la mezo de tri tuttagaj ekskursoj estis nostalgia tagmanĝo en la restoracio de la Palaco de Muziko, kie okazis la Universala Kongreso en 1993!

Fine menciindas, ke el la Kongreso venas nova konkurso, cerbo-bebo de Ramón Diago, pri ideoj kaj Esperanto, kun premioj de 1000, 600 kaj 400 eŭroj! La konkurso «Konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto “Francisco Mañez”» estas sponsorita de neesperantista organizo: Kultura Societo Ateneo la Alianco el Cheste. Detaloj riceveblas ĉe konkursoateneo@gmail.com.

Specialan dankon al ĉiuj LKKanoj, kiuj laboregis dum la Kongreso: Luis Salag, Rosa Zanón, Ana Montesinos, Niko Voloŝin, Ramón Diago kaj nia ĉionĉiamĉiefaranto Iván Garcia. Ankaŭ al Carmen López Martínez, Mari Carmen Segarra, kaj Duncan Charters, kiuj volontulis la tutan alven-tagon ĉe la stacidomo de Valencio por helpi la kongresanojn bone atingi la nefacile alireblan kongresejon proksime de Cheste. Kaj dankon al niaj konsilantoj, kiuj helpis dum la tuta planado-periodo: Ángel Arquillos, Laura Brazzabeni, Tonjo del Barrio kaj Alberto Granados Orcero.

Dennis Keefe
respondeculo pri prelegoj kaj postkongreso

Foto: José Antonio del Barrio

Itala Kongreso: Impona kiel ĉiam

De la 24a ĝis la 31a de aŭgusto okazis en Montecatini Terme la 90a Itala Kongreso de Esperanto kun 220 aliĝintoj el 21 landoj, el kiuj almenaŭ ducent efektive alvenis. La organizantoj denove elektis tre taŭgan urbon por la aranĝo: Montecatini Terme, fama banloko 50 km nordokcidente de Florenco.

La kongreso estis tre bone organizita. Kvankam unu monaton antaŭ ĝia komenco okazis brulo en la kongresejo, oni sukcesis trovi novan kongresejon apude kaj loĝigi ĉiujn partoprenantojn en tri proksimaj hoteloj.

Dum kvar antaŭtagmezoj okazis seminario pri interkultura kompetento, kiun brile gvidis la geprofesoroj Ilona Koutny kaj Duncan Charters. Pliaj elstaraj programeroj estis la koncertoj, el kiuj mi volas aparte mencii tiujn de Clarissa Sabatini, JoMo kaj *Kajto.* Ili ĉiuj muzikis ankaŭ ekster siaj propraj koncertoj kaj zorgis pri bonega etoso.

Kvankam mi ne partoprenis en la oficialaj ekskursoj, mi aŭdis ankaŭ pri ili ĉefe pozitivajn raportojn, aparte pri tiu al Massa. Ankaŭ ekster la oficiala programo oni povis bone amuziĝi. Mi havis la bonŝancon esti inter tiu triono de la kongresanoj, kiu loĝis en hotelo kun sufiĉe granda subĉiela naĝbaseno, kaj tre ĝuis naĝi tie kun geamikoj dum la preskaŭ ĉiam suna kaj varmega vetero. Krome oni povis promeni kun geamikoj en granda belega parko, kiu komenciĝis antaŭ nia kongresejo, aŭ preni la funikularon al Montecatini Alto – tre agrabla kaj vidinda antikva urboparto sur monto.

JoMo kaj Clarissa "Klarisa" Sabatini (Foto: Ulrich Matthias)

Apenaŭ eblas kritiki ion en la kongreso. Foje estis ankaŭ malpli sukcesaj programeroj, ekzemple la laŭ mi superflua "Resumo de la seminario" okazinta sen paralelaj programeroj en la lasta posttagmezo; la prelegantoj tie nur ripetis partojn de la seminario. Iom bedaŭrinde estas, ke la kongreso apenaŭ allogis junulojn (eble ankaŭ pro la parte samtempa IJK en Litovio), sed – kiel montris ekzemple la dancemo dum la koncertoj de JoMo kaj *Kajto* – entute la partoprenantaro estis tre vigla korpe kaj anime.

Partopreninte la lastajn kvar Italajn Kongresojn (la antaŭaj estis en Trieste, Assisi kaj Brescia), mi nun la kvaran fojon estis ege kontenta kaj sentas profundan dankon al la organiza teamo de Itala Esperanto-Federacio.

Ulrich Matthias

Oportuna jubileo por SAT-Kongreso

La 97a SAT-kongreso okazis en Oporto de la 5a ĝis la 11a de aŭgusto 2024. Ĝi estis la unua SAT-kongreso en Portugalio, ĝuste 50 jarojn post la Revolucio de la Diantoj. Ĝin partoprenis proksimume 80 kongresanoj el 16 landoj. Inter ili estis grupo de junuloj el Koreio, kiuj ricevis rektmetodan enkondukon al Esperanto, kaj tuj entuziasme ekinterŝanĝis kelkajn vortojn kun la ceteraj ĉeestantoj.

Apud la kutimaj laborkunsidoj okazis tre diversaj klerigaj prelegoj. Unu el ili rakontis pri la Kanto de Majo, francdevena kanto kiu famiĝis en Koreio dum la Gŭangŭ-ribelo de 1980. Aliaj traktitaj temoj estis la situacio de laboristoj en Palestino, ĉifrovalutoj, komuna uzado de pura akvo, neŭroscienco kaj ukraina kulturo. Ankaŭ estis prezentita bilanco pri la surstrata indignula movado en Madrido, kiu ekis en 2011, kaj nova libro eldonita de SATeH *Volontuloj kun okulvitroj*, kiu komparas du asertojn de eksterlandaj verkistoj dum la hispana enlanda milito. Du malmulte konataj historiaj figuroj estis prezentitaj: Jeanne Deroin, socialista aktivulino kaj unua virina kandidato por baloto en la franca parlamento en 1849, kaj Aristides Sousa Mendes, portugala konsulo en Bordozo, kiu helpis al judoj fuĝi el la nazia persekutado komence de la Dua Mondmilito.

Ankaŭ la Revolucio de la Diantoj estis memorigita, unue de prelego akompanata de kantoj, kaj poste de vizito al iama politika prizono de la salazarisma reĝimo, kie iama malliberigito, Maria José Ribeiro el la Unuiĝo de Portugalaj Kontraŭfaŝistaj Rezistantoj, kortuŝe rakontis pri tiamaj spertoj. La malfacila vivo de la kaptistoj de moruoj estis prezentita en la marmuzeo de Ilhavo, denove kun persona atesto de iama fiŝisto, antaŭ pli turisma vizito al la salmarĉoj kaj urbocentro de la apuda Aveiro. Kaj la ne pli enviinda laboro de karbominstoj estis prezentita en São Pedro da Cova.

La 98a SAT-Kongreso okazos en Svitavy (Ĉeĥio) 12-19an de julio 2025.

Vinko Markovo

Surinsula kongreso de kroataj esperantistoj

La unua el la kvin kongresoj de kroataj esperantistoj, por organizado de kiuj Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac en 2023 ricevis koncesion de Kroata Esperanto-Ligo, okazis en Prvić Luka sur la insulo Prvić apud Šibenik de la 21a ĝis 28a de junio. Laŭ ĉiuj karakterizaĵoj, ĝi estis malsama ol la antaŭaj kongresoj. La unuan fojon ĝi okazis en Dalmatio. Anstataŭ la kutimajn tri, ĝi daŭris sep tagojn kaj havis pli leĝeran karakteron.

La kongreso okazis en la hostelo de la ripozejo Požega, kiu, kompare kun la antaŭaj aranĝoj, estis iom pli modesta rilate la ofertitajn servojn, sed ĝi kontentigis plejparton de niaj bezonoj. Pro tio oni jam diskutas la eblecon organizi Esperanto-aranĝojn samloke ankaŭ dum la sekvaj jaroj.

Plejparto el la 85 aliĝintoj atingis la insulon per organizita busa kaj ŝipa transporto, kio por granda parto da ili estis unu el la ĉefaj instigoj por veni. Per publika transporto alveno sur la insulon estas malfacila kaj longdaŭra, kaj pro tio plejparto da kongresanoj decidis veni organizite. Kvankam la kongresanaro je unu triono estis malpli nombra ol kutime, konsiderante ĉiujn malfaciligajn cirkonstancojn, la organizantoj de la kongreso ne povas esti malkontentaj pri la kongresaj rezultoj. Aparte ĝojigas pli multnombra alveno de eksterlandanoj, el kiuj plej nombraj estis hungaroj (14). Tian nombron oni atribuas al la kunlaboro kun Hungaria Esperanto-Asocio surbaze de interkonsento pri kunlaboro kaj al reklamado de la kongreso dum la festado de Zamenhofa tago pasintan decembron en Budapeŝto. El aliaj landoj partoprenis Aŭstrio (1), Burundio (1), Pollando (1), Slovenio (1), Kanado (1), Litovio (1), Italio (1) kaj Britio (2).

En la oficiala kongresa programo Kroata Esperanto-Ligo okazigis sian jarkunvenon, kaj dum la kongreso estis organizita ankaŭ intensa Esperanto-kurso, ĉefe por la grupo da lernantoj el la 16a (lingva) gimnazio el Zagrebo.

Dimanĉe, la 23an de junio, sur la malferma teraso de la ripozejo okazis bone vizitita koncerto de Esperanta muziko de Neven Mrzlečki, kaj tagon poste pri la temo “Kiel funkcias senpilotaj aviadiloj” prelegis Robert Milijaš.

En la kongresa programo estis prezentitaj du novaj literaturaj eldonaĵoj de DEC: la romano *Alina* de la bulgara verkisto Julian Modest kaj proza-poezia kolekto *Nokta vojaĝo* de la ukraina aŭtorino Tatjana Auderskaja el Odeso. La librojn prezentis Zdravko Seleš kaj Josip Pleadin kun partopreno de Julian Modest.

Per informa projekcio estis prezentita biografio de esperantistino Antonija Jozičić el Hrvatska Kostajnica kaj la ĵus eldonita monografio pri tiu temo. Estis anoncitaj kongresoj por sekvaj jaroj kaj prezentita la projekto “Eŭropaj horizontoj pro kreski” de Erasmus+. Tamen, eble la plej grava atingaĵo de la kongreso estas la lanĉo de la longe atendita Registro de esperantistoj en Kroatio.

Dum la kongreso okazis eĉ kvar ekskursoj, tri surmare kaj unu surtere, ĉiu por po trideko da kongresanoj. Sabate, la 22an de junio, la kongresanoj vizitis la Nacian Parkon Krka, unu tagon poste (la 23an de junio) la Nacian parkon Kornati, kaj la 25an de junio (marde) la insulojn de la ŝibenika arkipelago (Kaprije, Žirje kaj Zlarin). Aŭtobusa ekskurso al Primošten estis realigita la 28an de junio, kaj ĉiujn ekskursojn gvidis profesia Esperanto-ĉiĉerono Neven Kovačić. El la ceteraj programeroj menciindas vizito al la Memorcentro de Faust Vrančić, kiu okazis la 26an de junio.

Estis eldonita kongresa libro, kaj la kongresanoj havis la okazon jam aliĝi al la 13a kongreso, okazonta la 16-18an de majo 2025 en Slavonski Brod.

DEC

Interkulture kaj inkluzive en la ĉefurbo de Serbio

De la 17a ĝis la 24a de aŭgusto en Beogrado okazis grava Esperanto-renkontiĝo “Interkulture kaj inkluzive”. En la ĉefurbo de Serbio samloke kaj samtempe okazis la 88a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj kaj seminario, organizita de Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), subvenciita de UEA, ILEI kaj Erasmus-projekto. Partoprenis 56 esperantistoj el 14 landoj.

La celo estis vigligi interkulturan komunikadon kaj inkluzivecon per prezentado de spertoj, esploroj kaj senpera komunikado de la partoprenantoj. La programo estis tre abunda kun riĉa labora, kultura kaj amuza enhavo.

Ni aŭskultis prelegon de la prezidanto de UEA, Dancan Charters, prelegon de bona konanto de la Esperanta literaturo, Zlatoje Martinov, pri tradukado pere de Esperanto, prelegojn kaj atelierojn de Francesco Maureli kaj Sara Spanò pri verkado de projektoj, mastrumado kaj subvencipetado.

Interesa estis prezento de egipta hieroglifa skribo kun reliefaj ilustraĵoj, preparita de Pier Luigi da Costa, prelego kaj ateliero pri novaj teknologioj, kiuj faciligas la vivon de la nevidantoj, prezentita de spertulo pri la temo, Gradimir Kragić. Atenton vekis ankaŭ prelego de Galina Lukjanenko pri rusa klasika literaturo kaj prezento de centjaraj aktivaĵoj de Eblogo (Esperanto-Blindul-Ligo de Germanio) pri kiu parolis ĝia prezidanto Verner Groen.

Okazis ankaŭ kunveno de Ĝenerala Asembleo de LIBE, kiun estis eble ĉeesti ankaŭ per Zoom. Estis traktitaj raportoj pri pasintjara agado kaj planoj por plivigligo de la agado. Nedeljka Ložajić kaj Aranka Laslo prezentis siajn spertojn pri instruado de Esperanto al nevidantoj kaj en miksitaj grupoj de vidantaj kaj viddifektitaj lernantoj.

Grava punkto dum la evento estis intensigo de kunlaboro de Balkan-danubaj landoj. Tiuteman prelegon prezentis István Szabolcs el Hungario.

La vespera programo abundis je muziko, poezio kaj teatro.

Kabaredo de la elstara Esperanto-aktoro kaj kantisto Saša Pilipović kontentigis gustojn de ĉiuj ĉeestantoj, kaj la aplaŭdoj igis lin plilongigi sian planitan programon. Gasto el Germanio, Karsten Snaforts, per sia koncerto en Esperanto kaj en aliaj lingvoj entuziasmigis la publikon. Uroš Martinović kaj Nedeljka Ložajić, akompanante sin per gitaro, prezentis muzikon, popularan en Serbio kaj sudslavaj landoj. La muzikgrupo “U ime ljubavi” (Je la nomo de la amo) kantis kelkajn kantojn en la serba lingvo kadre de nacia vespero. En la internacia arta vespero prezentiĝis pluraj partoprenantoj. Pro ia elektra difektiĝo tiu programo okazis en duonlumo, sed malgraŭ tio la vespero pasis en bona etoso, kaj ni ĝuis la programon kiun sperte gvidis Roberto Guido Tresoldi.

Krom pluraj deklamintoj, inter kiuj estis István Kabók, Dragana Dučić, Danijela Petrović, kaj kantistoj, kiuj kantis individue kaj grupe, mi menciu du grupojn kiuj

surloke ekzercis kaj prezentis sukcese kelkajn kantojn en Esperanto. Unu el la grupoj estis tiuj, kiuj partoprenis en konversacia rondo, kiun gvidis instruistino Natalia Kasymova. Profesiaj muzikistinoj Blanka Laslo (violonĉelo) kaj Danijela Petrović (piano) prezentis kelkajn komponaĵojn.

Dum la semajno estis organizitaj du ekskursoj. La unuan ni havis jam ĉe la komenco de la renkontiĝo. Ni vizitis la centron de la urbo kun ĉiĉeronino. La tuttaga ekskurso gvidis nin al Oplenac, maŭzoleo kaj bieno de la reĝfamilio Karađorđević, kaj poste al la urbo Kragujevac.

Nia kongresejo estis en Lernejo por viddifektitaj lernantoj, situanta en Zemun, parto de Beogrado, kie trafluas la rivero Danubo. Iun vesperon ni promenis tra la centro de Zemun, interesiĝantoj vizitis eĉ malnovan turon sur monto, kaj poste ni ĉiuj vespermanĝis ĉe la kajo.

Fine, mi diru, ke la evento estis interesa, utila, laciga por tiuj, kiuj deziris partopreni en ĉiuj programeroj kaj renkontiĝi kaj interparoli kun ĉiu kun kiu oni deziris fari tion.

Nedeljka Ložajić

Grupo da partoprenantoj de la ekskurso en Kragujevac

La 58a BET en la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo

Ĉi-jare Tartu iĝis tre alloga por turistoj, ĉar ĉi tiu fama universitata Estonia urbo estas la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo 2024. Tial bonega novaĵo estis, ke Tõnu Hirsik, prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio, sukcesis kunigi esperantistojn al la 58a BET en la universitata palaco de la 10a ĝis la 14a de julio.

Partoprenis 55 esperantistoj el 13 landoj; nature, la plej multaj (po 10-11) estis esperantistoj el Estonio, Latvio kaj Litovio, kaj gastoj el Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Hispanio, Hungario, Italio, Germanio, Luksemburgio, Pollando kaj Ukrainio – ili kreis vere internacian etoson kaj varian programon.

La alventago estis sen speciala programo, sed alvenintoj vespere kuniĝis por promeno tra la centro de la urbo kaj vespermanĝo en la belega ĉefplaco apud la urbodomo.

Ĵaŭde en la malfermo kun multaj salutoj de diversaj landoj; estis plezuro aŭskulti rakontojn de Biruta Rozenfelde kaj Zenonas Sabalys, kiuj kun aliaj junaj esperantistoj en 1959 komencis la tradicion de BEToj; post fotado kaj trarigardo de la libroservo okazis la unua prelego. Profesoro Enn Ernits prezentis kurtan historion pri la Esperanto-Movado en Estonio kaj montris la unuajn librojn eldonitajn en Estonio. Sekvis interesa prelego de d-ro Manfred Westermayer pri rolo de marĉoj en la vivo de naturo kaj de homaro. Pri tradukado kaj subtilaĵoj de tradukista laboro sprite kaj atentokapte parolis István Ertl, profesorino Nina Daniliuk rakontis pri “Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj: la verkoj en Esperanto”.

Finis la tagan programon tenera kaj melodia koncerto de la grupo “Kaval Kasi”, kie ni vidis kaj aŭdis la naciajn muzikajn instrumentojn. Multaj partoprenantoj, sugestitaj de Margarita Želve, post la vespermanĝo elektis la koncerton de latvaj muzikistoj ĉe la rivero, kadre de kultura urba programo.

Por prelegoj de la dua tago ni povis kunveni nur posttagmeze, ĉar la universitato estis matene fermita pro funebra ceremonio, sed eblis partopreni en la ekumena meso, kiu okazis en la malnova preĝejo de S-ta Johano, gvidata de luterana pastoro kun helpo de Kalle Vilbaste. Poste Kalle rakontis la historion de la preĝejo, atentigis pri amaso da specialaj ceramikaj figuroj, akompanis dezirantojn al la turo de la preĝejo, kie oni organizas eĉ teatraĵojn!

Tartu famas pri sia botanika ĝardeno, kaj multaj BETanoj vizitis ĝin kaj aliajn interesajn lokojn de la urbo.

Postagmezo estis denove prelega kaj unue ni aŭdis tiun de Manfred Westermayer “Historio de Ukrainio – de USSR al sendependeco”. Sekvis prelegoj de Margarita Želve pri “Latvaj Esperanto jubileoj en 2024” kaj Tuomo Grundström pri “Prapatro kaj nuna stelulino de la finnlingva dialekta literaturo”. La programon

finis impresoj de Gražina Opulskienė el ĉi-jara Nepala Himalaja renkontiĝo. La familio de Kalle Vilbaste strebis instrui kelkajn ludojn kaj dancigi esperantistojn post prelegoj.

Sabato estis ekskursa tago, kaj ni komencis per busa ekskurso al la impona Estonia Nacia Muzeo, kiu estas konstruita sur la loko de iama armea flughaveno. Tie oni detale prezentas la historion de Estonio, proponas interesan ekspozicion – kvazaŭ riveron pri lingvoj de la urala lingvofamilio, viziton al galerio kun bildoj de simbolistoj. Post la ekskurso kun ĉiĉeronino la ekskursantoj spektis apartajn ekspoziciojn de la muzeo. Posttagmeze ni ŝipis sur rivero Emajõgi. Restis iom da tempo por viziti grandan foiron en la centro de la Kultura Ĉefurbo 2024 kaj denove ĝui vesperan koncerton.

La fermo de BET okazis en la restoracio “Aleksander”, kie krom dankoj al Tõnu, Kalle, helpantoj kaj prelegantoj sonis ankaŭ Esperantaj kantoj. Pri programeroj de BET en socialaj retoj pere de “La Frateca Radio” informis kaj filmetojn kreis Laura Brazzabeni.

Dimanĉo estis forirtago, sed ne estis tempo por tristi, ja jam aperis la unua informilo pri BET-59 kiu okazos post unu jaro en Kaŭno, kaj ni plej verŝajne revidos en Kaŭno ne nur la ĉeestintojn de la Tartua BET, sed ankaŭ multajn esperantistojn de diversaj landoj.

Gražina Opulskienė

Vytenis Andriukaitis, membro de la Eŭropa parlamento, parolas al esperantistoj en la Aŭtuna Kunflugo. Apud li sidas Povilas Jegorovas (Foto: Jurgita Narbutienė).

Kunflugo kun eŭrop-parlamentano kaj aliaj famuloj

Litova Esperanto-Asocio (LEA) daŭrigas la tradicion organizi la printempajn kaj aŭtunajn kunflugojn de Litoviaj esperantistoj. La dua aŭtuna kunflugo okazis la 21-22an de septembro 2024 en la sama loko – agroturismejo en la vilaĝo Antalkiai, 26 kilometrojn de Kaŭno. La kunflugoj ĉefe estas destinitaj por Litoviaj esperantistoj, sed ni akceptas ankaŭ gastojn el aliaj landoj. La programo okazas parte en Esperanto kaj parte en la litova lingvo. Dum kelkaj jaroj ni kutimas kompili la programon ne nur el esperantistaj eroj, sed ni strebas allogi al la renkontiĝo famulojn nur parte ligitajn kun Esperanto aŭ neesperantistojn, kiuj estas interesaj por ni.

Tiel okazis ankaŭ ĉi-foje. La ĉefa ĉi-jara programero estis renkontiĝo kun Vytenis Povilas Andriukaitis – esperantisto, subskribinto de la Akto pri la sendependiĝo de Litovio la 11an de marto 1990, eksa vicprezidanto de la Litovia parlamento, eksa ministro pri sanprotektado de Litovio, eksa membro de Eŭropa Komisiono, eksa sendito de Monda Sanorganizo por Eŭropo, honora prezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio, membro de Honora Patrona Komitato de UEA, honora

membro de Eŭropa Esperanto-Unio, nuna membro de la Eŭropa parlamento. Li parolis ĉefe pri nunaj aktualaj problemoj en la mondo kaj en Eŭropo emfazante kulturajn aspektojn kaj konfliktojn inter civilizacioj kaj ligante tion kun ideoj de Ludoviko Zamenhof.

Sekvis renkontiĝo kun eksa eŭroparlamentano, profesoro de la Universitato Vytautas La Granda, fama kolektanto, Honora civitano de Kaŭno Liudas Mažylis. Li parolis ĉefe pri siaj historiaj esploroj kaj pri siaj aventuroj serĉante originalon de la Akto pri sendependiĝo de Litovio de la 16a de februaro 1918 en arkivoj de Germanio, kiun li trovis. Li demonstris esperantaĵojn, kiujn li havas en sia riĉa kolekto de historiaj artefaktoj.

Historiisto, ĵurnalisto kaj gvidanto de la eldonejo “Kalendorius” Aurelijus Norušević̆ius tre interese rakontis pri Litoviaj nomoj kaj eksponis siajn librojn pri tiu temo.

Dimanĉe nia gasto estis la verkisto, ĵurnalisto, prezidanto de Kaŭna filio de Litovia Verkista Asocio Gediminas Jankus. Li dum multaj jaroj kunlaboras kun LEA. Interesa fakto estas, ke liaj infanaĝo kaj junaĝo pasis en la malnova urboparto de Kaŭno sur la Zamenhof-strato, kie li tiutempe loĝis. Li konfesis, ke li delonge deziris lerni Esperanton kaj nun promesis ellerni ĝin antaŭ BET-59, kiu okazos sekvontjare en Kaŭno. Li estas ankaŭ kolektanto de sondiskoj, produktitaj antaŭ 1940, kaj li demonstris kelkajn malnovajn sondiskojn, interalie, kun la himno de Esperanto *La Espero.*

La dua dimanĉa renkontiĝo estis kun la verkistino kaj ĵurnalistino Rugilė Audenienė, kiu antaŭ kelkaj jaroj aperigis la libron *Vojaĝo* pri la sorto de sia esperantista avo kaj ricevis premion pro la plej bona litovlingva romano de la jaro.

La publiko estis tre aktiva, la prelegintoj ricevis multajn demandojn, ekestis diskutoj. La sabata vespero finiĝis per impona kaj varma violona koncerto de Ieva Laučkaitė kaj Živilė Kudirkaitė-Midvikienė. Sekvis komuna kantado de Esperantokantoj kun gitara akompano de Vytautas Šilas.

Dimanĉe la kunflugo finiĝis per elĉerpa rakonto de Povilas Jegorovas pri aktualaĵoj de la Litovia Esperanto-movado. La ĉefa atento estis direktita al la sekvontjara BET-59 en Kaŭno.

La renkontiĝon partoprenis 60 personoj el ses Litoviaj urboj. Krome, venis du litovoj el Germanio kaj el Britio. Funkciis riĉa libroservo. Laŭ ĉies opinioj la dua kunflugo estis tre interesa kaj tre sukcesa.

Povilas Jegorovas

La 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
okazos en Kaŭno (Litovio) la 5-13an de julio 2025.
La unua informilo jam aperis. Legu ĝin ĉe:
https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/

Ekspozicio omaĝe al Petras Čeliauskas

Laŭ iniciato de la urba muzeo de Švėkšna la 27an de julio okazis inaŭguro de ekspozicio, dediĉita al la eminenta litova pedagogo, landesploristo kaj esperantisto Petras Čeliauskas, forpasinta antaŭ du monatoj. La ekspozicio estis inaŭgurita kadre de la ĉiujara urba festo.

Petras Čeliauskas fondis ĉi tiun muzeon, kaj la muzeo deziris omaĝi al li per ĉi tiu ekspozicio. Ĝi respegulas la tri ĉefajn agaddirektojn de Čeliauskas – pedagogion, landesploradon, Esperanto-movadon. Ĉiuj eksponaĵoj estas prenitaj el la loĝejo de Čeliauskas – liaj personaj aĵoj, laboriloj, manuskriptoj, sliparo, libroj verkitaj de li en la litova lingvo kaj en Esperanto, kelkaj mebloj k. s. Dume la ekspozicio estas sufiĉe modesta, sed ĝi estos esence plibonigita kaj plivastigita.

Al la inaŭguro de la ekspozicio krom multaj lokanoj venis la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas, respondeca sekretario de LEA Asta Nastaravičiūtė kaj esperantistino el Kaŭno Jurgita Narbutienė. Dum la inaŭguro parolis la muzeistino Monika Žąsytienė, kelkaj lernantoj kaj amikoj de Čeliauskas. La prezidanto de LEA rakontis kelkajn malmulte konatajn epizodojn el lia esperantista vivo. Post la solenaĵo longe daŭris amika rakontado pri nia antaŭnelonge forpasinta eminentulo, omaĝe al kiu estas nomita unu el la salonoj de la 109a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo.

Povilas Jegorovas

Švėkšna: Monika Žąsytienė, Povilas Jegorovas, Asta Nastaravičiūtė (Foto: Jurgita Narbutienė)

La 45a REF: Gajaj en Geyer

La 45a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF) okazis fine de julio en la germana urbeto Geyer en Ercmontaro. REF estas la sola Esperanto-renkontiĝo, kiu kunigas ĉefe junajn denaskajn parolantojn de Esperanto. La plej junaj aĝis unu jaron. La plej maljuna denaska parolanto estis samtempe patrino de denaskulo. La plimulto de la gepatroj tamen lernis Esperanton kiel fremdan lingvon.

Memorganize en grupa domo

La dektagan renkontiĝon partoprenis 66 homoj el 18 familioj kaj kelkaj tagaj gastoj el la ĉirkaŭo. Kiel kongresejo estis elektita la iama pionira feridomo “Wilhelm Pieck”, kiu kiel renovigita grupdomo provizis ĉion necesan por komuna, memzorga aranĝo. En la bone ekipita kuirejo eblis kuiri por ĉiuj partoprenantoj senprobleme. Teamaj deĵoroj ekvilibre engaĝis la partoprenantojn en la sukcesigo de manĝoaĉeto, -pretigo kaj purigo, tiel ke ekstera helpo ne estis bezonata.

Edukado de denaskuloj

Tradicia programero de REF estas unuhora matena kantado. Marek Blahuš pretigis por ĝi kantaron surbaze de antaŭaj kantaroj uzante la programon Lilypond. Ĉar tiel ankaŭ preseblas notoj kaj ne nur tekstoj, pli facilis por novalvenintoj legi la melodion por kanti aŭ akompani instrumente. La kodo de la kantaro estas komune redaktata de volontuloj kaj disponebla en github.

En vespera diskuto pri edukado de denaskuloj, Marek prezentis kiel uzi voĉlegoskribilon por tiucele faritaj libroj por kreskigi la vortprovizon de infanoj. Krome, diversaj manlaboroj donis al la infanoj eblecon sperti la lingvon en diversaj situacioj

Foto: Felix Zesch

kun diversaj parolantoj. En la ŝakturniro laŭ la vario “mano kaj cerbo” ili povis lerni kaj apliki la nomojn de ŝakfiguroj en Esperanto. Foje regis konfuzeto, ĉu estas kuriero aŭ kuirejo – tipa eraro por homoj kiuj lernas unue la parolatan kaj poste la skribatan lingvon, dum por la plej multaj esperantistoj lernado de skribata kaj parolata lingvoj okazas pli malpli samtempe.

En la vespera programo okazis interalie du koncertoj. En tiu de “Duo Bemolo” estis prezentita nova strofo verkita de Birke por la kanto “Feliĉe”, kiun origine “Esperanto Desperado” publikigis, kaj kiu jam antaŭe ricevis aldonaĵojn.

Ekskurse malkovri minan mondon

La partoprenantoj ĝuis abundan programon kun multaj ekskursoj, kiuj ĉefe helpis ekscii pli pri mina fono de la regiono. En kolapsinta minejo (germane: Binge), la loka gvidanto montris intereson pri Esperanto, kiu laŭ lia percepto multe pli prosperis en GDR ol nun. Amuza miskompreno okazis, kiam li pensis, ke “infano” en Esperanto estas “infero”. En aliaj ekskursoj la partoprenantoj vizitis la iaman minejon Ehrenfriedersdorf, ĝuis la plej altan urbon de Germanio Oberwiesenthal kaj la tiean monton Fichtelberg kaj grimpoĝardenon ĉe la loka naturvidindaĵo Grifoŝtonoj. Migrado laŭ nova pado kun lignaj skulptaĵoj faritaj de loka motorsegila klubo konatigis la partoprenantojn kun strangetaj lokaj fabeloj, ekz. pri la origino de la urbonomo. Krome, eblis ĉiam iri al apuda subĉiela aŭ endoma naĝejoj kaj tie ĝui la someran veteron.

Kaj sekve?

La ĉeestantoj ne sukcesis interkonsenti ĉi-jare pri loko kaj tempo de la sekva REF dum la aranĝo. Malhelpas la diversaj feritempoj de la germanaj federaciaj landoj kaj la allogega renkontiĝo de la Verdaj Skoltoj komence de aŭgusto 2025.

Felix Zesch

Rata Rendevuo kun muzeo, ĝardeno kaj piroteknikaĵoj

Jam la 21an fojon la Esperanto-grupo Hameleno invitis amikojn de la internacia lingvo al la Rata Rendevuo. Ĉi-foje ni renkontiĝis la 14an de septembro en Hanovro. Venis ne nur homoj el la proksimeco, sed ankaŭ el Bremeno kaj Hamburgo.

Unue ni kunvenis en la kafejo “Extrablatt” por trinki kafon. Poste ni iris al la unika muzeo WOK (World Of Kitchen). Verŝajne estas la sola muzeo pri kuirejoj en Eŭropo, eble en la mondo. Ĉiĉeronino gvidis nin tra la muzeo, kaj ni povis admiri diversajn kuirejojn de la mezepoko ĝis preskaŭ hodiaŭ. Ĉie vi povas vidi detalojn el la pasintaj tempoj, kaj multaj rememoris la kuirejojn de siaj gepatroj el la sepdekaj, okdekaj aŭ naŭdekaj jaroj de la 20a jarcento. Ankaŭ la kuirejajn ilojn ili tiam eble mem tenis en la manoj. Kaj multaj memoris ankaŭ la Pril-florojn sur la kuirejaj kaheloj.

Sed ne nur laŭtempe la kuirejoj estis prezentitaj. Ni ankaŭ povis admiri kuirejojn el diversaj landoj kaj eĉ iom gustumi ion. Ekzemple, en svisa kuirejo ni povis gustumi keksojn, kaj en araba kuirejo mentan teon. La muzeo estas gvidata de asocio,

Frisa kuirejo el Nederlando

en kiu laboras nur volontuloj, kiuj fervore kaj libervole agadas kiel ĉiĉeronoj, purigistoj aŭ kuiristoj ktp. Tre diversajn prezentaĵojn la muzeo ofertas, estas eĉ ĉampana vespero por gustumi diversajn specojn de ŝaŭmvino.

Post la ekskurso ni gustumis freŝkuiritan tagmanĝon, bongustan supon kaj multdiversan elekton ĉe la bufedo. Satiĝinte, ni promenis al la metroohaltejo, sed dumvoje ankaŭ vizitis alian Esperanto-renkontiĝon, la Ludovikon – ludkunvenon en la loĝejo de Carolin kaj Robert. Estis bone kaj ĝojige renkonti kaj saluti tie ankaŭ aliajn esperantistojn.

Per la metroo ni atingis la montan ĝardenon, kiu apartenas al la ensemblo de la ĝardenoj de Herrenhausen. Ni rigardis la belajn florojn kaj plantojn en la parko kaj ankaŭ admiris diversajn kaktojn, tropikajn plantojn kaj orkideojn en vitraj domoj.

Post bongusta vespermanĝo en osmana restoracio, ni revenis al la ĝardenoj, ĉar en la Granda Ĝardeno de Herrenhausen okazis granda piroteknika konkurso, kaj ĉi-vespere prezentiĝis teamo el Slovakio. Ankaŭ de ekster la Granda Ĝardeno ni povis spekti admirindan prezentaĵon laŭ slovaka muziko. La fina salvo de raketoj, kreanta surĉiele bluan floron en oraj folioj malrapide sinkanta teren, ankaŭ por ni estis la fino de la rendevuo kaj longa, sed tre interesa tago.

Ankaŭ en la venonta jaro okazos Rata Rendevuo. Sed antaŭe ni invitas al nia antaŭkristnaska festo kaj venontjare denove al nia ĝardena festo. Krome denove okazos Reta Esperanto-Kurso por germanlingvaj komencantoj. Pliaj informoj estas en la retejoj: https://eventaservo.org/o/RB_Hameln

https://www.esperanto.de/eo/enhavo/hameln/kalendaro.

Heinz-Wilhelm Sprick

La verda somero en Greziljono

La somerajn renkontojn en la Esperanto-kastelo Greziljono komencis nia **5a Verda Naturisma Semajno** kun INOE. Antaŭtagmeze Esperanton instruis Thierry Spanjaard kaj Didier Loison, posttagmeze okazis sporto, promenado, turismo, prelegoj, muziko kaj ludoj. Laŭ la vetero kaj programero ni estis pli aŭ malpli libere vestitaj.

Ilona Koutny, Radojica Petrović kaj Andrea Bertrand instruis en nia **8a Maratona Esperanto-kursaro** dum dek tagoj meze de julio. Samtempe okazis la **36a Internacia Esperanto-Konferenco**, antaŭe organizita de OSIEK, pri variaj temoj kun 18 prelegoj. Krom tiu intensa lingva lernado kaj praktikado okazis ĉiutage ekskurso al lokaj vidindaĵoj. Ni serĉas instruantojn por la sekva somero.

Por franclingvaj membroj de senmona interŝanĝo, okazis nia 10a renkonto **Interŝanĝoj de scioj kaj faroj**, fine le julio. La staĝanoj proponis 70 diversajn aktivaĵojn.

Nia **14a Festa Semajno por infanoj kaj familioj** kaj samtempe nia **3a SOMERAS** logis komence de aŭgusto. Instruis kaj aktivis: Alex Humet, Larisa Osadĉuk, Alain Delmotte, Danka Ley, Ankica Jagnjić kaj Jean-Luc Kristos. Iuj venis por studi Esperanton, iuj por ludi kun infanoj, aliaj por praktiki Esperanton per dancado, kantado, familia terapio, origamio, kaj sorobano.

Partoprenantoj de la Maratona Kurso

Sian **naskiĝtagon** festis esperantisto fine de aŭgusto dum tuta semajno, invitinte siajn esperanistajn amikojn. Ankaŭ vi mem povas tion organizi en nia kastelo.

Sume dum la pasinta somero 190 homoj restadis en kastelo Greziljon dum kelkaj tagoj ĝis tuta monato, por lerni aŭ praktiki Esperanton, por ĝui la verdan etoson kaj la kastelon en vasta parko.

La sekva evento atendas vin fine de oktobro kun kursoj kaj ekzamenoj, kun ĥora kantado, japana paperfaldado kaj kurso de japana abako. Vidu en gresillon.org/autuno.

Bert Schumann

Esperanto-kurso por hispanparolantoj

Ekde 2020, seninterrompe, UEA kaj Kolombia Esperanto-Ligo ĉefkunlaboras por ĉiujare okazigi retajn Esperanto-kursojn por hispanparolantoj. En kelkaj jaroj partneras ankaŭ TEJO kaj aliaj landaj asocioj de UEA, kiel Hispana Esperanto-Federacio kaj Meksika Esperanto-Federacio, krom aliaj grupoj.

Tiu agado okazas kadre de la Amerika Komisiono de UEA ĉefe kiel informa agado, kiu tamen kontribuas ankaŭ al la instrua, reta kaj varba agadoj de UEA.

Al tiu agado entute ĝis nun aliĝis pli ol 2000 lernintoj el 29 landoj en la lastaj jaroj. La kursoj estas senpagaj kaj celas kaj komencantojn kaj progresantojn. Ĉiu lernanto havas aliron al vasta materialo, parolsesioj, lerniloj kaj virtualaj lecionoj gviditaj de spertaj esperantistoj, kiuj volontule instruas la bazojn de la lingvo, krom prononcadon, historion kaj panoramon de la Esperanto-movado kaj aliajn temojn.

En 2024 la kurso, al kiu jam aliĝis pli ol tricent personoj, okazas de la 2a de oktobro ĝis la 23a de novembro, tiel ke ĉiuj lernintoj povos post konkludo de la kurso tuj sperti Esperantujon per partopreno en la 5a Virtuala Kongreso de Esperanto, komenciĝonta la 28an de novembro.

La kurson oni proponas laŭ du diversaj horaroj: je la 17h00 UTC kaj je la 00h00 UTC, ĉiujn merkredojn kaj sabatojn, aldone al kromsesioj por solvi dubojn, pli esplori temojn kaj amike esperantumi kun lernantoj de aliaj klasoj kaj invititaj ĉeestantoj.

Ĉiujare la enhavo de la kurso pliboniĝas kaj la instrumetodoj evoluas. Jam en 2020, okaze de la Tago de Ameriko, kelkaj el la lernintoj povis post la kurso plene sukcese prelegi, tute flue. Similaj fluaj paroladoj ankaŭ estis en 2021, okaze de la fermo de la dua kurso: de tiam la kurso ĉiam finiĝas per oficiala fermo, kiu enhavas kaj prelegojn de lernintoj kaj invitojn de E-organizoj al ekaktivado en nia komunumo.

UEA kore dankas al la instruistoj kaj organizantoj, kiuj diligente laboras por tiu grava agado, kaj bondeziras al ĉiuj lernontoj agrablan ekposedon de la internacia lingvo Esperanto, kiu fine apartenas al la tuta homaro. **GK UEA**

KLERo: Survoje al la junulara Movado en Ruslando

KLERo estas Kleriga Lerna Esperanta Renkontiĝo, unuafoje okazinta la 4-9an de aŭgusto 2024 en la belega kaj komforta ripozejo “Surskije Zori” en Ĉuvaŝio. Mi ne memoras similajn interurbajn Esperanto-renkontiĝojn en Ruslando kaj Sovetunio. Kutime ĉiuj lernaj kursoj okazadis kadre de pli ĝeneralaj kunvenoj de esperantistoj, ofte pasis paralele kun aliaj programeroj kaj, laŭ mi, ne estis kontentige efikaj. Kaj certe neniam estis aĝaj limigoj por la lernantoj.

Ni detenu nin paroli pri la tuta mondo, sed en la nuna Ruslando forestas organizita junulara Esperanto-movado. Al kiuj ni transdonu la torĉon?

En Ruslando, samkiel en la mondo, ekzistas gejunuloj-esperantistoj, ekzistas ankaŭ intereso pri Esperanto, sufiĉe rimarkebla. Sed nia junularo kutimas al interreta komunikado kaj ne komprenas, kial necesas elspezi monon por studi ĉeeste tion, kion ili libere kaj senpage trovas en la reto. Ĉe siaj limigitaj financoj la gejunuloj elektas aliajn vojaĝojn. Tamen, laŭ mia konvinko, la veran socian movadon povas formi nur Esperanto-kunvenoj, kun personaj interkonatiĝoj, kunagado kaj interinspiriĝo. Ĝuste tiel – kvankam tio sonas malmoderne.

Mi ne rakontu, kiel ni superis la problemon kolekti la gejunulojn. Certe sen la unika magneteco de Aleksandro Blinov – la ĉeforganizanto kaj direktoro de KLERo

– ni ne atingus la celitan kvanton da partoprenantoj. Do, venis momento por la statistiko.

El la 25 partoprenintoj kvar aĝuloj estis nemalhaveblaj organizantoj, instruantoj kaj/aŭ gastprelegantoj, el la 21 (sen la aĝuloj) 17 estis gejunuloj de 4 ĝis 35 jaroj (el ili 13 geknaboj malpli ol 20-jaraj). Ili venis el: Ĉeboksaro – 10, Moskvo kaj Moskva regiono – 9, Barnaulo – 3, Dimitrovrgado – 2, Sankt-Peterburgo – 1. Laŭ la lingvaj niveloj: C – 4, B – 5, A2 – 3, A1 – 8, 0 – 5. Estis sep gefiloj de esperantistoj plus kvin parencoj de esperantistoj.

La lernantoj estis dividitaj je du pli-malpli egalaj grupoj laŭ la lingvaj kompetentoj. La instruistoj en ambaŭ grupoj estis Aleksandr Blinov kaj Irina Gonĉarova. La lecionoj pasis en la unua duono de la tago, ĉiu po 90 minutoj. En la 30-minutaj paŭzoj inter la lecionoj okazis movaj lecionoj pri ĵonglado.

En la dua tagduono estis klerigaj prelegoj en Esperanto kun sinkrona interpretado en la rusan kaj postaj profundaj diskutoj:

04.08. “Esperanto kiel socia fenomeno” – Irina Gonĉarova (Mirina, Moskvo), Esperanto-movadanino kun 50-jara sperto;

05.08. “Lingvoj de Rusio fokuse de la Volgia regiono” – Aleksandr Blinov (Alparuĥ, Ĉeboksaro), elstara rusia esperantisto, lingvoaktivulo;

06.08. “Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI)” – Elena Nadikova (Ĉeboksaro), sekretario de ILEI;

07.08. “Evoluo de Esperanto” – Hèctor Alòs i Font, sociolingvisto, aktivulo de la Kataluna Esperanto-movado (Ĉeboksaro-Barcelono);

08.08. “Spertoj de junulara kluba aktivado” – Irina Gonĉarova (Mirina, Moskvo).

La cetera programo konsistis el atelieroj (kantado, dancado, pentrado) kaj lingvaj ludoj por ĉiuj (la konatigaj, “Vero-Malvero”, “Ĉapelo”, “Bokarev-vortaro”, tablaj ludoj ktp), koncerto kaj certe privataj komunikiĝoj dum kafopaŭzoj.

Inter la gejunuloj reliefiĝis 5-7 aktivuloj, emaj kaj kapablaj gvidi iujn programerojn tuj en Esperanto aŭ kun helpo de lingve pli spertaj homoj. Certe, oni multe parolis ruse. Sed la emo de la gejunuloj lerni kaj progresi en la lingvo estis senduba. Kelkaj gejunuloj agrable mirigis nin per siaj lingvaj sukcesoj, kiujn pruvis la Libera Mikrofono, kie oni devis rakonti pri interesa nekonata fakto pri si mem.

Ni finu per la impreso de la 19-jara esperantistino Jaroslavna Puŝkarskaja (Dimitrovgrado):

«La unua lernejo por junularo rezultiĝis, laŭ mi, tre sukcese. Mi komprenas tion ĉefe pro mia frato, kiu nun diras al mi de tempo al tempo “Ne krokodilu!”

Do, mi vidas, ke ĉiuj komencantoj, inkluzive, certe, mian fraton, post la vizito al KLERo-1 multe pli bone parolas Esperante, komprenas la kulturon de ĝi, amas homojn de ĝi. Kaj ĉiuj progresantoj, kiel mi, perfektigis sian lingvonivelon kaj ricevis inspiron aktivadi por la movado.

Perfekta rezulto, ĉu ne? Do vivu KLERo, vivu Esperanto! Hura!»

Irina Gonĉarova

La dua Kalejdoskopo de lingvoj en Odincovo

La 29an de septembro, dimanĉe, en la centra biblioteko de la apudmoskva urbo Odincovo (ĉ. 190 mil loĝantoj) okazis la dua “Kalejdoskopo de lingvoj”. Ĝi estas branĉeto de la Moskva Lingva Festivalo (MLF), kiun Moskva Esperanto-Asocio MASI okazigas dum 18 jaroj en la ĉefurbo de Ruslando.

Inter la dek kvin prezentitaj lingvoj estis ankaŭ Esperanto, dufoje aperinta en la programo. La celo de la Kalejdoskopo estas logi atenton de odincovanoj al la lingva diverseco en la mondo kaj eventuale interesigi kelkajn pri Esperanto. Ĵurnalistoj de la ĉefa Odincova gazeto kaj de la urba televido aktive intervjuis la prelegantojn kaj la organizantojn.

La dua celo estis doni al la komencantaj prelegantoj de MLF la eblon provi sin kiel lingvoprezentantojn. Kaj tiu ĉi celo plene sukcesis. Ĉiuj prelegintoj – plejparte studentoj-filologoj de Moskvaj universitatoj – ricevis valoran sperton kaj multajn pozitivajn emociojn. La gejunuloj ĝuis varmajn dankojn de la publiko kaj subtenon de la kolegoj.Ĉe la malfermo prezentis sin ensemblo de popolaj kaŭkazaj dancoj.

La estrino de la biblioteko invitis ĉiujn partopreni sekvontjare en la tria Kalejdoskopo de Lingvoj. Ni interkonsentis okazigi en aprilo 2025 novan aranĝon – “Kalejdoskopo de Kulturoj”. Sendube, ankaŭ rakonto pri Esperanto-kulturo havos lokon en la programo!

Irina Gonĉarova

Ensemblo de dancoj de Kaŭkazaj popoloj

La Verdaj Skoltoj tendumadis en Ĉeĥio

De la 13a ĝis la 24a de julio 2024 okazis tendumado de la Verdaj Skoltoj en Mimoň, Ĉeĥio. Kio estas skoltoj? Skolto (scout) estas tutmonda junulara movado kiu celas kun-eduki infanojn kaj adoleskulojn.

Kio estas la Verdaj Skoltoj? En 2012 en Belgio kreiĝis grupo da Esperanto-parolantaj skoltoj. Kelkaj adoleskuloj kaj unu plenkreskulo regule kunvenis por skoltumi en nia lingvo. Ĉar Belgio estas plurlingva lando, Esperanto estis la sola komuna lingvo. Ekde la komenco partoprenis ankaŭ germanino kaj franco. La grupo kreskis iom post iom. En 2015 danke al subteno de Esperanto-Valonio ni fondis oficialan asocion.

Dum postaj jaroj, la grupo grandiĝis kaj internaciiĝis. Pro distancoj kaj manko de komunaj ferioj, ni nun organizas malpli da pli longaj eventoj. Nia ĉefa evento estas la somera tendumado.

Ĉi-jare en Mimoň ĉeestis 25 skoltoj el Francio, Belgio, Germanio, Skotlando, Hungario, Pollando kaj Svislando.

Kion ili faras? Lupidoj kaj esploristoj ludas, amuziĝas, lernas vivi kune, lernas elturniĝi en la naturo, helpas kuiri, faras fajron kaj kuiras sur ĝi… Ni ankaŭ instruas al ili pli bone interkomunikiĝi, pli bone koni sin mem, kaj serĉi sian vojon en la vivo.

Estroj organizas la eventojn kaj gvidas la skoltojn. Roveroj estas speciala grupo. Skoltoj provas plibonigi la mondon edukante la sekvontan generacion. Tamen roveroj estas escepto: ili provas rekte plibonigi la mondon per siaj projektoj. Ĉar

la Verdaj Skoltoj uzas Esperanton, niaj roveroj speciale fokusiĝas pri subteno kaj helpo al la Esperanto-movado. Ilia granda projekto ĉi-jare estas organizado de la Junulara E-Semajno (JES) en Belgio.

Sekvu niajn aventurojn ĉe Facebook https://www.facebook.com/verdajskoltoj, kaj en nia retejo https://verdajskoltoj.net/.

Ĉu vi konas infanojn kaj adoleskulojn kiuj ŝatus partopreni niajn eventojn? Skribu al ni info@verdajskoltoj.net.

Lupo

IJK 2025 okazos en Indonezio

TEJO ĝojas anonci, ke la 81a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en 2025 en Indonezio! Plonĝu en la mirinda diverseco de kulturoj, lingvoj, kaj pejzaĝoj de ĉi tiu insulara paradizo. De la vibrantaj urboj ĝis la serenaj plaĝoj, Indonezio certe ofertos unikan sperton por ĉiuj partoprenantoj.

Pliaj detaloj (urbo, datoj…) venos poste, sed jam pretiĝu por renkontiĝi kun esperantistoj el la tuta mondo, partopreni mojosajn aktivaĵojn, kaj sperti la varman gastamon de la indonezia popolo.

TEJO

Iĝu amiko de “La Ondo de Esperanto”!

Bonvenon al BET-59

Litova Esperanto-Asocio, universitato Vytautas La Granda en Kaŭno kaj Monda centro de litovoj invitas partopreni en la tradiciaj 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59). BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.

Datoj: De la 5a ĝis la 13a de julio 2025. Oni povos veni jam la 4an de julio.

Loko: BET-59 okazos en Kaŭno (litove: Kaunas), meze de Litovio, 100 km okcidente de Vilno, la ĉefurbo de Litovio. Kaŭno estas la dua laŭ la grandeco urbo de Litovio, situanta apud la kunfluo de la du plej grandaj riveroj de Litovio: Nemano (litove: Nemunas) kaj Neris, grava industria, transporta, scienca kaj kultura centro, eksa provizora ĉefurbo de Litovio.

Kaŭno estis unuafoje menciita en kroniko en la 1361a jaro. Nun ĝi havas ĉirkaŭ 320 mil loĝantojn. En 2022 Kaŭno estis la kultura ĉefurbo de Eŭropo. Kaŭno estas konsiderata kiel la ĉefurbo de Esperanto en Litovio.

Ĉiuj programeroj de BET-59 okazos en la moderne ekipita universitato Vytautas la Granda (str. S. Daukanto 28). Ĝi situas en la centro de la urbo kaj estas facile atingebla buse kaj aŭtomobile.

La partoprenantoj de BET-59 havos luksajn kondiĉojn por sia laboro kaj ripozo. Ili povos libere uzi la tutan infrastrukturon kaj servojn de la universitato (kunsidejoj, salonoj, aŭditorioj, kafejo, modernaj teknikaĵoj, multaj komputiloj kun libera retaliro k. a.). BET-59 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo kaj ankaŭ de tutlandaj ŝtataj instancoj.

La programo estos tradicia: somera universitato, diversnivelaj Esperanto-kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri la Esperanto-movado en la Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

La Organiza Komitato atendas proponojn, sugestojn kaj ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, speciale el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj landoj. La kvanto da partoprenantoj ne estas limigita. Ni atendas 500 personojn el 30-40 landoj.

Utilaj retejoj:

1. Urbaj turismaj informoj: https://visit.kaunas.lt/ en la litova, angla, germana kaj rusa lingvoj.

2. Vikipedio pri Kaŭno en Esperanto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Ka%C5%A-Dno.

Aliaj gravaĵoj:

Komence de junio 2025 aperos la 2a Informilo kun pli detalaj kaj aktualaj informoj.

Ni planas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de BET-59.

Aktualajn informojn oni povas trovi en la retejo de BET-59 http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59.

Aktualaĵojn pri BET-59 konstante publikigas ankaŭ la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* (https://sezonoj.ru/bet/) kaj la samtitola bitgazeto.

Detalajn informojn pri la aliĝado, kotizoj, loĝado, manĝado kaj vizoj legu en la 1a informilo pri BET-59 ĉe https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/

Litoviaj esperantistoj faros ĉion eblan por ke BET-59 estu vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. Bonvolu jam nun plani Vian partoprenon en BET-59 kaj notu tiujn datojn en via Esperanto-Kalendaro. Ĉiuj estas petataj disvastigi informojn pri BET-59 tra la tuta mondo.

Poŝta adreso: Litova Esperanto-Asocio, p. k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio.

Poŝtelefonoj: +370-687-12219 (Povilas Jegorovas); +370-611-60402 (Asta Nastaravičiūtė).

Retadresoj:

LEA: litova.ea@mail.lt;

Prezidanto de LEA Povilas Jegorovas: pjegorovas@yahoo.com;

Respondeca sekretario de LEA Asta Nastaravičiūtė: anasturte@gmail.com.

Bonvenon al Litovio!

Organiza Komitato

BET-59: Konatiĝu kun Arno Lagrange

La Ondo de Esperanto komencas prezenti tiujn, kiuj grave kontribuos al la programo de BET-59, kiu okazos la 5-13an de julio 2025 en la universitato Vytautas la Granda (Kaŭno, Litovio). La unua prezentato estas Arno Lagrange el Francio.

Arno Lagrange, naskita la 1an de septembro 1956, kreskis en Esperantista familio: la gepatroj (franca patro kaj germandevena patrino) kaj la fratoj estas esperantistoj. De 1975 li aktivis en Esperanto-teatraj trupoj: TESPA (Teatro Esperanto de Parizo), Krizalido, Kallima, TTT (Teatro Trupo de Tuluzo) kun dekoj da surscenigoj en Esperanto aŭ dulingve de originalaj tekstoj kaj de tradukaĵoj el la franca aŭ el iu alia lingvo; vidu pli ĉe http://arnolag.free.fr/eo/Teatro.php.

De 2002 Lagrange aktive partoprenas en Vikipedio. Laste li redaktis la vikipediajn artikolojn pri Stefan Zweig kaj pri liaj edzinoj Friderike Winternitz kaj Lotte Altmann, kiuj estas la baza materialo por la prelego en BET-59. Lagrange aktivas en Esperanto Kulturcentro en Tuluzo, kiu en 2000 okazigis Kulturan Artan Festivalon de Esperanto (KAFE) kaj partoprenas en Erasmus+ projektoj. En 2011 li partoprenis la organizadon de IREM (Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo). En 2017 li diplomiĝis pri Lingvoscienco en la Universitato de Tuluzo.

En Kaŭno Arno Lagrange prezentos solspektaklon *La ŝaknovelo* laŭ la samtitola ĉefverko de Stefan Zweig, lia plej lasta verko eldonita en 1943 post lia morto, kvazaŭ la testamento de la aŭstra aŭtoro kiun li redaktis antaŭ li mortigis sin.

Lagrange ankaŭ prelegos pri “Stefan Zweig, eŭropa verkisto” por konigi la verkiston Stefan Zweig, lian vivon, lian verkaron kaj liajn ecojn homajn.

La premiero de *La ŝaknovelo* (Tuluzo, marto 2024)

Aliĝu al UK-110 en Brno

La 110a Universala Kongreso de Esperanto okazos la 19-26an de julio 2025 en Brno, Ĉeĥio. Brno estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio, kun facile atingebla internacia flughaveno, kio ebligos senprobleman aliron por partoprenantoj el la tuta mondo. La unua bulteno estas elŝutebla ĉe https://uk.esperanto.net/2025/unuabulteno.

Je la 1a de oktobro 2024 jam 174 personoj el 39 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, plejmulte el la kongreslando Ĉeĥio (19), Germanio (16) kaj po 10 el Brazilo, Ĉinio kaj Usono. Inter ili estas la aŭtomate (senkotize) aligitaj honoraj membroj de UEA, membroj de la honora patrona komitato, honoraj prezidantoj de UEA, estraranoj de UEA, oficistoj kaj kunlaborantoj de UEA, kaj lokaj organizantoj.

Ĝis la 30a de novembro 2024 validas la unua, plej favora aliĝperiodo:

1. Individua membro de UEA: Landoj A 190 eŭroj / Landoj B 145 eŭroj
2. Ne individua membro de UEA: 240 / 180 eŭroj
3. Komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA 95 / 70 eŭroj
4. Kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA: 145 / 105 eŭroj

Senpage aliĝas infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 2004-12-31 kaj nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

Legu pli ĉe https://uk.esperanto.net/2025/ **AlKo**

Novjara Renkontiĝo denove en Wiesbaden

Ni invitas vin al la 21a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj 14a Novjara Internacia Semajno (NIS), kiuj okazos de la 27a de decembro 2024 ĝis la 3a de januaro 2025 denove en Wiesbaden ĉe Rejno, 40 km okcidente de Frankfurto/Majno, en la junulargastejo, en kiu ni jam plurfoje kaj tre agrable kunestis jarfine.

En NR kaj NIS, dum la lastaj jaroj ĉeestis inter 150 kaj 220 partoprenantoj; ili aĝis inter kelkaj monatoj kaj naŭdeko da jaroj. Partoprenis kutime trideko da familioj kun ĉirkaŭ kvardek ĝis sesdek infanoj kaj junuloj. Krome ĉeestis kvindeko da unuopuloj kaj paroj sen infanoj. Ili loĝas en deko da landoj. Proksimume duono venis el eksterlando kaj kreis bele internacian etoson. Al tiu kontribuas ankaŭ, ke por trideko da infanoj kaj junuloj Esperanto estas denaska lingvo.

La unua aliĝperiodo finiĝos la 14an de oktobro, lunde.

Informa paĝo http://esperanto.land/nr/#nr

Aliĝilo http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo

Lu Wunsch-Rolshoven

JES: Unuafoje en Belgio

Venu festi la novjaron en la tradicia novjarfesta junulara renkontiĝo JES, sed ĉi-foje ne plu en Pollando nek en Germanio, sed en Belgio! La oficiala programo daŭros nur ses tagojn: de la 27a de decembro 2024 ĝis la 2a de januaro 2025, ĉar ni ne volas doni al homoj, kiuj festus Kristnaskon hejme la 26an de decembro, la senton ke ili maltrafus pro tio la komencon de JES.

Ni luos la konstruaĵojn de la kolegio, eksa internejo kaj iama monaĥejo Saint-Roch, en la municipo Ferrières en la provinco de Lieĝo, kiu situas en Valonio, la franclingva parto de Belgio, kaj proksimas al la malmultaj germanlingvaj municipoj en Belgio.

Tamen eblas alveni jam la 26an de decembro, kaj pasigi la unuan tagon kun malformalaj, spontaneaj programeroj, kun amikoj, ekloĝante trankvile en la kongresejo (kaj poste bone helpi la aliajn alvenontojn trovi sian vojon).

Aliĝilo kaj aliaj informoj estas ĉe https://verdajskoltoj.net/es/jes-24-25.

3a NaturAmika KulturSemajno en Esperanto

La 20-26an de oktobro por la tria fojo okazos ĉe la kataluna marbordo la NaturAmika KulturSemajno, heredinta la tradicion de la Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Ĉi-foje ĝi okazos en kvarstela hotelo “Golden Bahía” en Tossa de Mar, en la koro de la fama Costa Brava (Sovaĝa Marbordo), urbeto internacie diskonita antaŭ 70 jaroj de la filmo *Pandora kaj la fluganta holandano.*

Jen jam konfirmitaj programeroj:

Ekskursoj: Tuttaga ekskurso al Ĝardeno Marimurtra (Blanes) kaj Ĝardeno Santa Clotilde (Lloret). Duontaga vizito en Tossa de Mar. Vizito de la Kataluna Nacia Biblioteko kaj/aŭ scienca muzeo Cosmocaixa (postkongrese). Vizito de Muzeo de Esperanto de Subirats (postkongrese)

Artaj vesperoj: *Kaj Tiel Pl*u en koncerto. jOmO en koncerto. Tradicia Esperanta Kantvespero (S. Keable). Magiaj ludoj (A. Badía, P. Martín).

Filmo: *La pedalaŭto*.

Kursoj kaj edukado: Konversacia kurso gvidata de Alessio Giordano. Ekzamena sesio por kandidatoj al LTSEC-diplomo.

Prelegoj: Prezento de la kataluna lingvo (Rubeno Fernández). *Asertas Pereira*: prezento de la romano, nun en esperanta traduko (Perla Martinelli). Filma intervjuo kaj komentario pri William Auld (Giorgio Silfer). *Istanbul' Istanbulo*: prezento de la romano, nun en esperanta traduko (Alessio Giordano). Ekologiismo kaj klimata ŝanĝo (Anĝelo García del Río). Natureco en lingvistiko kaj arĥivistiko (Rubeno Fernández).

Kontribuu programeron kaj ĝuu rabaton!

Legu pli ĉe https://eventaservo.org/e/NAKSE24.

La 5a Virtuala Kongreso de Esperanto

La 5a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) okazos de la 28a de novembro ĝis la 1a de decembro 2024. Jam eblas aliĝi al ĝi ĉe https://vk.esperanto.net/2024. Ĉiuj individuaj membroj (IM) de UEA povas senpage aliĝi – tamen aliĝo senpagas por IM nur ĝis la 13a de novembro 2024. Se vi ankoraŭ ne estas IM de UEA, eblas samtempe membriĝi al UEA kaj aliĝi al la VK. Alternative eblas unue aliĝi rekte ĉe UEA, kie ankaŭ eblas elekti aliajn aliĝ- kaj donac-opciojn: https://uea.org/alighoj/alighilo.

Donacoj ĉiam bonvenas: eblas donaci dum aliĝo (eĉ se senpage aliĝante) aŭ aparte, per speciala konstanta fonduso de UEA por la VK: https://uea.org/alighoj/donacoj/vk. Donacoj al la VK helpas kovri la kostojn de la evento kaj ebligas senpage partoprenigi nepagipovajn homojn, kun speciala atento al junuloj, virinoj kaj pensiuloj. Ĉiuj, kiuj donacas ekde 50 eŭroj, aperos (se konsente) kiel Subtenanto de VK en la Listo de la aliĝintoj.

La 5a VK estas realigo de UEA. Ĝia temo estas: “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”, sama de la ĵus okazinta 109a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉefgvidas la organizteamon la unua vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., respondeca en UEA i.a. pri kongresoj kaj reta agado.

Kunrealigas kaj teknike prizorgas la VKon la teamo de la neprofitocela esperantista organizo E@I. Subtenas la muzikan programon Eurokka/Vinilkosmo.

La emblemo de la 5a VK fariĝas la definitiva oficiala emblemo de la VK. Ĝin kreis Toni Espinosa Largo (el Hispanio). La emblemo revokas en nian memoron la emblemojn de ĉiuj antaŭaj eldonoj de la VK. Ĝi sugestas flaman formon, kiu dinamike envolviĝas por reflekti la varmon, pasion kaj daŭran vivforton de la Esperanta komunumo. Ĝi uzas la kernajn primarajn kolorojn (ruĝa, flava kaj blua), kiuj interplektiĝas por krei verdan, oranĝan kaj nigran kolorojn, ankaŭ ĉeestajn en la emblemo de UEA. Tiuj koloroj ne nur estetike kunfandiĝas, sed ankaŭ simbolas unuecon en diverseco. La verda stelo, kiu prezidas la bildon, reprezentas Esperanton kaj la esperon. Ĝi kompletigas tiun desegnan kompozicion, reliefigante la blankan fonon, kiu elvokas la ideon de paco kaj de senfina spaco por daŭra kreemo kaj agado.

La Virtuala Kongreso estas la plej granda reta evento por esperantistoj. UEA ĝin organizas ekde 2020. Ekde 2022 ĝi okazas ĉiam fine de la jaro, sub la temo de la samjara UK. Ĝi estas riĉa je interesaj prelegoj, artaj kaj kulturaj prezentoj kaj socia programo.

Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!

Dum la VK partoprenantoj de diversaj landoj interkonatiĝas, ekscias pli pri la Esperanto-movado dum la Virtuala Movada Foiro (ViMF), lernas ion novan dum la realtempaj diverstemaj prelegoj, kursetoj, klerigaj programeroj, diskutoj kaj multe pli! Por proponi ion por la VK-programo aŭ por la ViMF, uzu la formularojn disponeblajn ĉe https://vk.esperanto.net/2024/programo.

Al la antaŭa VK aliĝis 1294 personoj el 95 landoj aŭ teritorioj, kaj ĝi enhavis pli ol 200 programerojn. Ni esperas pri simila sukceso por la 5a VK kaj kalkulas je ĉiuj vi por tio!

GK UEA

Ni funebras kaj kondolencas

La 29an de junio en sia 86a vivojaro forpasis

Luis Hernández García (1938-1962-2024)

Esperantisto ekde 1962, li estis sekretario de la Valadolida Esperanto-grupo dum multaj jaroj kaj sekretario de Hispana Esperanto-Federacio de 1978 ĝis 1984, kiam la sidejo de HEF troviĝis en Valadolido. Li estis ankaŭ libroservanto de HEF dum multaj jaroj kaj dumviva membro de UEA.

Ni kondolencas al lia vidvino Rafaela Urueña, honora membro de UEA.

La 26an de septembro 2024 en Šiauliai en sia 86a vivojaro forpasis eminenta litova esperantisto

Zenonas Eimutis Sabalys (1939-2024)

Zenonas Sabalys naskiĝis en Kaŭno, kie en 1960 li diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sed ekde 1962 li loĝis en Šiauliai. Ekde 1979 li estis vicprezidanto de la urba plenumkomitato de Šiauliai, kaj en 1992 li fariĝis gvidanto de la Banko de Šiauliai, poste gvidis alian bankon. En 2004 li ricevis la honoran titolon "Honora civitano de Šiauliai".

Li esperantistiĝis en 1956 en Kaŭno kaj en 1959 partoprenis la unuan BETon (ĈET-1) en Latvio. Li instruis Esperanton en la universitato de Šiauliai kaj estis estrarano de la urba Esperanto-klubo "Ruto", partoprenis multajn BETojn kaj pli ol 20 Universalajn Kongresojn de Esperanto. Ekde 2008 li estis estrarano de Litova Esperanto-Asocio.

Kune kun la litoviaj esperantistoj ni funebras kaj kondolencas al la familianoj kaj proksimuloj de Zenonas Sabalys, kun kiu ni havis amikajn interrilatojn post nia transloĝiĝo al Kaliningrado en 2001.

Ripozu en paco!

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Tribuno

Sur la supra foto estas la ĉefa konstruaĵo de la universitato Vytautas La Granda en Kaŭno, kie venontsomere okazos la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59). Jam nun vi povas konatiĝi kun Kaŭno per la artikolo de Vytautas Šilas.



Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno

La plur-jarcenta urbo Kaŭno (litove: Kaunas), kiu en 2022 estis la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo, en 2025 gastigos la 59ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-59). Veni al Kaŭno indas, eĉ endas ne nur pro BET mem. Estas tri gravaj kialoj pro kiuj vi venu kaj konatiĝu kun la neordinara urbo Kaŭno. La unua, kompreneble, pro Esperanto mem, ja Kaŭno estas la koro de Litova Esperantujo. La dua – pro interesaj muzeoj kaj subĉielaj vidindaĵoj. La tria – pro tio, ke la Hereda Komitato de UNESCO dum sia sesio de 2023 aprobis la Petskribon de Litovio “Moderneca Kaŭno: optimisma arkitekturo, 1919-1939”. Tial 44 plej elstaraj konstruaĵoj de la intermilita Kaŭno ekhavis la statuson de Tutmonda heredo.

Ne ĉiuj esperantistoj scias, ordinaraj turistoj des pli, ke Esperanto kiel reala internacia lingvo naskiĝis dank’ al financa subteno de kaŭnano Zilbernik, ke la biografio de L. L. Zamenhof estas ligita kun Kaŭno, ke en la urbo estas pli ol 30 konstruaĵoj, ligitaj kun la agado de esperantistoj, kaj vi povos ilin viziti mem, kiam ajn.

La skriba historio de la urbo Kaŭno komenciĝis antaŭ 660 jaroj, kiam germana kronikisto priskribis gvatan militmarŝon de krucmilitistoj en 1361 – tiam li menciis la Kaŭnan kastelon (Castrum Kauen). La urbonomon oni originas de la (famili)nomo Kaunas, eble, la unua kastelmastro estis iu Kaunas. Cetere, en Litovio pli ol 100

familioj havas ĉi tiun nomon. Laŭ popola etimologio la urbonomo devenas de la adjektivo “kaunus” (batalema).

Vi ekvidos la restaĵon de la Kaŭna kastelo ĉe la kunfluejo de la du plej grandaj litovaj riveroj Nemunas kaj Neris. La kastelon atakadis germana krucmilitista ordeno, eĉ kelkfoje detruis ĝin. Litovoj ĉiam rekostruis ĝin. Nun la kastelo reprezentas la plej malnovan en Litovio gotikstilan ŝtonan fortikaĵon el la mezo de la 14a jarcento.

La batalan pasintecon ilustras starigita en 2018 apud la kastelo impona skulptaĵo de la litova rajdbatalanto (forpelanto). La sama, kiun vi povas ekvidi sur la blazono de Litovio.

La pli ol centjaran bataladon kontraŭ la kruckavaliroj sukcesis fini la litova regnestro grandduko Vytautas la Granda (baptonome – Aleksandro). Li multfoje vizitis la kastelurbon Kaŭno. Por li en 1990 en la ĉefstrato de la novurbo Laisvės alėja (Aleo de Libereco) aperis elokventa monumento. Post li pri la landa kultura kaj ekonomia evoluo penis zorgi lia bonepo, grandduko Aleksandro (du jarojn antaŭ la morto li iĝis ankaŭ reĝo de Pollando). Tiu kelkfoje estis en Kaŭno kaj prezentis al ĝi kelkajn komercajn privilegiojn. Ankaŭ la grandduko Aleksandro estis honorita per impona

monumento, starigita en 2024 ĉe la avenuo Vytautas. Pri la urba historio oni povas multon ekscii en la Kastela muzeo kaj en la Urbodoma muzeo, ankaŭ en la Milithistoria muzeo de Vytautas la Granda.

En Kaŭno estas pli ol 40 muzeoj kaj muzeetoj. Ekzemple: Litovia Zoologia Ĝardeno (membro de Internacia Zooĝardena Asocio, 2166 animaloj de 232 specioj), Aviada, Popol-instrumenta, Medicina kaj Farmacia, Pupteatra, Botanika Ĝardeno, Sakrala (en preskaŭ 360-jara monaĥejo de Pažaislis). Dum BET vizitu almenaŭ unu el ili. Eble unusola en la mondo kaj tre vizitata estas la Diabla muzeo de Žmuidzinavičius kun pli ol 3000 eksponaĵoj (la komencon por ĝi faris diableto, kiun al la fama pentristo donacis la ŝatata verkisto pastro Tumas-Vaižgantas, dirinte “por ke diabloj hantu vin dumvive”. Tamen, plej vizitendaj estu en la urbocentra Nacia Artmuzeo de Mikalojus Konstantinas Čiurlionis (lian 150an naskiĝdatrevenon oni festos en 2025), kaj la Litova Etnografia muzeo subĉiela, situanta je 20 km orienten de Kaŭno.

La Litova etnografia muzeo estas unu el la plej grandaj samspecaj muzeoj en Eŭropo. Ĝi estis malfermita en 1974, surborde de Kaŭna maro (rivera lago), apud la urbeto Rumšiškės. Nun en la 195-hektara areo lokiĝas 149 konstruaĵoj de popola arkitekturo, prezentantaj ĉiujn etnajn regionojn de Litovio. La muzeo eksponas ne nur lignajn konstruaĵojn de tradicia arkitekturo (ĉefe), sed ankaŭ teksaĵojn, meblaron, metiaĵojn, agroteknikaĵojn ktp. Entute 51 mil 420 eksponaĵojn. En la muzeo okazas diversaj tradiciaj kalendaraj festoj. Lastjare la muzeon vizitis pli ol 150 mil personoj. Ĝi estas la plej bona loko por ekkoni litovan etnan kulturon! Por ekvidi ĉion rezervu ne malpli ol duontagon.

La Nacia belarta muzeo de Čiurlionis, fondita en 1921, posedas pli ol 355 mil eksponaĵojn el popolarto, litova pentra kaj aplika arto, numismatiko. Tamen plej gravas, ke la muzeo estas la sola loko en la mondo, kie estas kolektita preskaŭ la tuta verkaro de la genia litova pentristo, simbolisto kaj komponisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis (1875-1911). En la Eŭropan kulturan historion li eniris kiel kreanto, kiu kunigis pentroarton kaj muzikon. La muzea galerio eksponas liajn pentraĵojn kaj grafikajn artaĵojn. Eblas akiri bonajn reproduktaĵojn de liaj bildoj. En la muzea muzika salono oni povas aŭskulti sonregistraĵojn de liaj muzikaj verkoj. Krom la konstanta eksponado de liaj verkoj, en la muzeo okazas ekspozicioj de aliaj kreantoj, diversaj koncertoj.

Post la Unua Mondmilito, kiam fiaskis la Germana kaj Ruslanda imperioj, Litovia lando, ĝis tiam okupata de Ruslanda Imperio, restarigis sian sendependecon. Tamen tuj la najbara Pollando (ĝis tiam aliancano!), subtenita de Francio kaj Granda Britujo, kanajle militokupis la litovan ĉefurbon Vilno kaj la ĉirkaŭan teritorion. Tiam, januare 1919 la urbo Kaŭno iĝis provizora ĉefurbo de Litovio, ĝia spirita, kultura, kleriga kaj ekonomika centro. Nur dum 20-jaroj de tiu „provizoreco“ Kaŭno el postrestinta rusimperia provinca urbo, kie dominis lignaj konstruaĵoj, subite transformiĝis al moderna Eŭropa ŝtona urbo! Tion grave kontribuis arkitekturo. En Kaŭno

estis konstruitaj centoj da ekskluzivaj konstruaĵoj. Ilin projektis kapablaj arkitektoj, kiuj studis kaj ĉerpis arkitekturajn novaĵojn eksterlande.

En 2023 dum sesio de Hereda komitato de UNESCO, la tuto de Kaŭna moderneca kaj optimisma arkitekturo eniris la UNESCO-liston de Tutmonda heredo. Inter la plej memorindaj konstruaĵoj estas Krista Resurektra preĝejo, Oficira hejmo, Centra poŝtejo, lernejo Jablonskis kaj – krone – la duopo galerio Ĉiurlonis kun Milithistoria muzeo. La liston eniras ankaŭ Kaŭna Sporta Halo, konstruita por la Eŭropa Korbopilka Ĉampioneco de 1939. La projektado daŭris 1,5 monatojn, la konstruado – nur kvin monatojn! Laŭ la aprezo de tiama Internacia Korbopilka Federacio ĝi estis “la plej bona korbopilka halo en Eŭropo”. Mi aldonu – tiam la litovia teamo iĝis la Eŭropa ĉampiono.

La historia parto de la urbo Kaŭno lokiĝas en malalta valo inter la riveroj Nemunas kaj Nėris. Pli novaj urbaj regionoj, la norda Žaliakalnis kaj la suda Aleksotas formiĝis altaĵe. Kiel unika transportilo por atingi tiujn du altaĵojn servas vagonaj tirleviloj funikularoj. La unua, tiu al Žaliakalnis, estis aranĝita en 1931. Ankaŭ uzu la okazon supreniĝi per ĝi al Žaliakalnis kaj iom paŝi al elstara modernisma arkitekturaĵo – la Krista Resurekta preĝejo kaj de ĝia surtegmenta teraso 43×15-metra por ĝui la vidon al la malnova kaj la nova urbo! Por tio uzu lifton aŭ 186-ŝtupan ŝtuparon ĉe la flanka enirejo de la preĝejo.

Kaŭno elstaras ankaŭ kiel studenta urbo, ve, somere vi tion apenaŭ eksentos. Tamen sciu – en ĝi funkcias pli ol dek universitatoj, en kiuj studas ne nur litoviaj civitanoj. Plej multe da eksterlandanoj studas en la Kaŭna teknologia universitato – preskaŭ 1200 kaj Litova sanscienca universitato – pli ol 500. Kaŭno estas tre

litova urbo, sed ju pli vi de urbocentro proksimiĝos al la avenuo Vytauto, des pli ofte vi ekaŭdos nelitovlingvan parolon. Ja en la universitata komunloĝejo “Baltija” loĝas kelkcent eksterlandaj studentoj. Ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el Aziaj landoj Pakistano, Hindio, Honkongo, Vjetnamio. Kiel al ili plaĉas en Kaŭno? Kelkaj italinoj konfesis: “Ĉi tie al ni plaĉis pli multe, ol ni esperis”.

Kaŭno estas ankaŭ sporta urbo; en ĝi funkcias Litova sporta universitato en kiu studas studentoj el Germanio, Hispanio, Israelo, Finnlando, Turkio. En Kaŭno okazas multaj internaciaj sportaj konkuroj. Ĝin oni nomas Litovia korbopilka ĉef-urbo. La efektivigo de sportaj konkuroj en Kaŭno akiris altan aprezon de internaciaj sportaj instancoj. Ĉiam pli ofte en Kaŭno okazas internaciaj konferencoj kaj aliaj aranĝoj. Kompreneble, ja kvanto de venantaj eksterlandaj turistoj senhalte kreskas. Plej multe da turistoj venas el najbaraj ŝtatoj – el Pollando kaj Latvio. Poste sekvas Granda Britujo, Germanio, Estonio kaj Nederlando. Trovas Kaŭnon ankaŭ turistoj el Skandinavaj landoj, eĉ el Japanio. Promene plej vizitataj estas la Urba placo kaj la aleo Laisvės, sed vizitindaj lokoj estas ankaŭ ekster ili.

Post longa promenado tra Kaŭno vi laciĝos kaj malsatiĝos. Kie vi povus plej sate kaj plej bonguste manĝi? Nu, en Kaŭno funkcias multe da bonaj restoracioj kaj kafejoj (multaj el ili orientiĝas al eksterlandanoj kaj ornamis sin per anglalingvaj ŝildoj). La organizantoj de BET informos vin pri apudaj lokoj, kie vi povus satiĝi. Mi, tamen, indiku du same proksimajn (de la centra kunvenejo) lokojn, kie vi povus ĝui litovajn manĝojn. Estas nemultekosta restoracio “Lietuviški patiekalai” (litovaj manĝaĵoj) en aleo Laisvės 21 (ĉe la preĝejo “Soboras”) kaj fajna kafejo “Bernelių užeiga” (Fraŭla gastejo) en strato Donelaičio 11.

Ĉu vi jam decidis iri al Kaŭno? Mi gratulas vin – vi faris ĝustan decidon!

Vytautas Šilas

Politikistoj de EU kaj Esperanto

Fine de aprilo ĉi-jare mi sendis leteron kun kopio de reklamoj de ABC en ok ĉefaj gazetoj al ĉirkaŭ 2 mil 600 parlamentanoj en Francio, Germanio kaj Pollando. Mi ricevis respondojn de 31 parlamentanoj. Tri kontraŭis, dirante: “En EU ni komunikas rekte en la angla, do ne bezonas Esperanton” kaj “Mi dubas pri artefaritaj lingvoj”, kaj kvin aŭ ses donis neklarajn respondojn, jes aŭ ne. Ne estis respondo de Pollando; kelkaj aliaj opinioj listiĝas sube.

Maria Klein-Schmeink, gvidanto de germana Verda Partio: “Ni kredas, ke Esperanto, kun iom da lernado, havas eblecon permesi komunikadon, antaŭenigi internacian komprenon kaj antaŭenigi pacon”.

Franca senatano **Christophe Chaillou**: “Mi legas la regulojn de Esperanto kun intereso kaj kundividas la valorojn de universaleco, unueco kaj humanismo antaŭenigitaj de ĉi tiu movado”.

Ministerio pri Kulturo de Suba Saksio, Germanio, **Dirk-Ulrich Mende**: “Mi subtenas fari Esperanton plia lingvo por antaŭenigi interkulturan dialogon”.

Malu Dreyer, germana parlamentano: “Anglalingvanoj havas klaran avantaĝon en EU, kaj neanglalingvanoj povas diri nur tion, kion ili povas esprimi en la angla. Koran dankon pro viaj klopodoj”.

Sabine Grützmacher, germana parlamentano: “Eĉ homoj sen talento povas atingi verajn venkojn per Esperanto”.

Nicolas Dupont-Aignan: “Se ni antaŭenigos Esperanton, ni povas eskapi la angla-usonan regadon. Mi planas aldoni Esperanton kiel atuton kaj kandidatiĝi por la franca prezidant-elekto post tri jaroj”. *(Mi havis grandajn esperojn pri li, sed bedaŭrinde li perdis la elekton en junio.)*

Jérôme Buisson, franca parlamentano: “Mi pensas legi vian libron. Esperanto estas valora ilo kiu povas esti solvo por antaŭenigi pli justan internacian komunikadon kaj konservi kulturan diversecon. Mi plene subtenas viajn klopodojn”.

Jörg Nürnberger, germana parlamentano: “Ni tre dankas vian leteron kaj la reklamojn en ĉefaj gazetoj kaj esperas, ke la komuna lingvoproblemo estos solvita”.

Solanges Nadille, franca parlamentano: “Mi admiras vian entuziasmon kaj sindediĉon fari Esperanton oficiala lingvo de EU. Mi esperas, ke vi estas kontenta pri la klopodoj kiujn vi faris ĝis nun”.

Gérard Leseul, franca parlamentano: “Mi ne povas sufiĉe danki vin pro via investo por propagando de Esperanto. Ĝi estas riĉa, simpligita kaj utila por eŭropaj komunikadoj, apogante projektojn vastiĝantajn en EU-landojn. Kredu je via sukceso kaj antaŭeniru”.

Steffen Kotré, germana parlamentano: “La propono fari Esperanton oficiala lingvo de EU tre interesas, sed oni devas zorge pripensi rilaton kun plurlingveco”.

Stéphane Séjourné, ministro pri eksteraj aferoj de Francio: “Ni plene konscias pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ŝatus vidi ĝian evoluon en Francio”.

Ursula von der Leyen, prezidantino de la Eŭropa Komisiono: “Vi proponis, ke Esperanto fariĝu la “komuna lingvo” de EU. Tamen ni fidas antaŭenigi niajn 24 oficialajn lingvojn kaj aktive laboras pri la uzo de aliaj lingvoj”.

Mi estis nekredeble surprizita, kiam mia leterkampanjo atingis la prezidantinon **von der Leyen** la 2an de majo 2024, kaj mi ricevis ŝian respondon la 15an de majo:

“Mi ŝatus esprimi mian dankemon pro via letero komence de majo, en kiu vi proponis Esperanton kiel la oficialan lingvon de EU. Tamen EU ne havas la aŭtoritaton decidi pri lingvo, kaj ni firme antaŭenigas la 24 oficialajn lingvojn establitajn de la EU-Konsilio kaj subtenas multlingvismon”.

Mi respondis la 4an de julio 2024:

“Dankon pro atentigo pri la diversaj subtenaj agadoj de EU rilate Esperanton registrita kiel pola kaj kroata kultura heredaĵo. Ĉi tiu afero trovos lokon en la EU-kadro.

En la letero de la prezidanto: EU-Komisiono ne havas la aŭtoritaton decidi pri la lingvo. Ĉu tio signifas, ke necesas akiri la konsenton de la 27 membroŝtatoj? Eĉ se dulingveco inter naciaj lingvoj kaj Esperanto estus revolucia plifortigo de EU kaj revo realiĝanta apud ununura merkato kaj ununura valuto! Ĉu vi povas prezenti proponojn al 27 landoj?”

Neatendite, la 4an de julio mi ricevis dankleteron de la prezidanto **Emmanuel Macron** pro sendo de mia libro. Mi ne povas kredi, ke la prezidanto de Francio ne legas *Le Monde* aŭ *Le Figaro*, kaj mi pensas, ke estas evidente, ke li legas la reklamojn: “EU jes, Eŭro jes, Esperanto?” Se la reklamo ne estus atinginta lin, mi ne estus ricevinta la dankon.

Konsiderante la nunan situacion ne plu eblas atendi, ke la reagoj de gazetlegantoj movos la amaskomunikilojn kaj rompos la lingvan muron. Tamen, ĉu ankoraŭ eblas, ke granduloj en la politiko, ekonomio kaj kulturo agos por fundamente fortigi la Eŭropan Union? Kio okazus, se sinjorino von der Leyen ekstarus?

Etsuo Miyoshi

Konfirmo pri samrajteco de Esperanto ĉe Eŭropa Unio

Rezulte de la reklamkampanjo pri Esperanto kaj posta letera kampanjo estiĝis rekta kontakto kun la Eŭropa Komisiono. La Komisono ĵus konfirmis, ke por la projektoj de Erasmus+ kaj Kreema Eŭropo (Creative Europe) Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj inkluzive de regionaj kaj minoritataj lingvoj. Laŭvorte la Komisiono skribis: “Projektoj povas subteni ĉiujn lingvojn sen diskriminacio, inkluzive de la regionaj kaj minoritataj lingvoj de Eŭropo aŭ Esperanto”. (Projects can promote all languages without discrimination, including Europe’s regional and minority languages or Esperanto.)

Esperanto jam estis parto de multaj programoj laŭ Erasmus+ kaj aliaj, sed ŝajne ne jam de Kreema Eŭropo. Tiuvoje eblos subvencipeti ekde nun. Krome la laŭvorta konfirmo de la Komisiono pri la samrajteco de Esperanto estas paŝo antaŭen kompare kun la ĝisnuna nura donado de subvencioj. Ni esperu, ke la praktiko estos influita de la deklaro.

Etsuo Miyoshi

Eŭropaj komencOntoj

Malfermita letero al la landaj asocioj en Eŭropo

Jes, vi legis bone: komencOntoj kaj ne komencAntoj estas tio, kion en Eŭropa Unio la Esperanto-movado bezonas. Ni bezonas homojn, kiuj malgraŭ la iluzio pri la angla kapablas pensi individue kaj interesiĝi pri idealaj solvoj. Tiuj homoj estas troveblaj plej verŝajne inter la homoj ĝis 25 jaroj.

Ĉiuj scias, ke estas tri vojoj por progresigi Esperanton, la vojo desupra [per kontaktoj kun instancoj kaj politikistoj], la vojo desuba [per varbado de individuaj homoj lerni Esperanton], la vojo deflanka [per kontaktoj kun lingvistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj]. Ĉi-foje ni parolas al vi pri la vojo desuba, kaj iom pli kompleta artikolo pri tio estas en *La Ondo* ĉe https://sezonoj.ru/2024/06/corsetti-5/.

Kiel trovi komencOntojn? Ne necesas inventi ion aŭ demandi la Artefaritan Inteligenton, sed simple ni refaru tion, kion faris Ludoviko kaj Klara, kiam ili dissendis 10 000 ekzemplerojn de la unua libro. Ĉar la mondo intertempe ŝanĝiĝis ni atingu 10 000 klakojn de rigardantoj de via anonco pri reta kurso de Esperanto.

Mi eĉ dirus, ke vi atingu tiom da klakoj, kiom via buĝeto pri informado kapablas elteni. Se eĉ italoj kaj serboj sukcesis aranĝi kaj reklami retajn kursojn de Esperanto por komencOntoj, kial aliaj eĉ ne volas provi?

Por kuraĝigi vin mi donas al vi la italajn nombrojn de la lasta provo:

elspezoj por anoncoj en Facebook kaj similaj – 300 eŭroj
homoj, kiuj klakis kaj poste petis informojn – 90
aliĝintoj al la retaj kursoj – 52
faktaj partoprenintoj – 40
restis en la kurso ĝis la fino – 20

Modesta rezulto, vi komentus. Jes, sed ili montras, ke eblas trovi komencOntojn. Cetere en Italujo apud tiuj retaj kursoj kun instruistoj funkcias la tradiciaj retaj kursoj KIREK, al kiuj aliĝis 92 kursanoj en 2023 kaj almenaŭ en sep urboj okazis ĉeestaj kursoj. Mi ne havas precizajn nombrojn pri la kursoj en Serbujo, sed per ili oni rekonstruis la junularan sekcion kaj akiris du novajn estraranojn de la landa asocio.

Do, eblas. Bonvolu provi aranĝi tian retan kurson ĉiu landa asocio en Eŭropo. KomencOntoj en ĉi tiu momento estas pli gravaj ol komencIntoj en Eŭropo, krom se ni volas venigi ilin el la Sudo de la mondo.

Renato Corsetti
kunordignato de la komisiono por agado en Eŭropo de UEA

Solidara kampanjo: Helpi la edzon de Miora

Poina Raveloharison, 50-jara malagaso, estas la edzo de Miora Raveloharison kaj la patro de la komuna 11-jara filo Jonathan. Li bezonas helpon por ortopedia operacio. Grupo da samideanoj kaj amikoj de Miora lanĉis solidaran helpkampanjon.

Miora Raveloharison, konata afrika Esperanto-aktivulino, skribis:

«En la jaro 2000 li malsaniĝis. Li estis enhospitaligita dum tri jaroj. Lia femuro doloregis. En 2015 kuracistoj diris, ke li bezonas operacion. Tamen ĝis nun ni ne povis realigi ĝin pro manko de mono. Ĝi kostas tro multe por ni. Tamen, li provis labori. Ni daŭre serĉis kuracadon por li, sed konstatis, ke en Madagaskaro oni eĉ ne faras la bezonatan operacion.

Ekde 2019, li ne plu povas labori. Li povas nek longe sidi, nek longe stari, kaj ne povas iri pli ol dek metrojn. Pro tiu doloro en la dekstra femuro lia korpo tre dependis de la genuo. Sekve liaj genuoj komencis malbone funkcii kaj ne plu povis fleksiĝi.

Li bezonas kompletan koks-artikan protezon.

Ni bezonas ĉirkaŭ kvin mil eŭrojn (5.000 €) por tiu kuracado kaj por la vojaĝkostoj de Poina kaj Miora al Irano.

Anticipan dankon pro via kontribuo por ĉi tiu kuracado. Lia situacio ne estas facila; li ne povas zorgi pri siaj edzino kaj filo. Li eĉ ne povas labori por certigi kuracadon kaj ne povas zorgi pri siaj familianoj. Kvankam li mem estas en malfacila situacio, li ĉiam klopodas helpi al Miora en ŝia agado por Esperanto.

Dankojn al esperantistaj amikoj en Irano por gastigi, dankojn al Keyhan, Ulrich kaj Renato por la iniciato de tiu kampanjo».

Ni ĝojas informi, ke ni jam kolektis iom pli ol duonon de la bezonata sumo kaj ni dankas ĉiujn kontribuintojn. Ni ankaŭ volas aparte informi vin pri kortuŝa donaco, kiu alvenis el DR Kongo per Western Union. Se ankaŭ afrikano en neriĉa lando sentis la bezonon kontribui, bonvolu helpi nin finkolekti la monon bezonatan.

Vi povas ĝiri vian subtenon al unu el la sekvaj kontoj:

– la germana banka konto de Ulrich Matthias: IBAN: DE48545100670196621672 ĉe Postbank, BIC/SWIFT-kodo: PBNKDEFF

– la UEA-konto “umat-w” de Ulrich Matthias
kun la simpla indiko “por Miora”

Ni promesas repagi la senditan monon, se la operacio ne realiĝos pro neatingo de la bezonata monsumo.

Renato Corsetti, Ulrich Matthias, Keyhan Sayadpour

Redakcie

Ni mem spertis la esperantistan solidarecon en 2011 dum longa atendado de operacio en Moskvo, kaj nun ni, malgraŭ nia neenviinda financa situacio, volonte ĝiras al la indikita UEA-konto cent eŭrojn kiel etan helpon por Poina kaj Miora.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Telegramo: Pli ol 400 abonantoj de “Esperanto-novaĵoj”

La 13an de julio 2023 estis fondita la Telegrama kanalo “Esperanto-novaĵoj” ĉe https://t.me/esperanto_news. La 23an de septembro 2023 al ĉi tiu kanalo aliĝis cent abonantoj, kaj antaŭ la jarfino ĉi tiu nombro superis 200. Dum la 109a UK la abonantaro superis 400, kaj nun la kanalon “Esperanto-novaĵoj” abonas 470 personoj, kiuj ĉiutage ricevas kurtajn mesaĝojn, plejparte pri novaj publikaĵoj en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto”.

Telegramo estas rapide populariĝanta senpaga nuba tujmesaĝilo por komputiloj kaj poŝtelefonoj. Esperantistoj, same kiel aliaj telegramanoj, uzas ĝin por sendi tekstajn kaj voĉajn mesaĝojn, kaj por telefonvoki kaj videovoki aliajn parolantojn. Eblas sendi per ĝi ĉian enhavon: tekstoj, bildoj, filmetoj, movbildoj, glumarkoj kaj dosieroj.

En Telegramo funkcias **grupoj**, en kiuj grupanoj interparolas pri diversaj temoj, kaj **kanaloj**. Kanalo estas unudirekta loko kun mesaĝoj pri difinita temo. Ĉiu kanalo havas specifan temon. Malkiel grupo, kanalo ne estas loko por diskuti, sed por informiĝi pri difinita temo, sed ĉe la kanalo “Esperanto-novaĵoj” funkcias samnoma grupo/babilejo.

La plej “amasa” Esperanto-kanalo en Telegramo estas “Esperantaj memeoj” kun 572 abonantoj, sed la plej freŝa novaĵo en ĝi estis publikigita la 25an de junio 2024, “Esperanto-novaĵoj” estas en la dua loko kun 470 abonantoj, ĝin sekvas “Kontraŭ Espero” (323), “Sal Esperanto” (321, la plej freŝa novaĵo el 2022) kaj “Libera Folio” (311).

Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri Esperanto kaj esperantista agado, aliĝu al la kanalo “Esperanto-novaĵoj” ĉe t.me/esperanto_news.

AlKo

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco, la 21a de septembro 2024

La jaro 2024 markas la 25-jariĝon de la Deklaracio kaj Agadprogramo de UN pri Kulturo de Paco, kie oni legas ke paco “postulas pozitivan, dinamikan partoprenan procedon kie dialogo estas instigata kaj konfliktoj estas solvataj en spirito de interkompreniĝo kaj kunlaboro”. Kunlaboro sekvas el interkompreniĝo: sen interkompreniĝo, do la kapablo aŭskulti kaj proponi, toleri kaj trovi komunajn vojojn, ne eblas progresi.

Kerna al interkompreniĝo estas la homa lingvo. Lingvoj gravegas, ne nur rilate interkomunikadon sed ankaŭ por starigi komunajn valorojn kaj principojn. Por atingi pacon, ni bezonas la partoprenadon de ĉiuj homoj kun ĉiuj lingvoj. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj specife kondamnas diskriminacion surbaze de la lingvo kiun oni parolas. Tio signifas egale respekti ĉiujn lingvojn kaj iliajn parolantojn, uzi diversajn komunajn lingvojn en specifaj okazoj, kaj krei pontojn inter malsamaj lingvoj en spirito de egaleco.

Kiel organizo kiu disvastigas la Internacian Lingvon Esperanton kun la celo disvolvi solidarecon, komprenon kaj estimon inter popoloj de la mondo, Universala Esperanto-Asocio reasertas la antaŭenigon de lingvaj homaj rajtoj kiel vojon al paco. En sia propra laboro, UEA aktive serĉas komunan grundon per komuna lingvo, kiel denove montrita en sia 109a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Aruŝo, Tanzanio, en aŭgusto. Preskaŭ mil parolantoj de Esperanto el 65 landoj kune diskutis en spirito de paco la temon “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”.

Ni atentigas, ke la temo de la ĉi-jara Eŭropa Tago de Lingvoj, la 26an de septembro, estas “Lingvoj por la Paco”. UEA partoprenos tiun dialogon. Kun aliaj NROj oficiale partneraj de Unesko, ni partoprenos ankaŭ la projekton “Danco kaj Paco Kundivide” – nur unu el multaj porpacaj projektoj de la Esperanto-movado je internacia, nacia kaj loka niveloj.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2025 Internacia Jaro de Paco kaj Konfido. UEA plene kaj entuziasme partoprenos: Paco kaj Konfido ankaŭ formos la ĉeftemon de la venontjara Universala Kongreso de Esperanto. Nia mondo bezonegas pacon, kaj tiu paco venos nur per kompreno kaj konfido. Dum la nuna epoko, kiam ni alfrontas militojn, malsatojn, pandemiojn kaj aliajn defiojn, ni unuiĝu por postuli pacon kaj por konstrui pacan mondon en spirito ankaŭ de lingva egaleco.

GK UEA

Arkivo



En la sekvaj du paĝoj vi povas legi la liston de la Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por oktobro 2024. Tamen la ĉefa aŭtuna Esperanto-jubileo okazos en novembro – antaŭ cent jaroj, la 6an de novembro 1924 naskiĝis William Auld. La 6an de novembro 2024 Esperanto-Asocio de Britio okazigos omaĝe al li ceremonion en la Nacia Biblioteko de Skotlando (Edinburgo), al kiu li donacis sian kolekton da proksimume kvin mil Esperanto-libroj.
Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/auld-3/

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2024

1. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Mariana Evlogieva** (Мариана Петрова Евлогиева, 1964-1981-), bulgara verkisto, entreprenisto kaj esperantistino; Esperanto-instruanto (1983-), aŭtoro de multaj artikoloj en/pri Esperanto, redaktoro de Esperato-libroj; aktivulo kaj estrarano de Bulgara Esperanto-Junularo (1986-90) kaj Bulgara Esperanto-Asocio (2000-), ĉefdelegito kaj A-Komitatano de UEA (pluraj oficperiodoj ekde 2002); adaptinto de la zagreb-metoda lernolibro por bulgaroj (1991, rete kaj teletekste 1996) kaj de la multmedia kurso de Esperanto de Carlos Pereira (lumdisko 2003); membro de la Akademio de Esperanto (2022-).

5. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Georges Warnier** (varnjé, 1884-1903-1953), franca komercisto kaj esperantisto; fondinto de Librejo de Esperanto (1906) kaj Domo de Esperanto (kun E. Archdeacon, 1928), prezidanto de la landa asocio UEF (1948-50), sekretario de la 10a UK (Parizo, 1914), prezidanto de LKK de la 24a kaj 35a UKoj (Parizo, 1932 kaj 1950); aŭtoro de kelkaj lerniloj, inter kiuj la plej populara *Esperanto manuel* (kun G. Chavet, 1907), kies 17a eldono aperis en 1958; ofta partoprenanto de la Esperanto-kabaredo *Tri koboldoj*.

13. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Ignat Florian Bociort** (boĉórt, 1924-1969-2015), rumana lingvisto kaj esperantisto; fondinto kaj gvidanto de la kolektivo "Esperanto kaj interlingvistiko" ĉe Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio (1978-89); enkondukinto de Esperanto kiel nedeviga studobjekto en la filologiajn fakultatojn de Rumanio (1978), la unua prezidanto de la landa asocio EAR (1990), aŭtoro de kelkaj Esperanto-lerniloj kaj de interlingvistikaj libroj; honora membro de UEA (1998).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 37-38).

14. Antaŭ 45 jaroj mortis **Milda Jakubcová** (fraŭline: Vasermanis, en la unua edzineco: Pirksts, 1899-1924-1979), latva oficistino kaj esperantistino, post la edziniĝo kun František Jakubec (en 1932) loĝinta en Ĉeĥoslovakio, Esperanto-instruistino kaj poetino (*Elektitaj versaĵoj*, 1969; *Estrado de animaloj*, 1970), tradukinta al Esperanto beletraĵojn el la latva, rusa, ĉeĥa kaj slovaka lingvoj.

26. Antaŭ 20 jaroj mortis **Chen Yuan** (1918-1931-2004), ĉina lingvisto, redaktoro, ŝtatoficisto (vicprezidanto de Ŝtata Skriblingva Reformkomisiono,

vicprezidanto de Ĉina Eldonista Asocio, direktoro de Instituto pri Aplika Lingvistiko ĉe la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro en Ŝtata Komisiono pri Lingvaj Aferoj) kaj esperantisto; redaktoro de la dummilitaj Esperanto-gazetoj *Informilo el Ĉinio, Justeco, Al Nova Etapo*, kunfondinto (1951) kaj ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) antaŭ la Kultura Revolucio; vicprezidanto (1980-89), prezidanto (1989-95) kaj honora prezidanto (1995) de ĈEL, redaktoro de pluraj Esperanto-eldonaĵoj, vicprezidanto de LKK de la 71a UK (Pekino, 1986); membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1986).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 58-59).

26. Antaŭ 60 jaroj mortis **Rudolf Hromada** (1890-1907-1964), ĉeĥa bankoficisto kaj esperantisto; membro de Internacia Centra Komitato de Esperanto-Movado (1922-30), redaktoro de *Ĉeĥoslovaka Gazeto, La Progreso* kaj *Esperantista*, aŭtoro de kelkaj Esperanto-vortaroj, tradukinto de centoj da poemoj (parto de ili aperis en la antologio *Intima Triptiko*, 1978) kaj *Riporto skribita en la pendumila maŝo* (1979) de Julius Fučík; membro de Lingva Komitato (1921-48) kaj Akademio de Esperanto (1948-62); honora membro de UEA (1933).

30. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Ivanička Maĝarova** (Иваничка Райкова Маджарова, 1939-1989-), bulgara kulturfaka oficistino, verkistino kaj esperantistino; sekretario (1989-99), prezidanto (1999-2014) kaj vicprezidanto (2014-) de la Esperanto-Kulturdomo "Ivan Kirĉev" en Razgrad, senatano de la Esperanta Civito ekde 2000, lanĉinto kaj redaktoro de *Esperantista tribun*o (1991-), organizanto de la ĉiujara renkontiĝo EKRA kaj literatura konkurso Abritus; aŭtoro de la novelaro *Vi kaj mi* (2000) kaj de kelkaj dulingvaj poemaroj, interalie, de la hajkaro *Kardo sur kasko* (2010) kiu ricevis la premion "La verko de la jaro" en 2011; kompilinto de la antologioj *Sonoj kaj kredoj el Razgrad* (1999) kaj *Abritus: Poezia kaj humura antologio* (2016).

31. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Ludwig Schödl** (1909-1928-1997), germana metiisto, instruisto kaj esperantisto; aktivulo de la intermilita laborista Esperanto-movado (SAT, GLEA, IPE), pledanto por restarigo de Esperanto-movado en GDR, kunfondinto (1965) kaj vicprezidanto (1977-81) de Centra Laborrondo Esperanto ĉe Kulturligo de GDR, vicprezidanto de GDREA (1981); aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto en GDR (1967).

Aleksander Korĵenkov

Kulturo

Dum jardekoj Vsevolod Ivanov estis konsiderata klasikulo de la Sovetunia literaturo, aŭtoro de la ade reeldonata “Kirastrajno 14-69”, funkciulo de la Sovetunia verkista unio, “edukito de Gorjkij” ktp. Sed li havis duan vivon, kaŝitan de ĉiuj, kaj liaj nepublikaj verkoj tute maltaŭgis por la kriterioj de la socialisma realismo. La 11a parto de “Rusa novelaro” enhavas kvin liajn prozaĵojn. ***(Pentraĵo de Georgij Verejskij, 1937)***

Vsevolod Ivanov: nesufiĉe konata verkisto

Vsévolod Vjaĉeslávoviĉ Ivanóv (Всеволод Иванов, 1895-1963) estas la unua aŭtoro el la jam prezentitaj en *Rusa novelaro*, kiu devenas ne el la Eŭropa parto de Ruslando, sed el la Azia. Li naskiĝis la 12an (Gregorie: la 24an) de februaro 1895 en la vilaĝo Lebjaĵje, en la Semipalatinska regiono (nun ĝi, renomita Akkuly, estas en Pavlodara regiono de Kazaĥstano) en la familio de la instruisto Vjaĉeslav Ivanov kaj ties edzino, kozakino Irina, fraŭline Savickaja, el familio de polaj ekzilitoj.

En la 14-jara aĝo li forlasis la hejmon kaj laboris kiel helpkomizo, riverŝipisto, portisto, vojaĝanta vendisto, cirka aktoro (fakiro, klaŭno, kanzonisto, batalisto...), vagabondis tra Siberio, Uralo kaj Centra Azio kaj fine en 1915 ekloĝis en Kurgan, laborante kiel kompostisto.

En la revolucia jaro 1917a Ivanov samtempe aliĝis al la menŝevista kaj socialista-revolucia partioj, poste al la bolŝevista, sed en 1919 li jam laboris en la Omska blankarmea gazeto *Vperjod*, verkante akrajn kontraŭbolŝevistajn felietonojn… Komence de 1920 li en blankarmea trajno fuĝis el Omsko orienten, sed en Novonikolajevsk (nun Novisibirsko) la trajno estis kaptita de ruĝuloj, kaj de neevitebla pafekzeko lin savis eksa kolego-kompostisto Nikolajev, rekoninta lin kiel iaman revolucian aktivulon. Ivanov rezignis pri armeo kaj politiko, decidinte vivteni sin kiel verkisto, kaj en januaro 1921 kun helpo de Gorjkij ekloĝis en Peterburgo.

La unuaj rakontoj kaj poemoj de Ivanov aperis en 1915 en uralaj kaj siberiaj gazetoj kun pluraj pseŭdonimoj. Siajn fruajn prozaĵojn Ivanov kolektis en la kajeroj *La verda flamo* (Kurgan, 1916-17) kaj *Rakontoj* (1919), sed lia unua *vera* libro estis *La kornaĵoj*, kiun li mem kaŝe kompostis kaj presigis 30-ekzemplere en la blankarmea presejo. Sed la famo venis al li, kiam en la unua numero de la unua Sovetunia "dika" literatura revuo *Krasnaja novj* (La ruĝa novo, 1921, №1-2) aperis lia romaneto *La partizanoj* kaj baldaŭ ankaŭ *La kirastrajno 14-69*. En Peterburgo li aliĝis al la legenda verkista koterio "La Serapionaj fratoj" (laŭ la novelaro *Die Serapionsbrüder* de Hoffmann) kiel frato Aleut.

En 1923 Ivanov ekloĝis en Moskvo, plu verkante rakontojn, novelojn, teatraĵojn, sed ĉiam malpli "politike ĝustaj". Fine de 1926 aperis lia libro *La sekreto de sekretoj*, kiu iĝis eble la plej kritikita novelaro en la dua duono de la 1920aj jaroj, ja li kuraĝis en la klasbatala epoko trakti la misterojn de la homa animo. Ĉi tiun novelaron oni nomis "freŭdisma", "bergsonisma", "biologia", "kontraŭsocia" ktp kaj ĝian aŭtoron "laŭtparolilo de la reakcia socia tavolo" kaj "poeto de la putranta filistraro".

Fine, la monumenta *Literatura ekciklopedio* (1930) jene karakterizis lin:

“La bildo de la kontraŭsocia homo, sklavigita de la primitivaj instinktoj, impete plenigas la tutan kreadon de Ivanov … La kreado de la malfrua Ivanov estas fremda al la socialisma revolucio”.

Tio ŝajnis verdikto. Li aŭdis ĝin kaj faris konkludojn, ekvivinte duoblan vivon: dum jaroj kaŝe laborante pri siaj groteskaj romanoj *La kremlo* kaj *U* (aŭ *Y*), senprecedencaj en la rusa literaturo kaj aperintaj en lia patrujo nur post la falo de Sovetunio, kaj ne plu ĝenante la potenculojn per verkoj nekonvenaj al la epoko, kaj ili (la potenculoj) postenigis lin kiel sekretarion de la Sovetunia verkista unio kaj de ties Literatura fonduso.

Speciale atendindaj estis la interrilatoj de Vsevolod Ivanov kun Stalin, kiu en la fruaj 1920aj jaroj proponis, ke li, Stalin mem, verku antaŭparolon por la baldaŭ eldonota novelaro de Ivanov. Ivanov kuraĝe respondis, ke li ĝenerale ne ŝatas antaŭparolojn, precipe se tiujn verkas politikistoj.

Lia filo, eminenta filologo Vjaĉelav Ivanov (1929-2017), rememoris:

«La patro ekde la junaĝo konis la Gvidanton, li priskribis lin en sia frua novelo *La reveno de Buda*o ankoraŭ kiel popolkomisaron pri naciaj aferoj, ili eĉ drinkis kune. Kaj la patro komprenis la esencon de tiu, kun kiu li interrilatis. Sed ankaŭ tiu komprenis, ke la patro komprenis lin! <…> Estis la rakonto “La bebo”, kies komencon Stalin sciis parkere, kaj li memoris ĝin ankaŭ post dudek jaroj kaj diris al Fjodor Panfjorov: “Jen kiel Vsevolod Ivanov verkis!” Ĉi tiu rakonto estis malpermesita dum la tuta Stalina epoko, ankaŭ poste oni ne tuj permesis [eldoni] ĝin».

Dum la tuta Sovetunia tempo estis daŭre presataj la “partizantemaj” verkoj de Ivanov, precipe la *Kirastrajno* (konata ankaŭ teatre kaj filme), sed ĉiam kun cenzura “korektado” de la originalo, en kiu la aŭtoro plurloke prezentis blankulojn ne negative, sed liaj literaturaj ĉefverkoj relegebliĝis nur en la 1990aj jaroj, kaj pluraj el liaj nepublikigitaj verkoj premiere aperis kaj aperas en la 21a jarcento.

Por la nuna kolekto ni elektis kvin verkojn. La plej frua el ili, *La kornaĵoj* probable estis verkita antaŭrevolucie kaj presita en la samtitola manfarita novelaro (1919). *La bebo* aperis en 1922; *La kampo* kaj *La vivo de Smokotinin* aperis en gazetaro antaŭ *La sekreto de sekretoj* (1926). Iom alia estas *Andreo Kuzjmiĉ*, verkita en 1940, sed unuafoje aperinta nur en 2012 kune kun tri samtempe verkitaj “nepublikaj” noveloj.

La tradukintoj frontis la tekstaron, spicitan de dialektaĵoj kaj kripligitaj vortoj, kiujn ni, kiam tio estis ebla, tradukis en la norman Esperanton. (Cetere, en la retrovitaj noveloj de la 1940a jaro kaj en postaj verkoj tiaj specialaĵoj mankas.) Ni esperas, ke ĉi tiuj tradukoj vekos vian intereson pri la verkaro de Vsevolod Ivanov.

Aleksander Korĵenkov

Vsevolod Ivanov

LA KORNAĴO

Ljonjka[1] kun aliaj knaboj vizitis la Turfan Lagaron kaj kaptis en akvo kornaĵojn: akvajn nuksojn de trapo kun ŝelo simila al malgrandaj kornoj. Ljonjka kaj la knaboj en la malhelbluan akvon ĵetis malnovajn bastajn matojn, per kiuj ili huligis la senmovan surfacon. Kaj eltiris ilin reen. Akrangulaj nuksoj kun gisfera koloro alkroĉiĝis al la mato, kaj la ĉasistoj kolektis milojn da ili. Estis varmege. Odoris scirpoj, kiel lakitaj brilis folioj de lapoj, kaj estis agrable malpezigi sian bruston per ĝoja krio:

– Donu-u korbo-ojn!

Kaj kiam de malproksime, de la Oblikva Monto la vilaĝon laŭ Irtiŝo[2] atingis la tondra muĝo de vaporŝipo, Ljonjka prenis sian korbon kun la kornaĵoj kaj kuris al la kajo. Li interesiĝis ne tiom pri komerco, kiom pri observado de la nekonata vivo, kuranta preter li. Sur la bordon elkuris kuiristoj, gajaj ŝipistoj, sinjoroj en mallongaj jakoj, kiel ĉe la filo de la popo, kaj sinjorinoj kun iaj nenaturaj voĉoj. “Ili portas siajn pantalonojn super la botoj, diabloj”, – envie pensis Ljonjka.

Hodiaŭ venis la plej granda vaporŝipo “Andreo” – blanka, kiel kapo da sukero, kaj tiel plena de tentoj kiel sukero. Preskaŭ ĉiuj kornaĵoj el ambaŭ korboj estis tuj aĉetitaj, restis nur iom sur la fundo. “Mi venu sur la ŝipon, – Ljonjka decidis, – se oni forpelos min, estu tiel, sed se mi donos al ili la kornaĵojn, eble ili ne pelos”. La malsupran ferdekon li jam kelkfoje vizitis kaj sufiĉe bone studis ĝin. “Necesas iri supren, ĉiuj de supre foriris al la bordo”.

Kaj Ljonjka, kun siaj korboj en la manoj, komencis grimpi supren laŭ la fera ŝtuparo. Li venis al la ferdeko.

Neniu estis en la koridoroj. Ljonjka ne estis videbla de la bordo – li eniris la ŝiprandon, kiu alfrontis Irtiŝon.

“Ĝuste – neniu estas, – glitis en lia menso, – ili estas stultuloj: de tia bona loko iris al la vilaĝo”.

Ljonjka sidiĝis sur benko, rigardis la kradojn, la balustradon, la plankon.

“Ĉio estas farbita, sed ĉe ni oni farbas nur ŝutrojn”.

Poste Ljonjka turnis sin kaj rigardis al la fenestro, ĉe kiu li sidis:

– Dika vitro. Ni ne havas tian eĉ en la preĝejo.

Li rigardis en la salonon kaj miris:

– Nu, frenezuloj: jenajn lumigilojn ili havas! Kaj la spegulojn!

En la salono, ĉe la piano, sub la floroj, sidis malgranda, pala knabino, leganta verdan libreton. “Saĝa, – pensis Ljonjka, – ŝi legas libron, ne kiel tiuj, kiuj vagaĉas

laŭ la bordo. Mi aliru ŝin, eble ŝi aĉetos la lastajn kornaĵojn". Kaj, kolektinte sian kuraĝon, li paŝis en la koridoron. Kun forte batanta koro, li prenis la vitran tenilon de la pordo: "Ĉu oni batos mian muzelon aŭ ne?"

La pala knabino ĉesis legi sian libron kaj perplekse rigardis al la lentuga, blankhara knabo en blua truhava ĉemizo, en mallonga, malpura pantalono kun korboj en la manoj.

– Kion vi bezonas? – ŝi demandis.

Ljonjka gratis sian ventron kaj, ronkinte, respondis:

– Nenion. Mi tiel.

– Kiun vi bezonas?

– Neniun. Eble vi aĉetu la kornaĵojn?

La knabino proksimiĝis kaj rigardis en la korbon.

– Kiaj malbonaj beroj.

– Vi mem estas bero, – Ljonjka koleriĝis,– se vi ne scias, do silentu. La kornaĵoj estas nuksoj, sed ne beroj.

– Nukso-oj…– la knabino tire diris, – mi ne havas monon, mia panjo ne donas al mi.

"Ŝajne vi mensogas", – pensis Ljonjka, denove zorge rigardante ĉirkaŭe.

"Ŝi estas malvigla kiel frostigita rapo."

– Sed vi povas kapti ĝin ĉe ŝi, – li proponis.

– Kiel do?

– Nu, kaŝe prenus, ĉu vi ne komprenas?

– Aĥ, ĉu ŝteli? Ne, oni ne devas ŝteli! Tio estas peko.

– Ŝtelado ne estas peko por etuloj, – diris Ljonjka serioze, – mia avino diras tion.

– Via avino nenion komprenas, ŝi estas neklera.

Ljonjka fajfis kaj sidiĝis sur seĝon.

– La avino scias, ŝi parolkuracas dentojn kaj kuracas malarian febron… sed vi mensogas, ke ŝi estas neklera. Sed la kornaĵojn mi donos al vi senpage, prenu.

– Sed kiel oni ilin prenu?

– Mi tuj montros.

Ljonjka prenis de la tablo malgrandan brilan tranĉilon kaj gisferan paperpremilon, direktis la tranĉilon al trapa nukso kaj frapis.

– Jen prenu, manĝegu ĝin, – li transdonis al la knabino blankan kernon eligitan el la kornaĵo, – tamen, ĉu plaĉas ĝi?

– Bonguste.

– Ĉu bone? Nu, mi por vi rompos ankoraŭ kelkajn, nur sukcesu meti ilin en la buŝon.

Ljonjka sidiĝis sur la plankon kaj komencis diligente rompi la kornaĵojn.

La knabino pensis dum kelka tempo kaj ankaŭ sidiĝis apud li.

Ili kviete konversaciis:

– Kio ĝi estas? – Ljonjka skuis la kapon al la piano.

– Piano, muziko.
– Kiu ĝin ludas?
– Ĉiuj.
– Ĉiuj? Vidu. Ĉu ankaŭ vi scipovas?
– Mi scipovas.
Ljonjka rigardis sian kunulinon kun respekto.
– Ĉu vi mensogas? Iru do, ludu ion.
La knabino kuris al la piano kaj sonigis kelkajn akordojn.
– Nu?
– Gurdo! Ĉe ni junuloj tirharmonikon ludas tiel, ke eĉ fajfo en oreloj estas. Nia muziko pli bonas. Ĉu vi scipovas ludi harmonikon?
– Ĉu harmonikon? Ne.
– Ĉu vi eĉ ne havas harmonikon? Nu kiaj homoj vi estas.
Ljonjka mungis sur la plankon kaj viŝis siajn fingrojn, kovritajn per fendetoj, per la pendanta kurteno.
– Ĉu via patrino estas riĉa? – li demandis la knabinon.
– Mi ne scias.
– Ĉu vere? Ĉu multajn bovinojn vi havas?
– Mankas bovinoj ĉe ni.
– Verŝajne vi mensogas. Ĉu vi havas ĉevalojn?
– Estas unu ĉevalo, paĉjo sur ĝi veturas al sia ofico.
– Do, malriĉaj, – kondolence Ljonjka diris, – sed kial vi vivas tiel? Kaj de kie vi venis?
– El la urbo.
– Vidu. Ĉiuj estas el la urbo. Kiel vi ne manĝas la kornaĵojn?
La knabino ridetis:
– Mi satmanĝis, mia patrino malpermesas al mi manĝi multe…
– Negrave, manĝu, mi ilin rompos ankaŭ por via patrino. Por ĉiuj sufiĉos. Manĝu.
– Kial vi estas tiom malpura? – la knabino demandis.
– Ĉu mi? Tute ne malpura… Mi banas min dek fojojn tage, mia haŭto jam fendiĝis.
– Ĉu vi en kuvo banas sin?
– En Irtiŝo, kaj foje mi venas al Hunda Jamla kun niaj knaboj, sed la vojo tien estas longa: ses verstoj.
– Ĉu vi ne timas?
– Kion ni devus timi? Estas timige nokte, tiam sorĉistinoj vagas.
– Ĉu ĉe vi estas sorĉistinoj? – kun ektimo sur la vizaĝo demandis la knabino.
– Multegaj…
– Ĉu vi ilin vidis?
Ljonjka ne volis perdi sian aŭtoritaton, kaj li mensogis:
– Mi vidis.
– Kiam? Rakontu, – la knabino kaptis lian manikon.

– Bone, – diris Ljonjka, – ĉu vi donos al mi la tranĉilon?
– Kiun tranĉilon?
– Tiun, per kiu ni rompas la kornaĵojn.
– Ĝi ne estas mia, mi donus ĝin al vi.
– Se ĝi ne estas via, do mi simple prenos ĝin. Oni ne ĵetu ĝin kie ajn.
Ljonjka metis la tranĉilon en sian sinon kaj komencis rakonti:
– Pasintjare mia avo Kalistrato kaj mi iris fiŝkapti: ni intencis establi hokitajn fiŝfadenojn. La sturgoj abundis, vere, grandaj kiel traboj. Do. La avo kaj mi trinkis teon vespere kaj kuŝiĝis por dormi, kaj la nokto estas luna, hela kvazaŭ tago. Kaj do ni vidas…
– Nu! nu! – la knabino urĝis lin.
– Do ni vidas…
Sed oni ne lasis lin fini la parolon: en la pordon ŝovis sin kapo kun pufa hararo, kaj alta virina voĉo demandis:
– Kion vi faras ĉi tie, Nora?
– Mi konversacias.
– Kun kiu?
La koro de Ljonjka premiĝis kaj li sentis ŝviton sur sia dorso.
– Kun li, kun la knabo.
La sinjorino rigardis al Ljonjka kaj kriis, kvazaŭ ŝi estus mordita:
– Kiu estas ĉi tie? Maria Pavlovna! Maria Pavlovna!
Enkuris alia virino, pli juna.
– Kial vi lasis la infanon sola? Maria Pavlovna?
– Mi… mi… por unu minuto… – konfuziĝis Maria Pavlovna.
“Mi estos vergita”, – pensis Ljonjka, tirante supren sian pantalonon.
– Kial vi estas ĉi tie? Ĉu? Kion? Kie estas la ŝipestro, voku ĉi tien la ŝipestron.
– Jen kornaĵoj… Aĉetu… – embarasite Ljonjka ial skuis la korbon, – kornaĵojn…
– Tuj mi instruos vin pri kornaĵoj!..
Enkuris la ŝipestro, forta viro kun la densaj brovoj kaj grumblema, kolera voĉo:
– Kion vi ĉi tie bezonas? Por kio vi enrampis?
– Li estis venenanta mian filinon per iu aĉaĵo! – la sinjorino ekscitiĝis.
– Ni bezonas kuraciston, kiel eble plej baldaŭ. Kuracisto!
La ŝipestro turnis sin kaj per sia polmo frapis la nukon de Ljonjka. La korbo de Ljonjka falis, el lia sino elsaltis la ŝtelita tranĉilo, sonorinta sur la planko, kaj mem Ljonjka ruliĝis sub la tablon.
– Dio mia! Krome li estas ŝtelisto. Li ŝtelis la tranĉileton, – la sinjorino kriis, – ŝipestro!
La ŝipestro ekhastis:
– Mi tuj faros, Via Ekscelenco.
Poste ĉio iĝis tute malbona… Amasiĝis homoj. Ljonjka estis trenita el sub la tablo, li kroĉiĝis al la tablotuko, deŝiris la tukon, de la tablo falis la tasoj kaj la tekruĉo.

– Diablido, – la kapitano kelkfoje frapis Ljonjkan per sia raspa manplato, – ne rampu tien, kie vi ne devas esti, ne rampu.

– Onklo, mi ne plu faros tiel, mi ne plu faros… – kriis Ljonjka.

Sub ridado de scipistoj, pasaĝeroj kaj kozakoj, li estis forpelita al la bordo laŭ la ŝtupareto.

Pro honto kaj ofendo, li kolere kriis tra larmoj al la ŝipestro:

– Redonu la korbon, dikventra koboldo!

La ŝipestro minacis al li per sia nodoplena pugno kaj sakris.

* * *

Ljonjka ne plu venas sur vaporŝipojn.

Kiam al la vilaĝo venas ŝipo, Ljonjka kuŝas sur la rando de la krutaĵo, manĝas kornaĵojn kaj ĵetas la ŝelojn en la akvon.

La ŝeloj turniĝante forflosas.

La rivero brilas, la suno varmigas la dorson, la akvo odoras.

Kun strida muĝo preterpasas blankaj, puraj, akurataj vaporŝipoj, plenaj de vivo fremda al Ljonjka.

“De kie diablo alpelas ilin?” – pensas Ljonjka.

Tradukis **Vladimir Jurganov**

LA BEBO

I

Mongolio estas besto sovaĝa kaj negaja! Ŝtono estas besto, akvo estas besto, eĉ papilio estas mordema.

Oni ne scias, kian koron havas mongolo: li surhavas felojn, similas al ĉino kaj loĝas malproksime de la rusoj, trans la dezerto Nor-Koj. Kaj, krome, oni diras, ke li foriros trans Ĉinion al Barato, al nekonataj bluaj landoj sur sep bordoj.

Proksime al la rusoj estis venantaj la Irtiŝaj[1] kirgizoj[2], kiuj pro la rusa milito[3] unue migris en Mongolion. Iliaj koroj estas konataj – glimecaj, maltaŭgaj, tute travideblaj. Ili iris ĉi tien senhaste kaj kunprenis siajn brutojn, kaj siajn infanojn, kaj eĉ siajn malsanulojn.

Sed la rusojn ĉi tien oni pelis kruele – pro tio ili estis viroj fortaj kaj sanaj. Sur ŝtonaj montoj ili forlasis siajn malfortulojn – iuj mortis, iuj estis mortigitaj. Iliaj familioj, varmaj vestoj kaj brutoj restis ĉe la blankuloj. La viroj estis malicaj kiel lupoj printempe. Ili kuŝis en siaj tendoj en valoj kaj pensis pri la stepo, pri Irtiŝo…

Da ili estis ĉirkaŭ kvindeko. Ilin gvidis Sergio Selivanov, kaj la taĉmento estis jene nomita: “Ruĝgvardia partizana taĉmento de kamarado Selivanov”.

Ili sopiris.

Dum oni peladis ilin tra la montoj, la granda kaj malhela ŝtonaro teruris iliajn korojn. Sed veninte en la stepon ili eksopiris al sia hejmlando. Ĉar ĉi tiu stepo similis la stepon ĉe Irtiŝo: sablo, duraj herboj, forte forĝita ĉielo. Sed ĉio estis fremda, ne sia propra, neplugita, sovaĝa.

Kaj vivi sen inoj estis ankaŭ malfacile.

Nokte oni rakontis obscenajn soldatajn fabelojn pri inoj, kaj kiam ne plu eblis elteni, ili surĉevaliĝis kaj rajdis en la stepon por kapti la kirgizinojn.

Kaj la kirgizinoj, rimarkinte la rusojn, obeeme kuŝiĝis dors-al-tere.

Estis malagrable kaj abomene kuniĝi kun la kirgizinoj, kuŝantaj kun forte fermitaj okuloj. Kvazaŭ pekado kun brutoj.

La kirgizoj timis la taĉmentanojn kaj migris pli profunden en la stepon. Vidante ruson, ili minacis per fusiloj kaj pafarkoj, kriaĉis, sed ne pafis. Ĉu eble ili ne scipovis pafi?..

II

Atanazio Petroviĉ, la trezoristo de la taĉmento, estis larmema kiel infano. Ankaŭ lia vizaĝo estis kvazaŭ infana: eta, senliphara kaj rozvanga. Sed liaj gamboj estis longaj kaj fortikaj, kiel tiuj de kamelo.

Sed sidiĝinte sur ĉevalon, li tuj iĝis severa. Lia vizaĝo kvazaŭ kaŝiĝis en foro, kaj li sidis grizhara, kolera kaj timinda.

Je Pentekosto tri personoj – Selivanov, Atanazio Petroviĉ kaj la sekretario de la taĉmento Drevesinin – estis senditaj por serĉi en stepo bonajn falĉejojn.

La sabloj fumis sub la suno.

La vento blovis de supre, de l’ ĉielo. La varmo de l’ tero leviĝis en la tremantan ĉielon. La korpoj de la homoj kaj bestoj estis duraj kaj pezaj kiel rokoj. Enuo.

Selivanov raŭke diris:

– Kiel statas la falĉejoj tie?..

Ĉiuj sciis, ke li parolas pri Irtiŝo. Sed iliaj maldensbarbaj vizaĝoj silentis. Kvazaŭ la suno bruligis iliajn barboharojn same kiel la herbojn en la stepo. Iliaj stretaj okuloj estis skarlataj, kiel vundo farita de fiŝhoko. Varmego.

Nur Atanazio Petroviĉ plendvoĉe respondis:

– Ĉu ankaŭ tie estas senpluveco, uloj?..

Lia voĉeto sonis ploreme, sed lia vizaĝo ne ploris, kaj nur la grandaj, longaj okuloj de la laca kaj anhelanta ĉevalo sub li verŝis dolorajn larmojn.

Tiel unu post unu, laŭ padoj faritaj de sovaĝaj kaproj, la partizanoj iris al la stepo.

La sabloj morne brulis. La sufoka vento gluiĝis al la ŝultroj kaj kapoj. Ŝvito brulis en la korpoj kaj ne povis eliĝi tra la seka haŭto.

Vespere, kiam ili estis jam forlasantaj la valon, Selivanov montris okcidenten kaj diris:

– Iuj vojaĝantoj rapidas.

Ĝuste: ĉe la horizonto la sablo balanciĝis kun roza polvo.

– Verŝajne, kirgizoj.

Ili ekdisputis: Drevesinin diris, ke la kirgizoj loĝas fore kaj ne proksimiĝas al la Selivanovaj valoj; laŭ Atanazio Petroviĉ ili certe estis kirgizoj; ja la polvo estis kirgiza, densa.

Kaj kiam la polvo ruliĝis pli proksimen, ĉiuj decidis:

– Nekonatoj.

Laŭ la voĉoj de l' mastroj la ĉevaloj komprenis, ke kun la vento flugas io fremda. Ili ekmovis siajn orelojn kaj falis sur la teron eĉ antaŭ la ordono. La grizaj kaj flavaj ĉevalaj korpoj kuŝas en la valo senhelpaj kaj komikaj pro la kruroj magraj kiel stangoj. Ĉu eble pro honto ili fermis siajn grandajn timigitajn okulojn kaj impete spiris?

Rande de la valo kuŝis Selivanov kaj la trezoristo Atanazio Petroviĉ. La trezoristo ploris, brue snufante. Por forpeli la timon, Selivanov ĉiam kuŝigis lin apud si, kaj pro la preskaŭ infana plorado ĝojis kaj petolis lia peza kampula koro.

La polvo turniĝis laŭ la vojeto. Vigle frapis la radoj. Kaj, kiel polvo, floke turniĝis en la ĉirkaŭkoloj longaj nigraj kolharoj!

– Rusoj… Oficiroj, – Selivanov diris kun certeco kaj vokis Drevesininon el la valo.

Du homoj kun ruĝbendaj kaskedoj sur la kapoj sidis en nova vimena ĉaro. La vizaĝoj ne videblis pro la polvo. Ŝajnis, ke en flava nubeto flosas la ruĝkaskeduloj. Kiam la mano kun la vipo estis elplonĝanta el la polvo, videbliĝis la supro de la fusila paftubo.

Drevesinin iom pensis kaj diris:

– Oficiroj… verŝajne pro aferoj. Ikspeticio. Estas klare.

Li petoleme palpebrumis okule kaj buŝe:

– Ni regalos ilin, Selivanĉjo.

La ĉaro portas la homojn, firme portas. La ĉevaloj gajas, kaj la ĉaro, kiel vulpo per sia vosto, balaas sian spuron per mongola polvo.

Atanazio Petroviĉ plorece eligis el si:

– Ne necesas, knaboj… Prefere kapti ilin… Atendu, ne pafu.

– Ĉu vi vere ne domaĝas vian kapon?

Selivanov koleriĝis kaj senbrue elĵetis la kulasblokon, kvazaŭ elfendigante butonon.

– Nun ne endas plori, trezoristo.

Plej kolerigis ilin tio, ke la oficiroj aperis en la stepo nur duope, sen eskorto, kvazaŭ ili havus grandiozan forton por mortigi la virojn. Jen, ekzemple, unu el la oficiroj ekstaris rekte, observis la stepon, sed malbone vidis: polvo, vespera ruĝa vento sur la bruligita herbo, ĉe la valo sur du ŝtonoj, similaj al ĉevalaj korpoj… Sed ĉu ŝtonoj?.. Korpoj?..

Kuregas tra la ruĝa polvo la ĉaro, radoj, homoj kaj iliaj pensoj…

Ili pafis… Kriis… Denove pafis.

La kaskedoj samtempe, intertuŝiĝinte, falis en la vimenan korbegon de la ĉaro.

La kondukiloj malstreĉiĝis, kvazaŭ ŝiriĝinte.

La ĉevaloj ektiris… ekkuris, sed iliaj postkoloj laktece ekŝaŭmis… Tremante per siaj fortaj muskoloj, ili klinis la kapojn kaj haltis.

Atanazio Petroviĉ diris:

– Ili mortis…

La viroj venis, rigardis.

La ruĝbenduloj mortis. Ili sidis ŝultr-ĉe-ŝultre, iliaj kapoj kliniĝis malantaŭen, kaj unu el la mortintoj estis virino. Ŝiaj haroj malordiĝis – duone flavaj, duone nigraj, kaj ŝia soldata ĉemizo estis alte levita sur la virina mamo.

– Strange, – Drevesinin diris, – ŝi mem kulpas, surmetinte la kaskedon. Kiu volus mortigi inon?… La socio bezonas inojn.

Atanazio Petroviĉ kraĉis.

– Vi estas monstro kaj burĝaĉo… En vi, kanajlo, estas nenio…

– Atendu, – Selivanon interrompis. – Ni ne estas rabistoj, necesas inventari la popolan proprietaĵon. Donu al mi paperon.

Sub la antaŭo de la ĉaro, en ĉina vimena korbo inter la alia “popola proprietaĵo” kuŝis blankokula kaj blankhara bebo. Lia maneto estis premanta angulon de bruna kovrilo. La eta sufinfano mallaŭte plorpepis.

Atanazio Petroviĉ kortuŝite diris:

– Ja ankaŭ li… verŝajne, siamaniere diras, kio kaj kiel.

Ili denove kompatis la virinon kaj ne demetis ŝiajn vestaĵojn, sed la nudan viron enfosis en la sablon.

III

Atanazio Petroviĉ estis revenanta en la predita ĉaro, li tenis sur la manoj la bebon kaj, lulante ĝin, mallaŭte kantetis:

Najtingal’, najtingal’, eta bird’…
Eta kanari’…
Kantas kun malĝoj’…

Li rememoris sian naskiĝvilaĝon Lebjaĵij, la kondukadon de la brutoj al la hejmo, la familion, la infanojn, kaj altvoĉe ploris.

Ankaŭ la bebo ploris.

Kuregis kaj altvoĉe ploris ankaŭ la fluanta, malstabila kaj bruligita sablo. La partizanoj kuregis sur siaj malaltaj fortikaj mongolaj ĉevaloj. La partizanoj havis bruligitajn vizaĝojn kaj bruligitajn animojn.

Apud la padoj kreskis absinto, strangolita de l' suno kaj simila al sablo – maldensa kaj nerimarkebla por la okulo.

Kaj la sablo similis al absinto – maldensa kaj amara.

Ho, padoj, kapraj padoj! Ho, padoj, amaraj padoj! Mongolio – besto sovaĝa kaj negaja!..

Ili trarigardis la oficiran posedaĵon. Libroj, valizo kun tabako, brilaj ŝtalaj instrumentoj. Unu el ili estis kvarangula kupra kesto kun gradoj, staranta sur tri longaj piedoj.

La partizanoj proksimiĝis, rigardis, palpis kaj pesis ĝin sur siaj manoj.

Ili odoris je ŝafa graso – pro enuo ili multe manĝis, kaj graso saturis iliajn vestaĵojn. Tiuj kun elstaraj pometoj kaj molaj maldikaj lipoj venis el la Donaj vilaĝoj[4]; la malhelvizaĝaj kun longaj nigraj haroj venis el la kalkfosejoj. Kaj ili ĉiuj havis gambojn kurbajn kiel jungarkoj kaj gorĝajn stepajn voĉojn.

Atanazio Petroviĉ prenis la kuprokapan tripiedon kaj diris:

– Tiliskopo, – li fermis la okulojn. – Bona tiliskopo, kostas milionojn. Oni rigardis la lunon tra ĝi kaj trovis sur ĝi orajn amasetojn, knaboj. Ne necesas lavi ĝin, ĝi estas oro pura, kiel faruno. Nur ŝutu ĝin en sakon…

Unu el la junaj urbanoj ridegis:

– Mensogaĉo, krevu lia kapo…

Atanazio Petroviĉ ekkoleris:

– Ĉu mi mensogaĉas, vi, poŝteja kanajlo? Sed atendu. …

– Kiu atendu?

Atanazio Petroviĉ kaptis sian revolveron.

– Ĉit! – diris Selivanov.

La tabako estis dividita, kaj la instrumentoj estis donitaj al Atanazio Petroviĉ, por ke li, kiel trezoristo, povu ĉe okazo interŝanĝi ilin kontraŭ io ĉe la kirgizoj.

Li metis la instrumentojn antaŭ la bebo.

– Ludu…

La bebo ne vidas ilin: ĝi ploras. Li provis tiel kaj aliel (eĉ ŝvitis pro la penado), sed la bebo daŭre ploras kaj ne ludas.

La kuiristoj alportis tagmanĝon. Dense ekodoris butero, kaĉo kaj brasika supo. Ĉiuj eligis el la botoj grandajn Semipalatinskajn kulerojn[5]. La herbo estis tretita de la partizanoj. Supre, sur roko, la sentinelo kriis:

– Ĉu mi baldaŭ?.. Mi volas vori… Sendu anstataŭanton!

Post la tagmanĝo oni rememoris, ke necesas nutri bebon, kiu senĉese ploris.

Atanazio Petroviĉ maĉis iom da pano. La humidan maĉaĵon li ŝovis en la malsekan disigitan buŝeton kaj ŝmacetis per siaj lipoj:

– Ŝmac-ŝmac! … bela… manĝu, eta koboldo. Bongusta.

Sed la bebo fermis la buŝeton kaj forturnis la kapon – ne akceptis. Li nazploris altvoĉe, ŝrike.

Viroj venis, ĉirkaŭis lin. Ili rigardas la bebon trans la kapoj, silentas.

Varmege. Pro la ŝafaĵo brilas iliaj pometoj kaj lipoj. La ĉemizoj estas malbutonitaj. La piedoj estas nudaj, flavaj, kiel la mongola tero.

Iu proponis:

– Supon al li…

Oni malvarmigis supon. Atanazio Petroviĉ trempis la fingron en la supo kaj metis ĝin en la beban buŝon. La grasa bongusta supo fluis laŭ la lipetoj sur la rozan ĉemizeton kaj flanelan kovrilon. Li ne akceptas. Pepas.

– Hundido pli saĝas – manĝas de la fingro.

– Hundo hundas, sed homo homas…

– Jen kia sciulo!..

Bovinan lakton ili ne havis. Ili pensis doni al li ĉevalinan lakton, ili havis ĉevalinojn. Sed ne – kumiso ebriigas. Li povos ekmalsani.

Ili disiris je grupoj inter la ĉaroj, malkviete interparolante. Kaj inter la ĉaroj kuradas Atanazio Petroviĉ kun ŝirita kozaka jako sur la ŝultroj, ankaŭ liaj etaj okuloj estas ŝiritaj. Lia voĉo estas alta, maltrankvila, infaneca, kvazaŭ la bebo mem estus kuranta kaj plendanta.

– Sed kio okazas?.. Uloj, li ja ne manĝas. Sed ja necesas, ha? Zorgu iel, kanajloj…

La larĝaj, potenckorpaj viroj staris kun senhelpaj rigardoj.

– Virina afero…

– Certe…

– Se virino donus, li tutan ŝafon manĝus…

– Jen kia afero.

Selivanov aranĝis kunvenon kaj anoncis:

– Kristana knabo ne devas morti kiel besto. Lia patro, jes, estis burĝaĉo, sed kio pri la bebo? Li estas senkulpa.

La viroj konsentis.

– La bebo ne estis implikita. Li senkulpas.

Drevesinin ekridegis:

– Kresku, knab'. Li ĉe ni kreskos, forflugos al la luno… Al la oraj amasetoj.

La kamparanoj ne ridis. Atanazio Petroviĉ levis la pugnon kaj kriis:

– Vi, nekorektebla hundinaĉo, la sola fimokisto en la taĉmento!..

Li faris kelkajn paŝojn surloke, svingis la manojn kaj subite ŝrikis:

– Bovinon… Bovinon li bezonas!..

Ĉiuj samtempe respondis:

– Sen bovino venos morto…

– Nepre la bovinon…

– Sen bovino li forbrulos.

Atanazio Petroviĉ rezolute diris:

– Uloj, mi iros por bovinoj.

Drevesinin petoleme interrompis:

– Ĉu al Irtiŝo, al Lebjaĵij?
– Al Irtiŝo, napokapa babilisto, mi ne havas kialon veturi. Mi veturos al la kirgizoj.
– Ĉu interŝanĝi tiliskopon kontraŭ bovino? Iru, bonfaranto.
Atanazio Petroviĉ saltis al li kaj kolere kriegis:
– Hundaĉo! Ĉu vi volas muzelbaton?
Kaj ĉar ili komencis sakri tro akre, la kunvenprezidanto Selivanov interrompis ilin:
– Sufiĉas…
Ili voĉdonis jene: Drevesinin, Atanazio Petroviĉ kaj tri aliaj rajdu en la stepon, al la kirgizaj vilaĝoj kaj revenu kun bovino. Se eblos, kun du aŭ kvin, ĉar la kuiristoj jam havis nesufiĉe da viando.
Ili ligis siajn fusilojn al la seloj, surmetis kirgizajn vulpajn ĉapojn por aspekti kiel kirgizoj de malproksime.
– Iru kun dio!
Oni envolvis la bebon en la kovrilon kaj metis lin en la ombron sub la ĉaron. Apud li sidis junulo, kiu por amuzi sin kaj la bebon, de tempo al tempo pafis per sia revolvero al absinto.

IV

Ho, vi, mongolaj sabloj, negajaj!
Ho, bluaj brulantaj ŝtonoj, manoj subteraj, malicaj!
Rusoj veturas tra sabloj. Nokto.
La sabloj odoras varmegon, absinton.
La vilaĝaj hundoj bojas al lupo, al mallumo.
La lupoj bojas en mallumo al malsato, al morto.
Kirgizoj fuĝas de l’ morto.
Sed ĉu eblas savi de l’ morto la brutaron?
La jurta vilaĝo odoris sterkopajlaĵon[6], fermentitan lakton. Ĉe la flavaj fajroj sidis magraj kaj malsataj kirgizaj infanoj. Apud ili estas nudripaj, akramuzelaj hundoj. La jurtoj staras kiel pajlostakoj. Post la jurtoj estas lago, scirpoj, kaj subite el la scirpejo oni laŭte pafis al la flavaj fajroj. O-o-a-at!..
Kirgizoj elkuris el siaj feltaj jurtoj. Timigite ekkriis:
– Uj-boj… Uj-boj, ak-kazyl-urus… Uj-boj…
Ili saltis sur la ĉevalojn, kvazaŭ iliaj ĉevaloj estis tage kaj nokte selitaj. La jurtoj ekfrapis. Ekfrapis la stepo. La scirpejo ekkvakis kiel sovaĝa anaso.
– Aj-aj, ruĝa-blanka ruso, aj-aj…
Iu grizbarbulo falis de la ĉevalo per la kapo en kaldronon, renversis ĝin. Brogite, li ekmuĝis densavoĉe. Kaj apud li vila hundo, subtirinte la voston, timeme ŝovis sian malsatan muzelon en la varmegan lakton.
Ĉevalinoj alte henis. Kvazaŭ timigitaj de lupoj, ŝafoj tumultis en sia korto. Bovinoj spiris peze, kvazaŭ anhelante.

Kaj la obeemaj kirgizinoj, ekvidinte la rusojn, obeeme kuŝiĝis sur feltajn tapiŝojn…

Drevesinin lascive ridegis:

– Ha, ĉu ni estas stalonoj?.. Ja ni ne povas senĉese ilin…

Li rapide verŝis lakton en la aŭstran ladbotelon kaj, klakante per sia skurĝo, pelis al unu el la jurtoj bovinojn kaj bovidojn. La malligitaj bovidoj, rapide puŝante per siaj kapoj molajn mamojn, ĝoje kaptis la cicojn per siaj grandaj, molaj lipoj.

– Vidu, malsataj mizeruloj.

Drevesinin pafis ĉiujn kartoĉojn el sia revolvero en la bovidojn.

Atanazio Petroviĉ trakuris la vilaĝon kaj volis sekvi Drevesinin-on, sed subite rememoris:

– Cicumo bezonatas. Diable, ni forgesis.

Li ekkuris tra la jurtoj, serĉante cicumon. La lumoj en jurtoj mankis. Atanazio Petroviĉ prenis brulantan ŝtipon kaj serĉis cicumon, disŝprucante fajrerojn kaj tusante pro la fumo. En unu lia mano estis la ŝtipo, en la alia – revolvero. Cicumoj mankis. La obeemaj kirgizinoj sterniĝis sur feltaj tapiŝoj, kovrinte sin per blankaj kaptukoj. La infanoj ploregis.

Atanazio Petroviĉ koleriĝis kaj en unu el la jurtoj kriis al juna kirgizino:

– Cicumon, fia paganino, donu cicumon!

La kirgizino ekploris kaj komencis rapide malbutoni sian fajan robon kaj poste demeti sian ĉemizon.

– Ni kirek[7]… Al… Al… Prenu… – Apud ŝi sur tapiŝo ploris bebo, envolvita en ĉifonoj. La kirgizino jam levis la genuojn. – Al… al… prenu…

Sed Atanazio Petroviĉ kaptis ŝiajn mamojn, palpis ilin kaj ĝojigite fajfis:

– Jeen… La cicumo. Ha! Firma!

– Ni kirek… Ni… Kio?..

– Nu, ne kraku. Iru! Firma!

Kaj li trenis je la mano la kirgizinon post si.

En la mallumo, li surseligis la kirgizinon kaj, de tempo al tempo palpante ŝiajn mamojn, rapidis al la Selovanovaj valoj, al la taĉmento.

– Mi ja trovis, uloj, – li ĝoje parolis, kaj liaj okuloj larmis. – Mi, fratoj, ĉion trovos, el la tero elfosos.

V

En la tendaro klariĝis, ke Atanazio Petroviĉ en la mallumo ne rimarkis, ke la kirgizino kunprenis sian propran infanon.

– Estu tiel, – la viroj diris, – ŝia lakto sufiĉos por ambaŭ. Ni havas bovinojn, kaj ŝi estas sana ino.

La kirgizino estis silentema, rigora, kaj ŝi mamnutris la bebojn vidate de neniu. Ili kuŝis sur ŝia tapiŝo en la tendo – unu blanka, la dua flava, kaj konkorde plorpepis.

Post unu semajno en la ĝenerala kunveno Atanazio Petroviĉ plendis:

– Jen la trompo, kamaradoj, la kirgizino, fiulino, sekrete sian idon per la tutaj mamoj nutras, kaj al la nia restas nur iom sur la fundo. Mi, fratoj, kaŝe vidis. Vi nur rigardu…

La viroj venis kaj rigardas: la beboj estas kiel ĉiuj beboj, unu blanka, la alia flava, kiel matura melono. Sed ŝajnas, ke la ruso estas malpli dika ol la kirgizo.

Atanazio Petroviĉ disigis siajn manojn.

– Mi nomis lin Vasjka[8]… sed vidu… Jena misokazaĵo. Trompo.

Drevesinin diris eĉ sen moko:

– Ja vi Vasjka estas febla, mortonta…

Ili trovis stangon, metis ĝin sur timonon, trovis la pezocentron, kaj pendigis la bebojn ĉe ambaŭ ekstremoj de la bastono por ekscii, kiu estas pli peza.

Plorpepis en siaj ĉifonaĵoj la beboj, pendigitaj sur lazoj, faritaj el haraĵo. Ili ellasis malfortan infanan odoron. La kirgizino staris ĉe la ĉaro kaj ploris, tute ne komprenante la situacion.

La viroj silente rigardis.

– Liberigu, – diris Selivanov. – La pesilon liberigu.

Atanazio Petroviĉ formetis la manojn de la stango, kaj la rusa knabeto tuj leviĝis.

– Jen la flavbuŝa bastardo, – kolere diris Atanazio Petroviĉ. – Grasiĝis.

Li levis de la tero sekan ŝafan kranion kaj metis ĝin sur la ruson. La pezoj egaliĝis.

La viroj rumore ekkriis:

– Uloj, ŝi ja tronutris lin je la tuta kapo!

– Oni ne kontrolis…

– Jen la bestaĉo… kiel ŝi nutris.

– Kiu kontrolis?

– Estas tro da laboro, krom kontrolado de la beboj!

Kelkaj pli prudentaj viroj konfirmis:

– Ne eblas kontroli…

– Ja ŝi estas lia patrino…

Atanazio Petroviĉ komencis stamfi kaj jelpis:

– Ĉu, laŭ vi, la rusa homo devos morti pro iu pagano… Ĉu mia Vasjka pereu?..

Ili rigardis al Vasjka – tiu kuŝis blanka kaj magra.

La viroj ekangoris.

Selivanov diris al Atanazio Petroviĉ:

– Sed vi lin… nu… li, la kirgizido, mortu, dio estu kun li. Ni jam multajn mortigis. Unu plia por nia respondeco…

La viroj denove rigardis al Vasjka kaj silente disiris.

Atanazio Petroviĉ prenis la krigizidon kaj metis ĝin en truhavan sakon.

Lia patrino komencis hurli. Atanazio Petroviĉ neforte pugnis ŝian buŝon kaj iris el la tendaro en la stepon…

VI

Post du tagoj la viroj staris piedpinte apud la tendo kaj super la ŝultroj de la aliaj, rigardis tien, kie sur felta tapiŝo la kirgizino mamnutris la blankan infanon.

La vizaĝo de la kirgizino estis obeema, kun okuloj mallarĝaj kiel avengrajnoj, ŝi surhavis fajan robon kaj molajn marokenajn botojn.

La bebo puŝadis sian vizaĝeton en ŝian mamon, ŝovadis siajn manetojn sur ŝia robo, kaj liaj kruroj svingiĝis komike kaj mallerte, kvazaŭ li estus saltanta.

La viroj rigardis kun ridego.

Kaj la plej tenera estis Atanazio Petroviĉ. Snufante, li ploreme parolis:

– Vidu, kiel li umas!..

Kaj ekster la tola tendo al nekonata celo kuris la valoj, rokoj, stepoj, fremda Mongolio.

Neniu scias, kien kuris Mongolio – besto sovaĝa kaj negaja!

Tradukis **Aleksander Korĵenkov**

LA KAMPO

Mileĥin ricevis kvarhoran forpermeson.

– Se vi malfruos, mi pune sendos vin deĵori ekster via vico, – diris la kompani-estro, stampante la paspermeson.

Tamen por Mileĥin estus sufiĉa nur unu horo. Li diris al la estro, ke liaj parencoj venis el la vilaĝo, kaj li mensogis, dirinte tion. Li nur volis refreŝiĝi. En la kazerno ŝajne estis tute malhele pro la marta suno, pro malpuraj cigaredaj stumpoj sur la planko, pro la muroj, grizaj de koto. Sur la skribtabulo (antaŭe ĉi tie estis lernejo), iu skribis malbonan vorton per blanka argilo, kaj apude sur la muro estis algluita per panpeceto la afiŝo: “Kolĉak[1] portas kolbason, Sovetoj portas liberecon”. Kaj kiam Mileĥin fermis la pordon, tegitan per basta mato kaj ekmarŝis tra la granda korto al la placo, li sentis varmon, satecon kaj ĝojon.

La fervoja stacidomo estis je kvar verstoj de la urbo, kaj ĉiun duonhoron trajno veturis al la urbo. Mileĥin ne volis atendi la trajnon, kaj li marŝis tra la grandega placo de la stacio.

Supre la suno bruligis, kaj malsupre estis frosto. La placo jam degelis, kaj nur la monteto da vojo kuŝis kiel malpura flaveca rubando sur la nigra ŝvelinta grundo. Post la salikaj arbustoj, rekte okcidente, estis froste blua Irtiŝo, kaj sur ĝi estis vid-eblaj ŝiritaj pecoj de la vojo, kiel paperaj pecetoj.

– Verŝajne la glacio sur ĝi nokte komencis rompiĝi, – diris Mileĥin.

Sed la sibla bruo de la glacirompiĝo ankoraŭ ne estis aŭdebla.

“Baldaŭ la glacio ekmoviĝos”.

Mileĥin ridetis kaj sentis ĝojon, kvazaŭ la glacio apartenus al li. Li marŝis laŭ la rando de la vojo, brue frapante siajn malsekajn anglajn botetojn, kaj la neĝo rompiĝis sub liaj piedoj. Ankaŭ la krakado donis al li plezuron.

La verdeta angla uniforma palto, simila al mantelo, kaj la bluaj francaj krurtukoj sur liaj tibikarnoj ne harmoniis kun la grandega kunikla ĉapo kun la orelumoj kaj la maldensa rufa barbeto.

Super la salikejo ekbrilis blanka flugilo de mevo.

“Baldaŭ ĝi moviĝos”, – Mileĥin denove pensis.

La stacidomo estis plena de homoj kun sakoj, plejparte virinoj; soldatoj kun stanaj steletoj sur siaj ĉapoj; tri ĉinoj vendis cigaredojn kaj sunflorajn semojn. De la tegmento akvo gutis. Kaj kun mola tintado ofte falis longaj pendoglacioj.

Mileĥin iom staris ĉe la pordo de vagono de la tria klaso. Iu komisaro kun flava teko sub la brako, preterirante, puŝis lin kaj diris mallaŭte:

– Pardonu.

Mileĥin, por ne malhelpi, foriris kaj sidiĝis sur la fenestrobreto. Preter li kuris fervojistoj kun lanternoj kaj iuj nigraj skatoloj, fajfis lokomotivoj per malsamaj voĉoj, frapis la bufroj de vagonoj. Desupre, kviete kaj nerapide, la granda klara suno varmigis la stacidomon, la malpurajn vagonojn kaj la teron ŝvelintan pro malsekeco.

Apud li falis pendoglacio. Mileĥin kliniĝis kaj prenis ĝin – ĝi interne ne havis malplenon. La dua falis, la tria – ĉiuj estis tute samaj.

“Signo de bona rikolto, – pensis Mileĥin, – la maturiĝo estos plena kaj la rezulto riĉa. Jene…”

Kaj li rememoris, ke la neĝo degelas ne pro la suno, sed pli forte nokte, de la tero.

Kaj degelas vigle.

– Signo de bona rikolto, – Mileĥin diris voĉe kaj dirinte tion, li pensis pri sia vilaĝo.

Li pensis, ke lia brutaro taŭgas al la korto – grizaj samkiel brunaj, la mastrumado estas en bona ordo. Pasintjare la rikolto estis malbona, sed ĉi-jare devos esti bona, la tuta marto estis seka, sed se dum la aprilo estos malseko – estas bonege. Kaj nun, dum la sankta tempo[2], mi devas purigi mian fusilon, aŭ eĉ stari garde ĉe iu provizejo. Lia humoro malboniĝis, li ekstaris, marŝis trifoje laŭ la pasaĝerkajo kaj decidis iri al sia kompanio. Ĉi-tempe iu lin vokis:

– Nikolĉjo!

Mileĥin returnis sin kaj rekonis unu el siaj kompaniaj kamaradoj, Fedjkan Nikitin. Antaŭ unu monato li malsaniĝis je tifo kaj oni transportis lin al hospitalo. Mileĥin venis al li, kaj ili salutis unu la alian per manpremo.

– Nu, kiel vi fartas? – demandis Mileĥin.

– Nemalbone. Oni lasis min iri por resanigo al mia vilaĝo por du monatoj. Mi tuj veturos.

– El kiu distrikto vi estas?

– El la Tatarska, – Nikitin respondis kun plezuro. – Post duona tago, frato, mi estos hejme. Kaj vi?

Mileĥin nevolonte respondis:

– El la Novo-Nikolajevska… Necesas veturi dum du tagoj. Sed trajnoj funkcias aĉe, kaj se trajno estas kun mitralo, do ĝi veturas tutan semajnon.

– Kun mitralo ĝuste ĝi apenaŭ veturas, – Nikitin konfirmis kaj diris per klara, ĝoja voĉo: – Ni venu al mi por trinki teon.

Mileĥin konsentis. Dum ili iris, Mileĥin rimarkis, ke Nikitin ŝanceliĝas pro malforto, kaj lia vizaĝo aspektis tiel, kvazaŭ li iras en preĝejon por sia geedziĝo. Mileĥin enviis lin.

Dum la temanĝo Nikitin, kiel ĉiuj post-tifaj homoj, manĝis multe kaj regalis Mileĥin-on.

Kaj Mileĥin ne aŭdis, kion Nikitin rakontis al li pri la hospitalo, kuracistoj, sed pensis pri sia vilaĝo.

Kaj kiam li eliris el la vagono, adiaŭinte sian kamaradon, li decidis reveni hejmen en la sama trajno. Tri vagonoj pasis, li intencis sidiĝi en la sama trajno ĉe ĝia vosto, sed ne plu povis elteni kaj eniris iun vagonon, preterpasis unu kupeon kaj en la sekva grimpis sub la benkon por sin kaŝi.

En la kupeo sidis kvin soldatoj. Unu el ili, kun la nazo fendita, demandis:

– Kien vi veturas?

– Hejmen, – Mileĥin respondis.

– Nu jen… – diris la soldato, kaj la alia, trempante biskviton en glason da teo, demandis:

– Kiom malproksime vi veturos?

– Al Novo-Nikolajevsk. Unu stacio antaŭ ĝi.

– Malproksime. Dokumentoj ĉe vi mankas?

– Mankas.

– Ĉu ankaŭ pano mankas?

Mileĥin respondis kolere:

– Nu, mankas, tamen kial vi zorgas pri tio?

– Kuŝu do, – diris la soldato. – Vi iel atingos vian stacion.

Dum du tagoj Mileĥin kuŝis sen eliri el sub la benko, kaj la trian tagon nokte li elvagoniĝis ĉe Graĉjovo. Dek kvin verstoj restis de Graĉjovo ĝis Krutoje, kaj matene Mileĥin jam estis hejme.

Milka, la hundino jelpis kaj ĵetis sin al liaj piedoj. La ansero, timigita, kuris flanken, sub la renversitan sledon; sur la ĉevala kranio, pendigita sur la barila paliso, kiel antaŭ unu jaro, pasero sidis kaj purigis la flugilojn. Semĉjo rigardis el la pordo kaj kriis en la domon: – Panjo, jen paĉjo alvenis!

La edzino starigis la samovaron, alportis lakton, tranĉis ringan panon kaj, viŝante en angulo siajn okulojn per roborando, demandis:

– Por kioma tempo oni forlasis vin?

– Por du monatoj, – gravaspekte diris Mileĥin, kaj li mem kredis siajn vortojn.

– La milito finiĝis, ĉu?

– Nenio finiĝis! Mi estas lasita pro malsano.

– Pro kiu malsano?

– Diablo ĝin scias. La kuracistoj ĝin konas.

– Kompreneble, la kuracistoj scias, – diris Maria, snufe plorante, – ili pereigis la homon, kaj eĉ ne diras per kio.

– Nu, vi ne ekscitiĝu. Ĉesu.

Oni demandis lin en la vilaĝo:

– Ĉu vi ne aliĝis al kumunio[3]?

Mileĥin respondis:

– Oni diras, ke mia ventro ne taŭgas por kumunio.

– Vidu, – miris la viroj. – Kaj ĉi tie oni diras, ke en Omsko oni registras ĉiujn al kumunio, kaj se iu ne volas, oni razas lian kapon kaj sendas lin al germanoj. Ĉu vi ne vidis tiujn?

– Mankis okazo vidi, – Mileĥin respondis.

– Se oni ekscitas homojn, ne atendu bonon.

Mileĥin konfirmis:

– Ne atendu …

La demandoj baldaŭ finiĝis. Komenciĝis plugado, kaj ĉiuj iris plugi. La printempo estis kvieta, la aprilo estis malseketa – falis mallongaj, sed delikataj pluvoj.

– Paradizo, – mallaŭte diris Mileĥin, por ne fortimigi la bonŝancon. – Timono dum unu nokto povas iĝi superkreskita de herbo.

– Miraklo! – aĥis la edzino.

La plugilo obstine kaj vigle boris la nigran teron. Brunulo ŝvitis, kaj lia ĉirkaŭkolo odoris akre kaj dolĉe. La pluga soko brilis, la malseka lano de Brunulo brilis, kaj al Mileĥin ŝajnis, ke la tero mem defalas, ĉar al ĝi tedis kuŝi. De la lagoj flugis la odoro de scirpoj, arboj burĝonis, kaj kelkloke sur ili estis malsekaj, ankoraŭ ne malfermitaj, burĝonoj, kiel grandaj skaraboj.

Mileĥin tute ne pensis, ke en Omsko, en la 2a plotono, kuŝas ĉe lia tabullito fusilo №45728, kaj ke li estas ne onklo Nikolĉjo, sed Nikolao Mileĥin, soldato de la Ruĝa Armeo.

La kokinoj malfrue estis forlasantaj sian sidstangon. La edzino ridetis kaj nokte parolis mallaŭte en la orelon de Mileĥin:

– La rikolto estos bona.

– Jes, – Mileĥin respondis per dormema voĉo, kaj rando de ŝia koro iomete tikliĝis. Li brakumis la edzinon al si kaj tiel ekdormis.

Kiam ekfloris paduso, ili komencis semi grenojn. Matene malpeza vento blovis de la oriento – bona vetero, la grenoj estis portataj al la okcidento, por ripozi; poste tagmeze la vento tute ĉesis – eĉ pli bone. La suno staris kvazaŭ la varma ruĝa cirklo kaj rigardis, kiel la grandaj flavaj grajnoj falas glate kaj peze en la teron.

Poste Mileĥin iris al la kampo kaj vidis densajn verdajn ĝermojn. De la supro de la observa loko, sur kiu li staris, la kultivita kampo aspektis kiel verda kolomna[4] tablotuko. Kaj ĉirkaŭ la randoj estis forbrulinta arbaro – nigraj bruligitaj trunkoj, kiel glasoj kun brika teo[5].

– Vidu… – Mileĥin diris kun memrespekto kaj, rememorinte, ke hejme li ne trinkigis la brutaron, iris hejmen.

Semjĉo renkontis lin post la pordego:

– Paĉjo, tie estas gardisto.

– Kie?

– En la ĉambro… Kun grandega ĉapo… Mi timas.

– Li vin ne mordos, – diris Mileĥin, suprenirante al la perono.

La milicisto[6] kondukis Mileĥin-on al la subdistrikta centro, kaj de tie al la distrikta milita komisarejo. De la distrikto li estis sendita al la gubernia ĉefurbo, kaj la gubernia milita tribunalo verdiktis: pro nesankciita forlaso de la Ruĝa Armeo dum la momento de intensa lukto kontraŭ la malamikoj de la socialisma patrujo oni konfisku la duonon de lia movebla kaj nemovebla posedaĵo por la bezono de la ŝtato.

Tradukis **Vladimir Jurganov**

LA VIVO DE SMOKOTININ

Kiam, la unuan fojon post la longaj militoj, ĉarpentistoj venis en la vilaĝon ĉarpenti por la riĉa vilaĝano Anfinogenov novan lignan domon anstataŭ la forbrulinta, abundis mokoj kontraŭ ili. Jen oni kriis, ke la hakiloj malakriĝis dum la revolucio – oni multajn kapojn forhakis per ili; jen ke ili, dekutimiĝinte, ne kapablas distingi tremolon de pino; jen simple sonis neklarigeblaj soldataj obscenaĵoj. Tamen estis agrable konscii la venintan normalan tempon, kiam eblas konstrui kaj ne vane labori. Kaj ĉiuj longe vagis ĉe la flavaj traboj, kunmetitaj kiel holmo, kaj palpis bonkvalitajn hakilojn el Zlatoust[1].

La konstruentreprenisto, kiu okupiĝis pri la domo, estis sia, samvilaĝa, Eŭgrafo Smokotinin, malalta larĝkrura olduleto. Eŭgrafo estis timigita de la milito, malsato, nekompreneblaj impostoj, sed oni plej timigis lin, kiam li denove, post longa interrompo, komencis entrepreni konstruadon. Li skrupule konstruigis en la subdistrikta centro butikon por kooperativo, sekvatage li esperis ricevi monon, sed la kooperativo subite krevis! Kaj ne estas kompreneble, kiu kulpas, kaj ne eblas pagigi iun. Post tio li definitive kredis al neniu, kaj mem pagis kaj postulis ke oni anticipe pagu lian laboron. Unu tagon antaŭ la ĉarpentado de la domo li ekmalsanis, aŭ li ŝajnigis

tion, por alkutimigi siajn infanojn, sed li sendis por kontroli la laboron sian plej junan filon Timoteon.

La ruĝvanga, helhumora kaj altvoĉa Timoteo enuis kontroli la laboron kaj instigi la ĉarpentistojn. Li prenis la hakilon, elektis pli pezan trabon kaj – hakis! La hakilo eksonoris, la ligno ĝemis…. La mateno estis friska; la roso ankoraŭ ne sekiĝis sur la subaj flankoj de la folioj; kolomboj rukulis apud la grenejo – kaj iliaj voĉoj estis zorgoplenaj, samkiel ĉio en tiu ĉi mateno. La ĉarpentistoj, vidante fervoron de la mastro, ankaŭ firme prenis la hakiltenilojn. Ili estis alilokaj, malŝatis tiun ĉi satan vilaĝon kaj strebis montri, kiel necesas ĝuste labori. Kaj la mastro kvazaŭ deziris konkuri kun ili.

El post la grenejo eliris Katerina Ŝepelova, vidvino: oni murdis ŝian edzon en la milito, ŝi restis kun sola infano. Neniu sciis, kiel ŝi vivtenis sin – onidire iu subdistrikta kooperativo mendas al ŝi triki pugnogantojn por vendo. Sed ĉu estas granda profito de la pugnogantoj? Kaj ofte, nokte, tra la malfermita fenestro etendiĝis el la mallumo nekonata mano, metanta sur la fenestrobreton saketon kun manĝaĵo: kaŝita almozo. Ŝi estis alta, sanplena, silentema, ŝi tenis la kapon iom klinite, kaj ŝajnis, ke ŝiaj longaj kaŝtankoloraj palpebroj balais la teron… Ĉirkaŭirinte la holmon da ŝtipoj, forte odorantaj je rezino, ŝi proksimiĝis al la ĉarpentistoj kaj malrapide, kvazaŭ honte, prenis grandan, pli ol arŝinan lignospliton[2]. Ŝi profunde sin klinis antaŭ ili. La ĉarpentistoj rigardis al la mastro – tiu ardis ĉe la trabo; li intencis fari el ĝi plafonan solivon, sed trovis en ĝi grandegan branĉtuberon, sekve li kompromitiĝis: tuberoj ne allaseblas en la solivo.

– Jen la virino estas kvazaŭ fenestro, bezonatas taŭga kadro por ŝi: estus kaj varme kaj hele por vi, – unu el la ĉarpentistoj diris, postrigardante Katerinan.

Timoteo levis la kapon kaj nur tiam rimarkis Katerinan.

– Kiu donis la spliton al ŝi?

– Ŝi mem prenis, – malkontente respondis la sama ĉarpentisto: la juna kaj malsperta mastro evidente ne sciis la kutimon, laŭ kiu ĉarpentistoj rajtas doni lignerojn laŭ sia propra konsidero.

Pro la fuŝita solivo, pro tio, ke laŭ la voĉnuancoj de la ĉarpentistoj eblis kompreni, ke li diris stultaĵon, Timoteo ekkoleris, kuratingis Katerinan, jam foririntan post la grenejon, kaptis la manikon de ŝia blua bluzo kaj ekscitite kriis:

– Kiu permesis al vi preni la splitojn?

Katerina malrapide movis la ŝultrojn, – ŝia bluzo estis malnova, multloke flikita, malstrikte butonita sur la brusto kaj evidente metita sur la nudan korpon, tial ŝi alpremis la spliton al la brusto kiel la infanon; kaj pro tiu ĉi ŝia movo kvazaŭ io sparkis en Timoteo. Li etendis la manon – li estis senceremonia rilate la virinojn – kaj anstataŭ la spliton, tra la nebutonita breĉo, kaptis ŝian mamon. Katerina, – male al aliaj virinoj – ne ŝrikis, nek svingmoviĝis, kaj ŝiaj piedoj restis firmaj, ŝi kvazaŭ eĉ ne hastis forpuŝi lin, – Katerina nur diris:

– Sufiĉas, – kaj ellasis la ligneron.

La lignero malrapide glitis, pikiĝis en la teron per la pinto kaj antaŭ falo iomete ŝanceliĝis kvazaŭ suspirante. Katerina ŝovis la manojn sub la ŝalon, forturnis sin, kaj subite Timoteo eksentis, ke kun la lignero same glitis lia koro, same pikiĝis, same ŝanceliĝis…

– Iru for, fierulino, – li kriis kaj, frapetante sian boton per la forprenita splito, revenis al la laboro. Sed la splito estis peza, kaj ŝajnis, ke li frapetas sin per ŝtipo.

– Groŝon por riĉiĝo kaj ligneron por bruligo, – moke incitetis lin la sama ĉarpentisto.

Sed Timoteo ne rebatis.

Li provis elekti novan trabon por la solivo, sed subite evidentiĝis, ke la trabaro konsistas nur el marĉaj pinoj – tuberplenaj kaj malsekaj; ke la loko, elektita por la domo, estas dekliva, necesas fosi kaj ebenigi la terenon; ankaŭ la ĉarpentistoj estas pigruloj, ili multe fumas kaj ridas. Li ekdeziris iri hejmen – trinki teon; aŭ eble iri al la rivero – bani sin.

– Li estos pli teda ol lia patro, – la mokema ĉarpentisto diris al lia dorso: – lerta fripono kreskos por nia metiularo.

Kaj ĉiuj ĉarpentistoj konsentis kun lia penso.

La patro kuŝis sur la apudforna kuŝejo[3], kaj kiam la filo eniris, li ekveis, ekĝemis, – por Timoteo estis malagrable vidi lian simuladon. La patro komencis demandi, kiel pasas la ĉarpentado. La bolanta samovaro staris sur la tablo, la fratino plenigis tason por Timoteo kaj almovis la sukeron en la vitra sukerujo, simila al melkositelo. Timoteo ne respondis al la patro kaj skoldis la fratinon:

– Vi kutimas nur trinkegi teon, sed ĝi kostas du arĝentajn rublojn por briketo!

Li venis al la rivero. Sur la transa bordo en la veprejo virinoj intervokis, kolektante ribojn. Li ankaŭ pro tio ekkoleris. Li demetis la boton – por bani sin, – la piedtukoj estis varmaj kaj kunvolviĝis kiel tubetoj, iom simile al la formo de lia kruro. Li pugnofrapis la piedtukon.

La somero estis kalma, aromoplena. Ĉe vesperoj okazis subtilaj pluvoj, kiuj desegnis per gutoj sur la polvo mincan reton; rosoj estis pezaj kaj varmaj; majskaraboj – aromaj melolontoj, flugegantaj vespere, – puŝiĝis, kvazaŭ lude, al la haroj: gratulante okaze de la rikolto. Necesus labori, ĉarpenti en tiu ĉi somero, ĉion plugi, ĉion prikonstrui, la tutan ĉirkaŭaĵon!

Sed Timoteo ekde tiu mateno ne plu vizitis la konstruatan domon. La patro skoldis, skoldis lin kaj venis mem por gvidi la aferon. Timoteo ankaŭ ne deziris plugadi, kaj post la plugado ĉiuj revenis lacaj, ne estis kun kiu drinki, kaj eĉ brandofarado malkreskis. Timoteo ekdeziris promeni en la rivero kun reto, sed kiam li ŝovis la piedon en la akvon, li preskaŭ elvomis.

– Jen kio, – li diris konfuzite, metante la reton sur la varman sablon, – ĉu oni al mi iun malsanon algluis?

Vespere oldulino, kiu kuracis per sorĉado, aspergis lin per akvo sorĉita sur braĝoj, trinkigis al li la Epifanian akvon, sed post tio ne iĝis pli bone. Li eĉ ne plu

povis normale dormi. Li promesis al la sorĉkuracistino lanan jupon, se ŝi nokte kondukos Katerinan al la fojnejo. La oldulino maltrankviliĝis.

– Mi pli bone kondukos al vi Elizabetan, tiu ne estas tiom malgrasa kaj ŝi konsentas. Katerina nenial kuŝiĝos. Mi antaŭ la edzo, ŝi diras, votis; mi nek edziniĝos, nek sub la viron kuŝiĝos. Eble, se promesi al ŝi bonan donacon, ĉu ŝuojn…

Sed ankaŭ al la oldulino Katerina respondis per la sama malklara vorto: “Sufiĉe”, kaj la oldulino, fikse rigardinte al ŝiaj palpebroj, subite ekĉitis, eksvingis la manojn.

Varmego komenciĝis en la ĉielo, varmego estis en la animo. La spikoj estis maturiĝantaj, kaj la aŭroroj estis ebriaj per siaj sateco kaj gajeco, samkiel la grenkampoj.

Timoteo konvinkis la patron aĉeti ĉaron kaj forveturis en la urbon por iĝi veturigisto. Sed evidentiĝis, ke li estas mirinde malbona veturigisto. Kvankam li staris ĉe la plej homamasaj stratanguloj, similaj al tiu apud la verda preĝejeto, simila al korbeto kun fungoj; kvankam la ĉevalo estis sata kaj la ĉaro nova, blue farbita; kvankam li aspektis kvazaŭ brava junulo, – sed venas pasaĝero – ebria stultulo – rigardas al li kaj direktas sin al iu alia. Timoteo neniam alvokis; kolektinte sian enspezon, li direktis sin al bierejo kaj, apoginte la kubutojn sur la tablo, haste trinkis bieron; silente, kiel ĉe la stratangulo – atentante neniun – rigardis al la tabloj. Foje en festa tago li sukcesis enspezi sep rublojn; li kun siaj kunuloj el la luita loĝejo iris en tavernon. Unu el ili, nazparolanta kaj aknoplena, rakontis, kiel li hieraŭ malvirgigis knabinon, kiel ŝi kriegis kaj gratis muron. La aŭskultantoj longe ridegis pro ĉiu vorto.

– Ni gekuŝos ankoraŭ eble du fojojn, kaj iru ŝi for… ŝi estas tro plorema… – la nazvoĉulo finis.

– Sed ĉu vi ne bedaŭros? – Timoteo subite demandis.

– Kion? – la nazparolulo miris.

Timoteo skuis la kapon – kaj postulis glason da vodko… La kunuloj por subteni la kompanon ankaŭ trinkis po unu glason. Post tio Timoteo diris:

– Kaj mi unu… vidvinon pereigis, mi ne deziris edziĝi, kaj ŝi diris al mi: pro kiu estas la sufero, tiu iĝu seka lignero…

Restis nur duonglaso da vodko. Oni komencis diskuti, kion plu trinki – bieron aŭ brandon. Ĉiuj delonge forgesis la vortojn de Timoteo, sed li deziris finrakonti, kial li ne edziĝis, kaj ke ŝiaj vortoj estis nur babilaĵo kaj tuj post ŝiaj vortoj por li komenciĝis vera prospero: li perlaboras multegon, baldaŭ akiros ĉaron kun pneŭmaj radoj…. Li deziris rakonti multon, sed ne sukcesis.

Matene li refreŝigis sin en la sama taverno, lia kapo tuj mirinde klariĝis, kaj li tiel ekgajis, kiel longe ne estis. Li staris ĉe la sama brua stratangulo apud la verda preĝejeto, simila al korbeto kun fungoj. Li vigle ĉirkaŭrigardadis, kaj iu maljunulo en la longbaska surtuto, sentimentale montrante al li, diris al junulino, iranta apud li: “Komercisto Gavrilov, li iam disponis milojn, sed nun jen al kio oni kondukis lin, – veturigisto». Kaj por Timoteo estis agrable, ke oni prenis lin por komercisto. Sed subite de la kukvendisto kun vendokesto ekiris dekstren virino en blua robo. Ŝiaj

facilaj manoj per tiu konata, unika movo kaŝiĝis sub ŝia ŝalo, ankaŭ ŝia paŝmaniero estis unika, malĝoja… Tuj la tuta klareco, kiu flirtis en Timoteo, estis forblovita, kvazaŭ floroj disde eglanterio per vento; la okuloj eksentis pikadon… Li deziris krii, kaptis la kondukilojn, kaj la ĉevalo kvazaŭ rekonis ŝin, – ĝi ĉiam estis kvieta, sed nun ĝi ekkuregis en la homamason! Knabo kun sako estis faligita, la libroj disŝutiĝis, la kukvendisto falis, oldulino en longa griza ŝalo hazarde staris sur lia vojo… Kaj Timoteo kriis, vipegante la ĉevalon: “Haltigu ŝin, haltigu!..” Ruĝvanga milicisto[4] ekfajfis, mem amuziĝante pro la tumulto, kaj pro la fajfado, kaj pro la nekomprenebla okazaĵo.

Oni eskortis Timoteon al la policejo. Li pasigis tie semajnon, poste oni liberigis lin, decidinte ke li estas malsana. La ĉevalo dum tiu semajno malgrasiĝis, kvazaŭ ankaŭ ĝi hontus. Timoteo vendis la ĉevalon, fordrinkis la monon kaj revenis en la vilaĝon en trivitaj ŝuoj. La patro jam entreprenis konstruadon de kvara lignodomo ĉijare, sed li plu estis same timigita. Sur la stoplejoj promenis grasaj anseroj; matene ĉe la riveraj bordoj aperis glacitavolo, kaj la tremoloj tute flaviĝis. Katerina eĉ en siaj pensoj ne vizitis la urbon, ŝi en la sama blua flikita robo paŝis en la vilaĝo, kaj ŝajnis, ke oni donis al ŝi travivi fremdan vivon, do ŝi tiel vivas. Baldaŭ post reveno de Timoteo lupo buĉis ĉevalidon en ilia kampo. Oni senfeligis la ĉevalidon kaj la korpon fortiris en ravinon, en arbustaron. La patro donis al Timoteo ŝrotfusilon, ŝargitan per kugletaĵo, kaj ordonis al li sidi en la arbustaro: eble lupoj, kiuj estas aŭtune agresemaj, malsataj, venos por karnaĵo. Kaj ĝuste, ĉe mateniĝo en la filipendulaj arbustoj en la supra parto de la ravino aperis du lupoj. Timoteo neniam supozis, ke ili havas tiom grandegajn kapojn. Timoteo pafis, la lupoj saltis, kaj unu el ili eklamis. Sed Timoteo enuis kaj deziris dormi. “Mi trovos ĝin morgaŭ”, – li pensis kaj ekiris hejmen. Oni ankoraŭ dormis en la vilaĝo, sed kiam li eniris la straton, jam aperis fumo el la fornotuboj kaj en la malgrandaj fenestroj aperis oranĝaj rebriloj pro la fornoj. Ankaŭ en la fenestro de la dometo de Katerina ekbrilis oranĝa flamo. Timoteo enrigardis. Katerina staris per sia flanko al li kaj estis tiranta kenojn desur la forno. La forno evidente malbone flamiĝis kaj ŝi intencis aldoni kenojn. Kaj Timoteo denove ekvidis ŝiajn brakojn: leĝerajn, blankajn kaj lanugajn, iom similajn al lino. Kiam ŝi tuŝis per ili sian bruston, okazis kvazaŭ fulmobrilado: ne prilumante, sed tremetigante kaj ŝian vizaĝon, kaj la lian. Vidante ŝin, starantan senmove kun la ligneroj… Timoteo eĉ iom kortuŝiĝis. Sed tuj kiam ŝi moviĝis kaj ŝiaj brakoj malleviĝis al la koksoj, kiam aperis la linio de la mamoj, kvazaŭ kruta bordo el nebulo, – Timoteo eksentis honton kaj malagrablegon – kaj pro tio, ke li eĉ intencis edziĝi kun ŝi, sed mankis forto diri tion al la patro kaj al ŝi; kaj pro tio, ke li denove atendis tiun vorton “sufiĉas”, kaj pro tio, ke li, sana kaj ŝajne kuraĝa homo, staras kiel almozulo sub la fenestro, aŭdacante nek eniri, nek eĉ pensi pri tio.

Por liberiĝi de tiuj pensoj, Timoteo abunde kraĉis, kaj kraĉinte eksentis sur la ŝultro pezon de la fusilo. Li prenis kartoĉon kaj ne povis rememori – ĉu ĝi estas kun kugletaĵo aŭ kun ŝroto. “Ne gravas – tri paŝoj”, – li pensis, kaj tiu nekutima

klareco – kiu foje trafis lin sur la stratangulo apud la verda preĝejeto – denove invadis lin.

Li ne murdis ŝin, la pafo trafis ŝian ŝultron. Ŝi kuŝis dum unu monato kaj duono sur benko sub la ŝafpelto, sendita de la patro de Timoteo, – kaj ŝi ne venis en la juĝejon. Timoteo povis nenion klarigi al la juĝistaro – li hontis paroli pri sorĉeco, kvankam li deziris. “Kvazaŭ ligna splito en la koro”, – li diris kaj dismetis la manojn. La juĝo kondamnis Timoteon por unujara mallibero. Plenuminte la aljuĝitan punon, li ne plu revenis en sian vilaĝon. En la prizono li akiris multajn konatojn, komencis vagadi kun novaj konatoj en foiroj, pasigi tempon kun ciganoj en drinkejoj. La vivo ŝajnis facila, nereala, li ĉiam pensis: necesas veni al la patro, profunde klini sin kaj diri, sed kion diri – li mem ankoraŭ ne sciis. Kaj iri al la patro ĉiam mankis tempo, kaj la vestaĵo triviĝis.

Denove estis aŭtuno, matenaj frostoj, la ĉielo kvazaŭ kovriĝis per prujno. Al unu el la foiroj oni venigis de iu loko apud Orenburgo[5] eksterordinarajn argamakojn[6]. La kampuloj lastatempe ekŝatis pursangajn ĉevalojn, la ciganoj proponis al Timoteo aferon. Sed ankaŭ la veterinaroj, alpelintaj la argamakojn, estis spertaj, pli ruzaj ol la ciganoj. La argamakoj staris en stalo, unu el kies muroj estis flanke de malluma strateto. La ciganoj elsegis tabulon. “Rampu”, – senpacience diris al li la plej juna cigano. Timoteo saltis: neeltenebla doloro frapis liajn genuojn, – la veterinaroj metis laŭlonge de la muro lupkaptilojn. Li ekkriis. Ekblinkis lanternoj, iu pafis. Oni longe batis Timoteon per pugnoj, per vipoj, turmente pridemandis, kie estas la ciganoj. Li diris. Tiam oni batis lian flankon per ŝtipo – kaj ĵetis en ravinon, post la rando de la vilaĝo. Likvo de unu el liaj okuloj elfluis, li eklamis – kaj ekcirkulis malbona famo pri li. Nun li eĉ ebria ne pensis reveni al la patro. La ciganoj peladis lin for, lia vestaro eluziĝis, li malsatis, kaj foje uloj el la najbara vilaĝo proponis al li murdi iun homon. Pro la murdo oni promesis feltbotojn, peltjakon kaj konsentis forveturigi lin en la urbon.

– Jen, fraĉjoj, ŝi alkondukis min, fiulino! Jes, mi nepre konsentas! – li kriis. Li ekaŭdis propran voĉon kaj petis vodkon. Oni donis al li duonglason, kaj li, kuŝante sur sledo inter la uloj, blagis al ili pri sia amo al la popa filino: kiel la popo estis pelanta lin, kiel persvadis la vilaganojn elloĝigi lin… La uloj ial ridegis, ĝis ili atingis angulon de granda lignodomo. Ili proponis al li frapi sur la fenestron, voki Ignacon kaj, kiam tiu eliros, enigi tranĉilon en lian ventron. Timoteo do faris tiel. Eliris Ignaco, alta viro simila al popo en longa ŝafpelta palto. Lumis alta kvieta lunarko, kaj la vizaĝo de Ignaco ankaŭ estis kvieta, kaj lia palto ŝajnis blua, kaj la kolumo similis nubaron.

– Ne malhelpu vivi, – Timoteo kriis, batante lin per la tranĉilo.

Tamen la tranĉilo glitis kaj subite ĉio intermiksiĝis en la korpo de Timoteo. Li klare eksentis amaran neĝon en la buŝo, ŝanceliĝantan neĝamason – kaj la lunarko forglitis inter liaj manoj….

Matene oni trovis senvivan Timoteon post la garbejoj ĉe la rivera glacitruo. Lia

kapo estis trabreĉita en tri lokoj, kaj la gingivoj estis tute nudaj kiel ĉe infano. Lia vilaĝo estis je tridek verstoj; oni pensis, ke la patro ne venos, sed li venis en sledo kun helbruna ĉevalparo…. Li rigardis la vizaĝon de la filo, krucosignis lin kaj, kovrinte lin per tuko, ordonis meti lin sur la sledon.

Kaj jen Timoteo la lastan fojon kuŝis hejme, sub ikonoj, en la ĉefĉambro. Kalva preĝeja servisto legis psalmaron, la katino ludis per franĝo de la tablotuko, la fratino de Timoteo preparis funebran tagmanĝon. Ĉio estis trankvila: sen plorego, sen tumultoj.

En la enirejo[7] ĉarpentistoj rabotis la ĉerkon, kaj la mokema ĉarpentisto, kiu iam ĉarpentis kune kun Timoteo la domon por Anfinogenov, moketis la ĵus edziĝintan kamaradon. Multaj venis por adiaŭi la forpasinton. La ĉarpentistoj, por faciligi la iradon, ŝovis en la angulon mielodorajn rabotaĵojn, disŝutiĝintajn tra la tuta enirejo. Ankaŭ Katerina venis. Ŝi faris krucosignon, ordigis la kuprajn monerojn, deglitantajn de la okuloj de Timoteo, kisis lian frunton. La moneroj faris la vizaĝon de Timoteo timigita kaj humila. “Sufiĉas”, – flustris Katerina, kaj ankoraŭfoje krucosignis. En la enirejo ŝi rigardis al la ĉerko. La ĉarpentistoj ripozis, fumis. Forte odoris je tabako. Ŝi firme streĉis node sur la brusto la ŝalon por ĝi ne glitu de la ŝultroj – kaj kiliniĝis al la planko.

Kaj nun neniu malhelpus al ŝi kolekti splitojn.

Tradukis **Ludmila Novikova**

ANDREO KUZJMIĈ

La vento ankoraŭ blovis neĝon en la vizaĝon, kiam Andreon Kuzjmiĉ ĉe la vagono renkontis lia iama sekretario Terjoŝkin. Salutinte, tiu ekiris apude, ĵetante embarasitan rigardon al la kalkanoj de sia kunparolanto. Andreo Kuzjmiĉ scivolis, kiu sendis lin – ĉu la kontoro aŭ la partia ĉelo. La renkontinto respondis fistulvoĉe:

– Kial? Mi ŝajnigis iri al la Popolkomisariato[1] kaj decidis renkonti vin. Fakte, ankaŭ oficiale renkonti estintus konvene…

– Ŝajnigis? – demandis Andreo Kuzjmiĉ. Terjoŝkin, rigardante lin, ekpensis, ke dum unu jaro kaj duono de la ekzilo Andreo Kuzjmiĉ malmulte ŝanĝiĝis – kun la same pintantaj rufaj lipharoj, griziĝintaj en la flankoj, same penetraj blankecaj okuloj, iomete ĝibeca dorso, tamen rivelanta la viron forta kaj fortika. Tamen lia vizaĝo estis kvazaŭ glacieca, kaj liaj kruroj estis pezaj, li paŝis sur la tero kvazaŭ sur ŝipa ŝtupetaro. Fremdulo pensus, ke la homo revenis el ofica vojaĝo.

Andreo Kuzjmiĉ rifuzis veturi en la aŭto proponita de la sekretario. Tiam la

sekretario transdonis al li dosierujon kun raporto pri la agado de la entrepreno dum la du pasintaj jaroj. “Eble vi bonvolos rigardi”, – li diris kaj demandis, rigardante liajn kalkanojn:

– Kiam vi planas reveni al la laboro, Andreo Kuzjmiĉ?

– Morgaŭ.

Andreo Kuzjmiĉ rigardis en lian kvazaŭ bukanitan vizaĝon kaj diris:

– Tamen vi senteble ŝanĝiĝis, Terjoŝkin.

Terjoŝkin iam en sia junaĝo estis erare rekrutita en la floton, de kie, semajnon poste, oni lin redirektis al la ariero. Tamen li ankaŭ nun konsideris sin maristo kaj ŝatis maristajn esprimojn. Malfermante la aŭtopordon, li diris:

– La aĝo, Andreo Kuzjmiĉ. Jam tempas ĵeti la haŭseron porvintre…

Kaj li forveturis.

Andreo Kuzjmiĉ iom staris sur la stacidoma perono, ĝuante vidi la Komsomolan placon[2], stacidoman tumulton, tramojn, flari la odoron de petrolo kaj benzino – kaj la viadukton, kiu kvazaŭ superĉapitra streko simbolis komencon de io nova; li metis en sian valizon la dosierujojn ricevitajn de la sekretario, kaj ekpaŝis piede tra Moskvo.

Li iris laŭ kverstrateto Krivokolennyj[3], kaj jam videbliĝis la malserena unuetaĝa domo, kie li iam loĝis. Li volis telefoni hejmen de la stacidomo, sed la subita apero de lia sekretario malhelpis lin fari tion. Kaj la fakto, ke la sekretario nenion diris pri la familio… tamen tio nenion diris. El la marĉoj Andreo Kuzjmiĉ leteris, sed ĉiuj tri leteroj restis senrespondaj. “Jen mi vizitos kaj foriros, – pensis li, malpliigante siajn paŝojn. – Kaj, entute, ĉu ili plu loĝas ĉi tie?”

“Nu, mia filo ja, – liaj pensoj plu hantis lin, – Griĉjo jam aĝas por armea servo. Sed oni apenaŭ lin prenos, ja lia patro estas malamiko de la popolo[4]. Sed nun mi ja ne plu estas malamiko. Do oni lin prenos”. Andreo Kuzjmiĉ amis la armeon, li ŝatis eĉ la maristajn terminojn de Terjoŝkin. Kaj imagante la teneran vizaĝon de sia filo, konstante revanta pri senĉesa beateco de homoj, ĝuanta sian menson, Andreo Kuzjmiĉ ĝemis. Aĥ, kara Griĉjo! Senĉese vi rigardas penseme kaj kortuŝe, deinfanaĝe konservas tiun senkulpan kaj amuzan mienon, kiu eble nur pligrandiĝis, sed konservis sian infanaĝan esprimon.

Finiĝis la neĝado. La malhele oliveca nubo forvagis malproksimen, post la urborandon. Oni detruis la preĝejon sur la placo, kaj la placo ekaspektis pli strikta tiel malserenigante la nubon. Maloftaj neĝeroj fojfoje refreŝigadis lian vizaĝon. La strateto, glata kaj blueca, kuŝis antaŭ li netuŝite. Kaj li rememoris la marĉojn, ĉe kiuj li longe loĝis kaj tra kiuj li promenadis, sola kaj fremda al ili. La lanternoj ankoraŭ ne estis ŝaltitaj. Li estis paŝanta pli kaj pli malrapide, kvazaŭ li surŝultrigis ion eĉ pli maloportunan.

Antaŭ si li viziis la molan kaj allogan vizaĝon de sia edzino. Ĉu tio okazis je la tria aŭ kvara naskiĝtago de Griĉjo? Flumove ŝi proksimiĝis al fotelo – pro manko de lito li dormis sur du apude starantaj vimenaj foteloj. La vestaĵoj kuŝis sur ŝi glatfalde, kiel sur statuo. La infano dormis. La edzino surgenuiĝis por vidi lian vizaĝon pli

proksime kaj aŭdi lian spiradon. Andreo Kuzjmiĉ sidis ĉe la tablo. Li vidis ŝiajn fratojn malantaŭ ŝi, altajn, perfekte razitajn, en malfajnaj brunaj jakoj. Ili estis teksistoj. El sub iliaj vilaj brovoj radiis tenero kaj fiero. Estis same malvarme kaj neĝblovece kiel nun. La loĝejo ankoraŭ ne estis stukita, li ankoraŭ ne estis ne nur direktoro de la fabriko, sed eĉ ne laborestro, kaj la dikaj traboj kreis por ĉio ĉi ian orumitan kadron, kaj la frostaĵo en la fenestra vitro scintilis arĝentece.

– Ĉi tiun knabon atendas bela vivo, – Andreo Kuzjmiĉ ŝajne diris tiam, je kio la plej aĝa el la fratoj, Nikodemo, superstiĉa kaj basvoĉa, tondre respondis:

– Lasu la panon finbeliĝi, nur poste bruligu la fornon…

Nun el la kamentubo videblis fumo. Io acida kaj densa falis sur lian koron. Li haltis. Li rememoris, ke en tiu lasta horo li staris en la vestiblo. Li prenis ŝnuron kaj serĉis fendilon intencante dispecigi kaj alporti brullignon. Reveninte de la laborejo hejmen antaŭ la tagmanĝo, li kutimis haki lignon por la sekva tago. Sed ĉi-foje la ŝnuro ie perdiĝis. Li staris, enpensiĝinte. En la angulo kuŝis la fendilo – granda hakilo kun platigita dorso, ordinare uzata de Griĉjo por rektigi najlojn eltiritajn el tabuloj… Kaj en tiu momento oni frapis. Andreo Kuzjmiĉ iris al la pordo, pensante, ke tiu estas Griĉjo, kaj levis la hokon…

La hoko klakis. Tra la fenestreto sub la pordo li vidis, ke oni ŝaltis la lumon en la vestiblo. La vizaĝo de Agnija Jegorovna ekbrilis pro tia ĝojo, ke ŝi por momento svenis, kaj li preskaŭ levis ŝin, apogante ŝin je la ŝultroj kaj kondukante ŝin en la kuirejon, de kie oni povis iri en la ĉambrojn. Ŝiajn manojn kovris skvamoj de fiŝoj, kiujn ŝi preparis por kuiri. Al la enirinto ŝajnis, ke ŝia ankoraŭ belega vizaĝo plu portas la neestingiĝintan fajron de junaĝo, tamen ŝajnis ke post unu momento ĝi iĝos senviva. Tiel la lastan fojon la subironta suno prilumas la pejzaĝon precipe neordinare, kvazaŭ lastfoje memorigante pri la beleco de la mondo, antaŭ ŝanĝi la tagon al nokto.

Li staris ĉe la sojlo, demetinte sian nigran ĉapeton. La fiŝoj restis en la pelvo, du el ili ankoraŭ ne estis tranĉitaj.

Ĉio restis sama – la kuriloj en la loĝejo ne ŝanĝiĝis, kvankam nun ili iĝis iel muskecaj, malhelaj. Jen la forno kun fenditaj kaheloj, kvazaŭ kovritaj per araneaĵoj, la bluaj tapetoj en la manĝoĉambro, la kurtenoj – ornamaĵo de burĝeca vivo, eble tro entuziasme uzata. Nu, ni ja ŝatas tiajn belaĵojn en nia vivo.

Li iris en la manĝoĉambron. Griĉjo kutimis dormi sur la sofo ĉi tie. Sur la tablo, apud la telefono, kuŝis volumo de Cooper. Andreo Kuzjmiĉ prenis la libron. “La kratero”[5], – li legis kaj pensis, ke li ne legis ĉi tiun romanon. Agnija Jegorovna, fininte la lavadon, eniris en la ĉambron, viŝante la manojn per tuko, kiun ŝi verŝajne forgesis pendigi.

– Panjo legas ĝin, – ŝi diris. – Nun ŝi loĝas ĉe mi.

– Kiel ŝi diras, “restas fintajlori la vivon”? – rememoris Andreo Kuzjmiĉ.

Li rigardis super la sofon. Ĉi tie pendis gravuraĵo[6] en malhela framo kun maldika rando. Ĝi montris herbejon kun duonnudaj virinoj armitaj per pafarkoj, pikiloj kaj torĉoj, kaj knabojn kun la binditaj okuloj batalantajn inter si. Dekstre duonviro-

duonkapro kun kaprokruroj trenis unu el la virinoj je la haroj. Maldekstre, proksime de la arbo, sur kiu pendis ŝildo kun ia figuro, staris alta virino vertikalpoze celante per sia lanco la knabojn. Kelkaj aliaj knaboj ĝenis virinon kuŝantan.

En stranga maniero ĉi tiu gravuraĵo trafis lin! Estis oktobro[7]. Damaĝita disrabita domego sen la fuĝintaj kadetoj. Andreo Kuzjmiĉ ŝtorme enrompiĝas. Sur la planko kuŝas ĝi, desegnaĵo bajonete trapikita en angulo. Li prenis ĝin kaj donis al la komandanto. Duonhoron poste la komandanto estis mortigita, kaj li surprenis la komandon. Li portis la pentraĵon, la nuran aĵon restintan de la detruo, al la distrikta soveto. Tie oni diris al li, ke li alportu ĝin morgaŭ, ĉar nun mankas tempo por pentraĵoj. La sekvintan tagon li estis okupata senarmigante oficirojn en Podolsk, unu semajnon poste li batalis ie apud Ĥarkovo, kaj la pentraĵo restis stari en la vestiblo, kovrite de polvo, ĝis du jarojn poste li prenis ĝin. Sed kiam li finfine alportis ĝin al la oficejo pri popolklerigo, oni petis lin prezenti akompanajn dokumentojn, notis lian adreson, diris, ke oni sendos kurieron, sed venis neniu. Li denove forgesis pri ĝi. Kiam li revenis de la intercivitana milito, iu pendigis ĝin sur la muron.

Do li ekklopodis deĉifri ĝin. Li studis. Kiam li jam fariĝis direktoro de fabriko, li jam sciis, ke tiu estas ne pentraĵo, sed gravuraĵo, ke la duonnudaj virinoj nomiĝas nimfoj, la knaboj – kupidoj, kaj ke la altstatura virino simila al lia edzino, Agnija Jegorovna, nomiĝas Minervo kaj ke la tuta gravuraĵo bildigas la lukton de pasioj kontraŭ ĉasteco. Plej malfacile estis ekscii, kiu estas Minervo. Tiu estis filino de Jupitero. Diino de milito kaj artoj. Minervo disputis kun Neptuno pri tio, kiu el ili povas produkti aĵojn por homoj pli bone kaj pli utile. Neptuno frapis la teron per sia tridento. Eliris vigla ĉevalo, bildo de maltrankvilo kaj milito. Tiam Minervo frapis. Eliris olearbo – signo de paco. Sur ŝia kasko estas strigo, ĉar tiu birdo vidas en mallumo, kio signas saĝon…

– Nu, kiel vi, Andreo Kuzjmiĉ, ĉu definitive? – demandis la edzino.

– Definitive.

– Kio do okazis?

– Oni implikis min en kazon per falsa akuzo, – li respondis skize, kaj estis klare, ke pli li ne emas, nek havas intereson rakonti, same kiel retiriĝantaj soldatoj ne ŝatas paroli pri sia malvenko.

La lampo el sub la lampoŝirmilo ĵetis bildon en formo de rikoltilo sur la tablon. La edzino forpaŝis kaj sidiĝis sur la sofo. Ŝia malklara vizaĝo apenaŭ brilis. Ŝiaj okuloj ŝajnis pene vidi, kaj ke ŝi apenaŭ povis distingi tagon de nokto.

– Amare, domaĝe, – aŭdiĝis de tie.

– Jes ja, suferiga aventuro travivita: patra pipro, patrina mustardo, – Andreo Kuzjmiĉ respondis rikane, kaj io brula, absinteca plenigis lian buŝon, kaj, por certigi sian vivon kiel bordodeklivon per fostoj, li petis: – Eble vi rakontu…

Ŝi kliniĝis antaŭen. La lumo pliheligis ŝiajn malsekajn, sed iel malprofundajn, ŝlimecajn okulojn. Ŝi parolis mallaŭte, sed tio estis la distanco[8], je kiu aŭdeblas la homa voĉo.

Li rememoris la somerdomon. Jen li iras al la sabla bordo. Virino en blanka robo kombas siajn harojn. Estas ŝi. La spikoj trumpetas venkon. Iom fore, tri viraj figuroj, fortikaj kaj altaj, eliras el la rivero. Tremolo falinta de la deklivo kun la radikoj elgrundiĝintaj renverse. Estas ankoraŭ somero, sed ĝiaj folioj jam oriĝas. Li turnas sin, kaj antaŭ li estas la blua rivero, ĉiam falanta surprize sur lian koron, kiel pafo el la brusto. La virino abrupte sin turnas, dum li kuras. Estas ŝi. Li ekkuras, plonĝas en la bluan riveron kaj naĝas. Same kiel feraj hokoj, enigitaj en la masonaĵon, plifortigas la konstruaĵon, tiel lia vivo estis harmonia kaj admirinda!

– Ŝtono estas pli densa ol spongo, – li diris, rikanridetante, – oro estas pli densa ol kupro. Kaj homo estas pli densa ol ĉiuj tiuj…

Liaj vortoj tamen ne estis tiel fortaj kiel antaŭe, kaj ŝi ekparolis malrapide, kvazaŭ puŝante ian pezon dekliven:

– Somero for, kio poste?..

Li paŭzis kaj daŭrigis rakonti sian simplan historion. Nu, iel ni trasomerumis… Ŝi mem, Agnija Jegorovna, estas konfesinde, pridubis la honestecon de sia edzo…

– Kaj Griĉjo?

– Griĉjo ne plu. Li kredis je vi.

Ŝi daŭrigis: ŝi mem montriĝis virino naiva – serĉis protekton. Preskaŭ ĉiuj partianoj forturnis sin de ŝi, iuj helpis, sed ŝi ne plu volis ĝeni ilin. Sed, ĉar Griĉjo kredis, ankaŭ ŝi volis konservi, se la edzo revenos, ne fordoni, la loĝejon. Ja ankaŭ la filo bezonus ĝin. Laŭ ŝia tiama kompreno, ne ekzistis alia estro pli grava por ŝi ol la domadministranto. Tiu ekfrekventis ŝin, komencis paroli… Ŝi rigardis lin per suferaj okuloj:

– Mi scias, pri kio oni parolas, – diris Andreo Kuzjmiĉ, deturniĝinte.

– Mi ja ne prisilentas lin, – diris Agnija Jegorovna. – Ankaŭ li havis malfacilan vivon: lia edzino suferis per ftizo, unu ido mense malforta, la knaboj frenezetaj. Do mi kompatis lin. Ankaŭ min mem, kial kaŝi tion.

– Kial do kaŝi tion? – diris Andreo Kuzjmiĉ.

Sed la domadministranton oni baldaŭ elpostenigis, ĉar li estis disŝirata inter sia maleblo, kiel montriĝis, forlasi siajn infanon kaj ftizan edzinon, kaj li vidis Griĉjon malami lin, kaj li du- aŭ trifoje drinkegis senespere pro la malĝojo, kaj oni lin maldungis. Li forloĝiĝis ien apud Mitiŝĉi, neniam reaperonte. Ankaŭ ŝi ne serĉis lin. Alia domadministranto aperis – nejuna, solida viro, kaj diris, ke oni parolas diversaĵojn, sed li timas, ke oni trouzis sian aŭtoritaton, kaj ke la domadministranto nenion povis fari pri la loĝejo, kaj li diris: “Ĉu li ne premis vin per io? Ja ĉion pri la afero necesas klarigi?” Kaj al ŝi iĝis tiel malfacile, ke ŝia kapo falis sur la ŝultron de tiu grizharulo kaj ploris amare. La maljunulo karesis ŝian kapon kaj diris, ke li kompatas ŝin, kaj li certe kompatis ŝin. Ekde tiam ŝi ne vidis lin, krom kiam ŝi bezonis pagi la loĝejon, do ŝi pagis, sed iel fariĝis pli leĝere kaj pli hele en ilia korto, kvankam la maljunulo nenion aparte deklaris, eble nur unufoje venis kun peto retajpi ion el la gazeto de la unua de majo – ŝi tiam laboris en trusto.

Ŝi paŭzis kaj denove levis la okulojn ekbrilintajn kiel antaŭe – per sunsubiro, kaj la malhela vizaĝo reaperis. Ŝi viŝis siajn larmojn.

– Necesas diri ĉion, – ŝi ripetis kaj daŭrigis.

Komenciĝis la milito kontraŭ la blankaj finnoj[9]. Griĉjo oficis en kooperativo kiel stakisto. Li estis tre kontenta, kiam oni lin mobilizis:

– Do mi ne estas filo de malamiko de la popolo? La veraj malamikoj de la popolo estas tiuj, kiuj pro nenio mortpafis mian patron. Kaj la honoro de la patro estas restarigota. Lia filo daŭrigos lian aferon…

Arda knabo.

– Jes ja, la knabo estas arda. Ĉu li leteras?

– Delonge ne leteris… – diris Agnija Jegorovna kaj, metinte la manojn sur la genuojn, rigardis flanken tra la fenestro.

La koro de Andreo Kuzjmiĉ haltis eksterkutime. Lia tuta turmento, kiun li sentis tiel malklare kaj neformite, nun subite transformiĝis en tiom turmentan kordoloron, ke li ekstaris kaj faris kelkajn paŝojn. Naŭzo leviĝis en la gorĝo. Ankaŭ Agnija Jegorovna ekstaris, kaj tiel ili, sen rimarki tion, paŝadis, ĉiu sur sia flanko de la tablo.

– Ĉu estas li, kiu legas ĉi tion? – li demandis, finfine preninte la libron de Cooper.

– Ne. La libro estas lia, sed estas panjo, kiu ĝin legas.

Tiumomente sonis la porda sonorilo. Venis panjo. Timigite, sen demeti sian malnovmodan ĉapeleton, ŝi ĵetis rigardon en la ĉambron kaj komencis fari ion en la kuirejo. Agnija Jegorovna turnis sin al Andreo Kuzjmiĉ, movis la lipojn, kaj eble estis dironta ion, kaj laŭ ŝiaj lipoj eblis kompreni – “Necesas diri ĉion”. Li kapjesis.

Ŝi iris al la malalta komodo, sur kiu staris radio, iam infanaĝe konstruita de Griĉjo, malfermis ĝin kaj transdonis al li poŝtan pakaĵon. La pakaĵo ne estis malfermita. El sub la pakaĵo ŝi prenis paketon el malglata blueta papero kun la adreso skribita per inko jam neklare videbla. La buroo de perdo-agentejo de la armea komisariato informis pri la heroa morto de G. A. Kravcov en batalo kontraŭ la blankaj finnoj.

Andreo Kuzjmiĉ, peze paŝinte, aliris la fenestron kaj fiksrigardis la glacian ornamaĵon daŭre restantan ne degelanta. Li metis sian manon sur la vitron, kiu malrapide adaptis la desegnitan vualon al la formo de liaj fingroj.

La edzino revenis al la sofo. Aŭdiĝis akva plaŭdado, evidente la maljunulino senskvamigis la fiŝojn, klopodante ne tro brui. La kuireja pendolhorloĝo tiktakis, fojfoje intermiksiĝante sone kun la plaŭdado.

Subite li turnis sin:

– Kial vi hodiaŭ ne hejtis la fornojn? Ĉu mankas brulligno?

– Ne mankas. Kutime ni ekhejtas pli malfrue, por ke matene ni ellitiĝu en varmo.

Li iris en la vestiblon kaj bruligis la lampon. Lia edzino time kaj alarmite sekvis lin. La ŝnuro pendis sur la ligna hoko. Li prenis ĝin, poste la fendilegon kun la splite disbatita dorso. La edzino eliris sur peronon, ne aŭdacante ion diri.

Ŝi ŝajne frapis la pordon tiel forte pro sia alarmo, ke tuj malfermiĝis kelkaj pordoj. La najbaroj jam sciis pri la reveno de Andreo Kuzjmiĉ. Iuj estis rigardantaj tra la

fenestroj, dum iuj aliaj simple staris sur la peronoj. La korta lanterno lumis. Li iris al la tenejo kaj malfermis ĝin. La homoj senpacience atendis, ke la edzino sin ĵetu al la tenejo kriante. Sed de tie aŭdiĝis sonoj de fendataj ŝtipoj, kaj baldaŭ aperis Andreo Kuzjmiĉ mem, portanta faskon da fajne hakita brulligno sur ŝnurego, kun la fendilo enmane, kaj kiam li preterpasis la lanternon, ĉiuj rimarkis, ke li ne multe ŝanĝiĝis, nur lia paŝmaniero iĝis pli peza kaj pli delikata, ofteca, kvazaŭ liaj gamboj estus el argilo.

Sed Andreo Kuzjmiĉ pensis, ke nepre necesas forporti la gravuraĵon, kaj cetere ekscii la nomon de la pentristo, kiu aŭtoris ĉi tiun gravuraĵon.

Tradukis **V. S. Neminem**

Notoj

La kornaĵo

La kornaĵo (Рогулька) aperis la 20an de aprilo 1919 en la Kurgana ĵurnalo *Zemlja i Trud* (Tero kaj laboro) kun la titolo *La kornaĵoj*, poste en la samtitola libro *La kornaĵoj*, kaŝe kompostita kaj presita en la redakcio-presejo de la blankarmea ĵurnalo *Vperjod* (Antaŭen). La redaktita teksto kun la titolo *Akvaj nuksoj* aperis en la Moskva revuo *Ogonjok* (*Fajreto*, 1924, №18) kaj, fine, en la novelaro *La Neĵinskaj kukumoj* (1926) kun la definitiva titolo *La kornaĵo.*

1. Ljonjka (Лёнька). Unu el la familiaraj formoj de la nomo Leonid (Леонид); ĝi havas iom pejorativan nuancon.

2. Irtiŝo (Иртыш). Longa (4248 km) Azia rivero, komenciĝanta en Ŝinĝjango (Ujgura aŭtonoma regiono en Ĉinio), fluanta tra Kazaĥstano kaj Ruslando, kaj alfluanta al Obo ĉe la urbo Ĥanty-Mansijsk. Irtiŝo estas ofte menciata en verkoj de Ivanov, kiu naskiĝis en Lebjaĵje sur la dekstra (orienta) bordo de Irtiŝo.

La bebo

La bebo (Дитё) aperis en la novelaro de Ivanov *La valoj* (1922); ĝi estis kelkfoje reeldonita, sed post la publikigo en la novelaro *La sovaĝaj homoj* (1934) ĝi estis malpermesita kaj denove publikigita nur en 1990. En 1992 aperis la filmo *La bebo* (Дитя) de Viktor Titov (reĝisoro kaj scenaristo).

1. Irtiŝo. Vd. la 2an noton por *La kornaĵo.*

2. Kirgizoj. En Ruslanda Imperio kaj en frua Sovetunio kazaĥoj estis nomataj kirgizokajsakoj, aŭ simple kirgizoj. Ekde 1925 oni komencis distingi la du proksimajn popolojn: kazaĥoj kaj kirgizoj. En *La bebo* ĉe Irtiŝo tiutempe nomadis la orientaj triboj de la “meza hordo”, plejparte, najmanoj. Pro la ofensivo de la blanka armeo en 1918-19 la ruĝarmeanoj kaj kazaĥaj nomadoj retiriĝis sud-orienten al Mongolio.

3. … pro la rusa milito. Ruslanda interna milito (1917-23).

4. Donaj vilaĝoj. Kozakaj vilaĝoj en la Dona regiono.

5. Ĉiuj eligis el la botoj grandajn Semipalatinskajn kulerojn. Partizanoj, same kiel Ruslandaj armeanoj, kutime portis siajn proprajn kulerojn (ne la malbonkvalitajn armeajn) en botokrurumoj. Semipalatinsk (nun Semej en Kazaĥstano) estis centro de granda regiono ĉirkaŭ Irtiŝo.

6. Sterkopajlaĵo (кизяк). Kutima nomada hejtaĵo en senarbaj regionoj. Blokoj da ŝafaj kaj/aŭ kapraj ekskrementoj miksitaj kun pajlo kaj sekigitaj.

7. Ni kirek. Kripligita kazaĥa-kirgiza demando: “Ne kerek?” – Kio bezonatas?

8. Vasjka (Васька). Unu el la formoj de la nomo Vasilij (Василий), Bazilĉjo.

La kampo

La kampo (Поле) aperis en la dusemajna Odesa revuo *Ŝkval* (La skualo), 1925, №19), poste en la novelaro *La sekreto de sekretoj* (1926).

1. Kolĉak, Aleksandr Vasiljevitĉ (Колчак, 1874-1920), rusa oceanologo, marармea oficiro kaj politikisto, admiralo, la ĉefa gvidanto de la kontraŭrevolucia blanka movado dum la interna milito en Ruslando. La registaro de Kolĉak nuligis la leĝon pri la ŝtata reguligo de prezoj de nutraĵoj, kiu estis tre malavantaĝa por la kamparanoj, kaj permesis liberan prezformiĝon.

2. … dum la sankta tempo. Dum la Paska semajno. En 1920 la rusortodoksa Pasko okazis la 29an de marto (Gregorie, la 11an de aprilo), do temas pri mezo de aprilo.

3. Kumunio (кумуния). Kripligita vorto por *коммуна*. Tiuj agrikulturaj komunumoj estis fonditaj en la komencaj jaroj de la bolŝevista Ruslando, sed ili ne populariĝis pro la egala enspezo por ĉiu komunumano, sendepende de la kvanto de farita laboro.

4. Kolomno (Коломна). Malnova rusa urbo je ĉ. 100 km sudoriente de Moskvo. En Kolomno estis produktataj bonkvalitaj silkaj tablotukoj.

5. Brika teo (кирпичный чай, плиточный чай). Nigra aŭ verda teo, produktita el malbonkvalita materialo kaj kunpremita; ĝi estis vendata en la formo de brik(et)oj.

6. Milicisto (милиционер). Dum la Sovetia tempo polico estis nomata milico; ne konfuzu kun la Esperanta milico/milicio: “Nekonstanta militistaro el civitanoj, ordinare volontuloj por la defendo de la nacia teritorio” (ruse: ополчение).

La vivo de Smokotinin

La vivo de Smokotinin (Жизнь Смокотинина) aperis la 14an de marto 1926 en la taĝĵurnalo *Krasnaja gazeta* (La ruĝa ĵurnalo), kun la titolo *La sekreto de sekretoj* (laŭ la latina traduko *Secretum Secretorum* de malnova araba verko, erare misatribuata al Aristotelo), poste en la Ĥarkova revuo *Plamja* (Flamo, 1926, №3) kun la titolo *La lignosplito*. Kun la definitiva titolo *La vivo de Smokotinin* ĝi estis publikigita en la novelaro *La sekreto de sekretoj* (1926).

1. Zlatoust (Златоуст). Urala urbo en Ĉeljabinska regiono, en kiu estis pro-

duktataj bonkvalitaj blankaj armiloj kaj diversaj metalaj instrumentoj.

2. Lignosplito (щепа). Iom longa lignopeco (en la rakonto ĉirkaŭ unumetra), kiu rezultas, kiam oni faras trabon el trunko, do peco de trunkoranda tabulo kun ŝelo unuflanke ne uzebla ĉe domkonstruado.

3. … apudforna kuŝejo (голбец). En la tradicia rusa domo: apudforna benko, kvazaŭ ŝtupo por supreniĝi al la surforna kuŝejo; kutime apud ĝi estis luko al la neloĝata teretaĝo. Dum la tago sur ĝi povis ripozi maljunaj aŭ malsanaj familianoj.

4. Milicisto. Vidu la 6an noton en *La kampo.*

5. Orenburgo (Оренбург). Urbo, kiu dum 1920-25 estis la ĉefurbo de la granda Kirgiza Aŭtonoma Socialisma Soveta Respubliko en RSFSR, kiu en 1925 estis transformita al Kazaĥia ASSR, kaj Orenburgo iĝis centro de pli malgranda regiono en RSFSR.

6. Argamako (аргамак). Multekosta purrasa rajdĉevalo.

7. Enirejo (сени). Nehejtata kaj neloĝata kromkonstruaĵo ĉe la tradicia rusa domo, kiu troviĝas inter la domo mem kaj la sojlo. Forme simila al la Eŭropa verando, la enirejo servas ne por somera manĝado aŭ ripozado, sed por konservado de varmo en la domo vintre, ĉar oni eniras de ekstere ne rekte en la domon, sed unue en la enirejon, poste fermas ties enirpordon, demetas la suprajn vestojn kaj feltbotojn, kaj eniras en la antaŭĉambron (foje en la kuirejon) de la loĝdomo. Kutime en la enirejo estas vestohokoj, instrumentujoj, neĝŝoveliloj ktp.

Andreo Kuzjmiĉ

Andreo Kuzjmiĉ (Андрей Кузьмич) estis finverkita la 6an de junio 1940, sed ne publikigita dum la vivo de la aŭtoro. Ĝi estis unuafoje eldonita nur en 2010. Ivanov hezitis pri la titolo kaj havis du versiojn: *Andreo Kuzjmiĉ* kaj *Minervo kaj Neptuno*, ĉi tie ni uzis la unuan.

1. Popolkomisariato (наркомат, mallongigo de народный комиссариат). Oficiala nomo de ministerio en Sovetunio ĝis 1946.

2. Komsomola placo (Комсомольская площадь). Moskva placo kun tri stacidomoj: Leningrada, Jaroslavlja kaj Kazana. Ĝis 1933 la placo estis nomata Kalanĉovskaja, t. e. Fajrotura.

3. Krivokolennyj (Кривоколенный переулок). S-forma strateto ĉe la strato Mjasnickaja en la centro de Moskvo; pro la stranga formo de la strateto oni nomis ĝin Krivokolennyj, t. e. Kurbagenua.

4. Malamiko de la popolo (враг народа; latine: hostis publicus, hostis populi). En Sovetunio ĉi tiu termino eĉ estis menciita en la 131a artikolo de la Konstitucio de USSR (1936): “Malamikoj de la popolo estas personoj, kiuj atencas la komunan, socialisman proprietaĵon”.

5. “La kratero”. *The Crater; Or, Vulcan’s Peak: A Tale of the Pacific* (1847) de James Fenimore Cooper.

6. Ĉi tie pendis gravuraĵo… Probable temas pri la gravuraĵo “La diskuto inter

Ateno kaj Pozidono” (1543) de Antonio Fantuzzi.

7. Estis oktobro. Laŭ la Julia kalendaro la bolŝevista revolucio okazis la 25an de oktobro 1917, sed, ĉar la bolŝevistoj ŝanĝis la Julian kalendaron al la Gregoria, ĝi estas festata la 7an de novembro.

8. … tio estis la distanco. En la manuskripto inter “estis” kaj “distanco” estas nelegebla vorto, probable temas pri “la maksimuma distanco”.

9. Komenciĝis la milito kontraŭ la blankaj finnoj. La Sovetunia-Finnlanda milito komenciĝis la 30an de novembro 1939 kaj finiĝis la 12an de marto 1940.

Aleksander Korĵenkov

Rusa novelaro 2. Jam aperis:

1. Ivan Bunin. En bieneto. Facila spirado. Sunfrapo. En Parizo. “Madrido” (Tr. A. Korĵenkov). LOdE, 2022, №1.

2. Aleksandr Kuprin. Siringo. Viando. Helenjo. Nokta violo (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LOdE, 2022, №2.

3. Maksim Gorjkij. Foje en aŭtuno. La naskiĝo de homo. Helgriza kaj lazura. La gvidisto (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LOdE, 2022, №3.

4. Fjodor Sologub. La belo. Transformiĝoj. La reĝino de kisoj. Traserĉo. La vojo al Emaus. La fianĉino de Judaso (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LOdE, 2022, №4.

5. Leonid Andrejev. La anĝeleto. Silento. La abismo. El rakonto, kiu neniam estos finita (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LOdE, 2023, №1.

6. Ivan Ŝmeljov. La febro. La oveto. La mirakla bileto. La eterna lumo. La agrabla promeno (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LOdE, 2023, №2.

7. Aleksej N. Tolstoj. La morto de la familio Nalymov. La inkmakulo. Nataŝa. Manjo. La kunloĝanto (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LOdE, 2023, №3.

8. Vladimir Nabokov. La vorto. Kristnasko. Fabelo. Razilo. Teruro. Nubo, lago, turo (Tr. A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LOdE, 2023, №4.

9. Aleksandr Grin. La pilorio. Nokte kaj tage. La parolema koboldo. La edziĝo de Aŭgusto Esborn. La akvarelo. La komandanto de l’ haveno (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LOdE, 2024, №1.

10. Miĥail Bulgakov. La ruĝa krono. La ĥana fajro. La blizardo. Estis majo (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LOdE, 2024, №2.

11. Vsevolod Ivanov. La kornaĵo. La bebo. La kampo. La vivo de Smokotinin. Andrej Kuzjmiĉ (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. S. Neminem). LOdE, 2024, №3.

Abstino

de Paulo Sergio Viana

Je la sunsubiro de mildvetera lundo, s-ro Breno subite blindiĝis. Li sentis strangan malkomforton en la maldekstra okulo, kaj en la daŭro de kelkaj sekundoj malleviĝis antaŭ lia rigardo peza, griza vualo, kiu kaŝis de lia vido ĉion. Absolute ĉion. Restis al li, de unu momento al alia, nur la dekstra okulo, kiu jam de longa tempo estis tre malsana, tiel ke li jam povis vidi ankaŭ per ĝi preskaŭ nenion: nek mienon de homo, nek figuron de besto, nek detalon de objekto, nek literojn sur libropaĝo. Unuvorte: en la lastaj horoj de tiu absurda lundo, s-ro Breno fariĝis preskaŭ tute blinda.

Li trenis sin al sia preferata fotelo en la vizitĉambro, por ordigi la pensojn. Kio okazis? Kia subita malsano atakis lin? Alproksimiĝis paniko. Ne, s-ro Breno, ĉiam memfida kaj racia homo, ne permesos al si invadon de paniko. Ĝi estas malsano, kiu postulas flegadon. Ni serĉu la medicinon, kiu certe solvos la problemon.

S-ro Breno ne tute trankviliĝis per ĉi tiu penso, sed sufiĉe por voki la filinon, kiu loĝas kun li. Ni iru al la sukurejo. Kaj li per serena voĉo lakone informis al ŝi pri tio, kio ĵus okazis. Ankaŭ ŝi ne panikis, sed rapide pretigis sin por irado al la sanservo.

Tie, la kuracisto estis ĝenerala klinikisto. Li tuj alvokis fakulon. Alvenis juna okulkuracisto, kiu aŭdis la informojn de la paciento, ekzamenis liajn okulojn per lanternetoj kaj trankvile sentencis:

— Temas pri hemoragio interne de la okulo. Venu morgaŭ al mia konsultejo por pli detala ekzamenado per aparatoj.

Li receptis gutojn kaj rekomendis absolutan ripozon kun la kapo pli alta ol la trunko. La sekvan matenon, s-ro Breno kaj lia filino iris al la fakula konsultejo. Post pluraj manovroj, li konfirmis la diagnozon.

— Ĉu mia vidado revenos? — nun lia voĉo iom tremis.

— Probable, jes. Sed tio postulos tempon, eble unu, eble du monatojn.

S-ro Breno kuntiris la brovojn.

— Probable? Ĉu vi ne estas certa pri tio?

— Certeco apartenas al dioj, ne al medicino, kara sinjoro. Mi povas nur diri: probable jes. Se tiu sango, kiu akumuliĝis en via maldekstra okulo ne malaperos pro la naturaj fortoj de via korpo, tiam ni devos operacii por forigi ĝin.

Kaj li signis senvorte, ke la konsulto finiĝis, por hodiaŭ. Li revenu post du semajnoj, por kontrolo.

* * *

S-ro Breno revenis al sia fotelo. Kion fari nun? Li ne povas iri sola el la hejmo, ne povas spekti televidon, komputilumi, ekzameni homajn mienojn. Sed ĉio tio ne tre gravas. Gravas vere, ke li ne povas legi siajn librojn. Jen tragedio. De multaj jaroj li legas multajn paĝojn ĉiutage, senescepte. Li povas vivi sen bifstekoj, sen lakto kaj sen pano; li povas vivi sen baniĝo, sen komforta lito, sen homaj mienoj antaŭ si, eĉ sen sia preferata fotelo; sed ne eblas vivi sen libroj, nome sen legado de libro. Kion fari?

Pasis du, tri tagoj, kaj s-ro Breno ŝtoniĝis sur sia fotelo. Li apenaŭ manĝetis, apenaŭ trinketis akvon, lia mieno esprimis absolutan senesperon. De tempo al tempo li klopodis rememori soneton de amata poeto, penson de admirata eseisto, proverbon, citaĵon el klasika romano. Iom post iom lia memorkapablo komencis konfuziĝi.

La filino maltrankviliĝis. Li per malforta voĉo apenaŭ respondis banalajn demandojn. S-ro Breno malsaniĝis ne nur je la okuloj, sed ankaŭ (kaj precipe) je literaturabstino. Ne utilas denove alvoki kuraciston. Ne ekzistas tiu fako en la medicina kadro. La filino enpensiĝis, kaj per sia tipa ina intuicio ekhavis ideon.

— Se vi povus, kiun libron vi volus nun legi, paĉjo?

— Iun ajn, — li ne povis pli klare indiki.

Tio sufiĉis. La sekvan tagon, tuj post la magra matenmanĝo, la tintilo sonis kaj envenis vizitanto. Li estis dudekjara junulo, iom hontema kaj hezitema. La filino lin prezentis:

— Paĉjo, ĉi tiu estas Luko, studento de literaturo. Mi petis lin elekti libron por laŭtlegado. Li venos ĉiutage post la matenmanĝo, kaj legos por vi dum unu horo.

Malantaŭ siaj nefunkciantaj okuloj s-ro Breno mienis surprizita. Sekvis nelongaj salutoj, Luko eksidis apud sia kliento kaj anoncis la titolon kaj la aŭtoron. S-ro Breno entuziasme rektiĝis sur la seĝo:

— Mi jam legis tiun libron!

— Nu, mi bedaŭras. Ĉu vi volas, ke mi elektu alian?

— Tute ne, kara junulo! Mi legis ĝin antaŭ multaj jaroj, kaj efektive ne bone memoras la enhavon. Estos bone relegi ĝin. Sciu: dua legado estas ĉiam pli bona ol unua. Ni komencu.

* * *

Komence la hontema Luko legis iom meĥanike, iom senesprime. s-ro Breno amuziĝis kaj provokis lin:

— He junulo, tiu teksto ne estas burokratia raporto pri la agado de la urbestro dum la pasinta mandato. Ĝi estas romano! Plena de sentoj, konfliktoj, duboj, pasioj, suferoj kaj ĝuoj. Bonvolu legi kvazaŭ vi vivus en ĝi!

Kaj la maljunulo eligis tiel bonhumoran ridegon, ke la junulo ne povis ankaŭ ne ridi. Kaj iom post iom li kolorigis la frazojn per emfazoj, laŭtigoj kaj mallaŭtigoj de la voĉo, eĉ per grimacetoj. S-ro Breno vigle aplaŭdis. Tiel la du novaj amikoj travivis matenojn plenajn de fantazio kaj interna, mensa kreado de scenoj. Tute nova sperto, kaj por la junulo, kaj por la maljunulo. Laŭgrade kiel la rakonto progresis, ili des pli vigle sekvis ĝin. La pohoraj kunsidoj foje prokrastiĝis je kelkaj minutoj, sed la filino ne permesis, ke ili malobeu la kontrakton: nepre po nur unu horo en ĉiu mateno! Tiel ili bonapetite atendos la sekvan matenon.

Tamen, la legado ne rapide progresis, ĉar ofte la blindulo petis, ke la leganto ripetu fragmenton, foje tutan paĝon, foje tutan ĉapitron.

— Kial vi petas, ke mi relegu? — la junulo demandis. — Ĉu mi ne legas sufiĉe klare?

— Ne temas pri tio, Luĉjo! Vi legas bonege, vi eĉ povus fariĝi aktoro… Tamen, kelkaj fragmentoj en tiu verko estas tiel brilaj, ke oni devas relegi, por kapti la tutan arton de la verkisto. Dum la unua legado mi komprenas nur la faktojn. Dum la dua, mi ĝuas la manieron, kiel li sukcesis meti ĝin sur la paperon. La zorge elektitajn vortojn, la zorge kunmetitajn frazojn, la ritmon de la teksto, la efikon de psikologiaj indikoj inter la linioj. Notu ĉi tion: klasika verko neniam finiĝas, eĉ se oni relegas ĝin multfoje. Temas pri magio.

Okazis ankaŭ, ke Luko iam kaj iam stumblis ĉe iuj malpli ordinaraj vortoj. La sperta aŭskultanto tuj kaptis la problemon: la junulo ne konis tiun vorton.

— Luko, ĉu vi povas diri al mi, kion signifas tiu vorto, pri kiu vi ĵus hezitis?

La junulo iom honte konfesis, ke li ne scias.

— Kaj ĉu vi intencis daŭrigi la legadon sen esploro pri ĝia signifo? Ho, tio estas grava eraro, mia kara! Ne nur eraro, sed malrespekto al la aŭtoro. Neniam transsaltu vorton en legata teksto, kies signifon vi ne scias. Por tio ekzistas niaj amikoj, la vortaroj. Krome, estas vera plezuro lerni novan vorton! Simile kiel kiam vi trovas monbileton sur la trotuaro…

Luko denove ne povis eviti ridon. Kaj ili iris al la vortaro, tute bonhumore.

Tiel fluis la matenoj de s-ro Breno, kiu pasigis la ceteron de la tagoj meditante pri la aŭdita hodiaŭa fragmento. Lia plezuro estis trovi kaŝitajn intencojn de la subtila verkisto. La sekvan matenon, li tion fiere montris al Luko, kiu ĉiam miris pri la mensa kapablo de la maljunulo.

Post du semajnoj, la blindulo revenis al la okulkuracisto. Iom da lumo malrapide sin anoncis antaŭ lia maldekstra okulo. Li ankoraŭ ne distingis la figurojn antaŭ si, sed la griza vualo jam iomete klariĝis. La doktoro transdonis esperon:

— Verŝajne via pigra okulo vekiĝas, sinjoro.

Pasis kvardek tagoj post la tragika lundo. Nun s-ro Breno jam povis rekoni homojn kaj mienojn, ekzameni la ĉielon kaj eĉ distingi literojn sur papero, per la helpo de lenso kaj portebla lampeto. Li komencis sian propran legadon, sed nenion informis al la filino pri tio. Li timis, ke ŝi maldungos lian amikon. Li eĉ alternigis legadon de kelkaj linioj kun la junulo. Ĉar li ankoraŭ legis iom malrapide kaj balbute, Luko mokis lin:

— Kara sinjoro, ĉi tio ne estas burokratia raporto! Bonvolu legi sentoplene!

Kaj ili ambaŭ gaje ridis.

Unu matenon, kiam li estis leganta al Luko, subite alvenis la filino. Ŝi amuze grimacis:

— Jen! Nia paciento jam povas legi! Kia bela trompado al la filino! Ŝajne vi jam ne estas bezonata ĉi tie, kara Luĉjo.

Ambaŭ amikoj malĝoje mallevis la kapojn. Luko stariĝis por foriri. Ŝi pravas. La filino eliris el la legoĉambro por liveri senĝenan okazon por adiaŭo inter la du legemuloj.

— Ho Luĉjo, mi bedaŭras, ke vi ne plu venos. Aŭskulti literaturon estas alispeca ĝuado de literaturo, kredu min. Vi mankos al mi.

— Nu, ĉu via filino permesos, ke mi plu venadu, almenaŭ ĝis la fino de ĉi tiu romano? Mi tre scivolas, kiel ĝi finiĝos. Kiel la protagonisto solvos sian problemon de ĵaluzo kontraŭ la bela edzino? Kaj fine: ĉu ŝi malfidelis al li, efektive?

— Ho malsaĝa junulo! Ne atendu plenan solvon. Ne ĉio en la vivo havas plenan solvon.

La filino konsentis. Kaj por fini la lastajn paĝojn de la romano, la du amikoj pasigis plurajn semajnojn. La filino protestis:

— Ĉu tiu romano neniam finiĝos? — ŝi ŝajnigis naivecon.

Luĉjo klarigis:

— Notu ĉi tion: klasika verko neniam finiĝas…

* * *

S-ro Breno ankoraŭ vivis multajn jarojn, kaj mortis tute klarmensa, kaŭze de falo en la hejmo, kiam li grimpis sur ŝtupareton por preni libron alte sur la bretaro. Ĝis liaj lastaj tagoj Luko vizitis lin regule, du- aŭ tri-foje en ĉiu monato, por alporti novan libron, kiun li ĵus aĉetis. Al la junulo plaĉis la modernaj aŭtoroj. S-ro Breno preferis la klasikaĵojn. Sed ne indis disputi pri tio.

Veroniko

de Laure Patas d'Illiers

Ŝia persona nomo estis Veroniko; ŝia familia nomo estas ankaŭ la mia.

Pri ŝia ekzisto mi delonge forgesis.

La notario solene informas min pri la forpaso de mia onklino. Li elmontras taŭgan malgajan mienon kaj daŭrigas. La malfeliĉa evento okazis antaŭ unu monato. Akcidenta falo el fenestro. Tiam ŝajnis, ke ŝi ne plu havas familion. Nur poste lia notariejo esploris la aferon kaj malkovris mian ekziston.

Estante la ununura ido de la familio, mi heredas de ŝi. Laŭ la notario, de ŝia mono restis neniom post la pago de la entombigo. Fakte, iun taskon mi heredas: la posedanto de ŝia loĝejo postulas, ke ĝi estu tute malplenigita antaŭ la fino de la monato, por ke li ludonu ĝin al aliulo.

Mi iras malkovri la apartamenton, kie mia onklino loĝis. Nenion mi esperas. Plej probable la valoro de la ena fatraso estas malpli alta ol la kosto kiun mi pagos al rubaĵisto por forporti ĉion.

Kvara etaĝo. Ne estas lifto. Por ĉiutage supreniri kaj malsupreniri, necesas sanaj kaj fortikaj kruroj. Ŝi aĝis sepdek naŭ, laŭ la notario. La ŝtuparo odoras je supo, tradicia legomsupo el terpomoj kaj poreoj. Mi malfermas la enirpordon. La ligna planko malforte knaras sub mia piedo, ĵus ĉe la sojlo. Mi staras en la enirejo kun muroj malhele farbitaj. Ene estas nenio, krom eksmoda grizeflava pluvmantelo sole pendanta sur vestohoko.

Mi eniras la salonon. La bruo de miaj paŝoj eĥas. Ronda tablo el ebonkolora ligno. Tia granda tablo kutime estas ĉirkaŭita de almenaŭ kvar similaj seĝoj, sed tie staras ununura seĝo. Kiam ŝi invitis amikojn, ĉu ili starante manĝis? La seĝo estas el la sama ligno kiel la tablo kaj havas rektegan dorsapogilon. En angulo de la salono, remburita brakseĝo kaj stangolampo kun direktebla kapo. Ne estas lustro, tapiŝo, pendigitaj bildoj, dekoraĵoj, plantoj. Mia onklino ŝatis la elegantecon de malplenaj spacoj. La fenestro havas metalan balustradon. Ne estas kurteno, trans la vitro krude kaj klare videblas la fenestroj de la kontraŭa alta domego.

Mi daŭrigas la esploron. Dormoĉambro. Unupersona lito, senornamaj muroj,

fermitaj ŝutroj. La etoso pensigas pri malmultekosta hotelo aŭ sociala noktejo. Mi supozas, ke pro nostalgio, mia onklino rekreis la aspekton de la studenta loĝejo kie ŝi iam vivis.

Mia onklino estis stranga homo. Mi antaŭvidis loĝejon plenŝtopitan de ĉiaj mebletoj, dekoraĵoj, delikataĵoj, memoraĵoj. Tiel ĉiam estas ĉe olduloj. Ju pli pezas la jaroj, des pli obstrukcias la aĵoj. Ju pli malfortiĝas la memoro, des pli amasiĝas la memoraĵoj.

Videble, en mallukso vivis mia onklino. Ĉu ŝi forvendis siajn meblojn kaj valoraĵojn pro monomanko? Ne, ŝi povintus peti helpon de mi. Neniel mi estus lasinta la onklinon malsatmorti. Pli probable ŝi estis adepto de iu asketisma skolo. Lastatempe mi aŭdis, ke minimumismo iĝas laŭmoda. Mi komprenis, ke minimumismo estas vivstilo, kie oni forigas ĉiajn aĵojn krom la neprajn. Tio faciligas la dompurigadon.

Reveninte en la salonon, mi rimarkas pli helan ortangulon meze de muro. Tie iam pendis bildo. Mi detektive esploras ĉiujn murojn de la apartamento kaj nombras kvin tiajn ortangulojn.

Alia penso trafas min. Neniu libro! Neniu parte legata libro kuŝas ĉe la salona brakseĝo aŭ ĉe la lito. Ne estas librobreto. Probable mia onklino konsideris la legadon teda okupo. Multege da homoj neniam legas librojn, krom pro neceso.

Plu observante, mi rimarkas, ke en la tuta loĝejo videblas neniu skribaĵo. Nek libro, nek gazeto, nek katalogo, nek afiŝeto. Mi memoras ke en la dormoĉambro staras labortablo kun seĝo. Mi traserĉas la tirkestojn. Du skribiloj kuŝas sur tavolo de polvo. Povas esti, ke jaron post jaro ŝia vidkapablo malfortiĝis kaj ŝi ne plu kapablis legi. Ŝi forigis la bildojn kaj librojn, kiujn ŝi ne plu povis ĝui.

Mi rondiras re kaj re de ĉambro al ĉambro. Veroniko estis solemulino. Ŝi elektis mizantropan vivon. Hej, onklino Veroniko, kial vi ne venis renkonti min?

Mi vespiras. Mi ŝatintus trovi foton de ŝi. Estas malfacile senti simpation al iu, kiu lasis neniun spuron de sia personeco. Onklino Veroniko, ĉu vi vere ekzistis, aŭ ĉu nura fantomo loĝis ĉi tie?

Mi sidiĝas sur la salonan brakseĝon. Se mi koncentriĝas, mi sukcesos revenigi memorojn. Mi laŭte ripetas: “Veroniko, Veroniko, Veroniko, Veroniko”. Eron post ero, reeĥas frazoj aŭditaj dum mia infanaĝo aŭ adolesko. Tiam mi ne atentis, sed iel ili printiĝis funde de mia menso. Onklino Veroniko naskiĝis longe post mia patro. Ili malmulte interrilatis, ĉar kiam ŝi ankoraŭ bebis, li forlasis la hejmon por eniri internulejan gimnazion. Post la abiturienta ekzameno li foriris eksterlanden por studi en universitato. Li revenis ĉi-landen kiel matura viro. Poste ambaŭ gefratoj plu restis disaj. Tial mi neniam konatiĝis kun la onklino Veroniko. Ŝi ne venis al lia entombigo antaŭ naŭ jaroj. Aŭ ŝi ja venis, sed ne alparolis min, kaj mi ne konsciis pri ŝia ĉeesto. Tion mi neniam scios.

La brakseĝo komfortas, sed mi sentas malagrablan odoron de malnova eluzita ŝtofo. Mi stariĝas, paŝas al la ligna tablo, ade ŝovas la manon sur la nigra, glata kaj malvarma surfaco. Kvazaŭ mi karesus la ĉerkon de Veroniko.

Subite mi konscias, ke mi soifas kaj malsatas. La konstato pri tiuj banalaj sentoj revenigas min al la realo. Mi serĉas la kuirejon.

En la kuirejo mi malfermas la fridujon, la ŝrankojn. Minimuma vazaro por unu persono. Kelkaj kuriloj. Nenio manĝebla. Absolute nenio. La ejo estas perfekte pura, kiel oni kutime lasas sian kuirejon antaŭ longa vojaĝo.

Mi kliniĝas, por ke mia buŝo estu ĵus sub la krano, kaj trinkas el la fluo. La freŝa akvo agrablas. Iom da akvo glitas sur mian mentonon. Mi sekigas ĝin per vazarotuko. Mi tremas. Fridas ĉi tie! Ho, ĉar la fenestro estas malfermita. Kial? Subite mi memoras detalojn diritajn de la notario: mia onklino mortis pro akcidento, iun matenon la gardisto de ŝia domego trovis ŝin surgrunde en la ena korto, ŝi estis falinta el sia fenestro.

El ĉi tiu fenestro.

Mi proksimiĝas al la fenestrobreto. Ĝi ne havas balustradon. Ĉu soleco dronigis Veroniko en malesperon kaj pro naŭzo pri la vivo ŝi ĵetis sin? Kia absurdaĵo! Veroniko ja estis iom stranga, sed ne eblas ke mia parenco tiel agus! Mi trovu alian hipotezon, iun ajn. Mi kliniĝas al ekstero. Sube videblas la korto. Malpura, grizeta ortangulo de betono ĉirkaŭita de krute vertikalaj muroj. Jen la plej malbela vidaĵo en la tuta mondo. Kiel malgranda tiu mizera korto aspektas! Ŝajnas neebla, ke ĝi ricevus tutan homkorpon. Mi suben metas miajn manojn. Miaj manplatoj tute kovras la korton. Ĝi ne plu videblas, do mi sentas kvazaŭ ĝi ne plu ekzistas. Ho, jen la klarigo! Ankaŭ Veroniko volis malvidi la korton, la hidan korton. Ŝi tiucele suben metis la brakojn, tro etendis ilin kaj falis.

Certe tiel okazis.



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj
Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov
Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj
Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj
Prezo: 30 eŭroj
Mendu ĉe via kutima libroservo
https://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm

Pri Faŭsto en Esperanto

Recenzo de Sergio Pokrovskij

Goethe, Johann Wolfgang von. *Faŭsto*. Partoj I kaj II / Tradukis el la germana Karl Schulze; Enkonduko kaj redaktado de Ulrich Becker. – Novjorko: Mondial, 2024. – 567 p.

Tipografio kaj ciferecigo

La libro aperis surpapere kaj bite (en PDF); mi uzis la bitlibron, laŭ mia prefero.

La teksto estas bele kompostita per la tiparo *Bookman SudEuro*. Tiu tiparo estas bone legebla kaj stile bone konvenas al la verko. Esence ĝi estas Okcident-Eŭropa vindoza tiparo (CP-1252) en kiu 12 kodpoziciojn okupas la ĉapelitaj literoj Esperantaj laŭ ilia loko en la malnova normo Latino-3a (ISO-8859-3); ekz-e en la kodpozicio 253 la lokon de **ý** okupas **ŭ**. Kaj malgraŭ tio la tiparo sin prezentas kiel kodita laŭ CP-1251. Antaŭ 30 jaroj oni uzis tiun trukon por kontrabandi Esperantajn tekstojn en tiaman PDF-on. Tio plu funkcias por surekranigo kaj perokula legado, por printado; sed misfunkcias ĉe interago kun la modernaj programoj kaj aranĝaĵoj, kiuj interpretas la kodojn ne per la signobildo sed laŭ la signonumero en CP-1252. Ekz-e por trovi la nomon *Faŭsto* per normala legilo necesas serĉi (klavi) `Faýsto`; simile se oni volas per alklako konsulti vortaron aŭ Vikipedion, kopii tekston ktp. Nun tiu truko ne plu necesas, nun eblas uzi Unikodon en PDF kaj havi ĉiujn Esperantajn literojn kiel tiajn. Prezenti la Esperantajn tekstojn Unikode nun estas la normo, kiun uzas i.a. «La Ondo de Esperanto» kaj «Monato».

Fine de la bitlibro, samkiel en la libroj paperaj, estas enhavtabelo kun paĝonumeroj sed sen alklakeblaj ligiloj. Fakte en PDF-libro pli oportunas *indekso*, kiun oni povas teni en aparta panelo sur la ekrano. Tia indekso disponeblas, sed ĝi estas tro maldetala (kaj cetere anglalingva): tie aperas *front cover, title page, copyright …* ***body****, back matter, table of contents, back cover.* La tuta traduko estas referencata per tiu ***body***, sen plua subdivido. Oportune detalajn PDF-indeksojn havas ekz-e multaj eldonaĵoj de INKO.

Iom ĝenas ke la PDF-aj paĝonumeroj je 1 superas la tipografiajn.

Numerado de versoj

La tradukinto, *Karl Schulze* [ŝulce], diras en sia antaŭparolo (p. 33):

> Kio koncernas mian Faŭst-tradukon, mi povas certigi, ke ĝi havas la saman versnombron kiel la germana teksto.

Tio estas granda kaj malofta merito. Ĝi ebligas numeri la tradukitajn versojn

kongrue kun la kanona numerado de la germana originalo; sed bedaŭrinde tia numerado mankas en la recenzada eldono (nur la enhavtabelo donas tri resumajn numerintervalojn por la Prologoj kaj la tutaj du Partoj — eĉ ne por la scenoj).

Verdire, unu el miaj koleginoj grumblas, ke la versonumeroj ŝin ĝenas dum legado; nu, en bitlibra eldono eblus kaŝi/malkaŝi ilin per musa alklako aŭ ŝvebo.

La tri meritoj

La libro komenciĝas per kvar antaŭparoloj:

- Antaŭparolo de la eldonejo
- Enkonduko de U. Becker [beker]
- K. Schulze: La aventuro de Faŭst-tradukado
- S. Fiedler [fidler]: “Amiko, grizas ĉiu teori”[1] – Pri la traduko de “Faŭsto” al Esperanto

Sume la tri antaŭparoloj de la libro prezentas tri ecojn laŭ kiuj oni taksu la valoron de la traduko:

1. Kompleteco: ĉu la tuta teksto estas tradukita?
2. Fidela esprimo de la senco.
3. Fidela esprimo de la metriko.
4. Trafa traduko de frazeologiaĵoj.

Tia, laŭ mi, estas la naiva ordo de prioritatoj. Pri la 1ª mi ne plu parolos, ĉar la Schulze-a traduko estas kompleta kaj ĉi-rilate havas nur unu rivalon, la tradukon de Norberto Bartelmes, kiu tamen kovras nur la Unuan Parton.

Koncerne la tri aliajn ecojn, reale en ĉi tiu traduko la plej atentita estas la 3ª, la metriko, al kiu fojfoje estas oferataj la du aliaj ecoj.

En tiu listo mankas ankoraŭ unu kriterio, tiom evidenta, ke oni ne multe ĝin atentas: kiom esperanteca estu la traduko?

Versofarado

> Mi malfermis la libron. Tio estis eĉ pli malbona ol kion mi antaŭtimis: *Ester'* kaj *Atalja* estis en versoj. Oni scias, ke ĉio verkita en versoj estas malfacile legebla kaj seninteresa.
>
> Anatole France. *La malgranda Peĉjo.*

Du malakordaj postuloj staras antaŭ tradukanto:

- La traduko fidele transdonu la metrikon de la originalo, tiel ke la germana leganto rekonu la bone konatajn versojn.
- La traduko estu bela kaj flua poeziaĵo Esperanta, kiun povu ĝui la publiko internacia.

K. Schulze konscias la neceson kompromisi; sed lia kompromiso biasas al la

unua postulo. Miaparte, mi pli atentus la duan. En sia *Enkonduko* U. Becker ilustras la situacion per la unua oktavo (okverso) el la *Dediĉo* de «Faŭsto».



La Dediĉo-ekzemplo (pp. 11–15)

La «Dediĉo», unuafoje en la poezio germana, estis verkita en oktavoj (italecaj okversoj, *ottava rima*), sed diference de la itala tradicio, kie la rimoj estas plejparte inaj[2]: *ABABABCC*, Goeto[3] elektis la skemon kun alternado (neoftan itale): *AbAbAbCC* (1 ina rimo *b* inter 3 versofinoj viraj).

La oktavoj bonege konvenas al la serene melankolia humoro de la Dediĉo; kial do tiu ŝanĝo?

Oni povus supozi, ke la alternado evitigas tedan unutonecon de la jambaj versoj; sed la tradicia dancanta rimskemo jam plene sufiĉas por tio. La vera kaŭzo estas la prozodio de la germana lingvo, en kiu oftas vortoj unusilabaj, kaj interalie, frazofine. Kun 3 viraj versofinoj el 8, la strofo iĝas tre komforta por la germana frazaranĝo.

Sed kiom ĝi estas komforta por la frazo germana, tiom ĝi estas maloportuna por la lingvoj kun la akcento fiksita sur la antaŭlasta silabo, kiaj estas la itala, la pola kaj Esperanto.

U. Becker komparas la tradukojn de la tuta unua oktavo fare de diversaj aŭtoroj; por ŝpari lokon mi prenu nur po la 2 unuaj versoj:

1 Ihr naht euch wieder, schwankende Gestalten,
2 die früh sich einst dem trüben Blick gezeigt.

U. Becker diras:

> Ke bona traduko el la germana en alian lingvon eblas, montras la fama traduko en la anglan de Walter Kaufman (Novjorko, 1961), kiu de multaj estas rigardata la poezie plej bela angla traduko kaj la plej fidela al la germana teksto (…):
>
> *You come back, wavering shapes, out of the past*
> *In which you first appeared to clouded eyes.*

(Verdire, tiuj du linioj neniom impresas min verse. La anglaj vortoj estas tro mallongaj por esprimi melodion.)

Nu, pruvo per traduko angla ne konvinkas: la angla estas samtipa lingvo ĝermana, en kiu unusilabaj vortoj eĉ pli abundas ol en la germana. Kaj fakte *ĉiuj* versofinoj de la oktavo, ankaŭ la 5 inaj, en tiu traduko iĝis viraj (ĉar angle la inaj versofinoj malpli facilas ol en la germana). Tio estas pli granda devio ol la pola traduko per ĉiuj versofinoj inaj:

> Znów, duchy zwiewne, przychodzicie do‿mnie,
> zjawione smętnym oczom przed latami.

Simile ĉe Bartelmes (1923):

Vi formoj ŝancelemaj realvenas,
Montrintaj frue sin al vidmalklaro.

Tio certe sonas por mi pli poezie ol la ĉi-supra traduko angla. Iom ĝenas la fina kunmeto «vidmalklaro». Ĝi fidele respondas al *dem trüben Blick*, t.e. «al la malklara rigardo». Goeto en tri vortojn pakis tion, kion Puŝkino malvolvis en tri versojn[4]:

Kaj la romanprojekton mian	И даль свободного романа
Mi tra magia revkristal'	Я сквозь магический кристалл
Distingis tiam nur sen klar' …	Ещё не ясно различал.

Mi ne povas juĝi, ĉu tio klaras germane, sed en ĉiuj tradukoj, kie oni provis esprimi ĝin ene de la verso 2, la rezulto estis fuŝa. Germane tiuj vortoj staras meze de la verso, kaj pro la rava melodieco de la frazo mi iel ne rimarkas ilin; sed ĉe Bartelmes la obstrukco aperas en la akcenta fina pozicio, kaj ankoraŭ en formo de aparte analizenda kunmetaĵo, kio pligrandigas la ĝenon.

Aliaj tradukintoj ŝanĝis «rigardo»n al «okuloj», kiel en la ĉi-supraj tradukoj angla kaj pola; tio malbonas, ĉar «okuloj» neprigas fiziologian vidadon optikan, dum ĉi-okaze temas pri metafora vidado mensa; kaj krome, ĉar «nubaj/malklaraj okuloj» impresas malagrable kiel malsaneco, la pola tradukisto ŝanĝis tion al pli romantikaj «okuloj malgajaj» (*trübe* ankaŭ tiun signifon havas). Sed plimulto da tradukistoj simple preterlasis tion.

Krome, «frue» estas mistraduko. Germane ***früh*** povas signifi *iama*, *pasinta*, *estinta*; sed la Esperanta **frua** tiun signifon ne havas.

Schulze kombinis la *ŝancelemon* de la *formoj* kaj la *malklaron* de la *vido* en «figuroj svagaj»:

El fruaj tempoj sentas mi reveni
Al mia vid', figuroj svagaj, vin.

La dua verso estas 5-pieda jambo, kun vira versofino, samkiel la originalo. Sed la kosto de tiu heroaĵo estas granda.

Unue, la vortordo estas nenatura:

- Ĝi estas nekutima sintakse. Nur versofine post relego mi komprenis, ke «figuroj svagaj» estas alparolo.
- Ĝi estas nekutima prozodie. Normale la personaj pronomoj estas senakcentaj, kiel la germana *ihr* en la originalo. Ĉi tie ĝi ricevas ĉefakcenton, kaj ankoraŭ post alparola paŭzo.

Due, sekve de tio la intonacio draste diferencas disde la originala. Melankolia andanto finiĝas per subita ekpafo. (Krome, tia postmeto impresas iom malafable, kvereleme, kiel en «vi estis lia helpanto, **vi**! For de miaj okuloj!»[5].)

Goeto oportunigis la italan strofon al la prozodio *germana*. Laŭ la intenco de lia faro, ĉe esperantigo endus *malfari* lian ŝanĝon, ĉar *por Esperanto* pli komfortas la kutima formo itala.

Kaj ankaŭ ĉi tie aperas la germanaĵo «*fruaj* tempoj».

Cetere, la unua monologo de Faŭsto en la Dua Parto (p. 263–264) estas verkita en pure in-rimaj tercinoj. Tre glate, sed iom plate.

La kanto de la gnomoj

Tamen estas lokoj kie la energiaj viraj rimoj estas tute konvenaj, ekz-e en la burleska kanto de la gnomoj (p. 303, v. 5850–5855):

En altaj montoj *erpas* ni,	Die hohen Berge *schröpfen* wir,
El plenaj vejnoj *ĉerpas* ni;	Aus vollen Adern *schöpfen* wir;
Kolektas ercojn ni amase,	Metalle stürzen wir zuhauf
Bonŝancon! ni salutas pase.	Mit Gruß getrost: Glück auf! Glück auf!
Sinceras ĉi salut’ de l’ gnom’:	Das ist von Grund auf wohlgemeint:
Amikas ni al bona hom’.	Wir sind der guten Menschen Freund.

Akcentonombraj versoj

Sed la regulaj klasikaj metroj estas esceptaj en «Faŭsto». Preskaŭ la tuta teksto estas verkita en *klabversoj* (*Knittel, Knüttelvers*), la germana speco de akcentonombraj versoj, kiujn karakterizas fiksita nombro de akcentoj en versaj linioj (plejparte 3–4) kaj rimoj. La nombro de silaboj en verso povas varii, samkiel la nombro de interaj silaboj senakcentaj:

360 **Heiß**e Ma**gist**er, heiße **Dok**tor **gar**	Ma**gist**ro mi nom**iĝ**as, eĉ dok**tor**’,
361 Und **zieh**e **schon** an die **zeh** en **Jahr** …	Kaj **jam** dek **jar**ojn kun fer**vor**’ …

Akcentonombraj versoj prosperas en la lingvoj kun *akcentopulsa* parolritmo, t.e. tiaj, en kiuj la parolantoj emas teni tempajn distancojn inter la akcentoj proksimume egalaj. Tiaj estas ekz-e la lingvoj germana, angla, rusa; en ili ekzistas folkloraj formoj de akcentonombraj versoj (resp. *Knittelvers, doggerel, раёшник / дольник*).

Tamen la akcentopulsado ne estas la sola ebla maniero aranĝi parolritmon. Multaj lingvoj ĝin bazas sur egala daŭro de la silaboj, sen atenti la akcentojn — ekz-e la franca, la itala, la ĉina. Por tiaj *silabopulsaj lingvoj* la plej konvena versoformo estas la *silabnombra*. Ĉe silabopulsa skandado la klabversoj perdas la ritmon, kaj oni perceptas nur la rimojn. Alia grava parolritmo pesas la silabojn laŭ moraoj, ĝi plej bone realiĝas en la *silabmezuraj versoj* (en la terminoj de la *Parnasa Gvidlibro*).

Goeto naive opiniis, ke liaj rimitaj klabversoj plaĉus al Helena (pp. 440/441):

Mi scivolemas, kial la parol’
De tiu viro strangas, sed afablas.
Konvenas ĉiu sono al l’ alia,
Kaj se l’ orelon trafis iu vort’,
Alia venas por karesi ĝin.

Tio malprobablas (la malnovgreka lingvo estis moraopulsa) — krom se Helena

plene asimilis la germanan lingvon kaj ĝian parolritmon. Laŭ Kalocsay («La klasika metriko kaj Esperanto», *Nica literatura revuo*, № 4/5),

> Reviviĝinta greko certe aŭskultus malŝate la barbarajn akcentajn ritmojn kun ilia langorompa malglateco (kiel eĉ kompari ilin al la magiaj anapestoj de Aristofano!), kaj li trovus infane naiva la sonan akordiĝon de la versfinoj. Laŭ Anatole France (vd. «La insulo de la pingvenoj»), tia estas ankaŭ la opinio de Vergilo pri la tercinoj de Dante.

Kian parolritmon havas Esperanto? La gramatikoj pri tio silentas, la lingvaj kursoj tion ne instruas. Supozeble, la esperantistoj plejparte parolas Esperanton en la parolritmo de sia gepatra lingvo aŭ de sia instruisto. Tia variado ne estas senekzempla ĉe la regionaj variantoj de naturaj mondolingvoj (ekz-e la Eŭropa lingvo portugala estas akcentopulsa, dum la Brazila, silabopulsa).

Tial mi supozas, ke tradukon per klabversoj povos aprezi nur parto de la Esperanta popolo. Alia parto, kompareble granda, simple ne perceptos ilian ritmon. La tradicia metriko *akcenta-silaba* (kian uzis Zamenhofo kaj Bartelmes) estus pli universale perceptebla ĉe perokula legado (sed supozeble ankaŭ la silabopulsuloj povus peraŭde kapti la ritmon de akcentopulsa deklamado).

Mi tamen koncedas, ke akcentonombrajn versojn uzis Zamenhofo en sia traduko de la Goeta *Ifigenio en Taŭrido*, ekz-e (versoj 4-akcentaj):

> Bon**ve**non, **pa**troj! Vin sa**lu**tas O**res**to,
> La **las**ta **vi**ro de **vi**a **gen**to;
> **Ki**on vi **se**mis, li **ĝin** ri**kol**tis:
> Kun **ŝarĝ**’ de mal**be**no li **i**ras mal**sup**ren.

Aliaj metroj

«Pro patriotismo» S. Fiedler apartigas jenajn versojn (pp. 50, 136):

> Frosch: Vi vere pravas! Mian Leipzig laŭdas mi!
> Ĝi estas et-Pariz’ kaj formas siajn homojn.
>
> 2171 Wahrhaftig, du hast recht! ¦ Mein Leipzig lob’ ich mir!
> 2172 Es ist ein klein Paris ¦ und bildet seine Leute.

Ŝatanto de francaĵoj, Frosch[6] ĉi tie kaj poste parolas per aleksandroj, la ĉefa metro de la franca teatro. Tamen inter la ajnformaj klabversoj la aleksandroj perdiĝas, kaj Schulze probable ne rimarkis ilin en la originalo.

(Krome, iom ĝenas la neasimilita kaj neakuzativigita *Leipzig*; strangas la vorto *et-Parizo*.)

Sentencoj

> «Multaj el la versoj [de „Faŭsto“] tiel disvastiĝis en la germana popolo kaj tiel gravuriĝis en ĝia memoro, ke ili estas ĉiam pretaj kaj estas citataj en respondaj situacioj

de la ĉiutaga vivo, koncize, ili fariĝis preskaŭ proverbaj aŭ eĉ veraj proverboj …» [K. Schulze, p. 20]

Efektive. Kaj tio veras ne nur pri la germanoj. Tamen atentindas, ke ĉe diversaj nacioj proverbiĝis malsamaj pecoj. Ekz-e Schulze antaŭ ĉio mencias la versojn:

1966 Denn was man *schwarz auf weiß* besitzt,
1967 Kann man getrost nach Hause tragen

(Ĉar kion oni posedas *nigre sur blank*e,
Tion oni povas trankvile hejmenporti)

kiujn li ne sukcesis enversigi laŭvorte: «Sed mi sentis kaj sentas eĉ nun grandajn skrupulojn pro tio, ĉar ĝuste tiu „nigre sur blanke“ estas tiu parto de la verso, kiu plej profunde eniĝis en la kapojn de la germanoj». Tamen *internacie* la esprimo ekzistas sendepende de «Faŭsto»: por la esperantistoj pli aktualas ĝia apero en la *Proverbaro* (Nigro sur blanko pruvas sen manko); anglalingve ĝin uzis Ŝekspiro 2 jarcentojn pli frue ol Goeto (*Comedy of Errors*, 4:1, la jaro 1594ª: *“though it be writ **in black and white**”*). Sed estas ja aliaj diroj, pli speciale Faŭstaj.

La Majstro kaj Margarita

La romanon de M. Bulgakov «La Majstro kaj Margarita» mote antaŭas traduko de la versoj 1335–1336:

1335 Nun gut, wer bist du denn?
1335 Mephistopheles: Ein Teil von jener Kraft,
1336 Die stets das Böse will und stets das Gute schafft.

En la Esperanta traduko de la romano mi uzis la versojn de N. Bartelmes:

Nu, kiu estas vi?
— De l’ fort’ mi estas ono
Malbonvolema ĉiam, sed kaŭzant’ de bono.

Nun disponeblas ankoraŭ la traduko de Schulze:

Nu, kiu do vi estas?
Mefistofelo: Parto de ĉi fort’,
El kies malbonvol’ rezultas bona sort’.

Pro du tialoj mi tamen malpreferus ĉi tiun novan tradukon:

Unue, en ĝi estas gramatika malglataĵo. «Ĉi» ne taŭgas por la korelativa senco «tiu, kiu/kies»; ja «ĉi forto» = «ĉi tiu forto» = «diese Kraft» konvenas por referenci forton jam menciitan — sed ĉi-okaze la *forto* estas unue enkondukata; tial, kaj Esperante kaj germane devas esti «de **tiu** forto, kiu …» = «von **jener** Kraft, die …».

Due, la vorto «sort’», evidente ŝuldata al la rimo, iel banaligas la frazon. «La bono», «das Gute» kaj «das Böse» sonas abstrakte-filozofie kaj mondoskale; «bona sort’» mallevas tion al la mita Fortuno, simpla bonŝancemo.

Fakte, Bulgakov forĵetis la pretajn rusajn tradukojn ĝuste ĉar ili ĉiuj malaltigas la

konceptan nivelon simile al la Schulze-a (pro la samaj kaŭzoj). Bulgakov preferis fari sian tradukon, kaj ĉar li, samkiel Bartelmes, precipe strebis ĝuste esprimi *la penson*, tial lia traduko pli proksimas la Bartelmesan — sufiĉe por akcepti tiun lastan en la Esperanta traduko de la moto.

Teorio kaj vivo

Probable la plej citata aforismo el «Faŭsto» estas tiu pri la teorio kaj la vivo [vv. 2038–2039]. Ĝin ŝatis Lenino, ĝin ofte ripetas mia edzino, ĝi aperas en la titolo de la antaŭparolo de *Sabine Fiedler* pri ĉi tiu traduko en la recenzata libro (p. 38). Tie ĝi tekstas jene:

> Amiko, grizas ĉiu teori',
> Sed l' ora vivoarbo verdas. [p. 130]

La traduko min ŝokis — sed ĝi laŭvorte respondas al sia germana originalo:

> 2038 Grau, teurer Freund, ist alle Theorie
> 2039 Und grün des Lebens goldner Baum.

Por mi «griza teorio» estas sensencaĵo, samkiel «flava algoritmo». Supozeble la celata senco estas «senviva teorio» aŭ «teda teorio». Ambaŭ tiujn signifojn internacie esprimas la epiteto *seka*:

> per **seka teori'**
> ni ne tiom nin instruas,
> kiom per alegori' [R. Schwartz: La Stranga Butiko]
>
> **seke teoria** logikeco [Z, Lingvaj Respondoj]

ktp. Ankaŭ germane eblas diri: *Nicht **trockene Theorie** und Grammatik, sondern aktives „Fremdsprechen"* (Ne *seka teorio* kaj gramatiko, sed aktiva fremdlingva parolado).

Nu, *griza* povas metafore signifi «seninteresa, teda» — sed pro alia kaŭzo, ol *seka*:

- *griza* estas teda ĉar tro ordinara, banala, maleminenta;
- *seka* estas teda ĉar tro formala, afereca, malsentimentala, senkora.

Ĝuste pri *seka* temas en la Mefista diro, kion cetere neprigas ĝia frivola kuntekSto (kiun la citantoj plejparte ne konas). Eble la germana lingvo ne distingas tiujn nuancojn, sed almenaŭ por iuj negermanoj ĝi ekzistas; la malevidenton de la ĉi-tiea *griza* atestas la portugala traduko de A. F. de Castilho:

> Meu caro amigo, toda a teoria é *névoas*
> (Mia kara amiko, ĉiu teorio estas *nebulo*)

Due, la epiteto *ora* en la sekva verso estas tiom banala kaj malkonvena, ke multaj tradukistoj ĝin simple forigas. «*Verda ora* arbo» estas oksimoro; supozeble por Goeto «ora» sinonimas kun la abstraktaj «nobla», «majesta»; sed ekz-e en la rusa poezio «ora arb(ar)o» ofte aludas flavon, aŭtunon, «la majestan velkadon de

la naturo»[7] (kiel «la arĝentaj haroj» de nobla maljunulo). Eblas supozi, ke Mefisto intence stultumas. Sed la eminentaj citantoj ĝin citas bonfide!

Ĉu la tradukanto rajtas plibonigi la originalon? Certe jes, se la laŭvorta traduko ne same sencas en la cellingvo. Mi konsilus ŝanĝi la tradukon en la senco de

Amiko, ĉiuj teorioj *sekas*,	*Суха*, мой друг, теория везде,
Dum la vivarbo *suke* verdas.	А древо жизни *пышно* зеленеет![8]

(Ĉi tie kaj ĉie aliloke, ĉi tiaj versosimilaj linioj miaj ne estas pretaj versoj, ili estas nur sencoklarigaj skemoj, kaj atentas nek metrikon nek rimojn.)

Speciale en la kunteksto de «Faŭsto», la *vivarbo* pensigas min pri la apuda *arbo de sciado* (*Gen* 2:15) kaj tre simila scivolo de Evo helpata de la serpento… Tre simila okazo, sed kun rekte kontraŭa reago de la bona Dio (Faŭston lia strebo scii savas; Evon Dio malbenas).

Grizaj leĝoj

Alia simila uzo de *griza* = *teda* aperas sur p. 162, kie Faŭsto diras al Mefisto:

Magistra moŝt' kun granda scio,	2633 Mein Herr Magister Lobesan,
Nun restu for kun *leĝoj grizaj*	2634 Laß er mich mit dem Gesetz in Frieden!

Do, ĉi tiun *grizaj* (por mi tre strangan) aldonis la tradukinto (pro rimo kun *disaj*). Faŭsto mokas la diablon nomante lin «laŭdinda», «**p**ia» (*lobesan*, propre lobesam), t.e.

Magistra moŝt' kun granda **p**io,
Ne tedu min per la moralo.

Tiu ironio mankas en la traduko.

Grize naskitaj

En la 2ª parto (p. 416) mi stumblis je la demando:

Ĉu eble venis unu
De l' Grajoj *grize naskitaj*…?

Mi ne scias, ĉu por la germanoj tiu uzo (v. 8732) de la vorto *graugebornen* estas evidenta; al mi necesis konscii, ke en la greka *Grajoj* (Γραῖαι) laŭvorte signifas *maljunulinoj*; kaj nur el tio mi konkludis, ke *griza* ĉi tie signifas *grizhara*, kaj ke la probabla senco estas *kiuj naskiĝis grizharaj, denaske grizharaj.* Ĉu Goeto paŭsis klišan epiteton grekan? Ĉiel ajn, laŭ mia lingvosento en Esperanto tiun sencon devas esprimi adjektivo, ne adverbo.

De la pudelo kern'

Vidante la nigran pudelon transformiĝi en Mefiston, Faŭsto ekkrias (p. 105):

Do jen de la pudelo kern’!	1323 Das also war des Pudels Kern!
Skolan’ vaganta? Jen ja kazo tre ridiga.	1324 Ein fahrender Skolast? Der Kasus macht mich lachen.
M.: Saluton donas mi al ĉi lucern’!	*M.:* Ich salutiere den gelehrten Herrn!

La tri versoj prezentas kvar problemojn.

(1) «Kerno de pudelo» estas stranga esprimo, kaj Esperante kaj germane: hundo ja ne estas frukto. Tio estas nek trafa nek sprita. Mi vidas nur unu motivon por ĝia apero: la rimo *Kern—Herrn* (iom hontinda pravigo por granda poeto). Pro sia strangeco la esprimo proverbiĝis en la germana (kvankam kun signifo alia ol en la sceno). Ekster la germana ĝi ne ekzistas, kaj en plimulto da tradukoj al ĝi respondas io pli normala, ekz-e

Jen kio sin en la pudela formo kaŝis!

Ankaŭ Bartelmes evitas tiun problemon:

Do tiel la pudel’ aspektas!
Student’ vaganta? Ho, ridigas min la kazo.
M.: Saluton mi al profesor’ direktas!

(2) *Der Kasus* signifas ĉi tie «eksterordinara okazaĵo», senco kiun havas nek la Esperanta *kazo*, nek la angla *case*, nek la franca *cas*. Traduko franca anstataŭas ĝin per la abstrakta *Tio*, traduko angla per la arkaika-latina *casus*:

Un bachelier errant ! *C’est* à pouffer de rire.

A travelling scholar, then? *The casus* is diverting.

(3) Kial Faŭsto diras, ke la okazaĵo estas *ridiga*? Lingve la originalo estas tute klara, tamen psiĥologie la reago estas neadekvata. Ĉu rido histeria? Atendebla efiko de la mamuta dozo da spiritismo en la antaŭaj scenoj; tamen tio certe ne estas interpreto tradicia. Multaj tradukoj simple ignoras tiun ĝenan frazon.

Instruantoj kaj instruatoj

(4) Nun, kio estas *ein fahrender Scholastikus* / *Skolast*? (Goeto unue skribas *Scholastikus*, kaj tuj poste, *Skolast.*) Evidente temas pri fenomeno ne plu ekzistanta, al la publiko ne plu konata, por kiu en la modernaj lingvoj mankas vorto; Vikipedio proponas «vagolernanto»n. Eble tio estus taŭga solvo; sed nepre ne *skolano*, kiu en Esperanto havas klaran signifon tute maltaŭgan por la koncerna sceno (*skolano* estas adepto de iu arta aŭ teoria skolo, ekz-e de la *Analiza Skolo*; *vaganta skolano* estas same malkonvena, kiel *vaganta adepto*).

La traduko de Bartelmes estas almenaŭ sencohava kaj konforma al la plimulto da tradukoj kaj ĉiuj komentoj. Mi tamen opinias tiun tradicion dubinda: Faŭsto estas orgojla moŝtetulo malestimanta siajn subulojn, samkiel Mefisto primokanta la junan lernemulon en la sekva sceno; nu, Mefiston Faŭsto traktas malafable, sed serioze, kiel egalulon[9]. Vortaro latina-germana donas por *Scholasticus* unue, la signifon

«instruisto pri retoriko», kaj nur trie «studento (precipe pri retoriko)». Mi dirus *vaganta klerulo.* En la spektakloj Mefisto ne aspektas junule.

(5) En v. 1325 Mefisto tre korekte kaj senmetafore nomas Faŭston *dokta sinjoro.* Bartelmes tradukas *profesoro*, tute bone. La traduko per *lucerno* laŭas la dubindan PIV-an metaforan signifon «eminenta klerulo», kiun PIV ilustras per *2Sam* 21:17 kaj *Ijob* 12:5 — tute maltrafe, ĉar ne pro klereco reĝo Davido kaj Ijobo estas tie nomataj *lucerno* (taŭgajn ekzemplojn oni evidente ne trovis). Tamen eĉ se akcepti tiun metaforon, speciale en la koncerna dramo ĝi estas situacie malkonvena: plurloke, kaj interalie jam sekvapaĝe (p. 106) Mefisto parolas pri la batalo inter la mallumo kaj la lumo; nomi Faŭston *lucerno* estas anigi lin al la luma partio. Tion Mefisto pridubas, kaj tial lia saluto sonas moke-ironie. Do, tiu rimo kun *kerno* sekvigas sugestojn kiuj en la originalo malestas.

Nomoj propraj

La inaj nomoj

La traduko plejparte farita en la 1970aj jaroj (Schulze mortis en 1983) prezentas kelkajn trajtojn de tiuepoka lingvo, inter kiuj estas la maniero apartigi la nomojn de la inoj per la kvazaŭadjektiva finaĵo *-a* (*Maria, Klara, Sofia, Anna* malgraŭ la Fundamentaj *Mario, Klaro, Sofio, Anno*), laŭ PAG5, §36, p. 65. Tiu maniero ne estas tute internacia: greke, japane la inaj nomoj povas finiĝi je *-o* (kiel *Baŭbo* ← Βαυβώ, p. 226; *Manto* ← Μαντώ); latine, ruse, hungare, hebree viraj nomoj povas finiĝi je *-a*; sed pli grave, tio rompas la gramatikan funkciadon de Esperanto: Se *Valpurga* estas ina nomo (kiel en PIV1970), kion signifas *la Valpurga nokto* (p. 222 k.a.)? Pro simila kialo (la adjektivo «*Ĥelonia* ŝildo», p. 396) la nomo de la nimfo Χελώνη iĝis Ĥelon**io** (p. 555; pli simpla estus *Ĥelono*, kun η → o, kiel en Ἀφροδῖτη → Afrodito). Samkaŭze en *Doctor Marianus* → Doktoro Marianus la epiteto restas latina, ĉar en Esperanto la nomformo *Maria* ne estas adjektivigebla (krom eble *Mariaa*?).

La nuna tendenco estas reveni al la Fundamenta sistemo[10], kaj la a-nomoj min ĝenas (mi tamen uzas ilin ĉi tie por koheri kun la recenzata verko). Estas konate, ke la tradukoj arkaikiĝas pli rapide ol iliaj originaloj; kaj aliflanke, la stilo antaŭhieraŭa ofte aspektas malpli eksmoda ol la stilo hieraŭa; tiel okazas pri la Bartelmesaj *Greto, Margareto, Marto*… Cetere, dum en la 2ª Parto 19-foje aperas *Helena*, en la komenco Schulze ankoraŭ skribis: «En ĉiu ino vi *Helenon* vidas» (p. 160); *Lilit'* (p. 232) implicas la formon *Lilito*; la terdiino *Geo* (p. 549).

Duoblaĵoj

Leganto kiu ne konas la Goetan «Faŭsto»n devas iel diveni, ke *Greta* menciata en la dialogoj kaj Margareta el la aŭtoraj instrukcioj kaj replik-etikedoj estas unu sama drampersono. Por evitigi al la legantoj tiun perplekson sufiĉus ĉie uzi nur la formon *Greta.* Verdire, en la tradukita rekta parolo ja aperas *Margareta* (p. 181),

Margaret' (p. 170) — ambaŭ responde al *Gretchen*; kaj *Margrenjo* (p. 170, respondе al *Margretlein* v. 2827). Sed tioj certe estas iel unuecigeblaj.

Iom ĝenas, ke en Esperanto «Mefistofelo» sonas kvazaŭ «felo de Mefisto». Fakte la nomo de tiu diablo *neniam* plenforme aperas en la rekta parolo, ĝi aperas nur en la scenaj komentoj, instrukcioj kaj replik-etikedoj; germane nur ĝian mallongan formon solfoje prononcas Faŭsto (4183 ***Mephisto***, *siehst du dort*…); en la traduko (p. 235) tiu alparolo ne aperas (Vidas *vi* Knabinon palan tie sola stari?). Tial eblas alinomi lin *Mefisto* sen ŝanĝi la deklamatan tekston.

Mi tamen konscias, ke multaj juĝus tiajn ŝanĝojn malkonvene aŭdacaj.

Sed plimulto da duoblaĵoj aperas en la mita parto de la verko, pri kiu mi parolos aparte.

Asimilo

Karl Schulze ne estas tiom konsekvenca, kiel Rikardo Ŝulco. Iuj nomoj, ekz-e *Gretchen, Margarete, Heinrich, Auerbach* … estas (parte) asimilitaj: *Greta, Margareta, Henriko, Aŭerbaĥ*; dum aliaj, samrangaj, aperas germane: *Wagner, Frosch, Siebel, Altmayer*; *Marthe* perdis la germanan *h*, sed retenis la fremdan *e* (*Marte*). Kp ĉe Bartelmes: *Aŭerbaĥ, Vagner, Froŝ, Zibel, Altmajer, Marto, Margareto*; simile en la pola traduko: *Frosz, Zybel, Altmajer, Marta.*

¶ Unu sama nomo aperas jen asimilite, jen transskribite; ekz-e la urbo Sparto (Σπάρτα, Σπάρτη): *Spart**a***, *Spart**o***, *Spart'* (kaj *Lacedemono*).

¶ En unu lokindiko apudas formoj transskribita (el *Harzgebirg*) kaj tute fremdaj:

> Valpurga nokto. **Harc**-montaro. Regiono de *Schierke* kaj *Elend*

Kp ĉe Bartelmes:

> Valpurga nokto. Harcmontaro. Regiono de Ŝirke kaj Elend

¶ Unu sama nomo diverse asimilita: *Tirezio*, p. 419, 563 = *Teiresiaso*, p. 557.

¶ *ĥ* → *k* (pro la PIV-a ĥo-fobio): **Ĥ**irono (**Χ**είρων) iĝas nerekonebla **K**irono. (Alia misinfluo de PIV-1970: *Rod**o**so*, Ρόδος ial iĝas *Rod**i**so.*)

¶ *k* → *c*, la eksmoda latinida kripligo de la grekaj nomoj: Baŭ**c**isa (Βαυ**κ**ίς), La**c**edemono (Λα**κ**εδαίμων, Goete *La**k**edämon*). Tamen Lin**k**eo (Λυν**κ**εύς, Goete *Lyn**c**eus*). Laŭ PIV-1970 aperas ***C**ipro*, ***C**itere**a*** (k-formojn PIV-1970 ne konas); en PIV-2002 ***K**ipro* iĝas preferata ol ***C**ipro*, dum la nomepiteto de Afrodito liberiĝas je la nesistema dua *e*, sed konservas la kriplan *C* (atendeblus ke la greka insulo estu **K**ύθηρα → **K**itero, de kie la epiteto **K**υθέρεια → **K**itera).

Barokeca mitologio

La 2ª Parto de «Faŭsto» estas longega 5-akta alegorio, prezentanta, laŭ la vortoj de Goeto mem, provon sintezi romantikismon kaj klasikismon. La rezulto impresas min kiel malbona baroko, kies principoj estas kontraŭaj al la Esperantaj: la erudiciaj redundo kaj kaprica malreguleco.

En la 2ª Parto svarmas herooj kaj diaĵoj de la antikvaj mitoj, nomataj per pli ol 90 mitaj nomoj sensisteme kaj malkohere: jen Afrodita, jen Venuso; jen Neptuno, jen Pozidono; jen Heraklo, jen Herkulo ktp.

Laŭ PIV, **Neptuno** estas «Roma dio de la maro, responda al la helena Pozidono». *Responda*, sed ne identa. Tamen la romanoj ja kutimis uzi por la grekaj dioj siajn respondajn nomojn. Tiun tradicion konservis la latinida lingvo franca: en la francaj klasikismaj tragedioj la grekaj dioj havas latinajn nomojn. Sed tiu tradicio estas nek logika nek ĝenerala; ekz-e en la rusaj tradukoj de tragedioj de Racino oni kutimas regrekigi la nomojn de grekaĵoj.

En *Ifigenio* Goeto (kaj sekve Zamenhofo) uzas tiun latinidan maskeradon: Artemiso → Diano, Zeŭso → Jupitero ktp (kaj min tio ĝenas kiel malkleraĵo); sed en «Faŭsto» li laŭkaprice miksas la du sistemojn. Logika malkonfuzo estus ĉion grekigi (ĉar la agantoj estas greklingvanoj); sed Goeto iam ironie absurdigas la konfuzon (p. 388, v. 7989):

Tre dignajn diojn mi ekvidis jam,	Altwürdige Götter hab' ich schon erblickt,
Kliniĝis antaŭ Ops kaj Rea-dam'	Vor Ops und Rhea tiefstens mich gebückt

(Se Krono identas al Saturno, tiam lia edzino *Rea* identas al ties edzino *Ops*. Cetere, Mefisto salutis ne *diojn*, sed *diinojn*, aŭ — laŭ *Götter — gediojn.*

Alia fonto de sinonimia redundo estas uzo de nomepitetoj kaj priskribaj nomoj. Ekz-e *Apolono* havas la epitetojn *Febo* (de la greka Φοῖβος, «Brila»), *Muzageto* (la kondukanto de la muzoj) k.m.a. (pri *Muzageto* mi parolos en la sekva sekcio). *Aĥilo* iam aperas sub sia patronomo *Peleido*.

La inaj patronomoj kaŭzas multe da eraroj en la traduko.

¶ La filinoj de la mardio **Nereo** 3-fojojn estas regule nomitaj *Nereid**in**oj* (ekz-e sur p. 392), kaj 3-fojojn erare, *Nereido*[j] (i.a. en la gloso, p. 559). Ilia frato *Nereido* en la verko ne aperas.

¶ La patrino de Nereidinoj estas la nimfo *Doriso* (Δωρίς), sekve eblas nomi ilin patrinnome *Dorisidinoj*. Tamen sur pp. 395, 405, 551 ili aperas kiel *Doridoj*, kio estas duoble erara: «Doridoj» estus *filoj*, kaj filoj de *Doro* [PIV] (Δῶρος, la prapatro de la dorianoj).

¶ Dum Νηρεύς, Πηλεύς (lat. *Nereus, Peleus*)… estas asimilitaj (Nereo, Peleo), la nomo de la ĥtona mara diaĵo **Φόρκυς** estas simple transskribita: **Forkis**, kaj liaj filinoj aperas kiel *Forkiadoj*. Goeto paradas per tri grekaj vortoj:

Phorkys → eine Phorkyas → die Phorkyaden.

En Esperanto preferindas apartigi la bazon Forki/, kaj laŭsisteme formi:

Forkio → Forkiidino → Forkiidinoj.

Cetere, la *Forkiidinoj* ankaŭ estas nomataj Grajoj (Γραῖαι), mi jam menciis ilin ĉi-supre.

¶ Al la duoblaĵo *Grekujo* = *Helenujo* aldoniĝas ankoraŭ *Helaso*.

Muzageto

Drampersono kun tiu nomo aperas en la sceno «Sonĝo en Valpurga Nokto» (p. 240). Oni scias ☺ ke *Muzageto* (Μουσαγέτας, «kondukanta la Muzojn») estas nomepiteto de Apolono. Sed certe ne pri Apolono tie temas. La tradukinto (aŭ la editoroj) aldonis parentezon: Muzageto (Estro de muzoj), tamen ĝi neniom helpas. La epizodo estas alegoria rememoro pri malaktuala gazetara polemiko okazinta antaŭ 225 jaroj de nun (kaj tute senrilate al «Faŭsto»).

En la jaro 1797ª Ŝilero publikigis en sia gazeto «Almanako de la **Muzoj**» (*Musen-almanach*) «*Ksenioj*»n — kolekton da distiĥaj **epigramoj** Goetaj kaj siaj pri iliaj literaturaj oponantoj. Unu el la oponantoj estis *August Adolph von Hennings*, eldonanta la revuon ***Musaget*** kaj la monatgazeton *Der Genius der Zeit*, kiu en la sekva jarcento iĝis *Genius des 19. Jahrhunderts.*

Nu, en la epizodo aperas la drampersonoj Epigramoj, Hennings, Muzageto, kaj Ci-devant (postrestinta) genio de la tempo; tiu lasta estas komentinda.

Unue, «Ci-devant ~~(postrestinta)~~» en Esperanto estas simple «Eksa».

Due, la titolo de la gazeto estas mistradukita.

Mi supozas, ke la titolo celas la koncepton kiu en tiu epoko ŝvebis en la germanaj kapoj kaj kies nomo poste definitiviĝis en «*Zeitgeist*»; tial Bartelmes ĝuste tradukas tion per *Spirito de la epoko* (p.174). Mi koncedas, ke kun *genio* la titolo estas laŭforme iom pli rekonebla; sed laŭ mi en Esperanto la vorto *genio* ne havas la celatan signifon, kaj sekve tiu rekoneblo estas samspeca kiel en la alparolo «Karaj papo kaj mamo!». Oni aŭ traduku ĝuste, aŭ citu germanlingve.

Laŭ Saint-Exupéry, «la perfektecon oni atingas ne kiam nenio estas aldoninda, sed kiam nenio estas forprenebla». La principo de Goeto estas kontraŭa: dum multaj jaroj li aldonadis ĉiajn ajnaĵojn, granda parto da kiuj estus avantaĝe foriginda. «Faŭsto» ja entenas verajn perlojn — sed krome, kiel diris mia nevino, «Multe tro multas malnecesaj drampersonoj kun senrilataj paroladoj kaj plataj ŝercoj».

La lingvaĵo

Nemalofte estas uzataj parnasismoj (olda, sor, frida…) — Bartelmes sukcesis traduki sen plimulto da ili. Pli ĝenas troa uzo de la memstara *ĉi*, iam misgramatika, kiel supre en «ĉi forto» kaj «ĉi lucern'».

Ĝenerale la tradukinto ne suferis je la ĥo-fobio kaj preferis la pli klarajn ĥo-formojn; tamen estas kelkaj esceptoj (ĉu ŝuldataj al redaktinto?). Interalie en la teksto 66-foje aperas la vorto *ĥoro*, sed ie-tie 13-foje aperas *koruso.*

Koruso kaj ĥoro

Ĉi tiu diferenco tamen venas ne de la ĥo-fobio, sed (almenaŭ parte) de la vortuzo Goeta, kiu iel distingas inter *Chor* kaj *Chorus*. Mi ne sukcesis kompreni lian sistemon; la vortaraj informoj ne sufiĉas por tio. Cetere Schulze ne ĉiam laŭas

Goeton (ekz-e en la unua Valpurga Nokto *korusoj* respondas al *Chor*-oj). Nenia klarigo estas donita. La aliaj tradukoj unuecigas tiujn du vortojn; ankaŭ Bartelmes tradukas ilin ambaŭ per *Ĥoro.*

Lingvaj eraroj

¶ La plej grava kaj ofta lingva eraro koncernas la lokon de la vorto ***ne***.

«Se li ĉeestas, *mi* ***ne preĝi*** *povas*» [p.204] (propre, «mi *ne povas* preĝi»).

«Skrupuloj aŭ duboj ***ne min*** *deprimas*» [p.73, v. 368] (min *ne deprimas*, *Mich plagen keine Skrupel noch Zweifel*).

«*Ĝis nun* ***ne venki*** *mi sukcesis*» [p. 107, v. 1366] (mi *ne sukcesis* venki, *Ich wusste nicht ihr beizukommen*).

Ŝanĝiĝis la situaci':	1407 Die Sache sieht jetzt anders aus;
Ne el la domo povas mi. [p. 108]	1408 Der Teufel *kann nicht* aus dem Haus.)
(propre «mi *ne povas* eldomiĝi»)	

Ankaŭ proze: «***Ne tiel*** montru viajn voremajn dentojn kontraŭ mi!» (p. 245).

Mi ĉesis noti tiajn erarojn post la 14ª, sed certe ili pli multas.

¶ *Refreŝita* anstataŭ *refreŝ**ig**ita* (p. 263).

¶ Misuzo de *pejzaĝo* en la senco *regiono, lando*: Aĥajo, Eliso, Ionio estas difinitaj kiel «malnovgrekaj pejzaĝoj» (ĉi tiun sencon de la germana *Landschaft* la Esperanta *pejzaĝo* ne navas).

¶ Heroo + heroino = *geherooj*, sed:

6298 So rufst du **Held und Heldin** aus der Nacht …
Venigos la *heroojn* via vok' … [p. 321]

Neprecizaj tradukoj

¶ Interesis min, kiel eblas traduki la verson 362, kies abruptaj vortoj estas tiom fremdaj al la Esperanta prozodio:

361 Und *ziehe* schon an die zehen Jahr	Kaj jam dek jarojn *kun fervor'*,
362 **Herauf, herab und quer und krumm**	**Malsupren, supren, kurbe, rekte**
363 Meine Schüler *an der Nase* herum —	Disĉiplojn *trompas* mi perfekte [p. 73]

Prozodie la traduko estas admirinda! Du linioj sen elizio kaj en natura vortordo, ligitaj per ina rimo, sonas ne malpli energie ol la originalaj; laŭ mi, eĉ pli elegante ol la originalo. Sed la verso 362 sencas nur konekse kun la lokucio *konduki je la nazo*, kiun Schulze anstataŭigis per la interpreto *trompi.* Nu, sen *konduki* la direktaj adjektoj orfiĝas: «trompi malsupren» estas sensencaĵo.

(Cetere, kion signifas tiu lokucio? Probable ĝi devenas el la maniero konduki bovon, urson, kamelon ktp per nazringo. Tiam ĝia signifo devas esti «konduki ien ajn laŭ sia kaprico» — kaj tia estas la klarigo en PIV; do, pli konvena sinonima verbo estus ne *trompas*, sed *manipulas.* Sed la germana signifo eble estas alia. — Krome, *kun fervor'* estas troigo sen bazo en la originalo.)

¶ Faŭsto provas traduki Evangelion (Joh 1:1) — p. 127 / v. 1223:

Mi ĝin el ĉi originalo	Das heilige Original
Nun en germanan lingvon ektradukas	In mein **geliebtes** Deutsch zu übertragen

Al mi mankas grava epiteto: «en mian *karan* lingvon germanan» (Bartelmes: «en mian *amegatan* lingvon ĉizi»). — Sekvas la fama konkludo:

Jen helpas la spirit' al la imag'.	1236 Mir hilft der Geist! Auf einmal seh ich Rat
Mi skribas tuj: Komence estis *ag'*!	1237 Und schreibe getrost: Im Anfang war die *Tat!*

Ago estas taŭga traduko, kvankam *Faro* ŝajnas al mi pli konvena. Sed ĝenas, ke la longa 14-versa serĉado kulminas en stumpa singulto *ag'* — tio sonas ridinde. Mi preferas la tradukon Bartelmesan, kun la normalaj versofinoj inaj:

Spirit' min helpas! Ekvidiĝas klaro,
Mi skribas sen tim': Komence estis *Faro*!

¶ Komparu la 3-an kvarverson el la balado pri la Tulea reĝo (p. 168) en la tradukoj de Schulze (p. 168 maldekstre) kaj Kalocsay::

Kiam la morto venis,	Kaj kiam li rekonis,
Riĉaĵojn nombris li.	ke venas vivo-fin',
El ĉio li retenis	*kastelojn li disdonis,*
La vazon nur por si.	kaj ĉion, sed ne ĝin.

Laŭ Goete, mortonte la reĝo *unue*, inventaris siajn urbojn; *due*, transdonis *ĉion* al sia heredonto; sed *trie*, la pokalon li tamen ne transdonis:

2767 Und als er kam zu sterben,
2768 Zählt' er seine Städt' im Reich,
2769 Gönnt' alles seinem Erben
2770 Den Becher nicht zugleich.

La burĝeca inventarado iel banaligas la romantikan etoson de la balado; tial plimulto da tradukoj (4 el la 7 de mi konsultitaj) ĝin preterlasas (samkiel la Kaloĉaja). Cetere, mi supozas ke ĉi tie *zählen* signifas ne *nombri*, sed *enumeracii, diri la nomojn de la eroj de io* (kiel la etimologie parenca angla *tell: "he told the towns in his land"*). Tri tradukoj parolas, laŭ la originalo, pri transdono al *unu* heredanto; kvar aliaj, samkiel Kalocsay, parolas pri *disdono* (la pola traduko, eĉ pri *malavara* disdono). Nur Schulze forgesas informi pri **la dua ero**, ke okazis heredigo. (Krome, *nur* estas mislokita: ne *nur por si,* sed *nur la vazon.* Ankaŭ aliloke Schulze emas uzi *nur* postpozicie.)

Cetere, kiel lerte Kalocsay metis la unusilaban *ĝin* en la pozicion logike akcentan! La parolo fluas facile kaj libere, kaj la vira versofino sonas tute nature.

¶ «Kio tie fariĝas je l' korvoŝton'?» [p. 247] Necesas esti germano por kompreni ke *korvoŝtono* estas paŭsaĵo de *Rabenstein*, kio germane signifas *ekzekutejo*, *eŝafodo.*

Faŭsto vizitas Gretan en karcero (Bildo de Peter Joseph von Cornelius)

¶ Stranga traduko en la karcera kanto de Greta:

Fratineto mia	4416 Mein Schwesterlein klein
Per kruro sia	*4417 Hub auf die Bein'*
En lok' frida feliĉis; (?)	4418 An einem kühlen Ort;
Jen mi arbarbirdet' fariĝis;	4419 Da ward ich ein schönes Waldvögelein,
Flugu for, birdo mia! [p. 248]	4420 Fliege fort, fliege fort!

Mia traduko laŭvorta: «Mia fratineto / metis[11] [mia]jn osto[j]n[12] / en malvarman lokon; / tie mi iĝis bela arbara birdeto, / [mi] forflugas[13], forflugas!» (Kelkan tempon post ol ĉi tiu analizo estis verkita, mi rericevis la tradukon Bartelmesan, kaj konstatis ke lia interpreto identas kun la mia.)

Strebo kaj serĉo

Ŝlosila vorto de la verko estas ***streben***. En la Ĉiela Prologo la Sinjoro diras:

317 Es irrt der Mensch so lang er*strebt* Eraras homo, dum *strebadas* li (p. 67)

Tio sonas kiel «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras» [*Proverbaro*] kaj ŝajnas inviti al kvietismo. Sed en la Epilogo (vv. 11934–11937 / p. 542) tio estas prezentata kiel merito:

Gerettet ist das edle Glied
Der Geisterwelt vom Bösen,
„Wer immer *strebend* sich bemüht
Den können wir erlösen.“

Savita el malbon’ la frat’
De l’ spiritmond’ sin trovas,
Kiu persistas en *strebad’*,
Ni tiun savi povas.

Granda plimulto da tradukistoj tradukas same meĥanike: *streben → strebi*. Tamen mi havas la impreson, ke la granda poeto ne ĉiam trafe elektas vortojn (pluraj ekzemploj jam aperis ĉi-supre). Mi ne estas sola, pluraj (nemultaj) konsciaj tradukistoj tradukis *streben → serĉi*:

L’homme erre / Tant qu’il s’évertue à *chercher*. (Marc-Monnier, 1875)
Кто *ищет* — вынужден блуждать. (Pasternak’, 1948)
Bo człowiek błądzi, póki *szuka* (Antochewicz, 1978)

T. e. «Serĉanto devas vagi» (kaj sekve iam erarvagi). Tio donas klaran kaj konvinkan bildon, fakte la heŭristikan metodon «serĉi per provoj kaj eraroj».

Konkludo

Laŭ K. Schulze (p. 20):

> En la traduko oni devas konservi la ritmon, la metrikon de la verso kaj la rimstrukturon, kiaj tiu neceso ofte devigas la tradukanton iomete devii de tiu teksto, kiu estas fiksita en la kapoj de *la germanoj*, kiuj konas sian Faŭston. [Ĉi tie kaj poste la kursivoj estas miaj. — *S. P.*]

Mi provis montri, ke «konservi la metrikon» ne ĉiam eblas nek ĉiam dezirindas. Per sia heroa entrepreno K. Schulze pruvis, ke en la okazo de Esperanto tio certagrade eblas (por la akcentopulsaj esperantistoj), sed kiapreze? Goeto faris por sia «Faŭsto» belajn vestojn laŭ la mezuroj de la germana lingvo; tamen sammezuraj vestoj ne sidos egale bone sur la pli grandkreska (longvorta) Esperanto: tro striktaj, ili estos ĝene malkomfortaj. Ĉiupaŝe frazo, kiu germane fluis libere kaj facile, en Esperanto iĝos prodaĵo, venko super la rezistanta materialo.

> Kaj la tradukinto estas tute ne certa, ĉu *germana* esperantisto poste estos preta rekoni la tradukon adekvata kaj trafa, se ĝi ne enhavas tiun aŭ alian vorton, esprimon aŭ bildon. Kaj mense la tradukinto jam vidas, kiel tiu esperantisto levas sian montrofingron por anonci sian proteston aŭ almenaŭ sian malaprobon pro tia fuŝado de la majstroverko.

Mi havas du objetojn, la dua sekvas el la unua:

1. Esperantigo atentu la publikon internacian ne malpli ol la fontlingvan.
2. Tradukante oni pli zorgu pri la pensoj ol pri la parolturnoj.

Mi komprenas ke la germanoj povas ŝati *pudelan kernon* kaj similajn strangaĵojn kiel oni ŝatas nevuson sur amata vizaĝo; sed internacie tio estas nur strangaĵo. Eĉ pli malbone estas pri *korvoŝtono*, kies timigan signifon alilingvano simple preteratentos.

Konekse kun la dirita bedaŭrindas, ke al la eldono kontribuis nur germanoj (almenaŭ tiel ŝajnas laŭ la antaŭparoloj): *Ulrich Becker, Käthe Schulze, Barbara Krone, Monika Ludewig, Ino Kolbe, Detlev Blanke, Wera Blanke, Sabine Fiedler*… Kunlaboro kun esperantisto(j) el alitipa kultura kaj lingva rondo probable estus utila.

Tamen eĉ por la germanoj la teksto prezentas problemojn, kaj Bartelmes honeste avertas en sia Enkonduko:

> Kiuj konas la originalon, scias, ke ekzistas multege da malfacile kompreneblaj frazoj, sentencoj kaj eĉ unuopaj vortoj en la verko.

Sekve la tradukanto devas aŭ klare interpreti la malklaraĵojn (kun la risko erari en sia interpreto), aŭ komenti ilin. Nu, komento estus instrua por tiuj, kiuj studas la verkon kiel kulturan artefakton; sed ĝena por la artisma impreso. Komento ne disponeblas por la teatraj spektantoj; sed en Esperanto «Faŭsto» probable restos nur *legodramo* (*Lesedrama*).

Ho ve, en Esperanto mankas komentaro pri «Faŭsto». Bartelmes rekomendas al la interesitoj «uzi ian komentan libron pri tiu verko en sia nacia lingvo». La recenzata eldono entenas glosaron por la Dua Parto, sed nenion por la Unua.

En pluraj naciaj lingvoj ekzistas apartaj tradukoj: la filologiaj (eventuale prozaj aŭ blankversaj), kies celo estas fidele traduki la ideojn kaj tropojn (kun konvenaj komentoj) — por la homoj studantaj la koncernan lingvon aŭ verkon aŭ aŭtoron; kaj la poeziaj, adaptitaj al la cellingvo, kiujn oni ĝuu kaj surscenigu. Por ambaŭ tipoj la katenoj de la originala metriko tro ĝenas (krom se la cela lingvo proksimas al la fonta); kaj mi ne komprenas, kial tio estus utila — krom se oni tradukas celante muzikan interpreton, ekz-e la baladon pri la Tulea reĝo fare de Ŝuberto.

K. Schulze faris kolosan laboron, sed supozeble la sanstato kaj la morto ne lasis al li sufiĉan tempon por ĝin finredakti kaj poluri. Iujn el la evidentaj korektoj povus fari redaktoro (ekz-e unuecigi la sporadajn Korusojn kun la evidente preferataj Ĥoroj; sed aliaj necesigas reverkon de versoj — precipe por korekti la sisteman eraron en negado.

Filologie la recenzata eldono ne atingas la nivelon de la modelaj eldonoj de kompareble grandaj klasikaĵoj, ekzemple: *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz/Grabowski (eĉ tiu de 1918, sen paroli pri la pli impona eldono de 1955), aŭ la Danta-Kaloĉaja *Infero* (LM 1933, 2a eld.: LF-koop 1979).

Pluraj aliaj problemoj de la traduko spegulas problemojn de la originalo. Ĉi tie ne estas loko por pridiskuti ĝian valoron: la reputacio de la verko estas firme establita en la monda literaturo. Kaj disponeblo de ĝia plena traduko en la literaturo Esperanta siavice grave plifirmigas ties reputacion.

Notoj de la recenzinto

1. La libro uzas la malraciajn “Anglalingvujajn citilojn”, maloportunajn por Esperanto, kaj ĉi tiu titolo bone ilustras tion. Vidu mian artikolon «Pri apostrofoj kaj citiloj en Esperanto».

2. En la rimskemoj la inajn rimojn signas *M*ajusklo kaj la virajn, *m*inusklo.

3. «**Goet/o**. Germana poeto, romanisto k dramisto (*J. W. von Goethe*, 1749−1832), aŭtoro de „Faŭsto“» [PIV].

4. «Eŭgeno Onegin», 8:50 (tr. N. Nekrasov, SAT, 1931).

5. Ŝilero tr. Zamenhof’: *Rabistoj*, 4:5.

6. Germane *Frosch* signifas «rano»; ĉu Goeto aludas la vulgaran moknomon de la francoj (*Froschfresser*)? Ĉu tio estas iel tradukenda?

7. Ekz-e en la versaĵo de S. Jesenin «Jam forparolis **arbareto ora** …» (Tr. K. Gusev, LOdE 26:17).

8. La traduko de H. A. Холодковский.

9. Fakte, la historia Faŭsto mem estis unu el la *scholastici vagantes* (*Epistolarum medicinalium Conradi* ***Gesneri***. 1577, Liber I epist. 1).

10. PIV2002 donas **Valpurg·o**→*Valpurga nokto*, kaj la argumentadon por la o-formoj en sia Antaŭparolo (p. 23).

11. *etwas aufheben:* etwas nicht wegwerfen, sondern behalten.

12. Normale *das Bein* signifas «gambo», sed iam ankaŭ «osto»: *Die ist nun Bein von meinem Bein* (Lutherbibel, *Gen* 2:23). Kp la anglan *bone*.

13. Sintakse tio pli similas imperativon: «[vi] forflugu»; sed situacie mankas la ordonanto kiu transprenus la parolon. Tial «mi iĝis … [kaj] forflugas».



Plia paŝo al ĝisdatigo, kvante kaj kvalite

Sten Johansson. *Plia dozo da prozo. Dua literatura esearo.* – Mondial: Novjorko, 2024. – 185 p.

Imagu, ke vi troviĝas en muzeo: de la muroj pendas, disigitaj unu de la aliaj, belegaj bildoj, diverstemaj kaj diversstilaj; la okulo simple transiras de unu al la alia, ne kuntrenante senton de kontinueco.

Tia vi vin sentas ĉe la legado de *Plia dozo da prozo – dua literatura esearo* (Mondial, 2024) de la sveda urbadministra oficisto Sten Johansson (1950), emeritiĝinta en 2014. Tia aŭtoro ne bezonas enkondukon; lia retejo OLE, fondita en 2000, enhavas centojn da ligoj al tekstoj kaj recenzoj de literaturaj verkoj. Kvankam ĝia dimensio estas ligita nur al verkistoj kiuj publikigis presitajn memstarajn librojn, do ne estas tie klasataj kiuj nur verkis, eĉ se abunde, en revuoj, kiel ekzemple Perla Martinelli aŭ Alessio Sacha Giordano aŭ mi mem, ĝi estas elstare reprezenta pri nia originala literaturo: plurmiloj da elementoj, citoj, ligoj. Ankaŭ la temo estas interpretata restrikte: mia nomo ne troviĝas tie kiel literatura aŭtoro, kvankam (kun)verkinto de *Historio de la Esperanta Literaturo* (HEL) kaj verkinto de *Historio de la Akademio de Esperanto*; same ne troviĝas, ekzemple, Alcalde, kiu aŭtoris historiaĵojn. La esperantlingva verkaro de Johansson (se ne paroli pri la svedlingva) ampleksas 26 originalajn librojn plus amason da malpli grandaj eroj (noveloj, eseoj) distie aperintajn, kaj dek ok tradukojn.

Nia muzeo do komenciĝas kiel laŭskema ripeto de jam aperinta esearo *Prozekroze* (2013); en ĉi-lasta estis traktataj dek du verkistoj, en la nuna ili estas dek ses, kaj ankaŭ ĉi-foje Johansson startas per tre mallonga enkonduko pri la evoluo de la prozo en la lastaj du jardekoj. Li ne ripetas la enkondukan eseon aperintan en tiu pli frua esearo, klopodanta redakti historion, ankaŭ ĉar intertempe aperis HEL, kiu fariĝis referenca punkto pri la koncerna temo, sed kiun Johansson, nekompreneble, entute ne citas. Fakte ĉiuj biografiaj elementoj pri la traktataj aŭtoroj kaj ankaŭ multaj kritikaj komentoj de Johansson troviĝas jam en HEL (kompreneble nur ĝis 2013), sed la nuna verko estas, por ĉiu pritraktata aŭtoro, pli freŝdata, pli ampleksa kaj tial pli studinda. Ne ĉiujn literaturkritikajn asertojn mi kundividus, sed ja salutinda estas la abundo kaj profundeco de la pritrakto.

Ne sencas fari klasifikon inter la aŭtoroj: al mi pleje plaĉis la pritrakto de la virinoj, Clelia Conterno Guglielminetti, Lina Gabrielli, Lena Karpunina kaj Anna Löwenstein. La soleco kaj de Lina kaj de Lena, la humura revivigo de antaŭgeneraciaj situacioj far Clelia kaj la historia rigoro de Anna estas tute adekvate spegulitaj ankaŭ

per abundaj ĉerpaĵoj el la verkoj, kaj la kuraĝigo al legado estas ne preteratentebla. Legado, legado, legado estas la alvoko kiu elvenas de ĉiu paĝo, kaj sendube kelkaj aŭtoroj ne havis la necesan atenton far la publiko, se ankoraŭ ĉe la libroservoj estas je dispono verkoj de antaŭ pli ol duonjarcento, kiel *Bagatelaro* (1951) de J. H. Rosbach. La pritraktita *Auli*, ĉarma longa rakonto de Adamson pri estona knabeto, aperinta ĉe *Literatura Mondo* en 1934, povis ja profiti de represo far la meritplena eldonejo Iltis en 1983, sed forpasis jam 40 jaroj, kaj ĝi plu sin proponas el deponejo.

Kvankam la kerno de la verko estas la pritrakto de la menciitaj aŭtoroj, mi menciu la unuajn paĝojn, kiuj prezentas la “bazan legoliston” de Auld de 1988 kaj de li ĝisdatigitan en 1997, kun proponoj pri aldonoj pri prozo far Johansson mem kaj pri poezio far Suso Moinhos kaj Nicola Ruggiero (mi estis min proponinta al Johansson por tia aldono, sed la proponon li lasis forfali). El la 16 propone aldonitaj pri poezio, naŭ estas de latinidaj poetoj, kiuj aldoniĝas al ses el 27 de la Aulda listo, kiu estis geografie tre pli ekvilibra.

Ni diru, ke tiuj unuaj paĝoj tuŝas flankan, tamen gravan problemon: se devus temi pri “baza” literaturo koninda de klera esperantano, jam trideko da verkoj poeziaj kaj samnombro da prozaj estus ege pli ol sufiĉaj por esti encerbigitaj; tial eĉ se oni volus enpreni, kaj certe kelkaj ja estas enprenindaj, por doni ĝisdatan liston, oni devus forigi kelkajn, kiuj en la taksado entuta pri la pli ol 130-jara literaturo ne plu aspektas absolute nerezigneblaj, ekzemple: *La granda aventuro, Kredu min sinjorino, Vitralo, La stranga butiko, Meznokto metropola*. Se oni neglektas ĉi tiun principon, je ĉiu kvaronjarcento la “baze konendaj” iĝus pli kaj pli multaj. Se krome oni rigardas harfende la aldonojn, se certe estas enmetinda unu el Camacho, dua aspektas troa: li jam havas kroman partoprenon en la du iberaj antologioj *Ibere libere* (1993) kaj *Ekstremoj* (1997); same troas du pri Nervi. Tial la klopodo starigi aktualan bazan liston estas laŭdinda, sed la kunon oni devas preni kun rezervoj.

La lastaj paĝoj estas ekstreme interesaj kaj tuŝas tute originalan temon: kiel verki romanon. Johansson parolas pri la siaj, pri kiel konturiĝis en lia menso, kaj poste en la fina redakto, ideoj, protagonistoj, rolantoj, konfliktoj inter ili, pri kiel ili evoluis aŭtonome sen specife aŭtora intenco. Ni ja estas kvazaŭ envolvitaj en verkadon mem de romano, pri kiel ĝi ampleksiĝas de novelo al pli vasta dimensio, pri kiel aperas flankaj rolantoj kaj etdimensiaj situacioj. Simpatie, ke Johansson instigas al legado, kapablo kiun li akiris jam trijara pro la instruado de pli aĝa fratino kaj ties amikino; al mi okazis same, mia frato du jarojn pli aĝa ol mi kapablis legi jam trijara pro instruo far nia karmemora Panjo kaj transigis tiun kapablon al mi; mia unua filino havis ĉe sia lulilo grandan afiŝon de la madrida UK (1968) kaj jam dujara kapablis distingi kaj legi majusklajn grandformatajn literojn…

El ĉiu parto de tiu ĉi verko multon oni povas lerni: kelkaj legantoj luliĝos en la ĉerpaĵoj de la pritraktitaj verkoj, aliaj enprofundiĝos en la demandon pri kiel fariĝi romanisto, aliaj simple lasos sin fluigi de la tre kunprena stilo de Johansson, aliaj estos stimulitaj al personaj komparoj kaj instigitaj al kunpartopreno en la familiaj

eventoj de Marina, laste akuŝita protagonistino de la romanoj de Johansson mem, aliaj retrospektos al kiel estis la apendicaj romanoj de la plej frua esperantismo far la franca kuracisto Henri (laŭnaskiĝe: Marie Léonce) Vallienne kaj la britiĝinta germano Heinrich August Luyken, kiuj produktis ses romanojn (po du kaj po kvar respektive) inter 1907 kaj 1924. Legu, studu, ĝuu!

Carlo Minnaja

Albumeto agrabla sone, sed malriĉa je enhavo

Tim. *Bela vivo*: Bitalbumo. – Donneville: Vinilkosmo, 2024.



La aŭtoro de la recenzata albumo kaŝas sin malantaŭ pseŭdonimo TIM, sed, espereble, mi ne faros grandan krimon, se mi tuj prezentos lian veran nomon. Li estas Thimoty Gallego Pineda, jam ne tro nova kaj tial pli-malpli konata Esperanto-muzikisto, devenanta el Kolombio (sed pasiginta multajn jarojn en Eŭropo). Li debutis kiel Esperanto-muzikisto kaj aŭtoro en 2018 dum la IJK, okazinta en Badajoz (Hispanio), kaj tuj akiris ioman popularecon, kio sekvigis kelkajn pliajn liajn prezentojn dum eŭropaj Esperanto-renkontiĝoj. Lia unua albumeto *Vaganto* (kun ses pecoj), estis eldonita de Vinilkosmo somere 2020. Kaj jen venas la dua albumeto *Bona vivo* same kun ses pecoj, sed fakte temas pri kvin kantoj, dum la aldona fragmento estas nur karaokea versio de la kanto *Amorantoj.*

Ĉiuj kantoj estis verkitaj kaj komponitaj de la artisto mem (escepte de unu teksto, *Fino de la Tempo*, aŭtorita de Miguel Gutiérrez, kiu respondecis ankaŭ pri la lingva polurado de ĉiuj aliaj tekstoj); ankaŭ pri la muzikado respondecis la aŭtoro mem (kun okaza partopreno de Marcus Ganado pri drumoj), do temas pri vere intime aŭtora kaj soloista projekto. La domina muzika stilo de la albumo estas nelaŭta, iom milda, melankolia kaj minora “sendependa” pop-roko, spicita per “ambienta” (ŝveb-sona) koloro.

Malgraŭ la entute bona kaj ekvilibra (eĉ, mi konfesas, iom sorĉa!) sono, al la muzikoj mankas eĉ iomete atentokaptaj melodioj; ĉiu peco impresas iom gume kaj viskoze (interalie – pro multaj ripetoj muzikaj kaj tekstaj), tute mankas iu muzika intrigo aŭ evoluo. Rezultas do *nur-por-fona* muziko, apenaŭ interesa ĉe atenta aŭskultado. Mi ege bedaŭrus malĝojigi la artiston kaj liajn fanojn, sed mia impreso post kelkfoja traaŭskulto estas certa kaj definitiva: malgraŭ la ĝenerale agrabla sono la albumo fakte prezentas nur tedetan muzikaĵ-kolekton…

La tekstoj estas eĉ pli senpovaj, ol la muzikoj, mankas al ili ritmoj kaj rimoj. Temas pri prozaj impresoj, rememoroj, sopiroj, revoj kaj imagoj pri amo kaj amorado

fone de naturaj pejzaĝeroj kiel pluvo, nokto, ĉemara sablo, sunsubiro, steloj ktp. La teksto de la lasta kanto (*Fino de la Tempo* de Miguel Gutiérrez) estas multe pli klara kaj impresa, ol la originalaj tekstoj de la ĉefaŭtoro, sed ankaŭ ĝi neniel estas elstara kantoteksto. Eĉ malgraŭ la absoluta lozeco de la tekstoj, la aŭtoro ne sukcesis eviti kelkajn mislokitajn akcentojn (vera plago por la plimulto de Esperanto-kantoj!). Feliĉe, almenaŭ ĉiuj akuzativoj ŝajnas stari sur la ĝusta loko. La agrabla voĉo de la kantisto (ŝajnas al mi, ke oni ja povus fari ĝin iom pli laŭta kaj reliefa dum la miksado) bone kongruas kun la muzikoj, sed ne povas savi la albumeton el evidenta trosimpleco.

La ĝenerala sono de la albumeto ja plaĉis al mia orelo, sed la tuto estas tamen evidente malriĉa kaj nesufiĉa por komplezi ne nur la orelon, sed ankaŭ la menson. Mi do prezentos iom strangan resumon: *sone kaj fone* la albumo tute bonas, sed eĉ minimumaj penoj pri pli atenta aŭskultado jam detruas la unuan impreson. Al la ŝatantoj de fona Esperanto-muziko la albumeto taŭgos kaj eble eĉ plaĉos; sed tiuj, kiuj adoras pli-malpli riĉan, sencohavan kaj artoplenan Esperanto-muzikon, prefere zorgu pri iu alia mendo.

Paŭlo Moĵajevo

La Zagreba lernolibro de Esperanto en la svahila



Kroata Esperanto-Ligo publikigis en Tanzanio novan lernolibron de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en la svahila lingvo. La lernilon adaptis al la svahila burundano Eric Nsabiyumva. La svahila lingvo estas parolata de ĉ. 100 milionoj da homoj en orienta Afriko en 12 landoj. La libro estis presita en Aruŝa, la kongresurbo de la 109a Universala Kongreso de Esperanto.

Tridek unuaj ekzempleroj estis senpage distribuataj dum la Movada Foiro en Aruŝa. Postkongrese ĝi estas havebla ĉe Kroata Esperanto-Ligo kontraŭ 10 eŭroj, plus sendokostoj.

Ĝi estas la 22a lingva presita lernilo lanĉita de Zlatko Tišljar kaj liaj kunlaborantoj en 1978. En multaj pliaj lingvoj ĝi konsulteblas ĉe https://esperanto12.net.

Spomenka Štimec

Pro la enorma amplekso de ĉi tiu eldono de "La Ondo" ni devis prokrasti al decembro aperigon de kelkaj tekstoj, inkluzive de la prezento de Kantabriaj poetoj en la poezia serio de Miguel Fernández.

Rapidu, vagonaro!

Sep monatojn post la apero de la unua unuopaĵo *La junularo de hodiaŭ* la Berlina rokbando *La Mondanoj* la 19an de julio revenis kun sia dua unuopaĵo *Rapidu, vagonaro!*

La Mondanoj estas Esperanto-rokbando el Berlino, fondita en 1983. En la 1980aj jaroj *La Mondanoj* ofte ludis en regulaj muzikkluboj en Germanio kaj ĉe Esperanto-eventoj en Hungario, Pollando, Francio kaj Germanio. Ĝi malfondiĝis en 1987 post la fina koncerto okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto en Krakovo.

Fokusiĝante pri siaj karieroj kaj familioj, Tom, Carsten kaj Aaron neniam perdis sian entuziasmon por muziko kaj restarigis la grupon en junio 2023. Ilia muziko kombinas klasikan rokon, funkon, bluson kaj aliajn influojn en unikan miksaĵon kiu kongruas kun la bela sono kaj homarana mesaĝo de Esperanto.

La konstantaj membroj de *La Mondanoj* estas:

Aaron Koenig: ĉefkantado kaj ritmogitaro

Carsten Kindermann: basgitaro kaj korusoj

Tom Wunderlich: ĉefgitaro kaj korusoj

La dutitola unuopaĵo (la kanto kaj la instrumenta versio) estas akirebla elŝute en la muzika platformo de Vinilkosmo https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/po-po-roko-hiphopo-elektronik/la-mondanoj kaj en ĉiuj kutimaj elsendfluaj platformoj.

La oficiala muzikvideo estas spektebla en Jutubo:
https://www.youtube.com/watch?v=3Xbb5_0ODsM

Floréal Martorell

La 3a Interkultura Novelo-Konkurso

La 4an de aŭgusto, dum la 109a Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio, estis anoncitaj la gajnintoj de la tria Interkultura Novelo-Konkurso (INK). Jen la 11 premiitoj:

Sperta kategorio

1. Vincenza Giubilei (Italio): *La najbaro (Il vicino di casa)*
2. Salvatore Amato (Unuiĝinta Reĝlando): *La gusto de libereco (Il sapore della libertà)*
3. Jorge Rafael Nogueras (Portoriko): *… kaj la fenestroj, okulojn*
4. Ekaterina Irtegova (Rusio): *Nervozaj rozoj (Нервные розы)*
5. Davide Bacchilega (Italio): *La luantino supre (L'inquilina del piano di sopra)*

Komencanta kategorio

1. Leila Mohammad Alizadeh Niku (Irano): *Reviviĝo*

2. Gelia Alekseeva (Ukrainio): *Ora sablo (Золотой песок)*

3. Anastasia Vashenko (Ukrainio): *Laŭ la spuro de paneroj (По слiду хлiбних крихт)*

4. Elisabetta Cammarata (Italio): *La klaŭno (Il pagliaccio)*

5. Evgenij Mirmovich (Rusio): *Korvaĉo (Карга)*

Honora mencio (la plej bona juna verkisto)

Gerard Fondevila Carreras (Hispanio): *La nokto de malkovroj (La nit dels descobriments)*

Elkorajn gratulojn al ĉiuj gajnintoj!

La novelaro *La sekreta vivo de miaj najbaroj* kun la finalistaj noveloj de la tria Interkultura Novelo-Konkurso disponeblas jam ĉe KAVA-PECH. Mendu ĝin tuj kaj malkovru la 35 sekretojn ĉe https://www.kava-pech.cz/#/eo/b/ZqIGIxAAACAAxeeE/36-noveloj-de-interkultura-konkurso.

Vi povas spekti la videon kun la anonco de la gajnintoj en nia Jutubo-kanalo https://www.youtube.com/watch?v=hMYJ2uFKyzU.

Bobelarto

Unesko-Kuriero: Konstrui por estonteco

«Arkitekturo estas esprimo de la maniero, kiel ni volas vivi kaj funkciigi nian estontecon. Ĝi estas tiel en la koro de nuntempaj aferoj – precipe daŭripova disvolviĝo. Unu nombro resumas la skalon de la defio: la konstrua sektoro – inkluzive de konstruado kaj energikonsumado – reprezentas 39% de la tutmondaj CO_2-emisioj. Ĉi tio ilustras la urĝan bezonon gvidi “verdan revolucion” en arkitekturo, ne nur por konservi nian planedon, sed ankaŭ por igi ĝin pli agrabla loko por vivi», – skribis Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, en la ĉefartikolo de la unua ĉi-jara kajero (januaro-marto 2024) de *Unesko-Kuriero*, aperinta en la elŝutejo de Unesko.

“Konstrui por estonteco: Al daŭrigebla habitato” estas la ĉefa temo de ĉi tiu eldono. Ĝin traktas jenaj tekstoj en la sekcio “Larĝa angulo”:

Henrik Schoenefeldt: Arkitektoj kaj urbaj planistoj ĉe avangardo

Leïla el-Wakil: La reveno de loka tradicia arkitekturo

Zofeen T. Ebrahim: Bambuaj domoj moderigas la efikojn de klimatŝanĝiĝo en Pakistano

Barbara Hallmann: La tegmentaj ĝardenoj de Vieno

“Nuna afrika urbo estas produkto de apartiĝo de la naturo” (Intervjuo kun Sénamé Koffi Agbodjinou)

Natalie Mossin kaj Henriette Ejstrup: La aldonvaloro de aktualigo de ekzistantaj konstruaĵoj

Anuliina Savolainen: Nyasha Harper-Michon, konstruema virino

Saili Sawantt: La arkiteknologia generacio

Katy Gillett: Solvo de konkreta problemo per salo en Dubajo

“La daŭripova arkitektura ‘sistemo’ evoluis kiel movado” (Intervjuo kun Wang Shu)

Unesko-Kuriero aperas en la ses oficialaj lingvoj de Unesko kaj ankaŭ katalune, Esperante, portugale, kaj koree. La Esperanta versio (52-paĝa) de la januara-marta *Kuriero* estas senpage elŝutebla (laŭ la normo pdf) en la retejo de Unesko:

https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000388425_epo

AlKo

Literatura Foiro, 2024, №330

La aŭgusta numero 2024 de *Literatura Foiro* proponas, kiel kutime, alloge buntan menuon. Ĝin inaŭguras fama uvertura poemo de la 16-jara Arthur Rimbaud, per traduko de Kálmán Kalocsay. Poezio gastas lirike ankaŭ per Minosun, humure per Carlo Minnaja, traduke per la maltano Ĝiorĝ Pisani, esperantigita de Carmel Mallia.

La originalan prozon reprezentas rakonto respektive novelo de Yin Juaxin kaj Nicolino Rossi. Por la serio “Militliteraturo” brilas juvelo el la franca: *Subpafe* (Le feu), de Henri Barbusse, fragmente tradukita kaj vaste komentariita de Giorgio Silfer, kies plumo, cetere, regalas la legantojn per recenzo pri la teatraĵo *Edmond* (2016), de Alexis Michalik, kiu surscenigas la vivon de Edmond Rostand, la aŭtoro de *Cyrano de Bergerac.*

La rubriko “Packulturo” gastigas specimenon el *Interpopola konduto*, de Edmond Privat, kun komentario de Perla Martinelli. La feminaj paĝoj de la numero estas dediĉitaj al Helen Adams Keller, Lilia Nikolova kaj Katalin Karikó, per kontribuoj de Stella Meester, Elena Popova kaj Helmi Martikainen.

Pri kino intervenas Renée Triolle, recenze al du kvazaŭ-amatoraj dokumentaj filmoj, kaj muzikon pritraktas Juan García del Río, kiu malkovrigas furoran protagoniston de la nederlanda popolkanto. Belarto ĉeestas per enkonduko al la vivo kaj

la artaĵoj de Elizabeth Catlett, fare de Alessio Giordano, kiu krome daŭrigas sian esearon pri la revuo *Frigidaire* en dediĉita artikolo.

Esee kontribuis ankaŭ Jesper Lykke Jacobsen, pri la utilo krei korpuson de esperantaj revuoj, kaj Fernando Pita, pri la filozofio kaj la pedagogio de Komenio.

En vitrino recenzoj pri *Semo de matenruĝoj* (2023) de Miguel Fernández, *Stranga malapero* (2023), de Marie-Laure Lions-Oliviéri kaj *El mirinda mondo de kaktoj* (2024) de Oldřich Arnošt Fischer. **HeKo**

Literatura Foiro, 2024, №331



Kiel oni rimarkis el la kvar jam presitaj numeroj, la ĉi-jaraj kovropaĝoj elstarigas la pentraĵojn de Maja Gorova, vicprezidantino de Bulgara Esperanto-Asocio kaj filino de la esperantista verkisto Ĥrima Gorov, kies belartaj kompetento kaj sentemo evidentiĝis per pluraj ekspozicioj lokaj kaj internaciaj. Kongrue kun la jara temo, “Paco kaj Milito”, la redakcio elektis ses reprezentajn bildojn el ŝia repertuaro: la ĉi-numera, titolita “Templo”, portretas la vunditan sopiron al reala paco.

La 64-paĝa revuo uverturas per fragmento el la 15a kanto de *La infana raso*, kies temo bedaŭrinde tro bone spegulas nian nuntempon. Por omaĝi la 100an datrevenon de la naskiĝo de William Auld, plaĉis al ni honori la memoron de LF-kunlaborinto kaj prezidinto de Esperanta PEN-Centro per la republikigo de intervjuo, okazinta la 6an de marto 1998 inter li, lia edzino Meta Auld kaj Giorgio Silfer. La numero dediĉis ankaŭ memoran nekrologon al István Szerdahelyi, unua lingvistika redaktoro de *Literatura Foiro*, eminenta lingvisto kaj esperantologo.

La rubriko pri Packulturo gastigas la esperantigon de la respondo de Sigmund Freud al Albert Einstein, *Pro kio milito?*, tradukita de Vinko Ošlak. Dume, inter la paĝoj de Militliteraturo trovas lokon eljapanigo de Suzuki Tadaiti pri dummilita virina perforto. Post longa hezito, ĉu – kadre de la ĉi-jara temo bedaŭrinde trudita de la monda situacio – publikigi tiun fragmenton, la redakcio konkludis ke ja necesas konscii kiel draste la milito perturbas la mensojn: ni jam provis per *La buĉisto* de Sándor Márai, en LF 329, sed ĉi tiu teksto estas des pli ŝoka, ĉar ĝi reliefigas la martirigon de virinoj.

Ĉi-rilate ni elektis ankaŭ artikolon de Helmi Martikainen pri Nadia Murad, iraka aktivulino gajninta en 2018 la Pac-Nobelon pro la klopodoj ĉesigi la uzadon de seksa perforto kiel armilo en militoj kaj armitaj konfliktoj. Sed aliaj tri virinoj elstaras en la numero: temas pri Elena Popova, kiu regalas la legantojn per sep originalaj hajkoj, Grazia Deledda – en traduko de Carlo Minnaja el la itala – kaj Gae Aulenti, sola elstara ina arkitekto de sia generacio prezentata de Stella Meester.

Juan García del Río proponas komparon inter la muziko de Pat Metheny kaj Lito Vitale, sin bazante sur hereza demando: kiun el la du Dio pli bone aŭskultus? Legu ĝis la fino por trovi respondon!

Alessio Giordano raportas pri sia partopreno en la Internacia Festivalo de la Fantastaj Filmoj, okazinta en Neuchâtel de la 4a ĝis la 12a de julio 2024, el kies programo li recenzis *Spalovač mrtvol* (1969), reĝisoritan de la ĉeĥo Juraj Herz, kaj la grekan filmon *Arkantia* (2024), de Yorgos Zois.

Esee elstaras ampleksa analizo de Rubèn Fernández Asensio pri la paralelaj sortoj de jido kaj esperanto, kiu montras la defiojn kaj la sukcesojn de ambaŭ lingvoj; sekvas intervjuo de Alessio Giordano al Vincenzo Sparagna, fondinto kaj eterna direktoro de unu el la plej gravaj, tamen ekstravagancaj, italaj kulturaj revuoj: *Frigidaire.*

En vitrino vi legos recenzon de Giorgio Silfer pri *Memoru ĉi praulojn* (2020), de Humphrey Tonkin; Perla Martinelli komentarias *Sinjorino en ruĝo sur griza fono* (2023) de Miguel Delibes, esperantigitan de Antonio Valén. Fine, sed ne fone, Enrico Dovigo priskribas la indon de *Amu min, mia ido!* (2024), aŭtorita de Elena Popova. Poezie fermas la numeron nova kontribuo de Nicolino Rossi *Paco stompita*:

… Tristas somero
sur la mondmap' makuloj
milit-indikaj
obliĝe plu sinuas
pac-esperon detruas…

La revuon posedas, eldonas kaj administras Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop). Ĉefredaktoro Perla Martinelli, vicĉefredaktoro Alessio Giordano. Prov-ekzemplerojn kaj abonon bonvolu trakti tra lf-koop@esperantio.net. **HeKo**

Mozaiko

Se en Esperanta teksto presita aŭ reta vi rimarkis amuzan mistajpon aŭ alian kuriozaĵon, ne forgesu sendi ĝin al István Ertl aŭ al nia redakcia adreso. (La supra foto, trovita en Fejsbuko montras nian “reduktoron” dum prelego en la 58a BET en Tartu.

Bonan vojaĝon!

Eta plukaĵo da ŝercoj, publikigitaj okaze de la Monda Turisma Tago, ĉiujare festata en la mondo la 27an de septembro.

Turisto demandas: “Danke al frazlibro mi lernis demandi pri la vojo al hotelo aŭ vendejo. Sed kiel mi komprenu la respondojn?”

Laŭdire, se enigi bastonon al riĉa grundo de Taitio, matene ĝi transformiĝos je frukta arbo. Se fari same en Napolo, matene ĉirkaŭ la bastono amasiĝos fotantaj turistoj.

Limgardisto demandas turiston en la Pariza flughaveno:
– Celo de via vizito?
– Fanfaroni en Fejsbuko kaj Telegramo.

Kiel bone sin prepari al vojaĝo? Plej gravas duonigi la nombron de la kunprenotaj objektoj kaj duobligi la kunprenotan monon.

Ĉiĉerono gvidas turistojn tra longa kaverno kaj montras kelkajn skeletojn, ĉenitajn al muro. “Sed kio okazis al ili?” – “Ili ne donis temonon al sia ĉiĉerono!”

– Kiel pasis via feriado?
– Duonon da ĝi mi pasigis en montaro!
– Kaj la alian duonon?
– En gipsobandaĝo…

Grupo da turistoj subite alfrontas urson en arbaro. Gvidanto trankviligas ilin: “Ne timu, evidente ĝi jam estas sata!” – “Kial?” – “Mi jam longe ne vidas Johanon inter ni…”

Ĉiĉerono post longa marŝo alparolas sian grupon supre de la alta monto:
– Mi havas por vi du novaĵojn – bonan kaj malbonan. La bona estas ke kun granda peno ni tamen atingis la montosupron!
– Hura!!! Kio estas la malbona?
– Ni venis al malĝusta monto…

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Sendu viajn ŝatatajn ŝercojn, kaj eble iu(j) el ili aperos en “La Ondo”.

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Efektiva partiestro

Xi Jinping, ĝenereala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, faris gravan paroladon… (*Por potencigi la armeon necesas bone uzi militajn kompetentulojn*, 29 jul 2022, esperanto.cri.cn/recomended/3834/20220729/774265.html)

Ursa servo al nia beletro

La tekstoj de la premiitaj verkoj de la Belartaj Konursoj 2023 (https://esperanto-literaturo.com/ kaj https://librejo.com, stato 26 sep 2024)

En barko senpilota?

14:15: Ĉiĉerondado en la biblioteko (Auld estos celebrata en Edinburgo, https://esperanto.org.uk/news/courses-events/auld-estos-celebrata-en-edinburgo-r247, 22 sep 2024)

Postvivaj studoj

La mortinto studentiĝis ĉe fako germanlingvo ĉe Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj… (*TERanidO*, 2024, №332, p. 5.)

Gramera moŝto

Post li pri la landa kultura kaj ekonomia evoluo penis zorgi lia bonepo, granduko Aleksandro. (Šilas V. *Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno*, https://sezonoj.ru/2024/09/bet-148, 9 sep 2024)

Prefere Esperante ol virine

Esperanto estas… relative facile lernebla lingvo. Neniam mi sugestis, ke ĝi estas malfacila kiom la araba, ina aŭ rusa (Stefan MacGill, https://groups.io/g/uea-membroj/topic/108123472)

Kie la muzoj loĝas…

En Kaŭno estas pli ol 40 muzeoj kaj muzejetoj. (Šilas V. *Kaptu la okazon por trovi la urbon Kaŭno*, https://sezonoj.ru/2024/09/bet-148, 9 sep 2024)

Ni zumas kaj zumas konstante

Jen tre rezuma filmeto pri la 109a UK. (FB-grupo Esperantujo, https://facebook.com/groups/185357291508002/posts/8193164837393834)

Universala kondicionalo

… sume 854 homoj el 66 landoj aliĝis al la 109a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazus de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2024 en Arušo (Tanzanio). (https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-48, 24 aŭg 2024, trovis Ionel Oneț)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tôkyô-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornella de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave. #100, Sacramento, CA 95811. Rete: eusa@esperanto-usa.org.





Tolkien en Esperanto



Mendu ĉe via libroservo.

ESPERANTO ESTAS PLI OL LA MOVADO

De 40 jaroj MONATO raportas ne pri Esperanto sed en Esperanto pri la plej diversaj flankoj de la homa socio: politiko, scienco, ekonomio kaj ĉiaj temoj de la moderna vivo. MONATO estas plenkolora kvalitmagazino por postulemaj legantoj, kiuj volas esti funde informitaj.

Jen kelkaj bonaj kialoj por aboni ĝin nun:

- **Nun novaj abonantoj ricevos MONATON dum tri monatoj senpage.**
- **Por MONATO raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.**
- **En MONATO la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vigle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.**
- **MONATO estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.**
- **MONATO plilarĝigas vian spektron de interesiĝo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.**
- **MONATO pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktita en bona hodiaŭa Esperanto.**

Abonu ĝin nun!
La unuaj tri numeroj estos senpagaj!

Skribu al MONATO,
Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio,
aŭ rete al eldonejo@MONATO.be aŭ, eĉ pli facile,
uzu tuj nian formularon en
http://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3.3.php

AGRABLAN LEGADON!